

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084
Treasurer (Kasisto): F-ino A. Dennys, 9 Cathers Court, 41 Frenchs Road
Willoughby, N.S.W., 2068

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350
Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro. 81(161)

MELBURNO

Jan.-Feb. 1970

HARMONIA 17-a KONGRESO EN PERTH

Urbo de la Estonteco por la lingvo de la Estonteco

4-a ĝis 9-a de Januaro 1970

Kongresanoj el la orientaj ŝtatoj de Aŭstralio, vojaĝinte al la bordo de la Hinda Oceano kaj sin trovante en la klarepura aero de la okcidenta ĉefurbo, kies multaj inpone modernaj nubskrapuloj pure reliefigas kontraŭ blua ĉielo, povus kredi, ke ili ĵus plenumis vojaĝon al "Kazohinio". Tamen, ne per ŝipo, sed plejparte per luksa klimatizita trajno, trans la vastan ebenajn "Nullarbor" (neniu arbo), laŭ la plej longa rekta fervojo en la mondo, ili alvenis; kaj tute ne kiel perditaj ŝippereuloj ili staris ĉe la nove konstruata Finstacio, ĉar tuj vidiĝis la verdaj flagoj kaj bonvenigaj ridetoj kaj mansalutoj de la atendantaj okcidentaj gesamideanoj, inter kiuj elstaris kiel gvidanto A.E.A. Vicprezidanto "Bill" Howard, ne nur gvidanto, sed, laŭ ĉiu senco de la esprimo, "Giganto" de la 17-a Kongreso.

Mencii nur lin, kompreneble estus maljuste. Lin akompanis kaj subtenis aro da entuziasmaj helpantoj, kies gravaj kontribuoj al la glata evoluo de ĝuplena kongresprogramo montriĝis en la jena raporto. Dank' al ilia efika kunlaboro, ĉiu alveninto estis persone eskortita kaj, en privata aŭtomobilo, transportita al sia loĝejo.

Propaganda Laboro

La informado de la gazetaro, radio kaj televido estis bonege preparita. Jam en la transaŭstralia trajno kongresanoj

aŭdis en la novajservo de A.B.C. raporton pri la kongreso kaj la okazigo de Di-Servo en Esperanto. Preskaŭ ĉiutage aperis artikoloj en la 2 Pertaj gazetoj, i.a. intervjuo kun "Tiny" Goldsmith en "West Australian" kaj kun Ken Linton en "Daily News" (kun la populara kolumnisto Kirwan Ward). La privat-komerca T.V. Stacio N-ro 9 intervjuis S-ron Linton kaj la A.B.C. Televida Servo disaŭdigis la malfermon de la kongreso kaj la komencon de la parolado de S-ro Ken Linton. Okulfrapa en la stratoj estis la bela kongresinsigno kaj granda nomkarto portata de ĉiu kongresano. Sendube Pertho sciis ke E-Kongreso okazas en ĝia urbo!

La kongreso komenciĝas:

La plimulto de la kongresanoj loĝis en la bela hotelo "Forrest House", en St. George's Terrace, preskaŭ en la urbocentro, kies tri diversprezaj restoracioj bone taŭgis por ĉies poŝo. Kiel kongresejo funkciis la subtera, luksa bankeda halo, kie kongressekretario "Bill" Howard disdonis la kongresdokumentaron. En bela plasta ujo ĉiu kongresano trovis ne nur siajn insignon, kongreskarton kaj ekskursbiletojn, sed ankaŭ aron da belaj broŝuroj pri Perth kaj Okcidenta Aŭstralio, kun la komplimentoj de la Hon. C. W. Court, Ministro por Industria Evoluo.

S-ino Ivy Fallu (Melbourne) instalas

en la kongresejo la A.E.A. Libro-Standon, ĉe kiu deĵoris ankaŭ S-inoj Jessie Gray kaj Olive Hunt (la nova libro-peranto por Okcidenta Aŭstralio) Kongresanoj eluzis la oportunojn kaj aĉetis librojn en la valoro de proks \$118.

Alĝis al la kongreso 75 ĝes-anoj, el kiu 64 fakte ĉeestis. Laŭŝtate venis el Okcidenta Aŭstralio 29, el Viktorio 18, el Nov-Suda Kimrujo 11, el Suda Aŭstralio 3 el Kvinŝlando 1, el Tasmanio 1 kaj el Anglujo 1. (Kompare 57 ĉeestis la Pertan kongreson en 1954).

La Di-Servo:

Digna komenco de la kongresprogramo estis la Di-Servo, dimanĉvespere (4/1) preparita de Ges-roj Hugh kaj Ruth McGrath. S-ro McGrath gvidis la legadon kaj respondojn, F-ino O. Stempel legis el la Evangelio laŭ Sankta Johano, S-ro Chris Dean pianludis kaj S-ro Ken Linton (Melburno) predikis laŭ la temo "Ĉu Jesuo Kristo ne estus Esperantisto, se li vivus hodiaŭ?" Li citis multajn ekzemplojn, kiuj montris lingvistan konon de Kristo pri la lokaj lingvoj tiutempaj. Monkolekto por blindaj esperantistoj rezultigis sumon de \$23.38.

La Oficiala Malfermo

Lunde posttagmeze (5/1) okazis la oficiala malfermo de la kongreso. Post enkondukaj vortoj de la kongressekretario (W. H. Howard), bonvensalutis la Prezidantino de la Okcident-Aŭstralio E-Ligo, S-ino Ruth McGrath. A.E.A. Prezidanto, S-ro Ken Linton, deklaris la kongreson malfermita. Li rakontis pri la tri etapo de A.E.A. depost la 2-a mondmilito. La unua etapo estis ĝia renaskiĝo en la jaro 1948, kiam Herbert Koppel alvenis en Aŭstralio de Kanado, kaj revivigis la preskaŭ mortintan organizon. La dua etapo komenciĝis en la jaro 1956 kiam li mem transprenis la postenon de kasisto kaj metis A.E.A. sur finance fortan fundamenton. La tria etapo komenciĝis en 1968 kiam alia enmigrinto, S-ro C. C. Goldsmith, transprenis la postenon de sekretario kaj nun dediĉas sian tutan tempon al A.E.A.-aferoj.

Sekvis nun la salutoj de diversaj organizajoj: S-ro Goldsmith legis salutojn de U.E.A., S-ro V. Gueltling salutis en la nomo de S. A. T. kaj S-ro V. J. Timmins nome de Internacia Ligo de E-instruistoj. En la nomo de la aŭstraliaj E-klubo salutis: S-ino D. Sinclair (Sunshine Coast E-klubo), S-ro F. Mueller-Sorau (Sydney E-Soc.), S-ro R. G. Robertson (Manly E-Klubo kaj N.S.W. E-Federacio) S-ro I. Maddern (Morwell E-Klubo), S-ro Arnold Baldwin

(Melbourne E-Soc.), S-ro R. Reed (Orientaj Antaŭurboj Melbourne), F-ino W. Addis (Adelaide E-Klubo) kaj S-ro J. Finch (E-Ligo de Okc. Aŭstralio).

Urbesta Akcepto

Marde tagmeze (6/1) okazis la Urbesta Akcepto. Iom antaŭ tiu horo, elegante vestita kongresanaro ekiris de la Hotelo "Forrest House" por marŝi laŭ St. George's Terrace ĝis la impona, ankoraŭ nova "Council House". Tie, sur la kvara etaĝo, pro la feria foresto de la Ĉef-Urbestro mem, lia deputito la Vic-Urbestro Cliff Harris akceptis unue, privataŭdiencie, AEA-Prez. K. Linton kaj S-inon Linton kaj Kongres-Sekretarion W. Howard kun S-ino Howard. Dume aliaj kongresanoj kolektiĝis en la granda, bele tapiŝita halo, de kie ili ĝuis ravajn panoramojn de la Rivero Swan, kaj kie funkciuoj regaligis ilin per trinkaĵoj kaj sandviĉoj.

Ĉeestis ankaŭ i.a. S-ro O'Connor, Ministro por Transporto, S-ro J. T. Tonkin, gvidanto de la ŝtata opozicio (kiu cetere malfermis la Pertan kongreson de 1954) kaj la japana konsulo. Post apero de la Vic-Urbestro li alparolis la tutan ĉeestantaron al kiu li deziris sukcesplenan kongreson. S-ro Linton danke respondis nome de la Esperantistoj, esprimante bedaŭron pro la ĝisnuna izoliteco de Okcidenta Aŭstralio kaj esperon pri pli federala sinteno kaj agado en la estonteco.

Labor-Kunsidoj:

La kongresprogramo antaŭvidis 4 AEA-Kunvenojn, sed pro la harmonia etoso kiu regis, oni nur bezonis du sesiojn por zorge pridiskuti la tagordon. Mankis senutilaj debatoj kaj disputoj pri malgravaj, kiuj nur malhelpis la kongreson en Manly. La ŝparitan tempon ni utile uzis por ekstra literatura prelego kaj por diskuto pri la plej bonaj varbmetodoj.

S-ro K. Linton malfermis la A. E. A. kunvenon kaj la ĉeestantoj observis minutojn da silento por la mortintaj gesamideanoj dum la pasintaj 2 jaroj (S-roj Len Newell kaj D-ro A. Fridenbergs kaj S-ino Violet Fraser). Poste S-ro Goldsmith laŭlegis saluttelegramojn de la Redcliffe kaj Canberra Klubo kaj de la "Business & Professional Blind Guild of Australia".

Pri la agado de la Asocio raportis "Tiny" Goldsmith. Pro la neĉesto de la Kasistino (F-ino A. Dennys) S-ro Goldsmith prezentis ankaŭ la bilancon. (Vidu ambaŭ raportojn aliloke). S-ro Goldsmith legis ankaŭ la raporton de la Redaktoro (S-ro F. R. Banham) kaj tiun de la Presoficisto (S-ro Petley) La Vic-

Sekretario (S-ro H. Koppel) raportis pri sia vizito al la 34-a Nov-Zelanda E-Kongreso en Januaro 1969 kaj pri paŝoj entreprenitaj al kunlaboro kun NZEA.

Laŭ la raporto de la Liro-Servo (S-ino I. Fallu) la neta profito inter 30-a Junio 1968 kaj 30-a Junio 1969 estis \$406.01. La Brisbana E-Soc. aĉetis la plimulton de la libroj (por \$192.78) Ni ricevis libromendojn de du pliaj mezlernejoj, nome de Queechey High School (Tasmanio) kaj Hamilton High School (Viktorio). Lastatempe ni ricevis ankaŭ mendojn de la Universitato Monash por E-libroj de ĝenerala intereso.

Ĉiuj raportoj estis unuanime akceptitaj de la membraro.

Sekvis la elekto de la nova Estraro. La kunveno akceptis proponon de S-ro Koppel ke la Nestoro de nia movado, D-ro C. J. Caldera, prezidu la elektadon. S-ro V. Timmins proponis S-ron K. Linton kiel Prezidanton (subtenis S-ro V. Gueltling). S-ro Koppel proponis S-ron W. Howard kiel Vic-Prezidanton (subtenis S-ro Linton, S-ino R. McGrath proponis S-ron I. Maddern kiel Vic-Prezidanton (subtenis S-ro Chandler). D-ro Caldera proponis S-ron C. Goldsmith kiel 1-an Sekretarion (subtenis S-ro Maddern). S-ro Howard proponis S-ron H. Koppel kiel 2-an Sekretarion (subtenis D-ro Caldera) S-ro Goldsmith klarigis ke pro laborpremo F-ino A. Dennis ne plu povas okupi la kasistan oficon kaj li proponas S-ron Les Scott (Manly), Subtenis S-ino Cleminson. S-ro Goldsmith proponis S-ron H. Petley kiel Public-Oficiston (subtenis S-ro Linton). La membraro voĉdonis kaj elektis la sekvantan novan Estraron:

Prezidanto: S-ro K. G. Linton (Melburno).

Vic-Prezidantoj: S-ro W. H. Howard (Perth), S-ro I. T. Maddern (Morwell)

1-a Sekretario: S-ro C. C. Goldsmith (Manly)

2-a Sekretario: S-ro H. Koppel (Melburno)

Kasisto: S-ro Les Scott (Manly)

Publikaj Rilatoj: S-ro H. V. Petley (Toowoomba)

Kaskontrolisto: S-ro G. Thatcher

Interliga Oficisto kun Nov-Zelando: S-ro H. Koppel (Melburno)

Sekvis viglaj diskutoj: Propono de S-ro Goldsmith ke ni estonte fermu la kontojn je 30a Nov. (subtenita de V. Gueltling) estis akceptita. S-ro H. Koppel proponis ke AEA havu Honoran Diplomon por personoj kiuj donis elstaran servon por nia movado. S-ro Robertson demandis

ĉu tiu diplomo estu ankaŭ por ne-Esperantistoj, kiuj dum la dujara periodo inter du kongresoj elstare laboris por la movado. La kunveno elektis tripersonan komisionon kies tasko estas ekzameni ĉu vere estis farita elstara laboro kiu indas la honordiplomon. La elektita komisiono konsistas el: S-ro V. Gueltling (Sydney), S-ino Fay Koppel (Melbourne) kaj S-ino Ruth McGrath (Perth).

S-ino R. McGrath proponis ke la nomoj de asociaj membroj aperu en la adresaro kune kun la individuaj membroj. (Propono akceptita). Akceptita estis ankaŭ propono de F-ino O. Stremplek ke ni havu publikan kunvenon por ne-Esperantistoj ĉe niaj kongresoj. Fine S-ro H. Koppel proponis ke la kongreso sendu saluttelegramon al D-ro Ross Robbins, kiu pro la longa distanco ne povis veni el Port Moresby. S-ro Chandler subtenis tiun proponon kaj la kongreso sendis ĉi tiun telegramon al D-ro Ross Robbins: "Deksepa Aŭstralia Esperanto-Kongreso salutas, bedaŭras neĉeeston, sed esperas revidon Melbourne Januaro 1972."

En la nomo de la Melburna E-Societo, S-ro H. Koppel invitis la 18-an Kongreson al Melbourne; ĝi okazu de la 2-a ĝis la 8-a de Januaro 1972. Tiu propono estis akceptita kun la deziro ke la 1974-a kongreso laŭeble okazu en Brisbano.

La U.E.A. Kunvenon prezidis la Ĉef-Delegito S-ro K. Linton. Kelkaj delegitoj raportis pri informetoj ricevitaj. S-ro Linton alvokis la ĉeestantojn ke ili daŭre subtenu U.E.A. kaj ke ili akceptu postenojn de fakdelegito. Ni bezonas multe pli da fakdelegitoj en Aŭstralio!

La S.A.T. Kunvenon gvidis la Peranto S-ro V. Gueltling. Li legis interesan artikolon el franca SAT-gazeto kaj varbis novajn membrojn.

La ĝeneralan kunvenon de A.I.E.A. ("Asocio por la Instruado de Esperanto en Aŭstralio") prezidis S-rino Gertrud Pollard. La Sekretario/Kasisto, S-ro V. Timmins raportis ke la enspezoj (\$146.25) superis la elspezojn (\$43.09) je \$103.16. La Asocio havis 66 membrojn en 1968 kaj 81 en 1969.

S-ro W. Chandler (redaktoro de "Klerigo") raportis ke la aspekto de la gazeto multe pliboniĝis pro la fakto ke la E-Asocio de NSW provizis novan multobliligilon, kaj de nun eĉ pagos por la ŝablonoj kaj papero. Li dankis la multajn fervorajn kontribuantojn kaj li anoncis, ke en la estonteco ĉiu eldono havos specialan temon. (N-ro 36 havos la temon "Impresoj pri la 17-a Kongreso") D-ro C. Caldera denove estris la elekton de la nova estraro, kiu nun konsistas el:

Prez: S-ino G. Pollard (Perth), Vic. Prez: S-ro I. Maddern (Morwell), Sekr./Kasisto: S-ro V. J. Timmins (Sydney), Redaktoro: S-ro W. Chandler (Sydney).

La membraro akceptis proponon ke S-ro Maddern petksribu al la Edukada Departemento de Viktorio, ke la Ministerio sendu lin kiel oficialan observanton al la Universala Kongreso en Vieno. Ĝi ankaŭ esprimis la deziron, ke la aŭstralia asocio fariĝu membro de la Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj.

Prelegoj:

Entute 4 prelegoj estis prezentitaj, el kiuj tri pritraktis E-temojn. D-ro C. J. Caldera (Perth) Priparolis la temon "Esperanta Instruado". Li priskribis la diversajn instrumentojn, la rektan kaj la gramatikan. Li rakontis pri propraj spertoj kaj konkludis pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de ambaŭ sistemoj. Lin sekvis S-ino Fay Koppel (Melbourne), kies titolo "De Z al A en tri Epokoj" kasis skizon pri la Esperanto-Literaturo de Zamenhof al Auld.

La prelego de S-ro Ken Linton (Melbourne) instruis pri "La Metriko en la Esperanta Poezio". Ĉi-tiu jam estis pli efika pro la sur diapozitivaj ekzemploj kiujn li montris dum li parolis. Pritraktante la temon "Kial mi estas Vegetarano", S-ro Volo Guelding (Sydney) klarigis, ke li fariĝis vegetarano ĉar iam doktoro malsukcesis kuraci haŭtmalsanon, kaj li mem pli sukcesis per dieto.

Distraĵoj kaj Ekskursoj:

Lundvespere (5/1) okazis la **Subĉiela Rostfesto** ĉe la hejmo de S-ino E. Palmer en la antaŭurbo Applecross; nur je la komenco de la vespero kelkaj minacaspektaj nuboj levis timojn pri la vetero. Feliĉe tiuj diskrete fortiris sin, kaj idealaj kondiĉoj benis la vesperon. Ankoraŭfoje lokaj samideanoj deĵoris kiel taksiaŝoforoj por transporti kongresanojn de la hotelo al la bela ĝardeno de S-ino Palmer, kie, sub altaj arboj lumigitaj per diverskoloraj lampoj kaj sur grand razeno ĉirkaŭita de floroj kaj arbedoj, estis aranĝitaj tabloj kaj seĝoj. Kelkaj tabloj jam estis ŝarĝitaj per multspecaj manĝaĵoj, eĉ vegetaranoj ne estis forgesitaj, kaj ĉe unu flanko de la razeno troviĝis en vico aro da kradrostiloj pretaj por la kuirado. Ĉiu partoprenanto ricevis sian propran plaste-vitvan pakajon da viando por mem rosti laŭ gusto, kaj dum iom da tempo ĉiuj okupiĝis pri la kuirado kaj manĝado; sed baldaŭ la satigitaj homoj povis direkti sian atenton kaj konversacion al pli kulturaj aferoj. Kantado kap muziko kontribuis al ĝuplena kaj memorinda okazaĵo.

Dankon al S-ino Palmer kaj al ŝiaj helpantoj!

La **Koncerto**, vere internacia, okazis en la Kongresejo, merkredon vespere (7/1) Ĝi estis organizita de D-ro Einihovici, kiu ankaŭ prezentis la artistojn. Gracia meksika danco de solodancistino kaj energia hungara danco de 2 junaj gedancistoj komencis la programon. Kantoj en pluraj lingvoj de tri tre diversaj, sed altrangaj artistinoj ravis la orelojn de la ĉeestantaro. S-ino Peterson kaj F-ino Grasson prezentis kantojn el famaj operoj, kaj F-ino Allen inter kelkaj neĝuraj kantoj prezentis ankaŭ "La Vojon" en Esperanto.

Anoj de la E-Ligo prezentis du skeĉojn, kiuj elvokis ridadon. S-inoj Gray, Blockley kaj Lindsay amuze montris la malsaĝon paroli nediskrete "En la kuracista atendejo", kaj F-ino O. Stempel kaj S-ro W. Howard tre profesiece rolis por prezenti ekzemplon pri rapida disrompiĝo de geedza harmonio, kiam "Li penis rakonti al sia Edzino." F-ino Lindsay amuze monologis en skota lingvo, kaj S-ro Fritz Mueller-Sorau prezentis mikspoton da esperantajj — ŝercoj, rakonto kaj kantado. S-ro Linton esprimis dankon al D-ro Einihovici kaj al la artistoj, kiun la aŭdantaro subtenis per aplaŭdo.

La Kongresa programo inkludis tri ekskursojn. La unua, mardvespere (6/1), estis, aŭtobusa rondveturo por montri la urbon sub lumoj. Post apudaj urbaj vidindaĵoj, la aŭtobuso laŭiris la bordon de la Rivero Swan ĝis altaĵo, kie situas populara hotelo "Brighton", kaj de kie partoprenantoj rigardis ravajn panoramojn. Reveno estis laŭ novekonstruitaj aŭtosoŝoseo (Kwinana Freeway) kaj ponto (Narrows Bridge), kun halto poste en Rezervejo (King's Park) por vidi novan memorfontanon.

Dua ekskurso, merkredon posttagmeze (7/1), konsistis el ripoziga veturado per pramo sur la dancantaj ondetoj de la Rivero Swan, kies largeco kaj helblua koloro tie pli similas al maro ol al rivero. Denove la suno ridetis kaj ideala vetero certigis plezuron al la partoprenantoj, kiuj ĝuis klarajn vidaĵojn de la urbaj konstruaĵoj kontraŭ fono de blua ĉielo kaj la fora montaro Darling. La pramo sekvis la bordon de la rivero preskaŭ ĝis Fremantle antaŭ ol reveni, kaj babilantaj veturantoj povis revivigi la gorgojn per tetrinkado survoje. Bedaŭrinde mankis la cigoj, de kiuj la rivero ricevis sian nomon.

La tria ekskurso (vendredon, 9/1) estis tuttaga kaj komenciĝis en du aŭtobusoj, kiuj veturis suden laŭ la rivero Swan ĝis

la havenurbo Fremantle kaj poste laŭ la Hinda Oceano tra la industria regiono "Kwinana" (indigena vorto por "bela fraŭlino"), kie oni rafinas petrolon kaj fabrikas ŝtalon, aluminon kaj superfosfatan sterkon. La ĉiam ŝanĝiĝanta pejzaĝo inkludis popularan vizitejon Rockingham, apud la Golfo Cockburn Sound, kiu fariĝas haveno por la produktado de la regiono, kaj multajn allogajn strandojn survoje al urbetlo Mandurah, ĉe kies kajeto atendis padelboato, "River Queen". Sur ĉi tiu ĉiuj pasaĝeroj komforte daŭrigis la veturadon nun laŭ mara ŝanelo kaj trans la Golfeton "Peel", preter multajn insuletojn, sur kiuj vidiĝis kolonioj de birdoj multspecaj — majestaj pelikanoj kaj graciaj nigraj cignoj elstaris el amasoj da sovaĝoj anasoj, mevoj kaj aliaj. Fine la boato atingis la elirejon de la rivero Murray, kies kurson ĝi sekvis al la hotelo "Ravenswood" (tre ŝatata de mielmonatuloj). Sur apuda herbejo kaj kun bona apetito la ekskursantoj lunchis el individuaj skatoloj kaj grandaj pletoj da abrikotoj kaj vinberoj, antaŭ ol fari la revenvojaĝon.

La Kongresa Vespermanĝo.

Ĵaŭdespere (8/1) okazis en la kongresejo la vespermanĝo, vere digna aranĝo, kiun partoprenis 65 personoj. Presitaj menukartoj sciigis en Esperanto la prezentotajn manĝaĵojn kaj la ordon de la tostoj, kun la nomoj de la proponantoj. Krome, ĉiu manĝanton ricevis lokkarteton kun serpentranta indigena floro.

Post bongustaj manĝaĵoj, miksitaj kun gaja babilado, Tostestro Ivan Maddern proponis la toston al la Reĝino, kaj kun interspacoj sekvis aliaj tostoj.

S-ro W. H. Howard, Sekretario de la loka Esperanto-Ligo, proponis la toston al A.E.A., kiun respondis S-ro Ken Linton.

S-ro H. Koppel (Melbourne), nome de la vizitantoj, proponis toston al la E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio, al kiu respondis la Prezidantino, S-ino Ruth McGrath.

Sekvis prezentado de donacoj. S-ro K. Linton skizis la multmeritan laboron de D-ro C. Caldera por la starigo de Aŭstraliaj ekzamenoj kaj transdonis al li malgrandan donacon (monujon). S-ino I. Fallu, nia Libro-peranto, ricevis el la manoj de la Prezidanto transitoron kaj F-ino V. Cox, kiu regule ekspedas nian gazeton, ricevis virinan mansakon. S-ro W. H. Howard, nome de la Kongreskomitato, dankis S-ron C. Goldsmith pro multaj konsiloj donitaj kaj transdonis al li faldeblan ombrelon. Fine, la Kongressekretario, S-ro W. H. Howard, ricevis valizon pro sia granda penado aranĝi tiel ĝuplunan kongreson.

Fermo de la Kongreso.

Antaŭ ol fermi la kongreson (8/1), S-ro K. Linton transdonis la parolon al S-ro H. Koppel. Tiu klarigis, ke pasintjare ĉe la 34a Novzelanda E-Kongreso li partoprenis "gravan seminarion"; gvidatan de la konata "Profesoro" Bertram Potts, kiu instruis lin "Kiamaniere fariĝi E-verkisto". Tiujn "gravajn" instruojn de la "Profesoro" S-ro Koppel transdonis al la aŭskultantaro, kies ridado atestis, ke ĝi ricevis la instruojn en la sama spirito, en kiu ili estis donitaj.

En sia fina parolado, S-ro Linton dankis la Partianojn pro ĝinda kongreso, alvokis al plua laboro por Esperanto kaj esprimis la esperon revidi ĉiun ĉeestanton en Januaro 1972 ĉe la 18a Kongreso en Melbourne.

La kunveno finiĝis per kantado de "La Espero".

A. E. A. en 1968-69

Estas tiom raportinda ke mi devas esti konciza, sed poste mi volonte respondos al informpetoj laŭ la ebleco.

Antaŭ du jaroj vi elektis min sekretario, sed preskaŭ tuj poste mi reiris al Anglujo por enordigi aferojn tie antaŭ ol migri al Aŭstralio. Dum mia foresto Herbert Koppel faris la sekretarian laboron kaj pro tio mi tre dankas al li. Reveninte meze de Julio 1968 mi iris al Melbourne por diskuti planojn pri estonta agado kun nia Prezidanto, S-ro Ken Linton kaj S-ro Koppel. Ni facile interkonsentis pri tiuj, kaj la nuna raporto donas la ĝisnunajn rezultojn.

Membraro. Je la fino de 1967 nia Asocio havis 206 individuajn membrojn kaj 49 asociajn; sume 255. Hodiaŭ ĝi havas 338 individuajn membrojn kaj 43 asociajn; sume 381. Ni celis pligrandigi la individuajn membrojn 50%; la efektiva kresko estas 60%.

Publicigo. Ni presigis 3,000 ekz. de la brita libreto "Freedom of Speech" aliigita tiel ke ĝi estu taŭga por Aŭstralio. Por disvastigi tiujn ni presigis la verdajn kartojn, kiujn supozeble vi ĉiuj jam vidis, kaj ni petis niajn membrojn helpi la distribuadon. Multaj tion faris kun bonaj rezultoj sed mi opinias ke ne pli ol triono de niaj anoj partoprenis tiun agadon. Mi devas speciale menciinian publicigan oficiston, S-ron Petley, kiu sukcesis aperigi multajn bonajn leterojn en ĵurnaloj en diversaj lokoj de la lando. Lia adreso estis ofte en tiuj leteroj, kaj rezulte li ricevis pli ol 300 petojn por nia broŝuro. Tiujn li sendis al mi kaj mi sendis la informon. S-ro Petley

prezentos apartan raporton, kaj mi estas tre danka al li pro lia bonega kunlaborado. Ĝis la 29a de Decembro ni ricevis entute 1225 informpetojn, sed pripensus kiom pli granda estus tiu cifero se ĈIU ANO estus kunlaborinta.

Al ĉiu informpetanto ni sendas ekz. de la broŝuro, aliĝinto por la Populara Koresponda Kurso, liston de kursoj, grupoj, kaj Lokaj Re prezentantoj en lia ŝtato, kaj informon pri disko kiu klarigas la prononcadon de Esperanto. Rezulte, ĝis nun ni ricevis 76 aliĝojn al la kurso, kiun jam kelkaj finis kaj nun studas per la Mezgrada Kurso, al kiu jam aliĝis 44 personoj. Ni ankaŭ ricevis 6 aliĝojn al la Altgrada Kurso. Ni nun havas 15 instruantojn por la Elementa Kurso, 12 por la Mezgrada, kaj 6 por la Altgrada.

Lokaj Re prezentantoj. Ni havas nun 59 L. R. en diversaj regionoj, sed ni deziras ricevi la nomojn de aliaj pretaj helpi al ni. La devoj estas simplaj, nome:

1. doni pli da informo pri Esperanto al tiuj, kiuj tion deziras;
2. se necese, doni al lernanto informon pri la prononcado (NE instrui lin—temas ĉefe pri lernantoj per korespondaj kursoj);
3. varbi Esperantistojn kiel individuajn membrojn de A.E.A.

Publicigo Fonduso. Nia ordinario enspezo tute ne sufiĉas por subteni ĉi tiun agadon. Ni do starigis Publicigan Fonduson. La celo indikita estis \$2500 kaj ĝis nun ni ricevis \$525. Ni sincere dankas al ĉiu helpinto. Tiu sumo estas preskaŭ eluzita, kaj la restanta sumo estas nun proksimume \$15. Felice ni ankoraŭ havas sufiĉajn ekz. de "Freedom of Speech" por eble 9-12 monatoj, sed ni ĵus ricevis alian dek mil verdkartojn, kies pago postulos pli ol la malgranda restaĵo. Per la Populara Kurso ni faras bonan profiton kaj tio helpas al la Fonduso, sed aliaj donacoj tiucele estos tre bonvenaj, ĉar preskaŭ certe ni devos represi "Freedom of Speech" antaŭ la fino de la jaro.

Interŝtata Konkurs. Por stimuli agadon ni starigis Interŝtatan Konkurson, pri kiu informo aperas ĉiumonate en la A. E. La nuna stato estas 1 Kvinlando; 2 Viktorio; 3 Nova S. K. 4 Okcidenta Aŭs. 5 Tasmanio; 6 Suda Aŭs.

Ni gratulas Kvinlandon pro tiu bonega progreso, ŝuldata al la bonaj laborantoj tie, kiuj sukcesis transdoni sian entuziasmon al siaj rekrutoj.

Financoj. Sur alia paĝo vi vidos ke la kreditsaldo je la komenco de la dujara periodo estis \$745 kaj je la fino estas \$1486, malgraŭ la granda kresko en la elspezoj.

Gazeto. Dum la lastaj du jaroj 17

numeroj aperis, kvankam en la bilanco vi legos pri nur 16, sed la Decembra numero aperis post ties pretigo kaj estos en la kalkuloj por la venonta periodo. Se nia nuna progreso daŭros ni esperas eldoni ĝin ĉiumonate, krom ke estos nur unu numero por Januaro-Februaro pro la libertempoj. Antaŭ kelkaj monatoj Citizen Printers, kiu presis la gazeton dum multaj jaroj, informis, ke ili ne plu povos tion fari. Nia prezidanto felice trovis novan presiston, Macrae Press, kiu kontentige presis la lastajn numerojn. Tamen la kosto plialtiĝis proks. \$50, kaj unue ni pensis, ke ni devus redukti la nombron da eldonoj anstataŭ ĝin pligrandigi. Sed post zorga kontrolo de nia financa stato eventigis, ke ni povus fari laŭ nia deziro. Mi ja deziras vidi nian gazeton kun pli da paĝoj kaj iom da ilustraĵoj, tiel ke ĝi estu la organo de evidente vigla movado. Tio ebligis nur se la nombro da membroj daŭras kreski. Do helpu nian publican agadon kaj agu kiel verbantoj, ĉar en Aŭstralio estas multaj E-istoj kiuj ne estas individuaj membroj de A.E.A.

Nia redaktoro, S-ro F. R. Banham, havas amason de legmaterialo, sed li bonvenigos novajn kaj viglajn artikolojn. Al li ni dankas, ankaŭ al F-ino V. Cox, kiu tre bone prizorgas la dissendadon de la gazeto.

Libroservo: Fidele administras ĝin S-celo I. Fallu. Dankon!

Ekzamenoj: Sukcesoj en la ekzamenoj estas raportataj en la Oficiala Informilo en nia gazeto. La nombro da ekzamenoj pligrandigas. Membroj devus provi sian scion per ekzameno por pruvi, ke ili ne estas ĉiamaj komencantoj! Espereble nova Adresaro aperos post nelonge. En ĝi oni trovos la indikojn pri ĉiu sukcesa ekzameno **konata de ni.**

Esperanto en Aŭstralio ne dormas. Ni progresas, sed ni povus progresi pli rapide, se ĉiu partoprenus, age kaj ideo. Ĉiu senescepte povas helpi, eĉ per kotiz-paĝo sen troa prokrasto.

Sinceran dankon al ĉiu helpinto atingi tiun kontentigan rezulton. Ĉiuj amikoj! Nin subtenu ankoraŭ daŭre dum la nuna periodo.—C.C.G.

KOTIZO AL U.E.A.

Sur p. 288 ni erare informis, ke la kotizo por Membro-Abonanto estas 6.50. S-ro Linton avizis, ke jam ĝi altiĝis ĝis 7.50 Aŭstralia mono.

"OOMOTO"

Lingve tre klara, ampleks' malavara, je kosto malkara. 6 numeroj jare: 1.60. Peras la redaktoro de "A.E."

**LA KONGRESANARO**

The zinc plates for these Congress photographs were generously given by Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne, as a mark of sympathy with our movement, through our President, Mr. K. G. Linton.

**CONSOLIDATED FINANCIAL STATEMENT FOR THE TWO-YEAR PERIOD
ENDED 5 DECEMBER, 1969**

RECEIPTS

1966-7	Balance 31/12/1967			
\$663.97	General Account	\$588.67		
145.99	Special Account	156.12		\$744.79
	Subscriptions —			
	1967	16.50		
317.20	1968	642.60		
332.60	1969	897.00		
	1970	128.00		
17.56	1971-80	50.50		1734.60
	Dumvivaj Membroj			117.00
13.00	Examinations (net)			48.95
16.25	Donations			5.98
	"E.A.N.S.W."			102.00
	"The Australian Esperantist"			
4.25	Subscriptions	4.65		
.20	Sales	3.90		
1.00	Advertisements	10.00		18.55
	16th Australian Congress			
62.60	20% of Fees	104.00		
18.80	Profit	72.44		176.44
	Bank Interest —			
49.70	General Account	60.20		
10.13	Special Account	14.57		74.77
	Intermediate and Advanced Correspondence Courses —			
	Receipts	296.00		
	Expenditure	254.80		
	Profit			41.20
	PUBLICITY FUND			
	Donations	\$522.57		
	Popular Course —			
	Receipts	\$352.40		
	Expenditure	218.79		
	Profit	133.61	133.61	
	Publicity Expenditure		656.18	
			644.70	
	Balance (included in bank figures)			11.48
				\$3075.76

Zamenhof estis junulo, kiam li kreis Esperanton; Privat estis junulo, kiam li ekaktivis por Esperanto; Lapenna estis junulo, kiam li unue organizis Esperanto-agadon. Subtenu la junularon, aniĝante al Tutmonda E-ista Junulara Organizo. Vi ricevas bultenojn kaj gazeton "Kon-takto". Peras K. Linton.

MORTO

S-ino Jessie W. Langtree, 78-jara, en Kimrujo, 6 Feb. Ŝi estis aktiva E-isto en Australio antaŭ ol ŝi migris al Britujo.

ERAROJ EN NUMERO 80

Plumeraro, p.301. Sub "J.L. Cobbin":
legu: "la dua red. de . . ."
Preseraroj: p. 304, sub "Names of . . ."
Legu: "internationale chosen".
"Princess Anaemia". Ses linioj de sube,
2-a kol. "bonvolu".

FINNLANDO

Depost la Univ. Kongreso en Helsinki la membraro de UEA kreskis preskaŭ 40-procente — de 251 ĝis 348. La favora pres-raportado estis tre kontentiga.

EXPENDITURE

		1966-7
"The Australian Esperantist" —		
16 issues to November 1969	\$1032.35	\$800.44
Postage	113.41	70.51
Printing and Stationery	223.51	55.94
Fees to U.E.A.	51.75	32.38
U.E.A. for Esperanto-Domo	76.00	
Aliĝo al Esperanto Co-op. Ltd.	26.00	
Gifts	44.10	
Receipt Duty and Exchange	12.36	
Sundry expenses	10.25	4.85
Balance 5/12/1969 —		
General Account	\$1198.34	588.67
Special Account	287.69	156.12
	1486.03	
	\$3075.76	

Audited and found correct
(Signed) GEORGE THATCHER
17/12/1969.



Ĉe la malfermo: De maldekstre dekstren: Goldsmith (Manly), S-ro Ken Linton (Perth), S-ro W. H. Howard (Perth),

S-ro I. Maddern (Morwell) S-ro Cecil (Melbourne), S-ino Ruth McGrath (Perth), S-ro Herbert Koppel (Melbourne).

ĈU ANTAŬDIRA ?

Ĉe-kiam bildoj kvazaŭ vive agos,
kaj sub la naro ŝipoj fiŝe naĝos,
kaj homoj eĉ la birdojn preterflugos
en sango tuta duonmondo kuŝos.
(Jen veskvaro skribita antaŭ 500 jaroj
sur tomboŝtono en regiono Essex en
Anglujo)

"MELB. ESPERANTO NEWS"

Since June 1968 this tastefully compiled and neatly produced 4-page two-monthly has regularly appeared. It contains personal notes and news of local activities. Five cents a copy. 2122T., G.P.O., Melb. 3001.

AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO OFICIALA INFORMILO

21an de Januaro 1970

Dumviva Membro

Hunt, F-ino O., Cottesloe, W.A.

Individuaj Membroj

Giles, S-ino E., Collaroy, N.S.W.
Gibson, S-iro W., Munbubbera, Qld.
McKay, S-ino E. E., Mosman Park, W.A.
Kennedy, S-ino J., Norman Park, Qld.
Martin, S-ino S., Salisbury, Qld.
Wright, S-ro D. A., Camp Hill, Qld.
Grigg, S-ro D., Research, Vic.
Dimo, S-ino J., Rochester, Vic.
Boorgaard, S-ino T., Semaphore, S.A.
Williams, F-ino B. C., Camberwell, Vic.
Bradley, S-ino B. J., Ringwood, Vic.

Donacoj al la Publiciga Fonduso

Jam anoncita	\$496.87
Anonimulo, W. A.	2.00
Simpson, S-ro A. R., Vic.	10.00
Goldsmith, S-ro C. C., N.S.W.	6.00
Fr. of Sp. 1969	7.70
Smith, F-ino B., Qld.	3.00
Strempe, F-ino O., W.A.	1.00
Tronerud, S-ro E. C., Vic.	5.00
Boorgaard, S-ino T.,	3.00
Curtis, F-ino A., Qld	1.00
Grafen, S-ro W. C., Vic.	1.00
Hopkins, S-ino A., Vic.	2.00
Smith, S-ro C. M., Qld.	2.00

\$540.57

Sinceran dankon al ĉiuj helpanto.

Interŝtata Konkurso Poentoj donataj

Nova Individua Membro	5
Nova Dumviva Membro	50
Aliĝo al la Populara Kurso	2
Aliĝo al la Mezgrada Kurso	5
Aliĝo al la Altgrada Kurso	10
Sukceso ĉe la Elementa Ekzameno	2
Sukceso ĉe la Altgrada Ekzameno	5
Sukceso ĉe la Klereca Ekzameno	10
Ĉiu \$ al la Publiciga Fonduso	1

Stato je la 21a de Jan. 1970

	Kvoto	Poentoj	%
Queensland	130	417	320.8
Victoria	300	642	214.0
N.S.W. & A.C.T.	260	486	187.0
W. Australia	80	147	183.7
Tasmania	30	29	96.6
S. Australia	40	12	30.0

La konkurso finiĝos unu monaton antaŭ la venonta kongreso..

Lokaj Rerezentantoj

Orange, N.S.W. S-ro F. Acs.
Subiaco, W.A. F-ino J. Gray
Wembley, W.A. S-ino A. Sedgley
C. C. Goldsmith,
Sekretario.

A.E.A. Ekzamenoj

Elementa:

Margaret Elyena Furness, Cooromandel Valley, S.A.;
Beryl Enid Randles*, Kensington Gardens, S. A.;
Frank Derwent Vawser*, Prospect, S.A.

* kun honoro.

EINO LOORITS

POLA RADIO donacis imponan diplomon al li danke pro partopreno en la konkurso lige kun la 25-a datreveno de la Pola Popola Respubliko. Filatelisto, li gajnis dum dek jaroj kelkajn premiojn de la Pola Radio. Foto kaj ses-cola raporto aperis en "The Hobart Mercury". Telegramon en Esperanto (26/8/69) sendis al li la Internacia E-ist Ferio en Medzygorze, responde al lia saluto.

Gratulon al nia fervora sam-o kaj sindonema bonfaranto ĉe novvenintoj al Aŭstralio. Li estas fakdelegito de U.E.A. en Hobarto.

VE-PLENDO PRI VERKEMULOJ


"Altrudiĝas impresoj, ke iuj aŭtoroj kaj redaktoroj sidas en ebura turo kaj verkadas nur por si mem, pro privata plezuro, pro intelekta ĝuo, aŭ pro literatura ambicio. Sajnas, ke ili tute ne pensas pri la kompatinduloj, kiuj legos iliajn produktojn, nek pri la esenca celo de nia lingvo: ebligi al mult-milionoj da homoj ne super-instruitaj, facile interkompreniĝi en la tuta mondo". — A. Lienhardt, en "Heroldo de E." 16 Okt. (En "The A.E." aperas sen klarigo nur vortoj trovataj en la vortaroj de S.A.T. (P.V. kaj Supl.), Waringhien, Butler aŭ Wells. Vortare netrovebla vorto ricevos difinon, por klarigi ĝian sencon. Krome, por faciligi konsulton de vortaro, streketo estos uzata ĉe iaj kunmetadoj. — Red.)

AFRANKA (TRO)ABUNDO?

De Israelo venis gazeto sub koverto havanta p.m. je valoro 0.90, supozinde nebagatela sumo en kiu ajn mono. Tio elokvente parolas pri la malavaremo de la sendinto kaj lia amo al la bela dekorado. Ĉu ĉiuj liaj samlandanoj tiel agadas? Se jes, ili, ĉesinte la cetero (ad)mirindan praktikon, povus ĉiujare grave kontribui al kosto de aviadilo F111.

TOMBO ŜEKSPIRA

Pro Jesu', ne fosu, amiko ĝentila, la polvon ĉi tie; ĝi restu trankvila. Benota la homo ĉi tombon zorganta; malbenoj por li miajn ostojn movanta.



**Go out
to the
world
with
*QANTAS***

RECENZOJ

Arĉoj. Sonetaro. GERALD MATTOS. Beletraj Kajeroj: eld. Stafeto, J. Regulo, Tenerife. 144 paĝoj. Prezo. 1.50 U.S. dol. aŭ egalvaloro.

Kiam Mattos prezentas klare konceptitan ideon, li sin esprimas per trafa vortuzo, interalie ĉe la satira "Kristnasko", la kompata "Lamulo", la komika "Gasisto". Tiuj estas tradukindaj.

Male, ĉe "Juĝisto", "Cie Homa" kaj aliaj la dirvolo ne tuj sin evidentigas. Homo povas esti princo de la poezia plumo, tamen foje maltrafi per sia produkto, se mankas al ĝi la klare inspira potenco, kiu jam eternigis amatajn kantojn por miliono.

Cu oni ne rajtas diri, ke granda porporcio de la poemoj en ĉi-libro defias tradukadon? Provu nur: traduku laŭvorte en la nacian lingvon. Se ĝi faras sensecaĵon aŭ estas preskaŭ nekomprenebla, aŭ tute nenatura, ĝin forjetu.

La 109 sonetoj kovras vastan kampon de impresionisma sent-esprimo kaj atestas teknikan talenton, sed bedaŭre ili tro malofte impresas per rekta kontakto kun la inteligento, de la meza leganto. La "maturiĝo" de iuj poetoj lokigas ilian verkon ekster la atingo-mensa de homoj satantaj sencon pli ol vers-lingva lerteco.

Admirantoj de la poemego "La Infana Raso" trovas plezuron, penante premi sencon el "Sperante" kaj "Sutte Alla" (tiell), verkita laŭ fantasta lingvaĵo, kiu similas al ia burlesko de "Pra-Esperanto". Mankas traduko de tiu galimatio, ankaŭ bezonata glosaro. Uzo de vortoj kiel: sunogivo, oprima, ungelane, geloj, ne helpas al komencantoj kaj progresantoj, kiujn ni instigas generi amon al la E-literaturo.

Prof-o Waringhien tributas per kompetente klariga enkonduko, trafe traktante la metron kaj pens-atmosferon de la Sudamerika poeto. Iuj tamen kontestus lian diron, ke tute for-estas en la poemoj ia nebuleco, "simbolisma" aŭ alia.

Nestante en sia eburna turo, dorlotatoj de la Muzoj riskas malkonsideri legantojn sen tiu dia beniteco. Psika ĝuo, volupta lukto por elesprimi siajn subjektivajn viziojn, prenas lokon prefere antaŭ la pura plezuo paroli rekte al iliaj simplaj kunhomoj. Tion oni ne rajtus apliki al Mattos; tamen la averto audiĝu en la oreloj de ĉiu poeto.

La Infana Raso: WILLIAM AULD. Poemo en 25 ĉapitroj. Dua eldono.

prinotita. 124 paĝoj. 1.50 U.S. dol. aŭ egalvaloro. Eldonis STAFETO.

En poŝformato, jen nova eldono de poemego nomata de iuj: la plej grava originala poezia fortostreĉo en E-o; aŭ, "la ĉefa atingajo de nia originala literaturo post la dua mondmilito". Ĝi kaŭzis vastan eksciton kiam ĝi aperis en 1955 kun fervora enkonduko de John Francis. Por la dua eldono Vilmos Benczik taksas la verkon laŭ vido al ĝi post dek du jaroj, dum kiuj inteligentuloj provadis sondi ĝian pens-profundon serĉe al interpretoj de multo mistera. En tiu tasko legantoj jam havas helpon de la aŭtoro, kiu provizis en ĉi libro 25 paĝojn da nete kompilitaj notoj. Dankinda laboro, kiu multe valorigas la volumon. Li atentigas pri nur unu teksta sanĝo (ĉap. 19, linio 24). Ilustraĵoj de George McIntosh feliĉe anstatauas nebulajojn de la unua eldono.

La nuna recenzanto, jam en La Rondo, 3/57, elplumis sian senton kaj penson pri la verko, kaj tiu artikolo restas por li ankoraŭ neŝanĝinda.

Presiĝis nur 1000 ekzempleroj. Do tuj mendu la verkon, kiu certe restos dum jardekoj iu el la plej signife mirindaj faroj en nia literaturo.

Esperinde, ke iam estontece profesiaj kleruloj solenc ĝin saĝumos en universitataj aŭditorioj.

El la Polvo de la Tero: Enkonduko en la Grundsciencan. Wm. F. Rolt. Stafeto eldonis. 144 paĝoj, ink. 8 fotobildaj. 1.80 U.S. dol. Eldonis Stafeto.

Prave plendante pri manko de teknika vort-provizo en E-o, la Novzelanda aŭtoro per sia verko faris grandan kontribuon al tiu terminaro — Vortareto por Grundsciencistoj, kun difinoj de kemiaj elementoj, rokoj kaj mineraloj. Ĝi estas lokita fine de la libro, plena de flue legebla kaj informriĉa teksto. El funda scio li pritraktas inter alia: la originon, teksturon, klasifikon, kutivadon de grundo, ĝian bazajn bezonojn, sterkojn, ankaŭ la homan dieton.

Saĝe posedus la libron ĉiu E-ista terkultivanto, ĉu sur bieno meje vasta, aŭ sur doma ĝardeno. Cetere, la ĉapitro pri dieto portus profiton al homoj en kies manoj malofte troviĝis semoj kaj ŝpato.

La aŭtoro laŭde mencias la verkojn de Neergaard: Atakoj Kontraŭ Ĝardenplantoj, kaj La Vivo de la Plantoj. Ambaŭ estas haveblaj ĉe B.E.A.

Copy by every 14th, please.—

H. Koppel.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 82 (162)

MELBOURNE

Marto, 1970

PARALLEL TRANSLATION

Here is an amusing incident from the Congress in Harrogate (1961). Whilst on a trip to the Lakes District I was seated for lunch at a table for four. The others were two Germans (husband and wife) and a French lass, none of whom had any English, or at best only a few words. The French girl took out of her bag a French-English dictionary in order to be able to order what she wanted to eat, so I said: "You won't need that — I can speak English". — So she put it away.

Presently the waitress came to our table and in the broadest possible Westmorland dialect said something which, of course, I couldn't understand. I asked her pardon, and she repeated what she had said, but again I had to ask her to repeat it. Whereupon the German, smiling with gentle sarcasm, remarked: "Apparently you don't understand English either." We all had a good laugh about it. — Letter to the editor.

Ĝen incidento ĉe la Kongreso en Harrogate. Vizitante la Lagoregionon, mi sidigis por lunci ĉe tablo kvarseĝa. La ceteraj okupantoj estis du Germanoj (geedzoj) kaj Franca junulino. Neniu el ili povis paroli la Anglan, aŭ, minimume nur kelkajn vortojn. La Francino prenis el sia mansaketo vortaron Franc-Anglan, por ke ŝi povu mendi iun manĝaĵon. Mi do diris: "Tiun vi ne bezonas; mi Angle parolas". Tial ŝi for-metis la vortaron.

Baldaŭ venis al nia tablo kelnerino, kiu adريس nin per plej dialekta idiomo de provinco Westmorland. Ĝin mi kompreneble ne povis kompreni. Mi petis pardonon. Ŝi ripetis la diron, sed ankoraŭfoje mi devis peti ŝin ripeti. Je tio la Germano, ridetante kun ĝentila sarkasmo, rimarkis: "Estas klare, ke ankaŭ vi ne komprenas la Anglan lingvon". Ĉiuj tablanoj laŭte ridis pro lia diro. — El letero al la redaktoro.

EL LETERO DE T. JUNG.

Li atentigas pri N-ro 75, p. 262: "... tute adekvata recenzo! Nur — ĉu mi pledis pri plisimpligo de E-o? Pli ĝuste — por konservo de laŭebla simpleco, ĉu ne?"

N-ro 77, p. 277: "Retrovita . . . " "Vere memorinda efiko de la interlingvo; de longe mi ne legis pri simile sukcesa helpo per E-o. Sampaĝe, Diskutinda

Diro: ankaŭ al mi Kabe ŝajnas stilisto ĝis nun ne superita (eble jam atingita), almenaŭ en tradukoj.

Grabowski fakte ne povas ĉe tia komparo esti nomata samspire kun Kabe".

(Estas notinde, ke Len Newell en letero (Majo 1963) skribis: "Pri Kabe: li estis unu el la niaj plej grandaj tradukistoj, sed ne tiel unika, kiel oni ofte volas kredi, kiel stilisto. Mi povus facile nomi dek kiuj almenaŭ egalas lin".)

**AUSTRALIAN ESPERANTO
ASSOCIATION
OFFICIAL INFORMATION**

13th February, 1970

New Members

Norcott, Mrs. E., Deception Bay, Q'ld.
Sleigh, Miss B., Redcliffe, Q'ld

Donations to the Publicity Fund

Already acknowledged	\$540.57
Horsburgh, Mrs. R. L., N.S.W.	2.00
Clarke, Mrs. J., Q'ld	1.00
Clarke, V. C., Q'ld	1.00
V. E. F., N.S.W.	1.00
Arnold, Miss D., N.S.W.	1.00
Bate, Mrs. L., Q'ld	2.00
C.C.G., N.S.W.	2.00
Mayall, Mrs. J., Vic.	1.00
MacDonnell, F., Q'ld	1.00
"Freedom of Speech"	5.10
Maddern, Miss D., Vic	1.40

\$559.07

Sincere thanks to each helper.

Interstate Competition

	Quota	Points	%
Queensland	130	442	340.0
Victoria	300	650	216.6
W. Australia	80	155	193.7
N.S.W. & A.C.T.	260	501	192.7
Tasmania	30	29	96.6
S. Australia	40	18	45.0

Local Representatives

Cottesloe, W.A. — Miss O. Hunt
Mosman Park, W.A. — Mrs. S. Blockley
Perth, W.A. 6100-7 — Mr. J. Finch
Victoria Park, W.A. — Miss A. Longson

At this time of the year we ought to be enrolling many new members. Are your Esperantist friends members? The more members we have the more success we can hope for when we approach authorities. C. C. Goldsmith, Secretary.

Dumvivaj Membroj de A.E.A.

Grant, S-ro S. H., Port Lincoln, S.A.
Hanney, S-ro R. J., Adelaide.
Hunt, F-ino O., Perth.
Linton, S-ro K. G., Melbourne
Maddern, S-ro I. T., Morwell, Vic.
Koppel, S-ro H., Melbourne.

Dumvivaj Membroj de U.E.A.

Addis, F-ino W., Adelaide.
Caldera, D-ro C. J., Perth
Carrick, F-ino E. B., Brisbane.
Cooper, S-ino H., Hobart.
Duncan, S-ino M., Manly, N.S.W.
Francis, Fratino M., Hobart
Grant, S-ro S. H., Port Lincoln, S.A.
Hanks, S-ino I. H., Melbourne
Hanks, S-ro E. S., Melbourne
Hanney, S-ro R. J., Adelaide.
Hodge, F-ino M., Adelaide.

Koppel, S-ino F., Melbourne
Linton, S-ro K. G., Melbourne.
McGrath, S-ino R., Perth.
Maddern, S-ro I. T., Morwell, Vic.
Matasin, S-ro J., Sydney.
Pollard, S-ino G., Perth.
Robbins, D-ro R. G., Port Moresby.
Schwerin, S-ino K. R., Sydney.
Serišev, Pastro I., Sydney.
Woodruff, S-ro E. W., Moree, N.S.W.

1970

LA PERFEKTIGA JARO

Make it so, by working through the AEA Progressive Intermediate Correspondence Course. This is a really good and interesting course; so say the 45 students now doing so.

Competent tutors correct your work and help to put you on the right track.

Send today for details to:
Australian Esperanto Association,
P.O. Box 415, Manly, N.S.W. 2095

**17th Australian Esperanto Congress
8th List of Enrolments:**

Late supplementary list:

No. 26 Dr. A. Einihovici (Perth)
27 Mrs. A. Einihovici (Perth)
28 Mr. J. Finch (Perth)
29 Miss O. Stempel (Perth)
30 Mrs. E. McKay (Perth)
94 Mrs. T. v. d. Boogaard
(Adelaide)

95 Miss A. I. Spinks (England)
State Distribution: W.A. 30, Vic. 22,
N.S.W. 14, Q'ld. 4, S.A. 3, Tas. 1,
England 1 — Total 75.

Copy for inclusion in "Aŭstralia Kroniko" should reach the sub-editor, Mr. H. Koppel (41 Byfield Street, Reservoir, Vic., 3073) NOT later than 12th of each month.

ESPERANTAJ GAZETOJ

"Espero Katolika" fondiĝis en 1903, sed suferis paŭzon en eldonado.

"Esperantische Mitteilungen" fondiĝis en 1904 kaj ricevis la nomon "Germana E-isto" en 1905. Ĝi pereis sub la Nazia teroro.

"The British E-ist" fondiĝis en 1905. En 1906 ĝi enkorporigis: "The Esperantist" (fond. 1903) kaj estas la plej seninterrompe malnova E-gazeto en la mondo.

"Esperanto" fondiĝis en 1905. Ankaŭ ĝi suferis paŭzon, nur kelkmonatan.

"Amerika E-isto", fondita en 1906, jam de longe ne plu aperas.

"La Brazila E-isto" fondiĝis en 1907.

DO YOU KNOW THAT:

Jules Verne was an enthusiastic Esperantist? ("New Statesman" 15/9/56). Although he was nigh 80 when he died in 1905, he was writing a book the theme of which was Esperanto ("Lingvo Internacia", 1905).

"The Vicar of Wakefield" (Goldsmith) has been running through "The British E-ist". The long ballad in chapter 8 is in two versions, that of Rossetti and that of Auld. Compare the merits of the two translations. In 1969 by October there have appeared 54 Sonnets of Shakespeare translated by Simon Aarse. Become a subscriber to The B.E. and regularly enjoy the rich and varied content of this national E-organ..

The Ilustrita Plena Vortaro should be in hands here early this 1970.

A new educational revue, Internacia Pedagogia Revuo, comes out this January. Teachers, turn to H. Sonnabend, 3161 Dollbergen, Im Eckerskampsfeld Ila. Germany.

The most frequent letters in Esperanto, taken from 7883 roots in La Plena Gramatiko, are ARET. Strangely, ĵ (38) and not ĥ (39) proved the least used. ("Esperanto", 10/69).

That Ezra 7/21 contains every letter of the alphabet except ĵ, originally the same as I. And in Esperanto: ŝajnas, ke la sagaca monaĥo laŭvoĉe rifuzadis preĝi sur herbajo. Now make one up yourself.

Budapest Univ. gives training in Esperanto teaching. Seven students in 1969 received diplomas for teaching Esperanto in secondary schools. ("Worker E-ist").

KONGRESANINO PAROLAS

S-ino Gertrude Pollard skribis: "Ankoraŭ trudas pensoj pri la mirinda Kongreso en Helsinki, pri la karaj samideanoj el diversaj landoj, pri la paroladoj de eminentuloj . . . precipe Ivo Lapenna, tiu majstro en la mondo de Esperanto . . . miaj pensoj vagadas, kaj mi haltas fojon post fojo por revii.

... en la landoj, kiujn mi vizitis — speciale Ĉeĥoslovakio kaj Hungario — mi uzis Esperanton, ĉar mi loĝis ĉe la hejmoj de korespondantoj. Neniu tie povas paroli la Anglan. En Budapeŝto mi renkontis Usonaninojn, kiuj perdis la vojon kaj deziris reveni al la hotelo Mi devis sciigi mian Hungaran amikinojn pri

ilia ĝeno. Si Esperante diris, ke ni akompanu ilin al la hotelo. Tion ni faris. Tiel mi agis kiel interpretisto kaj informis ilin pri la valoro de Esperanto. Ili tre interesiĝis, kaj mi esperas, ke ili klopodos pri la lernado, kiel ili tiutempe deziris estonte fari."

LONGAJ KUNMETAĴOJ

D-ro Lehman Wendell en "Esperanto Internacia" (Junio 1946) pontifike skribis, ke la Esperanto Biblio "estas verkita en tre simpla stilo, kaj ĝi estas literatura majstrajo". Ni konsentas. Malaprobante la longajn kunmetaĵojn, Wendell plue asertis: "Kiam oni legas la verkojn de Zamenhof oni ne bezonas krakojn kaj paperon por dismembrigi liajn vortojn . . . oni tuj komprenas, ĉar la vortoj estas simplaj . . ."

Tio instigas al ni komenti pri kelko, kion ni kribris el la Biblio. Z. ne troe aŭ troimplyke formis kunmetaĵojn, sed verdire donis al ni atentindajn ekzemplojn de la arte kunmeta vorto. Ekz., tendaranaro (Juĝistoj 7/21); malcedemigis (Readmono 2/30); nemalobebla (Ester 1/19); makulokululo (Levidoj 21/20); penetrigintaĵo (Levidoj 13/55). Nekonfeseblajn faktojn (Fundamenta Krestomatio, 9-e eld., p. 298). En la literaturo oni iufoje trovas "nemalhavebla"

Iu kritikis la vorton "malaktualiĝintaj". Ĝi estis uzita por traduki "dated", "of little or no present-day interest". "Eksmoda", "elmodiĝinta" eble taŭgas; tamen tiuj vortoj pensigas pli ĝuste pri fasono vesta.

Ni konfesas, ke en iom rapida parolado, aŭskultantoj verŝajne ne tuj komprenus la signifon de nekutima kunmetaĵo, pro neceso mense analizi ĝiajn elementojn. Ordinare, tiaj kunmetaĵoj estas iom arte fabrikitaĵoj de la aŭtoro aŭ oratoro, do ne en ĝenerala uzado. Tamen, certe en la skribita lingvaĵo, Zam. mem ne hezitis uzi longajn kunmetaĵojn, kondiĉe ke ili estis klare, logike kaj sufiĉe facile analizeblaj laŭ la leĝoj de la vortfarado. Bona konsilo: Legu la Esperantan Biblion kaj la ceterajn verkojn de Zam. kaj ĝeneraligu la formojn de li tie uzitajn.— F.R.B.

PLUMNOMOJ

Farbo — (F)r(A)nk (R)eginald (B)anham.

Karlo Madrigalo: Charles Ballard (la dua redaktoro de La Suda Kruco) elektis tiun kiel plumnomon. Guste elektinta tamen estus: Kalvulo — ballard (Oxford E. Dict.).

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: En la supera instruista kolegio okazis (16/11) la skriba provo pri Esperanto. Ok studentoj partoprenis; unu el ili brile sukcesis kun poentaro 100%. Aliaj ricevis respektive 95% (2), 92%, 87% (2) kaj 75%. Entute la rezulto estis kontentiga, ĉar la kurso konsistis de nur unu 45-minuta leciono semajne. Laŭ raporto de D-ro C. Caldera).

ADELAIDE: Deko da gesamideanoj kunvenis (15/12) en la domo de S-ino Thea v.d. Boogaard en Semaphore por kune festi la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof. Ili aŭskultis surbendigitajn prelegojn kaj kantojn. Poste la gastigantino regaligis ilin per vespermanĝo.

MELBOURNE: Pri la Fajenca Arto parolis S-ro E. McKenzie (24/11). Post historia skizo pri la diversaj metodoj en pluraj landoj, S-ro McKenzie montris kelkajn specimenojn faritajn de lia edzino kaj klarigis la metodojn. S-ro H. Koppel, 1/12, donis humoran monologon "Kiel fariĝi E-verkisto"; samvespere S-ino F. Koppel legis ŝercojn el la libro "Necenzurita Humoro". S-ro Kim Bastin (9/12) resumis artikolon el "Biblia Revuo", tre scienca esploro rilate la naskiĝdaton de Kristo.

La 4 E-societoj de Melburno partoprenis (13/12) komunan Zamenhofan-feston ĉe Y.W.C.A. en Russell Street. La kunveno malfermis Kim Bastin per pianludado, post kiu S-ro E. McKenzie bonvenige salutis la 55-personan ĉeestantaron nome de la "Melburna E-Societo kaj prezentis reprezentantojn de la aliaj grupoj. Salutis S-ro R. Reed (E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj), S-ino A. Paling (Orrong Grupo) kaj S-ro I. Heldzingen (Boronia-Grupo).

Sekvis ĝuplena muzikfesto. Vere poluritan prezentadon donis la horo de la Orrong-Grupo. S-ino Dorothy Theyer ĉarmis per dolĉa kantado en Esperanto kaj Kim Bastin plue ludis kaj sola kaj por gaja komuna kantado.

Ridado elvokis la Boronia-grupo per melodramo "La Hipoteko", kiun reĝisoris S-ro I. Heldzingen. S-ro Arnold Baldwin donis koncizan raporton pri la elstaradoj de 1969 kaj la esperoj por 1970, kaj la ĉefparolanto, S-ro F. R. Banham pritraktis la temon "La 3 doloroj de D-ro Zamenhof", en kiu li trafte komparis la vivon de la Majstro kun tiu de Jesuo Kristo. Ambaŭ suferis doloron pro-mondan, doloron pro interamika malpaco kaj doloron korpan (vivbatalan).

Kantado de "La Espero" kaj la kutima refreŝiga manĝeto kompletigis la tre sukcesan vesperon.

Dua, pli intima, sed malpli granda Zamenhof-Festo kaj Jarfina Festo okazis en la Esperanto-Domo (15/12). Denove pianludado de Kim Bastin ravis la orelojn dufoje. S-ro Harold Beechey daŭrigis plurjaran tradicion, parolante pri sia "Kvina Paŝo" en la lernado de Esperanto. S-ro H. Koppel distris per deklamado de ŝercpoemoj de Raymond Schwarz, kaj S-ro Ken Linton legis artikolon de Gaston Waringhien rilate la saĝecon de D-ro Zamenhof koncerne la fruan evoluon de nia lingvo.

SYDNEY: S-ro Frank Franjiĉ, 17/11, enkondukis sian prelegon pri la mandolino per kelkaj rimarkoj pri la origino kaj aĝo de la instrumento; poste li ludis multajn muzikajojn. S-ro F. Mueller-Sorau (24/11) legis el diversaj libroj kaj gazetoj pri kelkaj kuriozaĵoj. Lumbildparoladon pri la reklamarto faris S-ro V. Burlin (1/12). S-ino M. Skodova por la lasta fojo vizitis nian klubon antaŭ ol reflugi al Prago.

La 13-an de Decembro okazis la Zamenhof-Vespero. Ĉeestis 36 personoj. La vespero komenciĝis per kantado de "La Espero", post kiam la sekretario bonvenigis la kunvenintojn kaj klarigis ke la prezidanto rompis la ŝlosilon de sia aŭto kaj pro tio estos malfrua. S-ro V. Burlin legis poemon de D-ro Zamenhof, unue en rusa lingvo kaj poste en Esperanto. La festparoladon faris S-ro E. W. Chandler. Li akcentis la superan literaturan valoron de Esperanto kompare al aliaj lingvoprojektoj. S-ro F. Mueller-Sorau kantis 2 ĉehajn kantojn kaj rakontis la historion de "Felikso la Kelonio". Poste 13 anoj de la Sydney E-Soc. legis la poemon "Brolgo". La vespero finiĝis per babilado kaj vespermanĝeto.

Je 15/12 ni pridiskutis la reklamon por la venontjaraj kursoj kaj la klubprogramon. S-ino E. Brandman ludis sur akordiono kaj la vespero rapide pasis per kantado kaj ludoj.—VOLO.

BRISBANE: Okazis nia Zamenhofa Festo (4/12) ĉe la naĝejo "Aspley". Ĉeestis proks. 60 personoj. S-ino V. Robinson recitis interesan fabelon kaj S-ino N. Callaghan rakontis neordinaran sperton ŝi havis pasintjare en Nov-Zelando. Niaj grupanoj ludis teatraĵeton, kaj nia prezidanto, S-ro Karl Gunster, faris pensinstigan festparoladon. Alia teatraĵeto ludita de S-ro Gunster kaj Tom Donnelly kompletigis la programon. Estis diskutito kaj babilado inter la ĉeestantoj, kiuj ankaŭ ĝuis bongustan manĝon.

Bedaŭrinde ni devas raportiti ke S-ino V. Yowe, survoje al la festo, suferis motorakcidenton. Ni deziras al ŝi baldaŭnan resaniĝon.—Tom DONNELLY

REDCLIFFE: Atingis la kompilanton de la "Aŭstralia Kroniko" la jara raporto, kies ĉefaj eroj jam aperis en antaŭaj numeroj. Aldone, la Sekretario estis en kontakto kun la skoltestroj, kiuj akceptis Esperanton kiel temon por la lingvo-insigno.

La nova estraro konsistas el: Patrono: S-ino A. Pritchard; Prez. S-ino Jessie Clarke; Vic.Prez: S-ino V. Clark; Sekretario: S-ino Elsie Norcott; Kasisto: S-ro V. Clarke; Informado: S-ino L. Memmott; Libro-Servo: S-ino J. Clarke.

Esperanto-Federacio de N.S.W.: Nia Kristnaska Festo en ligo kun la Manly-a Klubo okazis 14/12 en la domo de S-ino Ruth Carruthers ĉe Balgowlah. 46 membroj kaj gastoj ĝuis gajan kunvenon kun babildado, kantado kaj vespermanĝo. Vic-prezidanto W. Chandler faris dankparoladon al Ruth pro ŝia gastameco.

Nia venonta konferenco kaj 3-a Jar-kunveno okazos 14/2 en la E-Domo en Redfern. Elektigis la nova estraro por 1970 kaj post temanĝo okazos muzika kaj interamikiga vespero.

—George THATCHER

KARAKTERO DE GENIULO

Schleyer, la inventinto de Volapuk, insistis, ke la lingvo apartenas sole al li kaj postulis rajton nuligi decidojn de la Akademio. Rezulte la afero tute frakasigis, kaj la ĉefaj Volapukistoj komencis fabriki aliajn projektojn. Volapuk fiaskis, tunc pro sia esenca maltaŭgeco kaj malfacileco, kaj due pro la diktatoreca karaktero de ĝia "patro".

E-o estas kompare tre facila. Kaj Zamenhof fordonis ĉian rajton al ĝi. Krome li estis milda, tolerema. Lia grandanimeco montriĝis precipe dum la malpacaj krizoj inter la kolegoj. Lia sagaca sinteno, takto, diskreto, ofte moligis malagrablajn situaciojn. Tiu grava faktoro — la sinofera karaktero de Zamenhof — verŝajne savis E-on el la perejo, kiu trafis Volapukon. Oni ne ofte emfazas tion — eĉ ne rimarkis.

SHOLOM ALEICHEM

Al Gerald Browne, Mosman, ni ŝuldas la jenan informon: En letero (1910) al D-ro Ferfel, red. de "Le Vegetarisma Observanto" (Kievo) Salom Alejhem (Esperanta formo) skribis: "Mi ricevis leteron de D-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Li petis permeson traduki iujn el miaj rakontoj en Esperanton". Sekvas laŭdo kaj firma fido al E-o.

Pluraj aperis en E-o. "La Gimnazio" el la Jida (Judgermana) troviĝas en "La Revuo" (Marto 1910), kaj jarojn poste, "Ĉe Doktoro". Ambaŭ haveblas ĉe

UEA.

Povas esti, ke Alejhem ne estas la plej fame granda Juda verkisto, sed certe li estas la plej amata. Lia arte naiva bonhumoro estas riĉe ĝu-dona.

BELŠACAR (Heine)

Jen nokta horo jam malfrua en urbo Babilon' senbrua; sed en kastelo altesida jen flama torĉo, sono rida. Jes, tie en la reĝa domo, monarh' bankedis. Ĉiu homo ĉetablis en kolora vesto — bonega vino, gaja festo! Pokala tinto, krud-diboĉo, altiklis plaĉe al la Moŝto. Al li la vangoj ardis forte; en li prudento velkis morte — ebrie volis li al krimo; blasfemi Dion ĝis ekstremo. Fiero lia, mok' malpia, fi-plaĉis al la grupo fia. La reĝo ordonvoĉe muĝis — obee sklavoja paŝe fluĝis — orvazoj, el la templo Dia, nun servis al malbono ĉia. Ekprenis nun la reĝo, skue, sanktajon plenan, superflue, eltrinkis ĝin ĝis fundafeĉe, ŝaŭmbuŝe kriis pulmostreĉe: "O Jave, jam vin gardu bone, ĉar regas mi en Babilono!" Jus ehis foren la blasfemo, jen boris koron stranga timo. La kunfestantoj ne plu ridis, sed paralize korprigidis, ĉar jen: sur tiu muro blanka literoj flagris, flank-ĉe-flanke. Kun membroj tremaj, vizag' morta. la reĝo sentis sin senforta. La uloj liaj, pro teruro, nur gapis mute al la muro. La magiistoj, post cerbumo, konfesis sin sen ajna lumo. — Taĝiga lum' kastelon tuŝas en kiu reĝ' murdita kuŝas. — Trad. F.R.B.

Jave — Jehovo, la Eternulo.

Komparu: Daniel 5. Belŝacar estis mortigita de Medoj kaj Persoj, kiuj invadis la kastelon en tiu sama nokto.

EN ZURICH?

Apud la stacidomo en Zurich estas restoracio, kies estro ankaŭ E-istojn bonvenigas. Turistoj, iru tien.

KAJ EN SOFIO ?

Ankaŭ la Hotelo Vitoŝa estas Esperantista. Laŭ la Informa Servo de U.E.A., akceptistoj, kelneroj kaj hotelanoj ĵom komencis lerni la Internacian Lingvon.

LA KONGRESA PEDIKO

Kiam Nia Sinjoro, Jesuo Kristo, estis inter sia propra popolo, li parolis la aramean lingvon, kiu estis la lingvo de la hejmo kaj de la familiaj rilatoj. Tion ni povas facile konstati el la Sanktaj Skriboj, kie S-ta Marko skribis ne-tradukitaj kelkajn arameajn vortojn. En ĉapitro 5, verso 41, li skribis: "Kaj preninte la manon de la infanino, li diris al ŝi: Talita kumi; tio estas: Knabine, mi diras al vi: levigu". Denove, en ĉapitro 7, verso 33, ni legas: "Kaj kondukinte lin el la homamaso en apartan lokon, li metis siajn fingrojn en liajn orelojn, kaj kraĉinte, li tuŝis lian langon; kaj suprenrigardinte al la ĉielo, li ĝemis, kaj diris al li: Efata (Ethphatha), tio estas: malfermiĝu. Kaj liaj oreloj malfermiĝis, kaj la ligilo de la lango malstreĉiĝis, kaj li parolis klare." En ambaŭ ĉi tiuj kazoj Jesuo parolis al la popolo de sia propra gento, kaj do uzis la lingvon de tiu gento, la aramean.

Sed Jesuo scipovis alian lingvon. Eĉ kiam li estis nur 12-jara li parolis al la pastroj en la sinagogo per la klasika hebrea lingvo. Profesoro Moore, tiu elstara aŭtoritato pri la hebrea lingvo, jam pruvis, ke la rabenoj en siaj debatoj uzis specialan akademian formon de la klasika hebrea, kaj ĝuste tiun lingvon Jesuo kapablis. En Marko 7:11, kie Jesuo parolis al la skribistoj kaj fariseoj, ni povas legi la vortojn: "Sed vi diras: Se iu diros al sia patro aŭ sia patrino: Korban". Tiu "korban" estis tia akademika vorto, kiun uzis nur la rabenoj. Ĉar Jesuo parolis al rabenoj, li uzis tiun rabenan lingvon.

Jesuo tiel bone parolis tiun rabenan lingvon, ke la publiko nomis lin "Rabeno", kiu signifas "Majstro" aŭ "Instruisto", kiel ni povas konstati en

Johano 1:38: "Kaj Jesuo sin turnis, kaj vidis ilin sekvantajn, kaj li diris al ili: Kion vi serĉas? Kaj ili diris al li: Rabeno (tio estas Majstro), kie vi loĝas? Kaj denove en Marko 12:13 "Kaj ili sendis al li iujn el la fariseoj kaj el la Herodanoj, por impliki lin per interparolado, kaj veninte ili diris al li: Majstro." De tio ni povas konstati, ke eĉ la fariseoj nomis lin Majstro, ĉar li parolis tiel bone la rabenan lingvon, la akademian klasikan hebrean.

Sed Jesuo uzis eĉ trian lingvon. Ni jam vidis, ke li parolis la hebrean aramean lingvon kaj la sinagogan hebrean, sed en siaj rilatoj kun homoj el aliaj rasoj li devis uzi tion, kio estis la tiutempa internacia lingvo, la "lingua franca de la periodo". La Evangelio kaj la tuta Nova

Testamento estis skribita en tiu lingvo, la greka. En Marko 4:25 ni legas: "Kaj grandaj homamasoj lin sekvis el Galileo kaj Decapolis (la dek grekaj urboj), kaj el Jerusalema kaj Judujo kaj el trans Jordan". S-ta Luko eĉ aldonas: "kaj el la marbordo se Tiro kaj Sidon".

En Marko 7:24 ni legas: "Kaj irinte de tie, li venis en la limojn de Tiro kaj Sidon. Kaj enirinte la domon, li volis, ke neniu sciu; sed li ne povis esti kaŝita. Sed aŭdinte pri li, iu virino, kies filino havis malpuran spiriton, venis kaj falis antaŭ liaj piedoj. Kaj la virino estis grekino, rase sirofenika". Rase ŝi estis sirofenika kaj parolis la rasan lingvon, sed intrerise ŝi devis paroli la grekan lingvon, do oni nomis ŝin grekino.

La plimulto de la popolo kun kiu Jesuo intermiksiĝis, tute ne komprenis la aramean lingvon, des multe malpli la hebrean, do Jesuo alparolis ilin en la greka lingvo, kaj en tiu lingvo Jesuo prezentis sian nekompereblan predikon sur la monto.

Kaj nun mi venas al la grava demando: Se estus hodiaŭ, ke Jesuo vivus sian surteran vivon, ĉu li estus Esperantisto? Kion vi opinias? Rimarku liajn vortojn en tiu prediko sur la monto: "Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj". Ĉu ne estas Esperantistoj veraj pacigantoj en la mondo hodiaŭ? Mi vere kredas, ke Jesuo tute aprobus nian internan ideon kaj benus niajn pacajn batalantojn.

Ni preĝu al Li en la vortoj de Zamenhof, ke Li lasu nin venki la baron, ke Li donacu benon al nia laboro, forton al nia fervoro, kaj ĉiam nin tenu kurajaĝ.

Ĉu estus Jesuo Esperantisto? Mi opinias, ke jes, ĉar "Komprenu unu la alian" estas la unua kaj esenca paŝo al la ideala "Amu unu la alian".

—Ken Linton, antaŭ la Kongreso en Perto. Li dankas al Pastro Cowling pro ties helpo en la afero.

Plum-eraroj: N-ro 81, p. 2, kol. 1, linio 2: Legu: F-inoj Jessie Gray kaj Olive Hunt.

P. 4, kol. 2, linioj 18-19: Legu: F-inoj Gray kaj Lindsay, kaj S-ino Blockley. P. 1, lasta linio: Melbourne.

ESPERANTO EN D.D.R.

Plendinte al W. Dietze en Lejzpigo pri daŭra konfiskado de "Sennaciulo", S.A.T. ricevis respondon, ke nur E-gazetoj el orientblokaj landoj estas allasataj ĝis nun en la Demokratian Respublikon Germanan. —"Sennaciulo", Okt. Do vanas sendi ilin.

"**Biblia Revuo**", Aŭg.-Okt. Redaktoro D. Broadribb detale pritraktas enigmon: La Konvertiĝo de Paulo, sur bazo de la atestaĵo en la Bibliaj libroj: Galatanoj, Korintanoj kaj Agoj. Poste li ekzamenas psikajn faktorojn. Pacience penante akordigi la sesajn rakontojn pri la evento, li trovas nekongruajn elementojn.

Lia temo kondukas lin al klarigo pri du, cetere ortodoksaj, ideologioj koncerne la naturon de la hom-stato postmorta — nome, natura senmorteco (tuja transiĝo de la konscia persono au personeco al alia sfero: kaj reviviĝo (ia reviviĝo post nedefinita, ĉar nekonebla, "dorm"-tempo).

La eseo meritas plurfojan legadon, kun aparta dediĉo al taŭga mens-digesto.

Post kleriga enkonduko pri la Hebrea poezio, ĝia historio kaj form-strukturo, li donas tradukojn de tri psalmoj, printitaj, ial li uzas la malfacilan formon "Jahüe" anstataŭ "Javeo" (Waringhien) aŭ Jehovo (Wells).

I. Chiussi, tradukinto de La Nobla Korano, prezentas Islamon kiel religion de l'amo, per tio refütante la ordinaran Okcidentan pens-bildon pri tiu religio. Lia tezo evidentiĝas intiman scion pri la esenco de tiu kred-formo kaj, per komparo kun la Kristana, ne evitas menciŭ ankaŭ mis-uzojn kaj deviojn for de ĝia pura praktikado. Ĉe la homoj ĉie kaj ĉiam tekst-tordigantoj pro propra profito . . .

Peras: D-ro Donald Broadribb, University of Melbourne 3052.

"**Medicina Internacia Revuo**", sendependa diskutejo de tutmondaj medicinistoj. Dufoje jare. N-roj por Decembro 1968 kaj Julio 1969. 25-paĝa, teknike kaj enhave tre bona.

Eldonata de la Universala Medicina E-Asocio, la gazeto estas sub gvido de diverslandaj Doktoroj, kies nomojn ĉiu E-isto bone konas. Kotizo membra estas 2 dol. Usonaj. Adreso: Prof. Masao Suzuki, Universitato TIBA, Japan.

LA 26-A INTERNACIA KONGRESO DE JUNULOJ (TEJO)

Ĝi okazos en Graz, Aŭstrio, 8-15 Aug. Ĉia helpo pri-loĝa k.t.p. ĉe H. Kovacic, Grazbachsgasse 57, Graz A8010. Je kosto 32 ŝil Aŭstrijaj li flugpoŝte sendis Bultenon Kongresan. Ĉu Aŭstraliano(j) povus viziti ĝin?

SEN-ARTA TAKSO

La sinjoro rave rigardas al pentraĵo "Printempo", granda ole-verko pri bonforma junulino, kiu surhavas "veston" el unu-du strategie metitaj folioj. Subite blekis akratone la edzino: "Nu do, kion vi atendas — la Aŭtunon?"

RECENZOJ

Ni, Homoj, Originaloj de Zora Heide. 70 paĝoj, 9 Danaj Kr. (1.44 Aŭstralie). Eldonis Dansk Esperanto-Forlag, Aaby-hoj. Ses noveloj de Jugoslava verkistino, loĝanta en Danlando. Ili estas pliĝuste bildoj pri strangaj situacioj en kiuj povas troviĝi homoj interrilate kun siaj kun-homoj. Mankas al ili la surpriza fin-paragrafo, kiu karakterizas la rakontojn de O. Henry kaj De Maupassant, se nomi nur du majstrojn en tiu ĝenro. La vera rakonto provizas korsaltige frapan finiĝon.

"**Volupto**" temas pri incesto. Edzo kaj edzino loĝas samhejme kun ŝia bopatro. La edzo servas ĉefronte, sed foje reiras sian hejmon per forpermeso arnea. Infano naskiĝas, kies patrecon oni kompreneble atribuas al la leĝa patro. Neniu moral-instruo troviĝas en la fina para-grafo, kiu iom naive indikas, ke "regis harmonio sub la tegmento de la familio kun la simpla vivo".

"**Epizodo**" donas bildon pri kompatinda virino, kies frato volas per ruzo eligi ŝin el la komuna hejmo, por sin liberigi de ŝia ekonomia ŝarĝo. Finveture, ŝi staras sola sur fora perono, vane atendante venon de supozinde "mita" persono al kiu blage ŝin sendis la fripono-frato.

"**Avo Martin**", plaĉa prezento de malriĉa ŝuisto, kiu dum jaroj sin preparis por viziti al riĉa frato, advokato. Simpatie oni legas pri lia akcepto seniluziiga ĉe la snobe klas-afektula frato.

"**Amika Malamiko**" tenas atenton pri ofta okazo en la militanta Eŭropo: Vivriske kaŝadi en propra domo "malamikan" soldaton. "Dukatoj" kaj "Instruistino Teresa" pritraktas problemojn de la edza stato fronte faktorojn de ennaska amo al la regiono, diferenco de soci-klaso, kaj — ĉikanado de jaluza bopatrino.

Profetino Helena Konttinen. Kajero I, 16 p. Emil Hanhiniemi. BOX 764, Ing-ham, Q., 4850.

La Finna originalo ampleksas 534 paĝojn. La tradukanto faris resuman epitomon. Temas pri mistikulino kiu oscile gravitas inter infero kaj ĉielo tiam, kiam la devoj kaj okupoj de la tero provizore ne povas plu-teni ŝin.

Bedaŭre, la cetera legeblan tekston makulas kelkaj strangaj lingvaj (na, ja, niu . . .). Unueco de uzado estas principo fera por nia lingvo. Dum 17 jaroj (1935-52) Joab Eljot ludis reformemete kun E-o. Ĉu li heredigis sian mantelon al S-ro H.? Se jes, do malbone.

Ĉar, ludante rolon de J.E., Emil nur mem-detruas sian propran verkon.

PLENDPEPO

S-ro J. K. Kuiler,, c/o John Prior, Mudgegonga, 3737, skribis al la redakcio: "... Mi havas pli ol 100 korespondantojn en 8 lingvoj, sed ne povas akiri 10 plumamikojn en Aŭstralio, kvankam mi skribis al ĉiuj adresoj ĉi tie. Denove mi promesas aniĝi al via organizo, se mi ricevos tiun dekon, urĝe bezonatan por miaj geamikoj".

Post pesimisma medito pri la pekoj de la mondsocio, li sin turnas al manko de teknikaj vortaroj en E-o, tiam fine al sugesto, ke nia gazeto enhavu paĝojn da senpaĝaj anoncoj, prefere ol "lingva instruado".

Piednoto informas, ke por 1970 li "aĉetis librojn kaj gazetojn por pli ol 100 guldonoj." Ok dolaroj?

Ni esperas, ke li de nun zorge atentus la "lingvan instruadon", per tio ebligante al si eviti la erarojn evidentajn en la letero. Dume, ĉu legantoj povas helpi al nia izolita sed fervora amiko?

BRENDON CLARK: POETO?

Pri rimarkoj en nia Maja n-ro (p. 252) F. R. en "Sonorilo", organo de la Belga E-Fed., ŝate aprobas ilin. Li komentas: "Se W. Auld riproĉas al Br. Clark ke li teorias, li devus fari saman riproĉon al ekz. V. Sadler ("Memkritiko") kaj al Porstein Frau Hamri (en traduko de B. Ragnarsson). Ĉar se iam oni mistifikis poezi-amantojn, tiam certe per la eldono de tiuj du stultajoj. Sed mi pensas, ke la vera kaŭzo de la malŝato de kelkaj je Br. Clark estas, ke li kapablus verki verajn, belajn poemojn sen tro da neologismoj kaj sen elizioj. Aliaj kiuj ne kapablus fari tion kompreneble envidias . . . kaj malŝatas . . . kaj kritikaĉas. Oni indulgu ilin. Sed la indulgo ne devas esti tiel granda, ke oni eldonu kaj legu iliajn tiel-nomatajn verkojn. Por fini ni devas tamen ankaŭ diri, ke ni konsideras W. A. kiel grandan poeton. Despli mirigis nin tiu ĉi eldiro .

"TUTO": p. 304, The A.E. 12/69.

Letere Prof-o Waringhien nin informas, ke la Zamenhofa teksto de Nombroj 23/13 estas: "Nur lian parton vi vidos, la tutan vi lin ne vidos". Temas evidente pri la popolo (Jakob aŭ Izrael, supre menciitaj). Sekve, sciu, ke la pluralo estas tre bedaŭrinda miskorekto de la Londona Komitato.

Pri Nombroj 5/30, li opinias, ke la artikolo estas ĉi tie superflua: "laŭ tuta tiu leĝo" estas sufiĉe preciza.

-E- PRONOUNCED

In 1907 George Bullen published his "Standard Course of Esperanto". In it he wrongly taught that the vowel E in E-o is pronounced as AY in "May". (To EJ he assigned the sound AYI, as in "saying"). There are still a few veterans who have never thrown off the handicap of this faulty teaching on the vowel E. Here are the counsels of others:

Margaret Jones, "The Esperanto Manual", 1913: E as in "pare". Helen Helen Fryer: E as in "bend", but broader, like E in "there". M. Hyde, "The Esperanto Guide", 1918: E as in "ferry". (Some would suggest "fairy" as a better example.) M. C. Butler: E as in "lend", "there". His advice accords with Fryer's, with its slightly differing values. He adds in a footnote that "the Esperanto E and O are heard in the Italian RE, DO, as sung by a good singer on a prolonged note". George Cox's "Grammar and Commentary" (4th edition, 1924): The correct sound of E is something between "bell" and "bale". No word in English expresses exactly its true sound.

The earliest textbooks: "Students' Complete Textbook" (J. C. O'Connor, on sale in 1903) and R. H. Geoghegan's "Short Grammar" are not available for citing.

Those who have a grounding in phonetics will appreciate the 11-page treatment in the "Plena Gramatiko". Such study, however, is not necessary in acquiring effective use of the language. A fluent speaker will find himself unconsciously shortening his vowels a little. But this, and other slight deviations from standard are no hindrance to full comprehension. But it is well to avoid such pronunciation as "bay-la" (bela), "ay-stas". (estas).

"BACKWARD CHILD"

Mense postrestanta (Wells); mense nenormala; iom mense malsana; cerbe difektita; cerbe kripla. Inter aliaj nuancoj "kripla" signifas ankaŭ: stunted (Butler).

Estas gradoj de mensa malsano; elektu ĝustajn terminojn por individuaj kazoj.

SIMPLICITY

Esperanto is an exceedingly 'simple' language — the 'simplest' of them all. 'Simplicity is the highest form of art. The art of expression is simplicity, which is no hindrance to subtlety of intellect'. The absurdity is to suppose that 'simplicity' is easily acquired by anyone.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro. 83 (163)

MELBURNO

Aprilo, 1970

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION OFFICIAL NOTICES

11th March, 1970

New Members

Dale, Mrs. P. J., Oxley, Qld.
Slattery, Mr. J., Balmoral, Vic.
Howes, Mr. M., Yarram, Vic.
B:own, Mrs. S., Morwell, Vic.

Publicity Fund

Already acknowledged \$559.07
Sennomulo, N.S.W. 20.00
C.C.G., N.S.W. 2.00
Buki, Mr. J., N.S.W. 1.00
Maddern, Miss M. M., Vic. 1.10
Timmins, Mr. V. J., N.S.W. 1.00
Kemp, Miss F. H., Vic. 2.00

\$586.17

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition

Points allotted

New Individual Member 5
New Life Member 50
Popular Course enrolment 2
Intermediate Course enrolment 5
Advanced Course enrolment 10
Elementary Examination success 2
Advanced Examination success 5
"Klereca" Examination success 10
Each \$1 for the Publicity Fund 1

Position on 11th March, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	458	352.3
Victoria	300	818	272.6

N.S.W. - - A.C.T.	260	535	205.8
West Australia	80	159	198.7
Tasmania	30	31	103.3
South Australia	40	23	57.5

IMPORTANT. After this issue, no further copies of the Australian Esperantist will be sent until after receipt of the 1970 subscription. If you have not yet sent yours, please do so without further delay. Remember—your support will assist the progress of Esperanto in Australia.

C. C. Goldsmith,
Secretary.

LA MALPURA FENESTRO

Surstrate pastro renkontis ŝerceman paroĥanon. Tiu diris al la kleriko: "Ĉu vi konas ĉi tiun rakonton? Temas pri malpura fenestro. Tamen bone, ke mi ne rakontos ĝin al vi, ĉar vi certe ne vidus tra ĝi".

"Jen bona ŝerco", diris al si la pastro, foririnte. Ĉe kunveno de preĝejaninoj li prezentis ĝin jene: "Ĉu vi konas la rakonton pri la fenestro, kiun vi ne povus travidi? Tamen bone, ke mi ne rakontos ĝin al vi — ĝi estas tro malpura!" (legu: malĉasta). Traduku Anglen!

FILMA FUSETO

"Malgraŭ ĉiuj konsilantoj kaj elspezo de milionoj da dolaroj, la farintoj de la filmo "La Biblio" ne povis malaperigi la . . . umbilikon de Adam, kiu certe ne havis ĝin". — "L'Expres".

MIA EDZINO, LA KOMPUTORO.

La atingoj de la moderna komputoro, kun vico post vico da memoraj unuoj palpebrumantaj, estas kiel absoluta nulo, kiam komparita kun la sistemo, kiun ni posedas en nia domo. Ni nomas ĝin la Magia Memoro de Panjo. Ĝi estas tiel rapida kaj senerara, ke estas timige pripreni ĝin. Konsideru, ekzemple, la okazon, kiam nia malvarmigilo paneis.

"Kiam oni liveris tiun aparaton?" Mi demandis al la edzino, kaj tuj mi rimarkis la lumeton en ŝia okulo.

"Bone mi memoras la matenon", ŝi komencis. "La laktisto enpaŝis en la kuirejon kaj glitis sur iom da arakidobutero kaj lasi fali botelon da akvo. Ni ricevis kvar botelojn tiutage, do devas estis mardo? Mi ankoraŭ purigis la plankon, kiam sonoris la pordsonorilo. Estis tiu homo, kiu vendis novajn tegmentojn je speciala malalta prezo dum Aprilo. Sed ni ne aĉetis la tegmenton ĝis la sekvinta aprilo en la jaro 1958. Do estis mardo en aprilo en la jaro 1957, sed kiu mardo?"

"Mi retenis la spiron."
"Ho, jes", ŝi diris. "Mi memoras. Tiu estis la tago. Jes, la meza salajrotago. Estis la deksesda. Tiu tagon mi aĉetis mian unuan rulitan rostaĵon. La kondamnita aĵo bezonis tutan ĉiamon por kuirigi. Vi venigis Edĉjon por vespermanĝo. Mi bone memoras, ke vi kaj Edĉjo sidis en la salono, kaj mi rigardis jen tiun kondamniton termometron kaj jen nian belan novan malvarmigilon. Jes, estis mardo, la deksesda de Aprilo en la jaro 1957".

Do, jen vi estas! Ĉu ne estas mirige? Mi tre kompatas akvokaton, kiu metus mian edzinon en la atestejon, kaj penus malcertigi ŝin pri iu longe pasinta dato. Si venkegus lin.

Ofte mi staris apud ŝi tute mirigite, dum ŝi penis elekti robon por porti al manĝovespero. Ĉiam denove mi konstatis, kia grava afero estas la portado de robo por virino.

"Portu tiun ruĝan silkon", mi sugestus.
"Ho, ne", ŝi respondus. "Sally kaj June vidis min en tiu robo ĉe la Bates antaŭ Kristnasko. Mi tute ne povus porti tiun".

"Do, kio pri la blua brodaĵo? Mi sugestus.

Denove ne, ĉar Nadina dufoje vidis min lastan jaron en tiu blua brodaĵo". Laŭ ĉiuj vestreguloj tria ekspono estas tute nepermesebla. Robon post robo ŝi malakceptus, ĝis denove briletus tiu lumo en la malantaŭo de ŝia blonda kapo.

"Elenjo estas la sola persono, kiu vidis mian verdan veluron", ŝi anoncus

triumfe, kaj mi intermetus: "Mi supozas, ke vi memoras, kion ŝi portis tiukaze". "Kompreneble", ŝi admonus. "ŝi portis sian oran briletajn kun du ŝnuroj de perloj".

Sed mi jam estus forkurinta por preni la unuan kompletan, kiun tuŝus mia mano, tute sekura en la scio, ke neniu nura viro memorus, ĉu li iam ajn vidis ĝin antaŭe.

Sed vi ne povus kredi ŝian kapablon rekonii malnovan filmon je la televido. Unufoje mi estis ĵus ekfunkciiginta la aparaton, kiam ŝi eniris la ĉambron.

"Ni jam vidis tion", ŝi atentige anoncis.
"Kiel vi povas ĝin rekonii?" Mi demandis.

"Per la temomuziko. Ĉu ĝi ne sonorigas ion en via kapo? Vi ne nur ĝin aŭdis antaŭe, sed vi dancis je tiu ario".

Mi bone sciis el pasinta sperto, ke mi devus esti tuj cedinta, sed stultuloj iras tien, kie anĝeloj timas paŝi, do mi demandis, "Kiam?"

"Estis la P.T.A. danco, kiam ni ankoraŭ loĝis en la antaŭa domo. Mi memoras, ke estis Majo, ĉar S-ino Arbuckle prizorgis la infanojn tiuvespere. Memor! Si manĝis tutan funton da vinberoj, kaj ni trovis la semojn malantaŭ la kanapo. Memor! Kiam ni revenis helmen..."

Sed ŝi subite ĉests, ĉar ŝi vidis miajn manojn supreniĝi kapitulace — El la Angla tradukis K. G. Linton.

PRI PSORIAZO

Ĝi estas niefekta haŭtmalsano. En Britujo oni starigis asocion, jam pli ol 250-anan. La asocio uzas Esperanton por serĉi al similaj asocioj en la mondo. Eble vi legis anoncojn pri ĝi en "Esperanto" aŭ "Heroldo de E." La rezulto? Tre kontentiga. Ĝis nun venis 28 respondoj, kaj ili ankoraŭ venas.

Uzante Esperanton, la asocio trovis, ke estas granda asocio en Svedujo (jam en kontakto), kaj tri malpli grandaj en aliaj landoj.

Adreso: The Psoriasis Association, 22 Billing Road, Northampton, NNI 5AT. Ĝi petas informon pri simila asocio en Aŭstralio kaj alilande.

Ni ŝuldas la supran al Ken Hadler (FD higieno), Hastings.

LINGVA DISKRIMINO

Junta Vaska naciisto estis eligita el Madrida kortumo, ĉar li uzis la Vaskan lingvon, persistinte en tio post tri avertoj de la kortuma prezidanto. ("B.E." 1/70, cite laŭ "Sunday Telegraph" 9 Nov. 69).

LA FILINO DE LA DRINKEJESTRINO

(Umland)

Tri junaj bravuloj la Rejnon transpaŝis:
Al iu drinkeja estrino almarŝis:

"Estrino, alportu bieron kaj vinon;
Kaj kie ni trovi la belan filinon?"

"La vino, biero, gajigas tre forte,
Sed mia filino nun kuŝas ŝtonmorte".

En ĉambron enpaŝis la trio, por vidi
Kadavron de ino en ĉerko kuŝsidi.

Unua bravulo morttukan fortiris

Kaj longe, amare la inon admiris:

"Se nune vi vivus, ho bela knabino,

Mi amus vin jam de nun, pluen sen
fino".

La dua resternis la tukon forkaŝe,

Kaj turnis sin plure, singulte, trempaŝe:

"Ho vin, kiu kuŝas jam ĉe la mortintoj,

Amadis mi multon da jaroj pasintaj".

La tria denove la tukon disprenis

Kaj arde la buŝon mortpalan kispremis:

"Mi amis vin vivan; nun amas en
morto,

Kaj amos senfine tra ĉia homsorto".

BELA, DILIGENTA . . . (Heine)

Bela, diligenta damo —

Dom'kaj kort' en bona stat';

ĉiam puraj staloj, keloj,

frukte preta kultivpart'.

En ĝardeno ĉiu loko

ornamita, sen fi-kresk';

mola pajlo, eldraŝita,

servos por amkuŝa nest.

Sed la koro kaj la lipoj

restas virgaj, bela dam,

kaj uzata nur duone

estas via dormoĉambro".

—Farbo.

EPIGRAMO

"Nur tempon mi mortigas" — ho,

senpensa via diro!

Saĝemaj homoj voĉas la aferon tut-alian:

"La tempo ne bezonas nian helpon al

foriro . . .

Efikas ĝi kun sola cel': Mortigi vivon

nian".

UPTON SINCLAIR: LANGUAGE

"(I learned Italian), but a few years later I ruined my Italian by studying Esperanto; the two are so much alike that thereafter I never knew which one I was trying to speak". — "Autobiography", p. 69.

"(In 1902) I sent a questionnaire to a thousand college graduates and discovered that among those who had been out ten years practically none could read the language they had studied in college". (idem, p. 92).

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La Jarkunveno okazis 8/12. Laŭ la raporto de la sekretario la Ligo havis 58 membrojn (2 dumvivaj, 42 plenrajtaj, 14 asociaj). Laŭ la kasista raporto la elspezoj superis la enspezojn je \$8.74. Oni decidis en 1970 kunveni la 2-an kaj 4-an merkredon (anstataŭ lunde). Elektigis jena nova estraro: Prez: S-ino Ruth McGrath; Vic-Prez: S-ino G. Pollard, S-ro J. Finch; Sekretario: S-ro W. H. Howard; Kasisto: S-ino E. McKay; Informado: F-ino J. Gray; Nigra Cigno: S-ino E. Palmer.

Ni dankas al S-ro J. Finch, kies klopodoj havigis al ni, je la fino de Januaro, standon ĉe la t.n. "Hyde Park Holiday". Tiu kultura evento okazas ĉiujare en Hyde Park dum la semajnfino en kiu oni festas la Fondigon de Aŭstralio (26/1) S-ro Howard starigis budon el kanvaso kaj tablon sur kiu S-ro Finch aranĝis librojn ktp. Dum la tritaga ekspozicio multaj vizitantoj demandis pri Esperanto kaj petis informon pri kursoj.

Dank' al la kunlaboro de la Estro de la "Secondary Teachers Training College" la 1970-aj dusemajnaj kunvenoĵ de la Ligo okazos en moderna lerneja ĉambro ĉe Nedlands.

Je la 11/3 ni bonvenigis Ges-rojn Tronerud (Melbourne), kiuj estas survoje al la nordaj regionoj per ruldomo. Ankaŭ partoprenis la kunvenon niaj membroj Ges-roj N. Brodie, kiuj baldaŭ reiros Sidnejon post 4-semajna libertempo en Perth. Entute 22 ĉeestantoj atente aŭskultis tre instruan prelegon de nia Prezidantino, S-ino Ruth McGrath, kiu pritraktis la temon "Esperanta Elparolado".

Ni esperas ke la Ligo gajnos novajn membrojn el la 22 studentoj kiuj aliĝis la elementan kurson instruatan de F-ino Jessie Gray ĉe Subiaco kaj el la klaso kiu komenciĝos ĉe Victoria Park.— W. H. H.

ADELAIDE: Dank' al la iniciativo de F-ino W. Addis kaj S-ro F. D. Vawser nia grupo nun kunvenas ĉiusemajne en la domo de la Temperance Union en la urbcentro. La kunvenoj konsistas ĉefe el konversacio. Ĉiu ano devas fari mallongan prelegeton. Tiel ni aŭdis interesajn vojaĝrakontojn de F-ino Delaine pri Tahiti, Nov-Zelando kaj Tongo kaj de S-ro Vawser, kiu lastatempe faris ĝisfundajn studojn pri siaj prapatroj. Cetere, S-ro Vawser vizitos baldaŭ Britujon kaj esperas ankaŭ parto-

preni la Universalan Kongreson en Vieno.

MELBOURNE: Ĉe la unua kunveno post la ferioj ni bonvenigis inter ni S-inon Kaye Morrison (Sydney) kaj F-inon Ellen Minton (Hobart). Ambaŭ reventuris de Perto kaj paŭzis en nia urbo. La programo konsistis el prelego de S-ro H. Koppel, kiu parolis pri sia vizito al la orubo Kalgoorlie kaj pri la Perta kongreso. S-ro K. Linton kaj S-ro H. Koppel 2/7 donis detalan raporton pri la kongreso. Multaj aŭskultantoj bedaŭris ke ili ne partoprenis la kongreson post kiam la parolantoj laŭdis la arnaĝojn kaj gastigantojn en Perth.

Plej elstara el la traktaj prezentitaj de S-ro F. R. Banham (9/2) sendube estis tiu kiu komparis Zamenhof kaj Isaac Pitman, ellaborinto de la stenografia sistemo. Ambaŭ en junaĝo ellaboris unuan krudan sistemon, kiun ili poste plibonigis. Ambaŭ traktis per sia sistemo la tutan Biblion kaj ambaŭ havis ducelan okupadon: Pitman okupiĝis pri reformo de la anglalingva alfabeto, Zamenhof pri Mondreligio. Ambaŭ sukcesis nur pri unu.

Ĉe la februara amuzvespero 23/2 S-ro Jim Daniel montris belajn diapozitivajn pri Kanado kaj Usono. En la RENDE-VUO la parolanto S-ro Kim Bastin prezentis duan parton de sia erudicia traktajo pri "La Lingvistiko". I.a. li montris per ekzemploj el pluraĵ lingvoj, kiel regulaj estas lingvaj ŝanĝiĝoj rilate la influon de apudaj sonoj. Bonvenaj gastoj, 2/3, estis Doktoro kaj S-ino Einihovici. D-ro Einihovici donis viglan kaj instigan rakonton pri renkontiĝoj kun Esperantistoj en Israelo, Japanujo kaj Sovetio.

ORRONG Club (Melbourne): La ĝenerala kunveno okazis 17/2. en la Kvakera Domo. Elektiĝis: Prez: S-ino A. Paling; Sekretario: S-ino L. Hooper; Kasisto: S-ino M. Halliday. La gast-parolanto estis S-ino Fay Koppel (Melb. E-Soc.)

BORONIA E-grupo komencis la jaron per efika reklamo en 2 lokaj gazetoj kaj per ekspozicio de E-libroj en la loka Knox-biblioteko. Kiel kutime ni kunvenas dimanĉvespere kaj 8/3 ni bonvenigis juĝoslavan E-iston S-ron Jim Piliĉ, kiu lernis Esperanton antaŭ 15 jaroj, kiu legis nian reklamon en loka gazeto. — Ivan Heldzingen.

EASTERN SUBURBS havis sian ĝeneralan kunvenon 18/3. La antaŭa prezidantino, S-ino Ivy Fallu, kiu estas treege okupata per la A.E.A. Libro-Servo, ne plu kandidatiĝis, kaj elektiĝis la jena nova Estraro: Prez: S-ro Arthur

Heathfield; Vic-Prez: F-ino Anne Hearne; Sekretario: S-ro R. Reed; Kasisto: S-ro J. Fallu; Estraranoj: S-ino Mary Casey, S-roj W. Baxter kaj M. Fordham. Ni havos 3 klasojn: S-ro R. Reed instruos komencantojn, S-ino I. Fallu la iom progresintojn kaj S-ino M. Fordham gvidos konversacian klason.

SYDNEY: La 19/1 S-ro F. Mueller-Soraŭ kaj V. Gueltling raportis pri la kongreso en Perth. Vizitis nian klubon F-ino Merrill Roff el Masterton, sur la norda insulo de Novzelando.

S-ro W. Chandler la 2/2 raportis pri sia vojaĝo per trajno al la kongreso en Perth, pri la kongreso kaj postaj vojaĝoj en Okcidenta Aŭstralio.

La 9/2 S-ino V. Schlesinger legis el la libro "La Tragedio De La Homo".

S-ro Giuseppe La Rocca, juna komencanto el Bolonjo en meza Italio, enmigris Aŭstralion kaj venis al nia klubo por la unua fojo.

La 17/2 S-ro F. Dunn parolis pri tiu maristo, pri kiu multaj homoj parolas ĉi tiun jaron.

La 20/3 nia longjara membro, F-ino Frieda Smith, fariĝis 90 jara. Ŝi naskiĝis en Heidelberg, Germanio, kaj venis al Aŭstralio antaŭ proksimume 80 jaroj.

La 23/2 okazis nia jarkunveno. Jena nova estraro elektiĝis: prezidanto, S-ro V. Bourlin; Vic-Prezidantoj, S-roj J. Matasin kaj W. Chandler; Sekretariino, S-ino M. Chaldecott; kasisto, S-ro T. Elliott; biblioteko, S-ro Gould; revizoroj: S-inoj M. Parker kaj E. Bradman; Publicigo, S-ino M. Chaldecott; Raportoj por "AE", S-ro W. Chandler.

La 2/3, S-ro V. Gueltling legis artikolon el la "Germana Esperanto Revuo". Poste okazis diskuto pri tabakreklamo, en formo de debato inter kvar personoj. Poste ni ĉiuj diskutis, ĉu ni havu propran gazeton. Ni aranĝos specialan vesperon por tiu temo—VOLO.

SEYMOUR (Vic.) Lunde 23/2 ĉe la "Internacia Vespere" de la "Business & Professional Women's Club bonekonata veterana E-isto Percy Holmes, kun helpo de sia edzino Margaret, aranĝis okul-frapan elmontrandon de Esperantaj. Ĉeestis 60 personoj. Diversspeca literaturo de multaj landoj legis multajn ĉeestantojn ekzameni kaj peti informon pri la kara lingvo. Inter aliaj kiuj montris intereson estis parlamentano David Kennedy kaj edzino.

MORWELL (Vic.): Sekve de niaj intensivaj kursoj pasintjare, ni formis etan E-Klubon kun 20 membroj. La estraro konsistis el: S-ro I. T. Maddern (Prez.);

S-ro W. Wybenga (Sekr.); S-ino M. Wybenga (Kasisto); S-ino L. McLaren (Biblioteko)

MANLY, 5/2/70. en la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly, komenciĝis 3 novaj kursoj:—komenca, konversacia, k. diskutata, gvidataj resp. de Betty Cleminson, Marjorie Duncan, k. Robbie Robertson, kun entute ĉ. 30 partoprenantoj. Ĉiujatide post la kursoj okazis klub-kunveno, 8.15-9.30, laŭ jena aranĝo: 5/2 Raportoj pri la 17a Aŭst. Esp. Kongreso; 12/2 S-ino G. Swan, Mia Vizito al Hindujo, kun diapozitivaj; 19/2 F-ino L. Jullie, "Scrabble" en Esperanto; 26/2 S-ro W. Chandler, Indigenaj Legendoj; 5/3 S-ro G. Thatcher, Film-afişoj malantaŭ la Ferkurteno, kun diapozitivaj. En niaj kunvenoj ĉeestis meznombre 17 anoj. Ni bonvenigis vizitantojn de la Sidnea Societo, k. S-ron La Rocco el Italujo.

La tag-jurnalo "Manly Daily" regule presas raportojn pri nia agado.

Ni gratulas nian anon, S-inon Peg Ford-Lewis, pro gajno de la Supera Diplomo de A.E.A.—M. DUNCAN.

BRISBANE: Nia grupa vivo estas tre vigla kaj progreskonscia. Ni kunvenas ĉiulunde de la 7-a ĝis 10-a. Oni instruas kaj lernas gaje kaj ofte aŭdiĝas ekridoj ĉe satiraj klarigoj. La komencantoj bone laboras sub gvido de Ges-roj Robinson, F-ino Sullivan, S-inoj Cooney kaj Oxley kaj Karl Guenster. Hans Brendel gvidas la konversacian kurson. S-roj Brendel kaj Guenster ankaŭ instruas ĉiujatide ĉe la "Eastern Suburbs Grupo" en la ŝtata lernejo en Chermside.

Okazis pikniko 1/3 sur insulo Bribie; partoprenis 24 membroj de la Brisbana kaj "Sunshine Coast"—grupo. S-ino Doris Sinclair el Caloundra rakontis al ni multon pri le Perta Kongreso. Ni decidis pikniki ekde nun ĉiun unuan dimanĉon. En la kunveno de 9/3, S-ro Guenster raportis pri sia vojaĝo survoje kaj precipe en la montaro "Snowy" kaj sur la montpinto de Mt. Kosciusko.

Ni bedaŭras raportoj ke dum la ferio nia sekretario Tom Donnelly estis malsana kaj en hospitalo. Nun li estas denove hejme kaj ni esperas baldaŭ revidi lin en nia klubo. (Laŭ raportoj de Karl Guenster, S-inoj W. Greenhalgh kaj Val Robinson)

SUNSHINE COAST: Je 5-a de Feb. rekomenciĝis la lecionoj de la Buderim-Grupo en la fako por Plenaĝula Edukado. Sep komencantoj sub S-ro J. Hausler bone lernas el "Practical Course". La pli progresintaj lernantoj studas per la libro de Makarian.

En Caloundra S-ino Sinclair instruas 5 progresintojn kaj 2 komencantojn. Dum

la unua semajno de Marto ŝi estis gastparolanto ĉe skolta kunveno. 18 estroj el 18 skoltaj grupoj de la Landsborough-distrikto aŭskultis kun granda intereso. La Caloundra filio de la "Australian Pensioners League" petis gastparolanton por ĝia kunveno de 10/3, kaj dum 45 minutoj ili estis amuzitaj per parolado, kaj kantoj sur sonbendoj. Montritaj ankaŭ estis bildkartoj, leteroj, libroj kaj gazetoj. Kvankam multaj de la pensuloj estas maljunaj, ili tamen havas gefilojn kaj genepojn al kiuj ili parolos pri nia lingvo.

Bonega tago ĉe la maro kun samideanoj el la Brisbana Klubo okazis je 1/3 kaj ĉar estis granda sukceso pikniko denove okazos je 5-e de Aprilo ĉe insulo Bribie.—Doris SINCLAIR.

ROCKHAMPTON: Kvankam Esperanto ne plu estas oficiala lernobjekto ĉe la "Adult Education", ni tamen havas senpagan uzon de almenaŭ unu ĉambro ĉe ties centro. Tie komenciĝis nova kurso kun 13 lernantoj. Instruas S-ino Y. Rayner, profesia instruistino. Ni presigis varbilojn kiuj ni ekspoziciis en malgrandaj butikoj en la antaŭurboj kaj en kelkaj librovendejoj kaj la urba biblioteko en la urbcentro. La loka radiostacio kaj la gazeto "Morning Bulletin" menciis pri nia kurso. Ni ankaŭ disdonis propagandilojn inter la geskoltoj.—John MOORE.

En preparo: "De Z. al A. en 3 Epokoj" de Fay Koppel 20-paĝa libreto, la teksto de prelego ĉe la 17-a Aŭstralia E-Kongreso. Ĉi tiu majstra verko pritraktas la evoluadon de E-literaturo de D-ro Zamenof ĝis William Auld. Nepre havinda al ĉiu literatur-amanto. Aperos espereble en Junio. La prezo estos 50c. Profito, se iom, estos donacata al "Klerigo". Sciigu al S-ro E. W. Chandler, 57 Northcote St., Crow's Nest, 2065, kiom da ekzempleroj via grupo intencos aĉeti.

PRI REPRESOJ

Anstataŭ presigi vers-librojn de speco plaĉe eble nur al manpleno da intelektemuloj, kial eldonistoj ne redonas verkojn de popole interesa karaktero? Sugeste, jen 4-5 originaloj konsiderindaj:

Nova Sento (Hyams 1915); Idoj de Orfeo (Bulthuis 1923); Abismoj (Forge 1923); Invito al Cielo (Sayers 1950); Kredu Min, Sinjorino (Cesar Rossetti 1951).

La titolo de tiu kvina libro laste aperis en la 1965 Jarlibro UEA: Generala Listo de haveblaj libroj, kaj ĝi mankas al la BEA Handbook 1970.

PARALLEL TRANSLATION

The purpose of courtship in Nature is to cloak the association of male and female with such enrichment and mystery that they shall be attracted to each other for a period long enough to produce and rear a family. We have travelled a long way from Nature in this. Today a man courts a girl because he finds her enchanting and would like to be enchanted for the rest of his life. He has found a brand of beer that suits him, and now he wants to go to work in the brewery. It is inconceivable that his taste for this brand will some day pall.

Courtship in Nature sometimes presents a pattern of constancy rare among humans. The sexual morals of the bearded tit are on a far higher plane than those of the bearded philosopher. And there are many primitive tribes which, like the tits, tackle the problem of courtship more sensibly than do many civilised groups, and who appreciate that courtship is as much a biological necessity after marriage as before it.

LIBERA FORUMO

Mi estas nek lingvisto, nek gramatikisto, do iom hezitas diskuti aŭ disputi kun spertaj tradukistoj. Mi tamen devas protesti kontraŭ la maniero [en kiu] oni prezentis "Parallel Translation" en "A.E." Marto.

"Jen incidento ĉe la Kongreso . . ." tute NE estas traduko de "Here is an AMUZING incident from the Congress . . ." Kaj ĉu vere "tablo kvarseĝa" estas eleganta traduko por "a table for four"?

La tradukisto kelkfoje tute ignoras interpunkciojn. Li ekzemple komencas novan frazon "Neniu el ili povis paroli la Anglan", dum la angla teksto diras ". . . two Germans . . . and a French lass, NONE OF WHOM had any English." Kvankam li ĝuste tradukas "French lass" per "Franca junulino", li poste tradukas "French girl" per "Francino". "So she put IT away" li tradukis per "l'al ŝi formetis la VORTARON". Denove la tradukisto ignoris interpunkcion kaj tradukas unu frazon "Presently the waitress . . . I couldn't understand", per 2 frazoj. Ankaŭ la frazo "I asked her pa.don, AND she repeated . . ." tradukiĝis per 2 frazoj: "Mi petis pardonon. Si ripetis la diron . . ."

Fine, ĉu "ĈIUJ TABLANOJ" laŭte ridis . . . estas la ĝusta traduko por: WE ALL had a good laugh . . ." Cio estas

La celo de la amidumado en la Naturo estas vesti la kunulecon de vir- kaj in-seksuloj per tiom da sentoriĉo kaj mistero, kiom allogos unu al la alia dum periodo sufiĉe daŭra por generi kaj eduki familion. De tio ni jam devojiĝis for de la Naturo longan distancon. Nuntempe viro amidumas virinon, ĉar li trovas ŝin ĉarma kaj li deziras esti ĉarmata de ŝi dum la restanta vivo. Li jam trovis por si fabrikmarton de biero, kiu plaĉas al li, kaj li nun deziras labori en tiu fabriko. Por li ne estas imageble, ke venus tempo, kiam foriĝus lia gusto por tiu marko.

La amidumado en la Naturo iufoje prezentas modelon de fideleco malofte ĉe la homoj. La seksmorale de la barbhava paruo estas multe pli pura ol tiu de la barbhava filozofo. Troveblas multaj primitivaj gentoj, kiuj, kiel la barbhavaj paruoj, entreprenas la malfacilan taskon de la amidumado pli sagace ol faras tion multaj civilizitaj homgrupoj. Krome, ili agnoskas, ke la amidumado estas samegale biologia neceso post la geedziĝo kiel antaŭ ĝi.

speco de tradukado, sed tute ne "paralela"

—Herbert Koppel

Dankon al nia aglookula amiko. Laŭdinde li atentis la tekstojn per kiuj ni klopodas regali la legantojn. Jen klarigoj pri punktoj por li dubaj:

- (1) Plumeraro. Kopiante malnetan manuskripton, la tradukanto pretervidis la vorton "amuza".
- (2) kvarseĝa? Kiel alimaniere ĝin traduki? Per la peza: "tablo kun kvar servlokoj"? Eleganta aŭ ne, "kvarseĝa" estas senc-klara.
- (3) Ĉu Franca junulino ne plu estas Francino?
- (4) Necesas uzi la vorton "vortaron", por klare identigi ĝin kun la jam supre uzita "vortaron Franc-Anglan". Uzi la pronomon "ĝin" estus ne bone, ĉar ĝi estus tro malproksima de sia antecedento.
- (5) Uzo de du Esperantaj frazoj estas ofte konsilinda ĉe sintakse malsimila Angla frazo. Tio estas konata rimedo tradukarta. Laŭvorteco — ĉu frazforma, ĉu idiotisma — forte difektas tradukaĵon. Laŭinterpunkcieco estas egale evitinda.
- (6) La tradukanto rajtis supoz, ke ridis nur la homoj ĉe tiu tablo, inkluzive de la rakontinto mem. La kritikanto sin turnu al okazo simila, ĉe "Hamleto", p. 150: "La tuta tablo eksplodadis per rido" (Angle: set the

table on a roar). Malgraŭ tiu modelo de la Majstro, la tradukanto preferis uzi la vorton "tablanoj", ĉar liasente ĝi estas pli taŭga.

Nia kritikanto miskomprenas la sencon de la vorto "paralela", kiel ĉi tie uzita: (du tekstoj) flank-ĉe-flanke okupantaj proksimume saman presospacon. — La redaktoro.

LA LINGVOJ DE JESUO

En la prediko sur p. 18 ne troviĝas mencio pri la lingvo Latino. Ĉu Jesuo sciis Latinon? Dekano Farrar en "Vivo de Kristo": 'La Greka estis la komuna parolmedio; sen ĝi Jesuo ne estus povinta konversi kun fremduloj — ekzemple la centestro, kies serviston Li resanigis, Pilato, kaj la Grekoj, kiuj deziris paroli kun Li en la lasta semajno de Lia vivo . . . ke li sciis ankaŭ la lingvon Latinon estas pli duba, tamen kredinde jesa, ĉar la Romianoj en Judujo tiutempe estis multenombraj, kaj la Latina estis stampita sur la moneroj en komuna uzado'.

Sed, centestro, ofiĉero en armeo Romia, parolus Latine, ĉu ne?

Rimarkindas, ke ĉe Johano 19/20 oni legas: (Tiu titolo) "estis skribita Hebreo kaj Latine kaj Greke".

En la Angla (Jakoba) Biblio la frazo troviĝas ankaŭ ĉe Luko 23/28 (iom aliorde). La teksto estas duba, kaj la Esperanta Biblio ellasis ĝin en la tria evangelio. — Farbo.

Esperanto, a Leaving Certificate Subject

This week, we received official word from the Examinations Board that Esperanto has been accepted as "An Approved Activity", a new Leaving Certificate subject. This is one of the most exciting things to happen in Victorian education for many, many years. The Board has also noted our suggestion that such approval should be extended into the Sixth Year or Matriculation Certificate.

Of our 115 pupils at the Leaving Certificate level, 90 has elected to take Esperanto as one of their block of six subjects. This makes Esperanto the most popular of all of our 24 Leaving Certificate subjects, outside the one compulsory subject of English.

We forecast that within five years, Esperanto will be taught in every high school in Victoria, and possibly in all technical schools as well, and that it will then be recognized by our universities for the important subject that it is, and that there will be Chairs for Esperanto at all of our universities.—I. T. Maddern, Principal, Morwell High School, 6/3/1970

INTERNATIONALITY OF ROOTS

Zamenhof strove to base his vocabulary on the widest internationality of roots, on the similarity of forms used in the chief European languages. But there were times when he was forced to accept roots peculiar to one tongue only

Using examples only from Latin and Russian, one finds that for "to yawn" he fell back on Latin "oscedado", giving "oscedi". You would meet the root in English only were your doctor in professional parlance to mention your "oscitation", or should you come across it in the older literature, for example when Coleridge remarks that "Southey has been strangely oscitant", that is, dull, drowsy, given to yawning (oscedema).

Zamenhof resorted here to Latin because he found that in the chief tongues current there is no similarity in the verbs used for "to yawn"; German, gaehnen Swedish, gaspa; French, bailler; Italian, sbadigliare; Spanish, bostezar; Portuguese, bocejar, and so on.

Similarly with others, he went to Latin as a last resort: arde', lien', silvi', meleagr', moned' &c.

As for Russian: With little or no likeness of roots one with the other in the European tongues, and finding that the Romans knew nothing of the delicacy, he took for "sausage" the Russian "kolbasa". The Russian language provided him also with the forms "krom", "nepre", "prava", "klopodi", "svati", "vosto", "bulko", "pilko".

Louis Bastien's "Naŭlingva Leksikono", 355 pages (1950), available at U.E.A. (30 steloj) gives the related national-language forms of some 5000 Esperanto roots. It is a most valuable reference book.

EARLY PIONEERS HERE.

In Sept. 1888, J. C. Cobbin, of St. Leonard's, Sydney, wrote to "The Office", a London magazine: "I think Dr. Esperanto's scheme leaves all its rivals far behind". He then criticises Volapuk as a bewildering medley and predicts its death. He asks for books on Esperanto and whether a letter addressed to the author, Dr. Esperanto, Warsaw, would reach him.

In January, 1890, he again writes: "I am now at work on Esperanto's Lingua (sic) Internacia, which I expect to master in a month . . . it is one of the greatest inventions of the century and I intend to make it popular in these colonies". He intends to "communicate (certain findings) to the learned author".

The full text is in *The British Esperantist*, Jan. 1932.

Did he write to Zamenhof? A letter in *Originala Verkaro*, Nr 73, page 481 informs us that Zamenhof received letters from Melbourne and also from gentlemen in a small town near Sydney. This letter is dated June or July, 1889, presumably too early to have reference to a letter from Cobbin.

C. W. Ballard, in the August n-r of *The B.E.* says that from 1887 to 1891 he corresponded with Cobbin on shorthand matters, though Esperanto was not mentioned. Cobbin was then in Sydney, a journalist and architect, also editor of *The NSW Shorthand Magazine*. He died at Cape Town in 1897. Ballard became an E-ist some time after 1910 and edited the *Suda Kruco* from 1921 to 1927.

Two other pioneers merit mention—D. G. Reinits and Herman Ritz, both of Mt. Victoria, NSW.

Zamenhof published 29 Adresaroj, the first in 1889, the last in 1909. Reinits and Ritz are the only Australians registered in the 2nd Adresaro covering the period from 1/9/1889 to 1/11/1892, being series two to eleven. Reinits tradukis el la Germana la fabelon "La Tri Mallaboruloj" S.K. 8/26 (speciale por nia gazeto). Reinits's number was 1394; Ritz's 1397. They are therefore the first registered Australian E-ists, having joined somewhere between 1889 and 1892. The list of all Australian E-ists mentioned in the Adresaroj is found in *The A.E.* December 1967.

RELIGIO KAJ AMO.

Kuriozaj metaforoj: "... iu Kristanismo filtrita senige de ĉia superstiĉo, eĉ de la doktrino pri la dieco de Kristo: tio similas al imit-kelonia supo, nome supo sen la kelonio". (Heine: "Konfesoj", 1853-4).

Komparu tion kun postea uzo, kiam, mortante, Heine plendis kontraŭ la "spiritita, platoneca amo" de iu virino al li:

Vortoj, vortoj, sed ne agoj;
mankas karno, kara Pupo.
Spirito, jes — sed ne viando —
senas nudloj en la supo!

DID YOU KNOW THAT:

The N.Z. Esperanto Asscn. sold 1951 dollars' worth of Esperanto books in 1968. (475 dol. in 1959).

"Biblio Revuo" has begun publishing in its pages the first texts of a new ecumenical Bible in Esperanto, annotated.

Wm. Auld, the well-known Esperanto

poet and author of text books in the language, has been appointed a paid instructor at Teachers' College in San Francisco. The course is official, for beginners and advanced, and begins on July 24.

TRADUKOJ DE ZAMENHOF

Per la bonvolo de S-ro A. Holzhaus ni ricevis kopiojn de du poemtradukoj faritaj de D-ro Zamenhof: "La Homo Vojo" el la Rusa de Barono B. N. Delvig, kaj "Amo de Soldato" de W. Hauff. La duan Zamenhof tradukis nur parte. Hauff parolas pri amata knabino; Zamenhof ŝanĝis ŝin en familion, tial ne kapablis traduki la 3-en kaj 5-an strofojn.

LA ĈEĤOSLOVAKOJ

La sekvanta ekzemplo atestas la plorindan staton de interŝtataj rilatoj pro ideologia malkonsento: nome, la bravaj samideanoj en Ĉeĥoslovakio, per paĝoj de "E-ista Slovaka", pene paciencaj reprodukti mimeografie la enhavon de la Plena Vortaro. Tio estas al ili dezirinda, simple pro tio, ke mankas al ili akireblo de la verko mem. Tia sindediĉo meritas senliman admiron. N-ro 7 enhavos du densajn paĝojn de tiu teksto — la deknua "eldono" de la kopiado!

Malgraŭ tiu kaj alia malavantaĝoj la proporcia nombro da E-istoj en Ĉ. S. estas forte pli alta ol en kelkaj landoj ĝuantaj plenan liberon aĉeti lernlibrojn.

ITALIAN CONGRESS 1970

It will be a "cruising congress"! On the 24000-ton "Caribia" you board at Genoa (17 Sept.) or at Cannes, Barcelona and Palma de Majorca. Then on to Bizerta, Palermo and Capri, arriving at Genoa the 26th. Good rebate, comfort. Esperantist company — everything.

Write air to Torina Esperanto-Grupo, P.K. 198, Turin 10121, Italy.

ESPERANTO-LIBROJ

El la Nazia teroro oni savis 2000 Esp. librojn de la Germana Esp. Instituto. Ili nun estas en la Stata Biblioteko, Unter den Linden 12, Berlin B. Karl Maier, Chrysanthemumstr. 8, Berlin No. 18, akceptas mendojn de preparata katalogo.

VORTSPAREMULO

Viro tre lakona eksciis pri la morto de la edzo de konata sinjorino. Li skribis al ŝi jene: "Estimata sinjorino: Ho vel!"

Post unu jaro li informiĝis, ke ŝi reedziniĝis. Li skribis: "... Ho hoi!"

Registered at G.P.O., Melbourne, for
Transmission by Post as a Periodical.

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro. 84(164)

MELBURNO

Majo, 1970

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION OFFICIAL NOTICES

10th April, 1970

New Members

Buchan, Mrs. L., Toowoomba, Qld.
Middleton, Mr. V., Toowoomba, Qld.
Strickland, Mrs. E. S., Croydon Park,
N.S.W.

Brennan, Mr. R. Morwell, Vic.
Brown, Mr. N. Burgeree, Vic.
Giles, Mr. W., Trafalgar, Vic.
Giles, Mrs. C., Trafalgar, Vic.
Potter, Miss M., Yallourn, Vic.
Lawless, Mrs. M., Churchill, Vic.
Court, Mrs. J., Traralgon, Vic.
Findlay, Miss A. V., Morwell, Vic.
Radford, Mrs. S., Clayton North, Vic.
Poelstra, Mrs. M., Caloundra, Qld.

New Junior Members

Austin, Kay Eneich, Hannelore
Black, Carole Grunberg, Noelen
Broadbent, Christine Heskey, Noelen
Bullock, Darylan Jordan, Beth
Chamings, Julie Kopec, Bogusia
Deppeler, Gayle Lowe, Pamela
Duve, Robynne Moffat, Jeanette
Ellis, Janice Palmieri, Gina
Evans, Annette Peterson, Christina
Hall, Diana Pobjoy, Karen
Holloway, Robyn Pryde, Anne
Keast, Julie Renestro, Rina
Kucher, Henriette Schilling, Robyn
Martin, Mary Thomas, Joy
Murfett, Susan Veysey, Annette
Pedrolini, Valerie Wasmayr, Ilsa
Peterson, Julie Alexander, John
Potter, Merril Blackford, Danny
Pryde, Susan Brennan, Ray
Sawers, Elizabeth Brooks, Ken
Teasdale, Susan Burton, Philip

Thompson, Kay
Walton, Linda
Williams, Belinda
Benson, Robert
Boyd, Ray
Broadbent, Philip
Burns, Kerry
Byrne, Terry
Dowling, George
Evans, Peter
Bailey, Barbara
Brinsmead, Kay
Broadbent, Sherril
Carroll, Raelene
Cook, Christine
Dowie, Julie
Ellingham, Davina
Doherty, Alistair
Elbourne, Bruce
Fatcher, Len
Gehrich, George
Huby, David
Kosakiewicz, Wm.
McLeod, Damian
Rhodes, Gary
Wilson, Alan
Zwankhuisen, John
Giles, Windsor
Kilmartin, Gary
Maddern, David
Nightingale, Ian
Stonehouse, Brett
Wright, Peter
All of Morwell High School, Victoria.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$586.17
Bantick, Mr. E. J., Tas.	.40
Baldwin, Mr. A. J., Vic.	3.00
Kirkwood, Mrs. G., N.S.W.	.40
McQueen, Mr. D. S., Vic.	2.40
Thatcher, G., N.S.W.	4.00
CCG., N.S.W.	3.00
Egset, Mr. R., Qld.	2.00
McGrath, Mrs. R., W.A.	2.00
Towsey, Mr. A., N.S.W.	1.00
Gibson, Mr. J., Tas.	1.00
Caldera, Dr. C. J., W.A.	1.00
	<hr/>
	\$606.37

Sincere thanks to all helpers.

A.E.A. — EKZAMENOJ

S-ino P. Ford Lewis, Dee Why,
N.S.K. — Supera, kun honoro.

Interstate Competition
Positions on 10th April, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	488	375.4
Victoria	300	873	291.0
N.S.W. + A.C.T.	260	554	213.1
W. Australia	80	162	202.5
Tasmania	30	32	106.6
S. Australia	40	23	57.5

Local Representative

Orange, N.S.W. Mr. F. Acs.

Publicity. The distribution of the green cards has brought good results, 1420 enquiries having been received so far. To help this distribution we have had some neat "Take One Boxes" made, some of which have already been placed in public libraries (of course with the permission of the Librarian, which has rarely been refused. They need very little space, only 5 x 1 inches. They are suitable also for tourist agencies, waiting rooms of doctors, dentists, cafes, hairdressers, and suitable shops. If you can arrange to place any, please let me know and they will be sent with the necessary cards. Please do your bit to help in this activity. — C. C. Goldsmith, Secretary.

NEKROLOGO

Post longa malsano mortis, la 5an de Februaro, 83-jara **Edgar A. (Ted) Walker**, D.B.E.A., Honora Dumviva Membro de la Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio.

S-ro Walker estis Prezidanto de la Ligo 1949/50 kaj denove en 1959. Dum jardeko li estis la Delegito de U.E.A. en Perth.

Li lernis Esperanton ĉe la Akademio de S-ro Burt kaj aliĝis al la "Westralian Esperanto Society" en 1929, partoprenante en la Kongreso en Perth en tiu jaro.

Nelonge antaŭ la Dua Mondmilito li vizitis Eŭropon kaj, post bicikla veturado de Nederlando ĝis Svislando, partoprenis en la Universala Kongreso en Bern en 1939. La militajn jarojn li pasigis en Anglujo, kaj revenis al Okcidenta Aŭstralio en 1948.

S-ro Walker estis tre fervora kaj fidela esperantisto.

ESPERANTA BIBLIO

Tradukante ĝin, Zamenhof uzis nur 87 radikojn ne trovblajn en la Universala Vortaro kaj la Unua Aldono Oficiala. El ili 55 estas teknikaj. — "British Esperantist", Nov.-Dec., 1950.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Kiel esprimo de danko pro la afabla disponigo de klubĉambroj, nia Ligo decidis fari donacon de E-libroj al la biblioteko de la "Secondary Teachers Training College". Oni profitis la ĉeston de D-ro C. Caldera ĉe la kunveno (11/2) por inviti lin elekti la librojn. D-ro Caldera gvidis pasintjare kurson por studentoj de la Kolegio. Ankaŭ en la nuna jaro li faros same.

S-ino Gertrude Pollard (25/2) parolis pri siaj spertoj ĉe la pasintjara Univ. Kongreso en Helsinki. Por sia prelego (11/3) S-ino Ruth McGrath elektis paroli pri la "Sonoj da Esperanto". Si emfazis ke Esperanto korekte prononcita estas belsona lingvo, sed ke multaj adeptoj ne bone regas ĝiajn sonojn. S-ino E. Palmer (25/3) parolis pri "Poŝoj kaj Monsakoj". Ni ekzamenis la enhavon de la poŝoj kaj monsakoj de la ĉeestantoj kaj trovis ke virinoj kunportas pli da diversspecaj objektoj ol viroj.

Nia fidela membro F-ino O. Strepel denove forlasis nin, por reiri al Port Vila, en la Nov-Hebridoj, kie ŝi instruas.

Okazas nun 4 kursoj: En Subiaco 24 personoj aliĝis al la klaso de F-ino J. Gray; F-ino Alice Longson instruas 12 en Victoria Park; F-ino O. Hunt gvidas klason en Applecross kaj S-ino V. Harris gvidas grupon de skoltaj en Jarrahdale.

MELBOURNE: S-ro K. Linton montris (16/3) diapozitivojn pri le bela kongresurbo Perth kaj pri la ĝindaĵaj kongresaj ekskursoj. Literaturan prelegon "Pioniro de Esperanto" faris S-ino Fay Koppel (23/3). Gi estis la vivhistorio de Edmond Privat kaj ties multfaceta agado en la kampo de literaturo, por U.E.A. kaj por multaj bonfaraj organizoj. Kun intereso la aŭdantaro aŭskultis je la fino al la voĉo de la kara mortinto, kiun S-ro H. Koppel prezentis per magnetofono, laŭ registrado de S-ro Ralph Harry, kiu antaŭ kelkaj jaroj dejoris kiel ĉef-konsulo aŭstralia en Genevo.

Pri fruaj pioniroj de Esperanto en Aŭstralio parolis S-ro F. R. Banham (6/4). Jam en Sept. 1888 J. C. Cobbin el St. Leonard's, N.S.W., (nur 14 monatajn post ĝia apero en Pollando) okupis sin pri Esperanto. Same D. G. Reinitz kaj Herman Ritz (Mt. Victoria, N.S.W.) aliĝis al la movado iam inter 1889 kaj 1892). Samvespere S-ro Banham ankaŭ parolis pri la arto de Novelverkado (kun specimenoj) kaj li finis la

vesperon per tre amuzaj ŝercoj. Je 13/4 ni aŭskultis al registrita programo de Radio Varsovio, bonkore pruntita de S-ro A. Turner (Shepparton). Je 20/4 la klubano laŭvice rakontis el siaj travivaĵoj, vojaĝoj ktp.

• **MANLY:** Ciujaŭde en la Vespera Lernejo okazas oficiala komenca kurso, 7-9ptm. sub gvidado de Betty Cleminson; konversacia kurso sub Marjorie Duncan, kaj diskut-rondo sub Robbie Robertson, 7-8.15 Je 8.30 meznombro 15 anoj partoprenas klub-programojn: 12/3 Lily Jullie organizis vort-ludon "Esperanto-Scrabble"; 17/3 George Thatcher aŭdigis sonbendon pri la Kongresa prelego de Fay Koppel; 1/4 Pete Schwerin montris lum-bildojn pri Venecio, kaj samvespere ni bonvenigis vizitanton Giuseppe La Rocca, kiu sonbende aŭdigis salutojn de siaj klubanoj en Bologna; 8/4 Bonvena vizitanto Violet Yowe parolis pri la Brisbana Societo.

Dum la Paska Libertempo 26/3, nia membro Edna Giles invitis klubanojn kaj vizitantojn al sia hejmo por ĝui societan vesperon. Nia VicPrezidanto Alderman Frank Preacher montris diazopozitivojn pri Sud-Orienta Azio, kaj donis inform-plenan komenton anglalingve pri sia lastatempa vizito al tiu mondparto.

"Manly Daily" kaj "Pacific Times" presis artikolojn pri nia agado.—Marjorie Duncan.

• **SYDNEY.** Dum Marto, Sydney Esperanto Society veturis vaste pere de prelegoj. La 9an S-ro Gerald Browne veturigis nin, per ilustrita kalendaro, rondvojaĝe tra Suda Afriko, "Alia Lando Kiu Havas Sunbrilon". Ciu ĝuis la prelegon ĉe kiu la ilustraĵoj de la kalendaro anstataŭis lumbildojn.

La 16an ni diskutis du demandojn, unue "Ĉu oni devas permesi propagandon por Tabakajoj?" La fumantoj jesis, kaj la nefumantoj kontraŭis. Unu sperta Esperantisto kaj unu kompare nova parolis por ĉiu flanko, kaj poste la aŭdintoj kritikis laŭ la vidpunkto de retoriko. La dua propono estis, Ĉu S.E.S., eldonu sian propran gazeton? Ĉiu parolis laŭ sia propra vidpunkto kaj vigle defendis tion. Ciu, eĉ la komencantoj, ĝuis la sperton kaj petis ke ni faru tion pliofte.

La 23an, S-ro Tom Elliott kondukis nin malantaŭen trans jarmiliardoj, kaj tra la tuta Universo por klarigi novan teorion pri Galaksioj. Laŭ tiu ĉi teorio, la tuta Universo rapide pligrandiĝas, kaj

la spacoj inter galaksioj, kaj en la galaksioj inter sunsistemoj, pligrandiĝas. En la sunsistemoj la planedoj forfuĝas de la centroj, kaj eĉ la planedoj mem pligrandiĝas dum la pezaj elementoj ŝanĝiĝas al malpezaj.

S-ino Viola Schlesinger veturigis nin sur mondvojaĝo kiun ŝi komencos post du semajnoj. Ĉiu ŝatus diri, "Duono de via bonŝanco!"

Kvin fidelulinoj lernas ĉe la Komencula Klaso estrata de S-ro Wre Chandler, kaj certe finas la kurson.

Ni decidis havi diskutvesperon unufoje en ĉiu monato por paroligi la tutan ĉeestantaron, kaj por la sama celo havi vortludan vesperon ankaŭ ĉiumonate.—Revanto.

ESPERANTO-FEDERACIO DE NOVA SUDKIMRUJO

La 11-a konferenco okazis en Esperanto House, Redfern, sabato 14-2-70, inkluzive la 3a Jarĵarkunveno. La Prez: S-ro Robertson, bonvenigis 24 membrojn. La Sek. raportis progreson dum 1969:—Ni havas 4 grupojn kaj 80 individuojn. Dum 1969 okazis 3 konferencoj kaj la 2a Jarĉefmanĝo. 3 bultenoj eldonitaj, kaj la kontoj estas kontentigaj, kun kreditsaldo \$101.54.

Oni decidis eldoni pligrandiĝajn bultenojn, en nova formo kiel "Klerigo", kun kontribuajtoj de membroj, kaj nome "TELOPEO" (Angle; Waratah — la nacia floro de N.S.W.). La unua ekzemplero jam eldoniĝis, kun 8 paĝoj. **NIA ESTRARO POR 1970 re-elektiĝis, jene:—**

Prezidanto: S-ro R. G. Robertson. Vic-Prez: S-ro E. W. Chandler. Sek-kasisto: S-ro Geo. Thatcher. Gazetara Oficisto: S-ino E. Graham. Publikaj Rilatoj: S-ino T. Richmond. Kaskontrolisto: S-ro F. S. Preacher.

Post vespermanĝo ni rekonvenis por societa vespero, kaj kuraĝite de la prez., ĉiu laŭvice rakontis, kantis aŭ kiel-vivolis, plejparte en E-o. Ni ĝuis la vigle amuzan programon.

La pikniko ĉe Northbridge Baths nuliĝis pro malseka vetero; anstataŭe ni konvenis en la hejmo de Ges-roj Robertson kaj pasigis interesan tempon per babilado kaj sonbendoj faritaj ĉe la Kongreso en Perth.

NIA VENONTA KONFERENCOKAZOS EN LA BELA URBO Orange, 166 mejlojn okcidente de Sidnejo, sabato 23-5-70, en la Royal Hotel. La aferkunveno komenciĝos 2.30 ptm, kaj post vespermanĝo en la Hotelo ni devove kunvenos por societa ves-

pero. Dimanĉon matene ni vizitos la vidindaĵojn en Orange kaj ĉirkaŭaĵoj. gvidate de nia vigla loka membro, S-ro Francisko Acs.—George Thatcher.

LA ĜOJO ĈEESTI

Estis somera mateno, kiam mi komencis vivi. Mi estis jam 12-jara knabino, harvosta, sunbruligita, nud-pieda, kaj konanta ĉiun monteton kaj ĝibon el tero sur la farmbieno de nia familio, kun ĝia kolektaĵo de bestoj, kaj sovaĝaj kaj farmaj.

Mi estis vivinta mian krizalidan stadion en angulo de la palisaro, kie la tagoj estis simplaj, fundamentaj, kaj bonaj. Kie la grizaj lignaj bariloj, glatigitaj de la tempo kaj la vetero, formis akutan angulon, mi metis mian tablon kaj seĝon, ambaŭ el radoj. (Mia patro estis forĝisto, do ĉiam abundis tiaj aferoj). Granda sambuko, leviĝanta kaj eleverŝanta kiel verda fontano, formis la trian muron kaj la foliolatisan tegmenton de mia ludodomo. Mia korto estis la pomarbejo. Okcidenten etendiĝis la maizkampoj. Orienten kliniĝis la maizkampoj. Tra miaj lamaj frontfenestroj mi povis rigardi malsupren al la rivero, transen kaj preteren, al la malsuproj de la nebulaj montetoj, kiuj pace envolvis unu la alian. En la printempo la violetoj kaj leontodoj borderis mian triangulan dometon, sed en la aŭtuno ili estis substituataj de la plumecaj tufoj de la vergo d'oro. Papilioj amase min vizitis en siaj multkoloraj vestoj, kaj okaze abeloj, ebrigitaj de nektaro, ŝanceliĝis en kaj el mia pordo.

En tiu aparta mateno, kiam mi komencis vivi, ŝvebis proksime al la tero la miksitaodoro de floroj kaj freŝe falĉita fojno. La ĉielo estis nekredable blua, kaj de malproksime en la monto venis la arĝenta sono de bovina sonorilo.

Mi tiam kuŝis sur mia dorso sub mia sambuka plafono, rigardante al birdo kiu venis por manĝi sambukajn berojn. Ni rigardis unu la alian, okulon al okulo. Subite ŝajnis al mi, ke mi jam estas aparta persono. Kiam la somera zefiro malordigis la plumojn de la birdo, mi povis senti ilian delikatan molecon; kiam la birdo premis beron en sia beko, mi povis gusti la dolĉan purpuran bonecon. Mi ne scias kiel priskribi la senton alimaniere ol, ke mi sentis min en harmonio kun tiu birdo, kaj ke ni ambaŭ estis en harmonio kun la arbaro. la zefiro, la herbajo, la suno, kaj ĉio ĉie.

Tio estis la unua efektiva intensigo de vivo, kiun mi konis. Mi ĉeestis! — mi

harmoniiis kun ĉiuj estaĵoj, kaj, juna kiel mi estis, mi komprenis, ke ĉi tiu stato estas treege plaĉa kaj senlime dezirinda. Mi konsciis la nepriskribeblian senton, ke ĉio moviĝas laŭ iu mistera mistika ordo, de kiu mi estis parto. Eble nur unufojo en la vivo oni ĝuas la privilegion ekvidi ĉi tiun kosman harmonion, ĉi tiun vizon de la vivo, kia ĝi devus esti.

Nun, multajn jarojn poste, mi ofte vekigas matene kaj flustras molan: "Jen mi estas", kvazaŭ respondante al iu neparolita nomvokado. Ĉi tio ne estas same kiel respondi por indiki fizikan ĉeeston. Ĝi estas la kolektiĝo de ĉiuj miaj sentoj por pretiĝi vidi, aŭdi, flari kaj tuŝi, por esti vigle viva, por ekkrii ĝoje sed silente: "Jen mi estas". En tiuj okazoj mi denove liberigas tiujn sentojn, kiuj subite venis al mi, kiam mi estis dekdulara.

Kiam la somera pluvo malrapide rampas super la sekega maizkampoj, kaj la soifanta polvo ŝajnas leviĝi por ĝin renkonti, mi devas elkuri por stari inter tiuj majestaj trunkoj, rigardante la ĉielon, flarante la liberigitan polenon, kaj sentante la pluvon sur mia vizaĝo. Tiam mia flustrita respondo: "Jen mi estas", ŝajnas miksiĝi kun la delikata frapetado de la pluvo sur la soifantaj folioj.

Kie ajn mi estas, mi estas kontenta resti tie. Kiam la kunikloj komencas siajn noktmezajn petoladojn en la kampo, mi deziras vekigi, ripozigi mian kapon sur la fenestra sojlo kaj — ĉeesti. Kiam la parado marŝas laŭ la strato kun batitaj tamburoj, turniĝantaj bastonoj, kaj flirtantaj flagoj, mi deziras stari, kubuton al kubuto en la homamaso, saluti ĉiujn, kaj diri silente al mi mem: "Jen mi estas".

Kiam la knabineto, kiu loĝas apude, invitas min veni kaj eltrovi kio dormis en la rozaltea floro hieraŭ nokte, nepre ne retenu min, kaj kiam malĝojo ĉeestas, lasu min senti ankaŭ tion. Kiam la sentoj estas malviglaj, oni devas trapasi la vivon sen iam ajn ĉeesti.

Hodiaŭ vespere, kiam krepusko alvenos, pleningate la malaltajn lokojn per bluj ombroj, kaj prezentante al ni la stelojn kaj la lumojn de aliaj domoj, rigardu supren al la velkiĝantaj restaĵoj de la tago, fokusi dum momento je ĉio. kion vi povas vidi; tiam vi aŭdos kaj flaros kaj palpos siavice per ĉiu sento. Diru al vi mem: "Jen mi estas", kaj, eble, dum unu rava momento vi ĉeestos. — Tradukita el la Angla de Ken G. Linton.

AL LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO:

Mi plezure raportas, ke la financaj aferoj de la 17a Kongreso tre kontentige finiĝis. La Financa Etato montras, ke la enspezoj superis la elspezojn je la sumo de \$393.50.

Tia kontentiga rezulto devenis el pluraj eroj, ĉefe —

- (a) La malavareco de la kongresanoj (ĉeestantaj kaj aliaj) kiuj donacis entute \$150.12.

- (b) La komplezo de la Estraro de "Forrest House", kiu faris rabaton pri la lukosto de la kongresejo.
- (c) La rabato kompleze farita de la aŭtobusa kompanio "Ansett-Pioneer Tours". (Sekve ni gajnis profiton de \$89.30 el la Tuttaga Ekskurso).
- (ĉ) La Fotografisto ankaŭ donis 10 procentan rabaton, kiun ni ne atendis. — W. H. Howard, Kongres-sekretario.

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO 17A KONGRESO

FINANCA ETATO

Enspezoj		Elspezoj	
	\$ c.		\$ c.
Kotizoj	248.50	Luado de Kongresejo	120.00
Vendo de Tebiletoj	42.40	Atm. kaj Ptm. Teo	36.75
Diserva Monkolekto (vidu kontraue)	23.38	Donacita al la Instituto de la Blinduloj	23.38
Vendo de Fotografajoj	88.00	Fotografajoj	78.00
Donacoj	150.12	Presado kaj Paperajoj	45.12
Banka Intereso	19.38	Poŝtkosto	26.67
Flankajoj	.20	Flankajoj	2.97
Profito el Distrajoj (vidu ĉi sube)	154.41	Superaĵo de Enspezoj	393.50
	<u>\$726.39</u>		<u>\$726.39</u>

La Superaĵo de Enspezoj estas pagenda al —

La Aŭstralia Esperanto-Asocio—	20% de la Kotizoj	49.70	
	50% de la Restajo	171.90	
			221.60
La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio:	50% de la Restajo	171.90	
			<u>\$393.50</u>

DISTRAJOJ — PROFITO KAJ MALPROFITO

	Enspezoj		Elspezoj		Profito		Malprofito	
	\$	c.	\$	c.	\$	c.	\$	c.
Rostajfesto	87.00		42.59		44.41			
Kongresa Vespermanĝo	244.00		251.30				7.30	
Vespera Ekskurso (Aŭtobuse)	54.00		35.00		19.00			
Rivera Ekskurso	66.20		57.20		9.00			
Tuttaga Ekskurso	368.40		279.10		89.30			
	<u>368.40</u>		<u>279.10</u>		<u>89.30</u>			
Minus malprofito					161.71		7.30	
Fina Profito					<u>7.30</u>			
					154.41			

Checked and found correct:

Hugh McGrath, Hon. Auditor
4th April, 1970.

W. H. Howard, Kongres-sekretario
5-a de Marto, 1970.

RECENZOJ

"Pri Longdaŭra Milito": Maŭ Zedong. Prelegoj en Majo, 1938, pri la Japan-Cina konflikto. Studinda de ĉiu, ĉu simpatia aŭ mala, kiu sin interesas pri la moderna Ĉinio. La popolĉefo prave analizis la fortojn je dispono de la du landoj, metis la principojn de movada kaj pozicia milito, kaj antaŭdiris la invadon de Japanujo en Sud-Aziona. La luktado en Ĉinio principe similis al tiu inter Francujo kaj Rusujo en 1812 kaj al la fruaj fazoj de tiu inter Germanujo kaj Sovetio en 1941-45.

Neta poŝlibreto 156-paĝa, lingvaj modela. Rimarkindas: partikulara, parolistoj (demagogues), vivmorta milito (life-and-death struggle).

"Biblia Revuo", Nov.-Dec. C. 60 paĝoj. 6 U.S. dol. Peras: Prof-o D. Broadribb, Univ. de Melb., Parkville, Vic., 3052.

Vastan intereson meritas la ĝisnun plej kompleta "Historio de la Esperanto-Biblio". George Rust detale pri-traktas ĝian evoluon, rice dokumentante per bibliografiaj notoj pri ĉio rilata al la granda tradukado. La artikolo longe restos kiel aŭtoritata faktofonto por studentoj. Modelo de pacienca, do valora kompilado.

D. Broadribb daŭrigas tradukadon de kelkaj Psalmoj: iuj el la piednotaj komentoj estas plene utiligeblaj nur por Hebreistoj, kiel la aŭtoro avertis en la antaŭa numero.

Iom kurioza studaĵo pri la Prezo de Biblio kaj aliaj libroj jam de 1400j. Sekvas enketo pri Novaj Elfosoj en Israelo.

La revuo estas teknike tre digna, profesie altnivela.

"English Phrases and Expressions in Esperanto": Felix Woolf; Eldonis: Esperanto Press, 2040 Springbank Rd., Port Credit, Ontario. 119 pages. 30 steloj.

This is the book English-speaking E-ists have been longing for. It serves both beginners and the more advanced.

Here are a few examples culled from the specimen pages:

Windscreen antaŭglaco; -wiper—glacviŝilo. Get the wind up—ektimi, nervoziĝi. Live wire—viglulo, energiuo. Have the last word—diri la limvorton; havi la lastan decidon. Say the word!—diru/parolu nurl. Eat one's words—repreni sian diron; erarkonfesi. Work off (a debt)—popece kvitigi. World and his wife—ĉiuj seneŝtepe.

Raise the wind — estigi malpacon,

tumulton; furioziĝi. Tio tamen ne estas idiotismo Aŭstralia, eble ankaŭ ne Brita. La senco ĉe ni estas pliĝuste: serĉi havigi al si bezonatan monon . . . monrimedojn, kiuj momente mankas.

Wolf cry — false alarmi. Manka: "wolf whistle", seksalloga fajfvoko de viro al pasanta junulino.

Can't see the wood for the trees — pro multe da arboj li arbaron ne vidas en arbaro sidi kaj ne vidi arbojn. Pro rimo ni sugestas: . . . kaj arbojn ne vidi

"Do" is given 9 entries. The mar did me with a crook note: (trompis mir per falsa . . .); Our hosts did us wel (regalis); We had no time to do the museums (viziti); She did my hair (frizis) &c. And under "get" — 4th entries.

Read the book carefully through with pleasure rather than with conscious study. In this way familiarity with its principles will enable one to render in clear Esperanto many an idiom not covered by it; for English is a highly idiomatic tongue, a fact that, among others, makes it unfitted to become a world speech-medium. Even in English-speaking lands local idioms abound the British Council admits that in several countries English has begun to fall into dialects.

The editor, Mr. R. Eichholz, asks for help in supplementing a revised edition. Australians could send in quite a large collection of their very own.

PARDONPETO

Pardonu al ni, S-ro Kuiler, pro erarc sur p. 20. Vi aĉetis . . . por pli ol 2^d dolaroj, ne "ok dolaroj", kiel en teksto. La A.E.A. konsistas el proks. 370 anoj. Se ĉiu el ili en 1970 mendus librojn ka gazetojn por dek dolaroj, E-aj eldonistoj goje saltus pro enspezo de 3700 dolaro Aŭstraliaj.

Dekdolaro elspezo pri libroj en jaro. Admirinda ekzemplo de tre bona faro. Sed nia amiko elspezis por 1970 \$25; se ĉiu Asocio same elspezus, la sumo atingus . . . \$9250.

BIGOTO, BIGOTULO?

Laŭ Oficiala Klasika Libro de la Akademio "bigot" estas substantivo; radiko. Konfirmas tion la Plena Vortaro kaj tiu de Waringhien: bigot = homo . . . Male, Fulcher/Long, Millidge Butler rigardas ĝin adjektiva: bigot = bigoted; bigotulo = bigot.

Vidu similan noton pri "adolt'" su paĝo 295. Sinjoroj, akordu viajn violonojn!

ON COURTSHIP

Nothing could be less true than that "all the world loves a lover". Down the generations mistresses have insisted that their servants should have no "followers". Landladies who give board to single girls stipulate that they have no "visitors". Farmers fume at damage to crops and haystacks caused by courting couples. Park-keepers eject lovers from bushes, vicars chase them out of churchyards, orderly officers turn them out of sentry boxes.

In dark roads policemen rap at the windows of parked cars. Bishops protest at the abandoned behaviour of couples on the seaside sands. Cinema-goers fret at the nuisance of sitting behind two heads propped together. The railways spend much money replacing light bulbs thrown from carriage windows by those with no desire for illumination. Day by day it becomes more difficult for courting couples, and equally for those who have to suffer them.

KOMERCO

Husen Al-Amili, delegito de AEU en Bagdado, faris komercan vojaĝon tra Eŭropo, utiligante E-kontaktojn en sep landoj. Koresponde li uzis E-on kun firmao en Germanujo kaj kun la Ĉina Nacia Korporacio por Eksporto kaj Importo de Maŝinaro, Pekino.

Simile, juvelisto Jack Snarberg (Stokholmo) flugvojaĝis al Hindujo, Honkongo kaj Japanujo, uzante ekskluzive nur E-on en ĉiuj negocoj.

DESCENT INTO DIALECTS

The State-financed British Council, whose budget of £12,000,000 serves primarily to spread the English language, has admitted in its year-report that English as a second language has, in several countries, begun to fall into dialects, similarly to Latin in aforesaid Europe. ("British E-ist" 1/70; "Esperanto", 2/70).

LA BLATO

Kuris en la kabineton
Blato, grimpis librobretton,
Haltis tie; kaj volumo—
La Kaloĉaj-Gramatikumo . . .
Ĝin surfalis!

Ne premita
Estis ĝi, nek premita,
Nur perfekte platigita.

"Blato! ho tro fida blato,"
Gemis mi laŭ fratkompato!—J.E.

V.4: "Plena Gramatiko": Kalocsay/Waringhien.

PRI AMINDUMADO

Tute malvera estas la diro: La tuta mondo amas la geamantojn. Jam dum generacioj domestrinoj insistis, ke iliaj servistinoj ne havu amindumantojn. Posedantinoj de pensioj, kiuj provizas manĝon kaj ĉambron al needzinoj, postulas, ke tiuj ne ricevu "vizitantojn". Farmistoj koleras pro difektoj faritaj de amantaj paroj al siaj rikoltoj kaj fojnostakoj. Gardistoj de publikaj ĝardenoj forpelas geamulojn el arbustoj. Parohestroj puŝas ilin el tomboteroj. Suboficiroj ordonas ilin el posten-budoj.

En mallumaj vojoj, policanoj frapetas fenestrojn de restlokitaŭ aŭtoj. Episkopoj kondamnas nedecan agadon de geuloj kuŝantaj sur strandoj. Kino-frekventantoj ĝeniĝas pro la malagrablo, sidadi post du kapoj unu preme al la alia. La fervojo elspezas multe da mono, reprovizante ampolojn elvagonen jetitajn de homoj nedezirantaj prilumon.

Tagon post tago fariĝas ankoraŭ ĉiam pli malfacile al duoj amfebrantaj, kaj egale tiel al homoj, kiuj devas ilin toleri.

(Nu serĉu en la E-aj tekstoj laŭvortan tradukon. Ili celas redoni la efektivan sencan de la originalo. Jam en la supra teksto oni rimarkus, ekzemplojn de pli logika, laŭsenca redono: Oni "amas la geamantojn", ne nur "la amantojn" ampoloj jetiĝas ne nur tra fenestroj de vagonoj, sed ankaŭ tra pordoj.

J. L. COBBIN. Page 27

In Aug., 1889, "The Office", a London paper, informs Mr. Cobbin that the books on Esperanto available in London are: "Dr. Esperanto's International Tongue", (an English translation of a publication in Warsaw, 1887) and "An Attempt towards an International Tongue", by Dr. Esperanto", by Henry Phillips (Junior), published by Henry Holt & Co.; New York. The latter had "an English-International vocabulary", which the former had not.

The first-named work was made, most imperfectly, by Julian Steinhaus ("J. St."). For examples of the text: "British E-ist", Feb., 1915. Geoghegan's fine translation appeared the same year, 1889, but, it seems, was not on sale at the time.

It is little known that Henry Phillips translated the text into English early in 1889. This effort is usually ascribed to Geoghegan, as he being the first to do so. But his rendering, it seems, issued later in the year.

GOOD MORNING? MASTER!

In Esperanto verse, Wm. Auld speaks with the phantom of Dr. Zamenhof.

"Norda Prismo", N-ro 1. 1968. Here is a free translation:

Good morning, Master. Welcome, take a chair!

How fare you fifty years from when you left the earth?

Light up and smoke. I feel you'll like to share

Such information as I have — for what it's worth —

Of Esperanto in our day. But, oh, of course you know

That folk are sluggish, obstacles are raised,

Wars, pogroms, risings threaten, and winds contrary blow

Throughout the world. I feel you're not amazed

To hear from me that governments ignore us —

'Twas much the same with you when you were here.

But added hindrance see we now before us:

'Tis devilish hard to reach the public ear.

Men quip and grin at us; we feel so small.

Ye gods! So much you sacrificed. Yes, now and then,

Though "short", we give a pound or so; but that's not all:

We toil and moil, and stew and swot, as when

For instance we to ATA/ITA did devote

Uncounted hours, fruit of which learning did appear

In bulky volumes from the wordy screeds we wrote,

Which some with gusto read, but others found so drear.

I earlier said that governments ignore us;

Or pleas by us with scanty glance refuse.

But worse by far — for Mao-ze-tung is for us;

His "Red Book" even Esperantists use! We've learned the language—to a point—but at our meetings chatter

Our mother tongue. And why? The motive's surely plain:

Tyros Esperanto hear, but fail to grasp the matter

It nobly vestures. Thus they strain their ears in vain.

Well, Master, it's been good to see you. And now au revoir.

The news of this your visit I'll to ardent listeners give.

You may return with faith refreshed to that trans-Lethean shore;

By these and other hands and minds your Work shall ever live.

NEW-STYLE PRINTING

Through purchase of modern typesetting and photographic machines U.E.A. will enlarge its organ "Esperanto" in 1971. Also the Yearbook will be larger—approx. 600 pages in two parts. The book list will have over 200 pages and give a brief description of the more important works with illustrations. This could be the most detailed catalogue of Esperanto literature now available.

Individual members of UEA receive the gazette and the Yearbook. Details of the new-style typography are in "Esperanto" (Feb., 1970). Agent for UEA: Ken Linton.

PLEJVENDITAJ LIBROJ

Plej sukcesa el ĉiuj: La Nobla Korano. Aperos dua eldono.

Belliteraturo: La Infana Raso (dua eldono); Wm. Auld.

Legolibro: Paŝoj al Plena Posedo (Auld).

Lernolibroj: Privilegia Vojo (Setala); Jamborea Lingvo (J. Hammer).

Fikcia: Kaŭkazaj Rakontoj (Lermon-tov).

Disko: La Feliĉo (kantoj de Ramona van Dalsem).

OUR EARLY ADVTS.

From No. 1 (July, 1920) to June, 1928, Cole's Book Arcade advertised in La Suda Kruco. No. 7: Kookaburra Librejo, Bourke St. No. 10-11: Harold Pudney, "kuracisto de fonto-plumoj" (later, erroneously, "fontanplumoj"). His advt. ran to Aug. 1931, the longest regular advt. Some may recall his small book of verse.

In No. 38 (Aug. 1923): Hall's Book Store, Prahnan (agent for La Suda Kruco"). It ran for a year.

In No. 50 (Aug. 1924) we find several advts: Hall's; Cole's; Chocolate Bowl, Collins Street; Redcliffs Guest House (Mr. Bigelow) Newhaven; Vitamin, tonic pills (A. R. Cohen).

Eraro: "The A.E." Dec. 1968, 2-a kol., p. 232, 14 de la malsupro: Legu "Jan.", ne "July".

The Australian Esperantist

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro. 85(165)

MELBURNO

Junio, 1970

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION OFFICIAL NOTICES 11th MAY, 1970

New Members

Asselin, Mr. R. A., Sydney, N.S.W.

Penman, Mr. D., Walebing, W.A.

Harvey, Mrs. W. K., Toowoomba, Qld.

Hull, Mr. J. Baulkham Hills, N.S.W.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$606.37
"Revanto", N.S.W.	2.00
"Antaŭen", N.S.W.	5.00

\$613.37

Sincere thanks to all who help.

Interstate Competition Points allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
"Klereca" Examination success	10
Each \$1 for the Publicity Fund	1

Positions on 11th May, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	499	383.8
Victoria	300	873	291.0
N.S.W. - - A.C.T.	260	578	222.3
W. Australia	80	167	208.7
Tasmania	30	32	106.6
S. Australia	40	23	57.5

Don't miss this opportunity. By now all who have paid their subscriptions for the current year should have received the new "Adresaro". In it there are 431 names, a larger number I

believe than ever before. I should very much like to see at least 500 before I retire, and I appeal for your help.

I am sure that there are hundreds of Esperantists in Australia who are not members of A.E.A. We do not know their addresses, so cannot contact them, but probably nearly all who read this know at least one or two. Anyone can now join for the remainder of this year for a half-year subscription of \$1.50, for which they receive membership documents, the "Australian Esperantist" for the remainder of the year, and the "Adresaro". Enrolment forms are available on request. All you need do is hand or send one to those you know. The more members we have, the better we can work for the spread of Esperanto. So please give us your help NOW.
—C. C. Goldsmith, Secretary.

SOCI(ET)A VESPERO?

"Socia vespero estas en Esperanto vespero koncernanta la homan socion! Tute alia afero estas societa aranĝo, aŭ amuzo, aŭ eĉ societa vespero". (Ivo Lapenna: "E-o", 5/54).

Estas supozinde, ke nur tre malofte samideanoj kunvenas por diskuti la aferojn de la homaro entute kiel tia. Konsideru:

Vespero amikiĝa, -iga, interkona (por logikemuloj: interkonatiga) signifas "get-together", reciproke konatiga.

Interamika (meeting of more-or-less old friends; revido de pli-malpli intimaj amikoj).

Porbabila: conversation evening, conversazione, "social", gabfest, talkfest (Sinclair Lewis).

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: La tri klasoj ĉe Subiaco, Victoria Park kaj Applecross bone funkcias kaj nia Ligo intencas inviti la studentojn al nia klubkunveno en Junio aŭ Julio, por ke ili renkontu la Ligoanojn. D-ro C. Caldera forveturis al Eŭropo kaj dum lia foresto S-ino D. Threlfall gvidas Esperanto-klason ĉe la "Secondary Teachers College".

Je 8/4 S-ro J. Hawks gvidis tradukekzercojn. Je 22/4 S-ino Ruth McGrath prezentis per magnetofono paroladon de Pastro Cseh, kiun tiu faris ĉe la Univ. Kongreso en Varsovio 1959.

MELBOURNE: Ni bedaŭras raporti ke nia ĝisnuna kasisto, S-ro Marshall Cohen, survoje al Cobram, havis aŭtomobilan akcidenton je la 4-e de Februaro. Lia edzino suferis rompigitajn brakoj kaj pelvon kaj devis resti num kelkaj semajnoj en la hospitalo de Mooroopna apud Shepparton. Felice S-ro Cohen nur ricevis skrapvundojn kaj la aŭto iomete difektiĝis. Pro lia foresto en Shepparton prokrastiĝis nia ĝenerala kunveno, kiu kutime okazas meze de Marto.

Je 4-a kaj 11-a de Majo fine okazis la prokrastita Jarkunveno. La Sekretario (S-ro H. Koppel) raportis ke la Melbourne E-Societo havis en 1969 entute 38 membrojn, el kiuj 5 estis novaj studentoj kaj 33 malnovaj membroj. (1968: 5 studentoj kaj 36 malnovaj membroj). Laŭ la kasista raporto de S-ro Cohen la societo elspezis \$507.92, sed enspezis nur \$390.36. Tamen, ĉi tiu ŝajna defikto de \$117.56 klarigis per elspezo de \$110 por piano kaj ties transporto al la Esperanto-Domo kaj agordiĝo fare de profesia agordisto. Tiun sumon la societo ricevis el speciala "Ekipaja Fonduso", kiu jam atingis preskaŭ \$90. Elektigis la sekvanta nova estraro: Prez: S-ro E. McKenzie; Vic-Prez: S-roj H. Rosengren kaj K. Bastin; Sekretarioj S-roj H. Koppel kaj H. Beechey; Kasisto S-ino Mary Fordham; Publikaj Rilatoj: S-ro A. Baldwin; Biblioteka Komitato: S-inoj F. Koppel, F. Fordham kaj F-ino A. Hearn.

Ĉe la amuzvespero de 27/4 S-ro Jim Daniels montris diapozitivojn pri vojaĝo tra Kalifornio. S-ro Kim Bastin, 18/5, parolis pri "Moderna Gramatika Metodo" en la studado pri la lingvistiko kaj klarigis ke fakte tio estas reiro al la malnova metodo — komparo de la gramatiko. S-ro Beechey nomis sian prelegon je 25/5 "Eksperimento Poezia". Post kelkaj vortoj pri la arto poezia li provis instigi la ĉeestantaron al ia verda poezia, sed ne trovigis embriaj

poetoj inter ni tiun vesperon.

La Esperanto-Klubo de Orientaj Antaŭurboj nun kunvenas ĉiun merkredon en la Biblioteko de Oakleigh, esceptante la 2-an Merkredon. La anoj aranĝis tre efikan ekspozicion en la bibliotekoj de Camberwell kaj Waverley, kaj vizitantoj al la 2 bibliotekoj prenis multajn verdajn kartojn. Ni esperas ricevi el tiu elmonro kelkajn novajn studentojn.

De la **Boronia E-Grupo** venis novaĵo kiu estis kaŭzo de ridetoj inter la grupanoj. Naskiĝis 3 estontaj esperantistoj: Leonie Heldzingen (nask. 2-4-1970), Patrick Stewart (13-4-1970) kaj Andrew Kuhlman (14-4-1970). Gratulojn al la feliĉaj gepatroj.

La membroj de la **Orrong E-Grupo** obstine laboras por perfektigi en Esperanto ĝis la venonta kongreso kaj tiucele akiris la helpon de S-ino Fay Koppel de la Melbourne E-Societo, kiu ĉiumonate vizitas la grupon.

MANLY: Niaj 3 kursoj daŭris en la Vespera Lernejo ĉiujauĉe kun meznombro 19 studentoj entute. Post la kurso okazis klub-kunvenoj kun 19 ĉe-estantoj: 16/4 Niaj Verkoj. Kvin anoj legis siajn proprajn rakontojn. 23/4 George Singer prelegis pri Abeloj (laŭ traduko de Peg Ford-Lewis). 30/4 Distra Vespero, kun kantoj, rakontoj, teatraĵetoj, kaj deklamo, fare de kursanoj kaj membroj. Ni nun libertempas ĝis 28/5, la komenco de la 2a stud-periodo.

Du el niaj anoj gajnis la Superan Diploman kun Hoero: Peg Ford-Lewis (A.E.A.), kaj Flora Cardale (B.E.A.) Gratulon al ambaŭ.

Sekve de peto de Argentina Esperantisto al D-ro A. Capell, 3 el niaj anoj renkontis junan anon de la ŝipo "Liber-tad", kaj gastigis lin dum la Festo-Tagoj de la "Cook Bicentenary".

"Manly Daily" regule raportis pri nia agado dum la pasintaj semajnoj.—

Marjorie Duncan.

BRISBANE: Nia dua pikniko, 5/4 estis eĉ pli granda sukceso ol la unua. Denove ni renkontis la grupojn de Redcliffe kaj de la Sunbrila Marbordo, ĉe Brisbane. La vetero estis perfekta. Ĉeestis 38 personoj kaj 2 infanoj. Kelkaj naĝis en la oceano, aliaj fiŝkaptis. Poste S-ino D. Sinclair gvidis nian kantadon, kaj S-ro Gunster ludis sian buŝharmonikon. S-ro MacDonell instruis nin kiel subakviĝi.

Je 27/4 okazis distra vespero. S-ro Cuvet preparis prelegon, S-ro Gunster legis rakonton kaj S-ino Greenhalgh deklamis 3 poemojn.—W. Greenhalgh.

REDCLIFFE: Nia klaso por infanoj daŭras en la ejo de la loka asocio de la

skoltinoj, kiuj favoras nian ideon; instruas S-ino Norcott kaj F-ino Lexia Joyner. Ni ankaŭ dankas S-ron Justins, la lernejestron de la Redcliffe Altlernejo, kiu permesas nin uzi la lernejon por la E-klaso. Novaj anoj: S-ro K. Kunze kaj F-ino Everdell.

Ce Toowoomba estas klaso ĉe la lernejo, kaj estas klaso porifana ĉe Rosewood.—Jessie Clarke.

Fondkunveno de Esperanto-Federacio de Viktorio

Tridek sep Melburnaj Esperantistoj kunvenis la 29-an de Aprilo en la Biblioteko de Oakleigh por fondi la E-Federacion de Viktorio. A.E.A. Sekretario "Tiny" Goldsmith proprakoste flugis al Melburno por prezidi ĉi tiun kunvenon. Li prelegis pri la celoj de regionaj federacioj kaj rakontis pri similaj federacioj en kiuj li aktive kunlaboris.

La kunveno elektis la sekvantan estraron: Prez: S-ro A. L. McLochlan (Boronia E-Grupo), Sekretario/Kasisto: S-ro A. Baldwin (Melbourne E-Soc.); Komitatanoj: Ges-roj R. Brooks (Ororong E-Grupo), S-ino M. Casey (Eastern Suburbs), S-ro I. Heldzingen (Boronia), S-ino V. King (Melbourne E-Soc.)

Dankon meritas S-ro Goldsmith, kiu venis speciale el Manly, kaj la prezidanto de la E-Klubo de Orientaj Antaŭurboj (S-ro A. Heathfield), kiu multe klopodis pri la fondiĝo de la Federacio. Laste, sed ne malplej grave, meritas dankojn la sinjorinoj de tiu klubo, kiuj provizis vespermanĝeton.—Herbert Koppel.

Nia 18-a Kongreso okazos en la Melburna Universitato

Kun ĝojo ni povas anonci ke ni sukcesis rezervi la "Queen's College" de la Melburna Universitato por la 18-a Aŭstralia E-Kongreso, kiu okazos de la 2-a ĝis 8-a Jan. 1972. Ĉiuj kongresanoj loĝos, manĝos kaj kongresos en la granda kaj tre komforta kolegio, kiu ankaŭ havas lokojn por parki privatajn aŭtomobilojn. La moderna naĝejo de la Universitato estos je nia dispono.

Ĉambroj estas haveblaj por 70 personoj kaj membroj kiuj deziras rezervi jam nun povas fari tion sendante \$5.00 al la Sekretario, Melbourne Esperanto Society, Box 2122 T., G.P.O., Melbourne 3001.

PRI LANTI

Cu iu en Aŭstralio korespondis aŭ parolis kun Lanti? Se jes, ĉu ili bonvolus kontakti kun E. Borsboom, Klipspringerdreef 23, Utrecht, Holland, kiu verkas pri lia vivo.

TRADUKA KURSO

Gi celas helpi progresintojn, kiuj deziras pliakiri lingvan scion kaj plibonigi sian stilon.

En ĉiu monato mi sendas tradukotan pecon en la Angla, ne tre longan. Gi atingas la Rondanon sufiĉe frue, por ke li aŭ ŝi povu traduki kaj sendi ĝin al mi antaŭ aŭ en la 25-a de la koncerna monato. Mi kontrolas ĝin, enskribante marginajn notojn, kaj resendas ĝin al la membro, kune kun mia traduko kun ties notoj kaj la Angla Peco por traduko en la sekvanta monato. Via tasko postulus proksimume unu horon.

La Kurso fondiĝis en 1940, kaj jam atingis sian Numeron 362.

La Kurso estas aparte instiga por plimalpli izolitaj Esperantistoj, al kiuj de tempo al tempo mi sendas legmaterialon.

Gi paŭzas dum Decembro, pro okupopremo tiusezona.

Al petantoj mi sendas foliojn klarigajn kaj konsilajn pri detaloj de la entrepreno.

La kotizo: 2 dol. jare, estas nur formala kaj servas por pagi afrankon kaj koston de materialo, riparado k.t.p.—Redaktoro.

Aŭstralia Esperanto Asocio

De n-ro I "La Suda Kruco" (Julio 1920) ĝis n-roj 6-7 (Aprilo-Majo 1920) surhavis subtitolon: Organo de la Aŭstraliaj Esperantistoj.

N-ro 12-13 (Junio-Julio 1921) ĝis n-ro 17 (Novembro 1921) . . . de la Australasian Esperanto Association.

N-ro 21 (Marto 1922) . . . Aŭstralazia Esperanto-Asocio.

Al n-o 147 (Decembro 1932) jam mankas, sen komento, tiu subtitolo.

Jam en tiu tempo la A.E.A. supozinde ne plu ekzistis eĉ surpapere. Per n-ro 165 (Oktobero 1934) la gazeto mem mortis.

En mimeografajo la gazeto renaskiĝis en Oktobero 1940 kaj vivis ĝis Decembro 1946. En Oktobero 1941 ekaperis subtitolo "Oficiala Organo de la A.E.A." En Januaro 1943 unufoje aperis la formo: La Aŭstralia Esperanto-Asocio. Tiun titolon retenas la nun presata serio jam de sia komenco en Januaro 1947.

Laŭ "British E-ist" Januaro 1912 la Australian Esperanto Association estis definitive fondita ĉe la Unua Kongreso en Adelajdo (1911). Dum longe en postea tempo la Asocio restis nur papera, ŝajne sen organiza formo. En "British E-ist", 12/37:—

"La Aŭstralia Esperanto-Asocio fondiĝis la 11-an de Oktobero, 1937, sub prezidanteco de Joab Eljot". Tio do

estis re-fondo.

La datoj donitaj en "La Rondo", Nov.-Dec. 1951, p. 40, estas nefaktaj.

Fondo de A.E.A., 1937.

En "Suda Kruceto" (Okt.-Dec. 1937) aperas reklamo: Fondiĝis 11 X 1937 por la kontinento Aŭstralia — Aŭstralia Esperanto-Asocio: Celo:— Subteni Oficialan Esperanton ĝis la rolo Mondlingvo. (Tiell)

Prezidanto (ĝis 1 Majo 1938): Joab Eljot . . . kiu dume plenumu ĉiujn neokupitajn oficojn.

Aliĝ-raĵto: Al ĉiu, kiu konsentas la Celon, eĉ se li mem nek estas Esperantisto, nek uzas Oficialan Esperanton.

"British E-ist" (Dec. 1937) anoncis tiun "fondon", aldonante kritikon pri la reformismo de Joab Eljot.

En 1938 Anna Hintze vokis plede por fondo de vera A.E.A. En tiu sama numero (Bulteno N-ro 2 eldonita de Joab Eljot) aperas plena teksto de la Statuto de la A.E.A. kiel li mem formulis ĝin.

En Novembro 1938 C. C. Cowling kaj F-ino N. D. Lawson aperigis en Bulteno N-ro 7 inviton al ĉiuj E-istoj formi fortan A.E.A.-on.

En Julio 1939 oni legas ke la oficentantoj de A.E.A. estas: Prez., C. C. Cowling; sek. kaj Kasisto, F-ino N. Lawson. Komitato: J. Eljot, S-ino A. Hintze; A. Turner. Novaj membroj voĉrajtaj: S-ino A. Douglas; G. Hillerman; F-ino A. Lawson.

Do ŝajnas ke la A.E.A. havis sian devenon en la iom nebule konceptita ideo de J. Eljot. Lia iniciato tamen iris atenton de aliaj, pli realismaj kaj praktikaj homoj, ekzemple Hintze, Cowling, Lawson, kiuj kune povis voke kaj memage formi la bazon de vere funkcia organaĵo.—Redaktoro.

ALFABETO

Rusa 33, Hispana 27, Angla, Germana 26, Franca 25, Greka 24, Latina, Hebrea 22, Kelta 17. Ĉiuj estas malperfektaj laŭ fonetiko. Ekz-e, pri la Angla Dorothy Sayers atentigas, ke la Oksforda Angla Vortaro "listas ne malpli ol 52 indigenajn variaĵojn". R. Markarian (B.E. 1/67): "Ortografie estas pli ol 140 manieroj prezenti la vokalsonojn". Li ne citas aŭtoritaton.

Ezra 7/21 enhavas ĉiujn literojn sen J, kiu origine samis kiel I. En du Anglaj vortoj la kvin vokaloj ĝuste sin sekvas: facetious, abstemious.

Ĉiu E-a litero troviĝas en: "Ŝajnas, ke la sagaca monaho laŭtvoĉe rifuzadis preĝi sur herbaĵo".

Provu fari similan frazon.

NEKROLOGO: M. C. BUTLER

Kun dolora sento ni informas pri la paca morto de Montagu Christie Butler en Majo 5, 1970, ĉe Kingston on Thames. Li estis 86-jara. Lia forpaso okazis en unu el liaj normale aferplenaj tagoj.

Li estis tutanime dediĉita al Esperanto kaj siaj alte moralaj principoj. Li Esperantiĝis en 1905. Kiel sekretario de B.E.A. 1916-1934 kaj poste kiel edukada sekretario de la Asocio, li prelegis al pli ol 3000 kunvenoj. Krom tio li laboris en diversaj kómpoj, kiel redaktoro, verkisto, tradukisto, vortaristo, bibliotekisto, bibliografo, himnologo, stenografo, muzikologo k.a. La Esperantistaro ŝuldas al li, inter multo alia: Esperanto-Angla vortaro, Step by Step, Muzika Termimaro, Klasifo de Esperantaj Temoj; tradukoj de Fundamentoj de la Kvakerismo, La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo, Kantaro Esperanta (250 kantoj), Himnaro Esperanta (280 himnoj); detalajn artikolojn pri Esperanto kaj lingvajn studojn pri la lingvaĵo de la Esperanta Biblio.

Laŭ karaktero li estis konscienca homo kaj puranima Kristano; laŭ intelekto, studanto persista kaj funde-serĉa prezentanto de sia amata lingvo.

Li paciencce pritraktis ĉian peton de amikoj. En mia arĥivo restas liaj leteroj de Septembro, 1930, ĝis Januaro, 1970. Ilia enhavo atestas la kuragan energion kaj neniam-ĉesan scideziron de nia nelacigebla veterano.

Li apartenas al elstare klerula familio. Lia patro estis pastro anglikana (1846-1923), kiu pioniris la muzikinstruadon "Tonic Sol-fa". Ties kuzo, Henry Montagu Butler (1833-?) estis Mastro (ĉefpersono) de la Kolegio Trinity, Kembriĝo. La Mastro en 1966 estis Lordo Butler, kaj diversaj familianoj Butler estis lernejestroj ĉe Rugby, Harrow kaj aliaj altgradaj lernejoj (letero de M.C.B. 34 Aprilo, 1966).

Finiĝis jam, ho kara hom', la pilgrimado tera;

Foriris vi, kun Dia ben', al servo alisfera.

Per paŝo post paŝo, post longa laboro,

Atingis vi fine la Celon en gloro. Unu el siaj propraj difinoj de "servi" estas: "What can I do for you?" (Mi staras preta por vin servi). — F.R.B.

Li deziris nur simplan funebran ceremonion, sen florkronoj. Pro memoro al li, oni povas fari materian tributon, sendante mondonacon al la Biblioteko de la B.E.A., kiun li ame servadis dum pli

ol kvindek jaroj. Adresu: Butler Memorial Fund, c/o British Esperanto Assn., 140 Holland Park Avenue, London W11.

DRINKEJO?

Plena Vortaro difnas "drinki" per aĉa senco:—"Maldodere trinki alkoholaĵojn", sed modife difnas "drinkejo" per "trinkejo de alkoholaĵoj". Sed konsekvence la difino devus esti: ejo, kie oni **maldodere** trinkas alkoholaĵoj. Tio estus nur relativa priskribo.

Millidge kaj Butler difnas "drinkejo" per public house, drink-shop, inn; dram shop, pub, tavern — post aĉsenca difino de "drinki". Butler: trinkajejo = refreshment room.

Fulcher/Long difnas per: tavern, pub-house = trinkejo.

Ce Johano 2/10 "drinkis" estas eraro anstataŭ la ĝusta "trinkis". Similkuntekste en la Hebrea Biblio Zamenhof uzis "trink".

"PAROLADO HAVITA DE L. EINSTEIN"

Tiel estas teksto sur p. 256 de "Fundamenta Krestomatio".

En sia revizio (1954) W. J. Downes ne prinitos la formon.)

Kontrolante la verkon, sendube Zamenhof aprobis aŭ permesis ĝin. Komparu: II Fabeloj de Andersen, p. 30/5, "... la muzikajisto havis ... paroladon". Ankaŭ: "Zamenhof" (Drezon), p. 14-15: "li havis ... paroladon".

Tamen iuj rigardas ĝin kiel unu el la multaj arkaismoj troveblaj en tiu antologio, prefere uzante "farita de ...". A., to **make** a speech; Fr., **faire** une conference; Germ., eine Rede **halten**.

POST(E)A; PLUS ...

Grabowski uzis "postea" por indiki tempon, ne lokon. "... ec la postea registaraĵ persekutoj neniam kapablus disŝiri". "influo sur lian postean animan staton" (Antaŭparolo al "Sinjoro Tadeo", 1918).

"Plus" estas signo de adicio, do aritmetika termino (Komparu: minus).

Gi signifas: krome (= krom tio), aldone. Gi jam uzigas en nefaka prozo: "... plus afranko; "La saĝo de ... plus via propra" (Quo Vadis, vol. 1, 123/1: Lidja Zamenhof trad.); "dramo ... plus mallonga peco" ("Esperanto", 5/69 p. 77). Laŭ analogo oni do rajtus uzi "minus" en prozo por la mala senco. "Li venis hejmen minus sia ĉapo". Tamen, ĉu pli bone ol kun la simpla "sen"?

RECENZOJ

"Norda Prismo", N-ro 3-4, 1969. 70 paĝoj. 45 steloj, kvaronjara.

Proksimume 40 legajeroj tradukitaj el la Pola, Rusa, Latva, Ĉeĥa, Hungara, Hispana, Portugala, Cina, Angla, kun originalaĵoj. Per tio oni vidas la fontvariecon de la enhavo. Originalaj poemoj de De Kock (Sud-Afrikan), tradukoj de Kalocsaj, Hilda Dresen, Armand Su kaj aliaj. Ĉerte ĝia "prismo" ne limas je la "norda". Fakte, el la Nordo venis nur unu — el la Dana.

"N.P." estas la sola ĝustnomata kulture-literatura neŭtrala gazeto en E-ujo. Gi meritas pli vastan subtenon ol ĝi ĝis nun akiris. Tamen, kelkaj observantoj tre povus pridubi ĝian manieron akiri subtenon, ekzameninte jen la tro intelektan, jen la tro ekzaltan karakteron de multaj el ĝiaj kontribuajtoj.

D-ro Manders avertis ("La Progresanto", Okt. 1950): "Mi jam 20 jarojn intense min okupas pri E-o, tamen min ankoraŭ embarasas multaj subtilaĵoj en la ... beletristika literaturo. La profesiaj E-istoj ... plene fordonis sin al la lingvo. Ilin ravis la subtilaĵoj de la vere vivanta lingvo de Zam ... ili propris al si la vivantan lingvon de niaj malmultaj eminentaj literaturistoj ... Ili forĝis kiom da-jaroj ili mem konstante okupiĝis pri la lingvo antaŭ ol ili atingis perfektecon, kiun ili postulas de aliaj ... La ĉefa kvalito de E-o estas maksimuma simpleco kaj daŭra stabileco ... E-o vivas, sed nur por malmultaj profesiaj E-istoj". Diroj diskutindaj, certe konsiderindaj. Malmultaj kontestus, ke simpleco kaj stabileco estas bazneĉesaj por vasta akcepto al E-o, kaj ĝia komprenateco ĉe ĉiu tavolo de la homa socio. Averta ekzemplo: Ragnarsson originalis senriman, senritman poemon: "El la Difinoj" (?) p.176. Gi estas forme kaj sence ne komprenebla.

La redakcio instruu al si, ke la grandega plimulto da E-istoj maleblas digesti tiun poemon kaj multon alian en la cetera bona kolekto Nordprisma. Diro aplikbla ankaŭ por alia revuo, kiu simile jam malsaĝis de temp' al tempo. Por varbi vige-legantan abonataron, ĝi celu la meze-adeptajn E-istojn, homojn sen pretendo aŭ kapablo al la kuriozaj produktoj de super-febraj verkistoj. Tiaj modeste ekipitaj E-istoj estas sufiĉe nombraj kaj volonte mendus revuon en kiu troviĝus legajoj simple kaj trafe esprimata. Kiam la romanoj de Dickens seriforme aperadis, amasoj kolektiĝis apud la eldonejo kaj vendejoj, kripostulante ekzemplerojn de la gazeto en kiu la mirindaj rakontoj havis lokon.

Kiam niaj eldonistoj jam profite studos tiun situacion kaj agos samtaktike, tiam ili ne plu plendos pri subten-manko.

Poetoj, penu redoni almenaŭ iom de la irize kristala belo de Tennyson, la atentotena forto de Coleridge. Eldonistoj, donu baladojn, kiuj saltigas la sangon, novelojn, kiuj nin surprizas per finrapa frazo, poemojn, kiuj per rekta lumfluo en la animon, esperigas pri l'homo, pri la mondo, pri la destino.

Jarkolektoj de "N.P." estas mendeblaj (1957-1968) je 20 Danaj kronoj (3.20 Aŭstralio) po unu. Peras K. Linton.

"ARKAIKA ESPERANTO": Manuel Halvelik, Gebr. Blommenstr., 41/0, 2200 Borgerhout, Antwerp. 124 paĝoj, 3 Us. dol.

La aŭtoro rigardas E-on kiel destinitan al "aktualaj homoj", por iliaj aktualaj bezonoj — interkomunikado kaj gefratigado sur internacia nivelo. En tio ĝi bone taŭgas. Ĝi sukcesis krei jam riĉan beletran literaturon, kiu refutas antaŭjuĝojn rilate ĝian tielnomatan artefitecon. En tio ni konsentas kun li.

Tamen li kritikis la procedojn per kiuj E-istoj selektas terminojn de la ekzaktaj sciencoj kaj vidas kiel konsekvencon la relativan malmulton da sciencaj eldonaj en E-o. Verdire la demando pri fak-terminoj en E-o prezentas principajn problemojn ankoraŭ ne solvitajn, kiel povas atesti laborantoj en tiu malfacila kampo. Proprakoste ili laboras super tasko, kiun devus esplori salajrata komisiono.

De tiu kritiko la aŭtoro pasas al sia kurioza postulo, ke E-o bezonas ankaŭ — "arkaikan lingvoformon", kiu povu distingi inter antikvaj kaj modernaj esprimmanieroj, respevuli la etoson kaj koloron de pratekstoj, malnovaj poemoj k.t.p. de antaŭaj jarcentoj. Sekvas liaj rezonoj, motivoj, por pravigi tiun strangajon. Li citas "kiel modelon kaj instigon" spritan disertajton de Kalocsay: "Mezepoka Esperanto" ("Lingvo Stilo Formo"), sed ne en la arlekena humoro de la Hungaro.

Por kio nome oni bezonus "arkaikan E-on"? La tasko de E-o ne estas reprodukti lingvoformojn de jam longe arkaikiĝintaj tekstoj, sed male: servi kiel komunikilo inter vivantaj kaj estontaj uzantoj, cele al klara kompreno reciproka. Niaj okuloj rigardas la modernan mondon — ne la pergameojn de pasintaj pra-tempoj. Por servi kiel efika soci-faktoro, E-o devas antaŭ ĉio resti kiel eble plej simpla kaj rokfirme stabila. Avantaĝo valora por E-o estas ĝuste tio, ke eĉ la plej fruajn verkajojn kaj gazetojn oni hodiaŭ legas kun facilco,

ne rimarkante la malmultajn formojn poste korektitajn per komuna uzado. tamen ankoraŭ kompreneblajn.

La nuna verko atestas la paciencon kaj kleron de rimarkinda homo, kiu evidente disponas pri neelĉerpebla fonto de energio, tempo kaj mono. Bedaŭre nur, ke li tiel misdirektas sian spiritan kaj mensan forton al propre kreita himerio. La "antikva E-o troviĝus en la tekstoj de la komencaj jardekoj de sia historio, kiam la vortprovizo estis malgranda, kaj aŭtoroj devis iufoje uzi formojn jam de longe ne uzitajn." (Pri lia "Universala Skribo", vidu: THE A.E. p. 210).

"Kontakto": organo de La Tutmonda E-a Junulara Asocio. 20-paĝa. 2.56 dol. jare, ĉe U.E.A.

Cefartikolo de Humphrey Tonkin pri la aktuala situacio ĉe la studentoj tra la mondo, kun rilato al la celo de E-o Pensiga tezo. Skizo pri Rumanio, de R. Dobrzynski. Anonimulo, per kvin nudvortaj paragrafoj pri la seksa vivo, prezentas konsilon nete kaj sence esprimitan.

KIOM DA ESPERANTISTOJ?

Preskaŭ ĉiam intervjuisto demandas pri tio. Oni povus respondi per alia demando: — Kiom da Aŭstralianoj scipovas la Francan (prestigan lingvon), lerninte ĝin kiel la duan lingvon apud la gepatra? Samkondiĉe, kiom da Francoj scipovas la Anglan (pli prestiĝan)? La intervjuisto ne sciis.

Prikalkuloj vaste varias. J. C. Wells: "Oni ne scias precize, sed proksimume unu miliono" ("Esperanto", 1/69).

Prof-o Mario Pei ("The Many Hues of English"): "Rosiest estimate: 15 millions in a population of 3 billions".

E. Sonnenfeld: "Miaopinie, sub miliono" ("Esperanto" 7-8, 1968).

T. Jung ("Tri Homoj Flugas al la Luno": 1969): "aktuale 40,000-50,000 pli-malpli aktivaj E-istoj".

Centro de E-a Dokumentado ("Esperanto", 5/65): "Kiel eltrovi kaj nombri la E-istojn? Kiuj el ili "parolas" aŭ "scipovas" E-on, kiun homoj lernas ĝis diversaj gradoj?"

La takso de Jung proksimume akordas kun la membro-cifero de U.E.A. (proks. 34,000), se oni prenas en kalkulon nepagi-povajn E-istojn kaj tiujn indiferentajn al la Asocio.

Tamen, devas esti, ke dum la 83-jara vivo de E-o multaj milionoj lernis ĝin

ĝis ia grado; sekve, povas esti, ke troviĝus iom impresa nombro, kiu ankoraŭ povas pasive leg(et)i la lingvon, eĉ ĝin praktiketi. La demando restas statistike nesolvebla.

OUT OF THE DEPTHS

Society, as we have constituted it, will have no place for me, has none to offer; but Nature, whose sweet rains fall on unjust and just alike, will have clefs in the rocks where I may hide, and secret valleys in whose silence I may weep undisturbed. She will hang the night with stars so that I may walk abroad in the darkness without stumbling, and send the wind over my footprints so that none may track me to my hurt; she will cleanse me in great waters, and with bitter herbs make me whole. — Oscar Wilde.

EL "BIGLOW PAPERS" (Lowell).

Mi militon nomas murdo;
Jen l'afer' sen argument'.
Ne necesas serĉi pruvon
Ekster nia Testament'.
Dio klare diris tion —
Ĉiu povas legi ĝin,
Kaj vi devas fruleviĝi,
Se vi volos trompi Lin.

Epoletoj kaj plumaro
Ne pravigos tion ĉi;
Nek la ŝafa imitado
Vin justigos antaŭ Li.
Se la glavon vi eltiras
Kaj en homon puŝas ĝin,
Ne la registaro kulpas —
Dio respondiĝos vin.

Kial iri al kunveno
Ĉiam en dimanĉmaten',
Se konvenas falĉi homojn
Kvazaŭ ili estus gren'?
Kvankam ŝajnas belaspekte
Ĉirkaŭpompj en galon',
Estas stranga Kristaneco:
Tranĉi gorgojn laŭ ordon'.

—Malnova traduko supozinde el iu n-ro de "British E-ist". Tradukinto? V.22. Originale: ĉirkaŭstruti. Mi ŝanĝis tion per: ĉirkaŭpompj. F. R. Banham.

LIBERA FORUMO

Kiel prononci la nomon "Canberra"? "Metu akcenton sur la unuan silabon" (Lady Denman, 1913.). Ĉu vere? Laŭ kiu aŭtoritato ŝi tiel pontifikas? Tiel metante akcenton, oni riskas konfuzon

ESPERANTO PLACE-NAMES

There are over 300 streets and squares in the world that bear the names: Zamenhof or Esperanto. No fewer than 50 are in Brazil.

EL LA PROFUNDO

La socio, en sia establita formo, ne donos lokon al mi; ĝi ne havas ĝin por proponi al mi. Tamen la Naturo, kies dolĉa pluvo faliĝas samegale sur la maljustajn kaj la justajn, havos en la rokoj ŝirmkrevojn en kiaj mi povos min kaŝi kaj sekretaĵn valojn en kies silento mi povos plori senĝenate. Si ornamos la noktan ĉielon per steloj, tiel ke mi povos disiradi en mallumo, ne stumblante, kaj ŝi sendos la venton por forviŝi miajn piedsignojn, tiel ke neniu povos postsekvi por min vundi; ŝi purigos min en grandaj akvoj kaj per amaraĵ herboj min resanigos.

kun la nomo "Canada", precipe ĉe telefona parolo aŭ neklara elvoĉo. Metante akcenton sur la mezan "ber", oni klare evidencigas la propran nomon, sen alia dubo. Cetero, se la nomo fakte estas indigene devena, ĉu oni ne rajtas kredi, ke la nigrujoj akcentadis la silabon "ber"? Farbo.

ESPERANTA KOMPUTILO

Komputile oni trovis, ke la plej ofta vorto en du tekstoj de Zamenhof kaj Lapenna estas LA: ĉe Zamenhof, 7.6%; ĉe Lapenna, 10.2%. Krome, ke el 125,000 literoj en tekstoj de Zamenhof kaj Lapenna la ofteco de supersignitaj literoj estas 1.42% ĉe ambaŭ aŭtoroj. (Esperanto, 2/70).

En La Rondo, 11/49: Kalocsay kalkulis pri du artikolojn en Heroldo de E-o —el 4800 literoj 102 havis supersignon, do proks. 2%. Tial, se oni povas tajpi Angran tekston en 100 minutoj, oni povas samtajpi E-an en 102.

NOV-ZELANDA ESPERANTO KONGRESO AUCKLAND, 8-12 JANUARO 1971

Eksterlandaj Esperantistoj estas tre bonvenaj kaj la ĉeesto senpaga. Oni povas resti en kongresejo, plejparte unutilaj ĉambroj, je kosto de 22 dol., lito kaj ĉiuj manĝoj dum la tuta kongreso.

Ĉambro rezervita nur post pago de 5 dol. deponmono por ĉiu persono. Frua aliĝo nepro necesa. Mrs. A. G. Wood (sekretario de la Loka Kongreso), 24 Stewart Rd., Mt. Albert, Auckland 3, N.Z.

PURECO KAJ INTERNACIECO DE ESPERANTO

Unu el la fundamentaj kvalitoj de E-o estas ĝia internacieco. Tiu esenca eco de la I. L. estas la ĉefa kaŭzo de ĝiaj ĝisnunaj sukcesoj kaj absoluta garantio por la estonteco. Konservu, ame gardi kaj flege evoluigi la internaciecon de la lingvo estas la elementa devo de ĉiu E-isto. Pri tio specialan respondecon havas niaj redaktoroj, verkistoj, tradukantoj, prelegantoj k.a., kiuj pro sia elstara pozicio estas imite sekvataj de la aliaj. Klara, vere internacia E-o fortikigas la unuecon de la lingvo kaj kontribuas al ĝia normala evoluo sur la striktaj reloj de tiu unueco.

Eĉ la plej bona uzanto de kiu ajn lingvo povas erari. Tio estas neevitebla en la naciaj lingvoj, kaj povas okazi ankaŭ en E-o. Se temas pri eraroj pli-malpli hazardaj, sporadaj, iusence personaj la afero estas iom ĝena kaj malagraba, sed neniel tragika . . . ĝi estas facile korektebla.

Male, se temas pri formoj erare aplikataj de tuta grupo da personoj — plej ofte nacia grupo — tiam la danĝero estas serioza. Tiaj kolektivaj eraroj povas detruu la bazon mem de E-o. Ili ĉiam fontas el la naciaj lingvoj, sub kies influo E-istoj de la koncernaj landoj ripetadas malĝustajn formojn ne kompreneblajn en aliaj medioj.

Tiusec Lapenna enkondukas artikolon en "Esperanto", Majo, 1954. Post kritiko pri misuzoj de Kroataj, Serbaj, Slovenaj E-istoj, li sin turnas al Italaj, kiuj regule legas ion sur ĵurnalo. Tiu eraron sufiĉe ofte faras ankaŭ Francaj kaj Hispanaj E-istoj. "Kompreneble, oni povas legi ankaŭ starante sur iu ĵurnalo. Tamen, tio verŝajne ne okazas tre ofte". Kutime oni sidas sur seĝo kaj legas ion en ĵurnalo.

Francoj invitas vin al tagmanĝo, dirante: "Mi oferos al vi tagmanĝon". Sendube, kelkfoje tia invito estas tre ĝena, eĉ ofera, precipe se temas pri ne tre interesa persono. Tamen, eĉ en tiaj okazoj, oni ne kutimas diri tion al la invitito, al kiu oni prezentas tagmanĝon, aŭ, se vi preferas, kiun oni regalas per tagmanĝo. Oferi tagmanĝon signifas ofendi la invititon. La saman eraron faras multaj Italaj, kaj, ne malofte, Britaj E-istoj.

Britaj E-istoj iufoje uzas forme ĝustan E-an vorton, sed kun senco, kiun

ĝi havas en la Angla lingvo: Lingvisto ne estas persono, kiu scias plurajn lingvojn, sed sciencisto, kiu studas la strukturon de la lingvo, la leĝojn de ĝia evoluo, kvankam li, eble, parolas nur unu lingvon. Kiu scias plurajn lingvojn, tiu estas poligloto. (Plurlingvulo, multlingvulo. — Butler, Waringhien). Vidu piednoton sube.

Varma aŭ malvarma povas esti forno, supo, ĉambro. Ankaŭ la homo estas varma, se li havas febron, aŭ malvarma post kiam li mortis.

Se — havante normalan temperaturon — oni sentas varmon aŭ malvarmon, oni devas ne diri: "mi estas varma, aŭ malvarma", sed "al mi estas varme, aŭ malvarme". Dirante "mi estas varma" — kio cetere estas tre bela kvalito de la temperamento — oni riskas miskomprenon, precipe ĉe sudlandanoj.

Oficisto estas persone, kiu profesie plenumas iun oficon (P.V.). Kiam temas pri funkcioj en E-aj kluboj, grupoj, k.s. eble preferinda estas: funkciulo, oficulo, ofi(ten)anto.

Tamen, "isto" estas iom "elaste" uzata. P.V. (sub "kasisto") duadifine: societano, kies tasko estas kolekti la kotizojn. Sub "-ist" ĝi libere difinas la sufikson per: ". . . kiu profesie, daŭre, prefere aŭ ofte sin okupas pri la afero difinita de la radiko". Butler: (sub "-ist") ". . . whether by profession or by habitual or frequent occupation or interest".

Zamenhof skribis: "plej aminda revistino"; "senhonta blasfemisto". (Rabistoj 32/1; 33/17). Per tio li indikas "fortan emon, inklinon revii, blasfemi". Do, ni evitu dogmemon ankaŭ en lingvaj aferoj.

La vera stilo Esperanta estas: simpla kaj logika. Celadu al klara esprimo internacia, gardante vin kontraŭ la veneno de nacilingva influo. Ĉiu "idiotismo" estu vera "esperantismo", nepre komprenata de ĉiu naciiano, ĉar ĝenerale uzata. Ilin notu kaj uzu, kiel efektivan parton de la lingvo. Kontrolu per la Plena Vortaro.

En "British E-ist", Jan. 1947, oni trovas bonegan helpilon: "False Friends" — 133 vortoj ofte misuzataj de Britaj E-istoj; ekz-e apologio, brava, domaĝi, akurata, eventuale festo, pamflet, rento, verso, novelo, verso . . . Vidu ankaŭ: "Lingvo kaj Vivo", p. 117.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 86 (166)

MELBURNO

Julio, 1970

VORTOJ DE LA REDAKTORO



Antaŭaj redaktoroj:

Arthur M. Hyde, 1920 - 1921.

Charles W. Ballard, 1921-1927.

Percy Hudson, 1927-1929.

En Majo, 1929 — antaŭ 41 jaroj — mi akceptis redaktorecon de la Aŭstralia Esperanto-organo. Organo, laŭ la tria difino de Plena Vortaro: esprimas la pensojn de grupo da homoj, do de vi, legantoj. Inter vi povas okazi diskuto: ĉu aŭ ĉu ne nia gazeto kontentige plenumis la sencon de tiu difino, sed estas certe, ke mi funkciis kun tiu principa intenco.

Antaŭ 41 jaroj Percy Hudson, la tiama redaktoro, abdikis oficon, por vojaĝi al Hindujo, per tre komplika vojo. En La Rondo (Marto, 1950) vi legas pri tio, kun multo alia pri tiu rimarkinda viro, senrivala vojaĝemulo inter ni E-istoj Aŭstraliaj.

La tasko, kiun mi tiam entreprenis, estis pene malfacila. Laŭ konsilo de Percy Hudson: "Se vi ne akceptos la laboron, la gazeto nun iras en morton.

Se vi akceptos, eldonu laŭ la stato de la kaso — tio estas, laŭ viaj financaj rimedoj".

Per subteno de fidelaj amikoj, tamen, la gazeto (tiam sub titolo: La Suda Kruco) sukcesis aperadi en preskaŭ ĉiu monato sen halto ĝis Oktobro, 1934. En Oktobro, 1940, aperis La Rondo mimeografita; en 1947, presita. En Januaro, 1958, nia gazeto ricevis sian trian kaj nunan titolon, pli taŭgan ol la nomo La Rondo, kiu povas pensigi pri ekskluziva esotera grupo da "skolanoj"

Gia eldonnombro kreskas, alproksimiĝante ĝis 400. Ni atingi 500 antaŭ paso de unu-du jaroj. Tiun progreson en tre alta grado rezultigis "Tiny" Goldsmith, nia sekretario, kies organiza fervoro kaj fundesperta strategio verŝis vivon en la landan E-movadon.

Post preskaŭ kvindek jaroj da E-isteco, mi ankoraŭ strebadas pli kaj pli intimiĝi kun nia amata lingvo, iufoje min riproĉante pri mia pigmea kontribuo al ĝia progreso, kompare kun la brilaj atingoj de aliaj homoj, ekzemple de nia vigla veterano Tiny, jam ĉirkaŭ 81-jara. Tiu sin-admona sento estas saniga; ĝi manku al neniu el ni.

En granda mezuro la gazeto ŝuldas sian finanĉan stabilecon al la longtempa laboro de Ken Linton, ĝia kasisto, kiu brave firmigis ĝian bazon, frontante plurajn krizojn. Tiun stabilecon nun aliaj induloj sindedice prigardas, ĉar li ĉi-jare rezignis la oficon en iliajn manojn.

Lojale subtenu la gazeton, la Asocian interligilon, sen kiu la movado ĉi-landa riskus diserigon — sen centra gvido, informo, instigo kaj individua tribunio por ĉies voĉo.

LIMERIKOJ

Junulo el Suda Afriko
Ekliris tra spac' en sputniko:
Sed ĉu al la luno,
Aŭ, eble, la suno,
Montriĝis nenia indiko.

Frenezul' el insulo Korsiko
Vojaĝas tra spac' en sputniko;
Kaj se lia sorto
Finiĝos per morto,
Jen, almenaŭ, pri li, limeriko!

—Bernard Long, okaze de E-ista kunveno en Watford. Ĉu legantoj povus fabriki similajn

ZAMENHOF VEGETARANO?

Zamenhof forte influigis de L. N. Tolstoj Legu: "Fundamenta Krestomatio", p. 108: La Hejmo de Mettisto; p. 187: Kio estas Vegetarano? (resp. p. 100 kaj 177 en la 17-a eld.). Tuj komence de la E-a movado fondiĝis Unuigo de E-aj Vegetaranoj, kies membro estis ankaŭ Zamenhof, kaj kies unua prezidanto estis Tolstoj. — "E-isto Slovaka" n-ro 7.

S.A.T. eldonis grandan nombron da libroj, originalajn aŭ tradukitajn. Elstaraj estas la Plena Vortaro, kaj la Plena Ilustrita Vortaro baldaŭ aperonta. Ĉiu membro de S.A.T. ricevas la gazeton "Sennaciulo" monatan, kaj Jarlibron kun la nomoj-adresoj de ĉiuj anoj tra la mondo. La kotizo estas tre malalta: 3.45 kaj 0.75 por "Sennacieca Revuo". Kiu helpas nin daŭrigi nian laboron?—Volo Guelting, landa peranto, 5/21 A'Beckett Avenue, Ashfield, N.S.W. 2131.

KAZAKA LULKANTO

(M. Lermontov)

Dormu, etuleto bela,
Mi enlulas vin.
La kvieta luno hela
Rigardados vin.
Mi rakontos fabeletojn
Kaj vi aŭdu min.
Dormu, fermu okuletojn,
Mi enlulas vin.
Super ŝtonoj Terek saltas,
Plaŭdas la ondet',
La ĉeĉen' sur bordon rampas
Kun la ponardet'.
Patro via estas forta
Kaj li venkos lin.
Dormu, estu vi kvieta,
Mi enlulas vin.
Venus tempo, vi elkreskos
Kun kazaka kor',
Sur ĉevalo vi ekrajdos
Kun pafilo for.
Silke brilos la seleto,
Mi borderos ĝin.
Dormu, mia infaneto,
Mi enlulas vin.
Vi heroo brava estos
Kaj kazak-anim'.
Akompani mi alvenos,
Manon svingos vi.
Kiom larmoj da amaraj
Verŝos la patrin'! . . .
Dormu, anĝeleto kara,
Mi enlulas vin.
En sopiro turmentigos
Sen konsolo mi,
Tutan tagon mi preĝados,
Nokte ploros mi'!
Pensos mi, ke vi enuas
Ĉe la fremda lim'.
Dormu, zorgojn vi ne konas,
Mi enlulas vin.
Tiam sanktan ikoneton
Donos mi al vi:
Ĝin, al Di' farante peton,
Metu antaŭ vi.
Kiam estos en batalo,
Ekmemoru min.
Dormu, etulino bela,
Mi enlulas vin.
—Tradukis A. Holzhaus.

Rimarkoj: Terek estas monta rivero en Kaŭkazo. Ĉeĉeno estas Kaŭkaza popolo.

MALPLIKARA AFRANKO

De 1 Jan. 1970 afranko de leteroj kaj p.k. al 21 landoj, inter kiuj estas Japanujo, Indonezio, Filipinoj, S. Koreujo, Tajlando, S. Vjetnamo, Laoso, Kambojdo, estas jene:

Leteroj, ĝis I unco, 5c.; 4c. por ĉiu sekvanta unco.

Poŝtkartoj, 5c. ("Age", Melbourne, 18/12/69).

**AUSTRALIAN ESPERANTO
ASSOCIATION
OFFICIAL NOTICES**

10th June, 1970

New Individual Member

Degnin, Mrs. J., Collaroy, N.S.W.

Publication Fund

Previously acknowledged	\$613.37
Gardiner, Mrs. E., Qld.	2.00
Harry, Mr. R. L., A.C.T.	12.50
Crane, Mr. D., Qld.	1.00
Behncken, Mr. O. H., Qld.	4.00
Keogh, Mr. J. B., Vic.	5.00
Brodie, Mr. N., N.S.W.	2.00
Hanks, Mr. E. S., Vic	2.00
Oki, Mr. J., Vic.	5.00
Dean, Mr. C. J. W., W.A.	2.00
Pisz, Mr. T., Vic.	1.00
"Antaŭen", N.S.W.	5.00
Simpson, Mr. A. R., Vic.	10.00
Laid, Mr. L., N.S.W.	4.00
Ma:shall, Mr. H., Vic.	3.00
Robbins, Dr. R., A.C.T.	1.00
Rymer, Rev. W. V., N.S.W.	1.00

\$673.87

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition

Positions on 10th June, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	506	389.2
Victoria	300	899	300.0
N.S.W. - - A.C.T.	260	608	234.0
W. Australia	80	169	211.2
Tasmania	30	32	106.6
S. Australia	40	23	57.5

THE NEW "ADRESARO"

There was a request on the first page of our December issue asking members to let us know if they had passed any examination not indicated in the previous "Adresaro". In the first week after the despatch of the new one we have received complaints from three members that their success has not been indicated. If you have succeeded in any Esperanto examination please let me know now—before you forget it—so that this can be noted for next time.

The 1970 Adresaro is much more imposing than its predecessor, but it would be still more so to the outsider if a far larger proportion of our members could show that they had a fairly good knowledge of Esperanto. If you have this, why not prove it by taking an examination? Particulars free on request, but a stamped addressed envelope would be appreciated.

If you think your knowledge is not yet up to standard, take a correspondence course to help while away the weary hours. Details free on request.—C. C. Goldsmith, Secretary.

EKZAMENOJ

Proksimume egalvaloras la sekvantaj ekzamenoj:

Elementa B.E.A.; Pyke Memorial (A.E.A.); Elementa A.E.A.

Altrada B.E.A. (Atesto pri Kapableco); Supera A.E.A.

Plej alta: Klereca A.E.A.; Licencia B.E.A.

La Anglalingvaj terminoj por la titoloj Elementa, Supera kaj Klereca estas Elementary, Advanced kaj Final ("The A.E." 5/69).

PRI PUBLICO.

En Aŭstraliaj ĵurnaloj ofte aperas artikoloj, leteroj, pri lingva instruado en lernejoj. Zorge notu ilin kaj, kiam oportune, respondu al ili laŭ via E-ista vidpunkto. Viaj respondoj estu nete kompaktaĵ; ĉiam kontrolu la faktojn; neniam troigu; emfazu la utilecon kaj praktikecon de E-o. Krome, de tempo al tempo sendu al redakcioj interesajn novaĵojn pri E-a agado en diversaj kampoj de loka kaj monda signifo. Povas esti, ke redaktoroj ne presigos ilin, tamen almenaŭ ili mem ekscias per viaj provoj iom pri la lingvo kaj fine konstatos, ke ili havas valoron laŭ ĝenerala intereso. En du jaroj centoj da pri-E-aj leteroj aperis en Aŭstraliaj gazetoj.

Ekzemple: "Sunday Mail" (Brisbano). Iu letero konfesas, ke E-o ne mirakle solvos ĉiujn mondproblemojn. Zamenhof ne pretendis, ke E-o tiel efikus. Nek li, nek liaj amikoj, estas tiel naivaj. Tamen E-o efektive prezentas solvon de la kompleksa lingva problemo, kiun frontas vojaĝantoj, sciencistoj, tradukistoj kaj ja simplaj homoj en ĉiu lando.

"The Australian": "Responde al mia letero en via ĵurnalo mi ricevis kelkajn demandojn de legantoj. Mia Asocio en la pasintaj du monatoj ricevis proks. 500 petojn pri E-a informado".

"Sunday Mail" (Brisbano): D-ro Naylor faras bonege en sia laboro: kreskigi German-Aŭstralian amikecon. Simile la A.E.A. daŭre, vige instigas lernadon de E-o, cele al tutmonda amikesco. (Sekvas detaloj kaj invito aliĝi al A.E.A.).

"Toowoomba Chronicle". En sia verko "What's in a Word?" Prof- Mario Pei asertas: Estas je ĉies dispono artingvo kun pli multe da adeptoj kaj vasta rekonado ol kiu ajn alia artingvo. Jen la fakta situacio. E-o jam tiris al si impresan nombron da adeptoj. Ĝi atingis ĉian kapablon kiel parolata kaj skribata lingvo. Ĝi vekis intereson ĉe registaroj. Ĝi impresis la publikon ĝis grado, ke preskaŭ ĉiu homo konas ĝin laŭnome.

rigardante ĝin kiel lingvon internacian. Pei donas al E-o kvar ĉapitrojn en tiu verko kaj nomas ĝin: "la lingvo de morgaŭ".

La supraj ekzemploj donas ideojn pri estonta agado de niaj "publicistoj". Legante ĵurnalon, notu pri ĉio, kio konce nas lingvojn, lingvoinstruon, kaj sendu al redaktoro taŭgan komenton, rebaton, kritikon aŭ similan, en senco kiu trafu metus la justajn pretendojn de E-o antaŭ la vastan publikon.

Rezultajn eltranĉaĵojn bv. sendu al H. V. Petley, 32a Lindsay St., Toowoomba.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION

publishes a monthly magazine, books and leaflets, maintains a national network of local representatives, stocks a wide selection of books and records and controls the largest Esperanto reference library in the world. It is financed only by its members. Our register in Australia reveals a sadly small membership of the B.E.A., our mother body. This surely could be increased. Write for its handbook 1970: 140 Holland Park Avenue, London W11.

To those of our newcomers who are looking for ways of utilising their growing proficiency in Esperanto we point out several openings. You have a hobby or special interest? You may contact 26 specialist societies (from Buddhists to nudists) — 20 pages of them in the Yearbook of the Universal Esperanto Association. You want a pen friend? "The British Esperantist", one among some 100 Esperanto papers, carries addresses of such. You will travel abroad? The Yearbook with 600 pages of addresses of 3600 representatives in 64 countries offers you agreeable and helpful contacts with Esperanto speakers. Like reading? Esperanto has a rich and growing literature. Want to learn another language? Experience has shown that learning Esperanto first and then another language is quicker than learning the national tongue first.

As a member of B.E.A. you enjoy associate membership with the U.E.A. with right to certain of its services. Mr. Linton would give any details on membership in these two bodies. Please think it over.

PARDON, MES AMIS!

Ĉirkau 150 Francaj vizitantoj al sia "ĝemelurbo" Taunton (Anglujo) takte

diskrete ignoris "bonvenigajn" afiŝojn. Jam semajnon magazeno en la ĉefa strato uzis miksaĵon da Franca kaj Angla en montrufenestra reklamo: "Une sale Francaise", kio signifas: "malpura Francino". La estro varkontrola diris, ke firmanoj jam antaŭe konsultis supozatan scianton de la Franca kaj ricevis ties certigon, ke la esprimo estas ĝusta. — "Sun" (Melburno) 29 Junio.

VIRINA HUMURO

Kiam mi estis sesjara, mi diris al knabineto, kiu loĝis tute apude: "Mi vetas, ke mi povas stari du colojn for de vi sen la ebleco, ke vi tuŝu min."

"Kiel?" Si demandis.

"Starante malantaŭ la pordo." Mi ridis tiel forte, ke la ludgloboj ruliĝis el la poŝo de la pantaloneto.

La knabineto rigardis min, kvazaŭ mi estus rano. "Kio estas tiel komika pri tio. Neniu povus vin tuŝi, se vi estus tiel stulta stari malantaŭ la pordo."

Malgraŭ la forpaso de multaj jaroj post tiam, mi ankoraŭ ne povas kompreni la virinan senton pri humuro.

Virinoj aŭ ridas je la malĝusta tempo, aŭ al la malĝusta serĉo, aŭ ili tute ne ridas. Mi konas virinon, kiu diris: "H-m-m-m, kaj kio okazis post tio?" kiam la ŝerco estis jam definitive finita, kaj alian mi konis, kiu ridis la tutan tempon, ĝis mi atingis la kulminon, kaj tiam subite serioziĝis kaj demandis: "Kaj kie vi loĝas nun?"

La sekreto de la afero, kompreneble, estas, ke la humuro ne venas el la ŝerco mem, sed el la mensaj bildoj, sentoj, kaj rilatoj, kiujn la ŝerco sugestas. Persono, kies mensaj bildoj konsistas el salonaj kurtenoj, printempaj kostumoj, kaj Gregory Peck, certe perceptas aferojn malsame ol persono, kies psiko turniĝas al tiel interesaj aferoj, kiaj golfludado, trufiŝado, kaj sveltaj blondulinoj.

Virinoj portas kun si tiel fortan balaston de tro fundamentaj realismoj, kiuj ne permesas, ke ŝi aspiru al pli altaj aferoj. Jen la kialo, pro kiu ili ne reagis al la tielnomita "shaggy-dog" rakonto, kiu derivas sian humuron el la fakto, ke tia rakonto estas malracia.

Unu nokton mi alvenis hejmen, eniris la domon, kaj salutis la edzinon. "Ĉu vi ŝatus aŭdi komikan ŝercon, karulino? Nu, iam estis ulo, kiu ĉiutage vizitis la saman restoracion kun peco de celerio malantaŭ la orelo. Iun tagon li portis cepon anstataŭ celerion. Homo, kiu estis lin observinta ĉiutage, ne povis sin reteni plu, do alproksimiĝis kaj demandis:

"Diru al mi, amiko, kial vi portas cepon malantaŭ la orelo? La viro respondis: "Hodiaŭ mi ne povis aĉeti celerion." La lastajn vortojn mi apenaŭ povis diri, antaŭ ol preskaŭ kolapsi pro senbrida ridado.

La edzino strange min rigardis kaj demandis: "Kial li ne povis aĉeti celerion?" Tiam ŝi aldonis: "Tio memorigas min. Grace kaj Bill estos ĉe ni hodiaŭ vespere. Ni bezonas fromaĝon."

Tiun vesperon mi rakontis la ŝercon al Grace kaj Bill. Bill ridegis, sed Grace nur ridetis afable kaj diris: "Celerio ja estas vere altkosta", kaj turninte sin al mia edzino, ŝi aldonis: "Nur hodiaŭ mi diris al mi, ke se kostoj daŭros altiĝi, mi devos trovi edzon, kiu gajnos pli da mono." Je tio la du virinoj fortege skuigis pro serio da histeria ridado, dum Bill kaj mi serioze suĉis olivojn.

Virino ne sin donas al petolado tiel prete, kiel viro. Viro povas interrompi direktoran konferencon por rakonti ŝercon, sed virino devas atendi, ĝis la vazoj estas lavitaj, kaj la infanoj banitaj kaj enlitigitaj, antaŭ ol eĉ pensi pri tiaj aferoj.

Je alia okazo mi diris al la edzino: "Ĉu vi aŭdis pri la du angloj sidantaj en la salono de sia klubo?" "Mi bedaŭras la novaĵon, ke vi devis enterigi vian edzinon hodiaŭ matene", la unua diris. La alia respondis: "Ho, ne bedaŭru. Mi devis. Ŝi mortis."

La edzino rigardis min per tiu sama esprimo, per kiu ŝi komencis, kaj mia granda rideto grade degelis for de la vizaĝo. "Pro kio ŝi mortis?" Ŝi demandis.

"Aŭskultu", mi rekomencis. "Du angloj . . ."

"Mi aŭdis tion," ŝi interrompis, "kaj ne kriegu al mi. Se iu intencas agi tiamaniere, mi ne deziras aŭskulti la rakonton."

Alia kaŭzo por malsukceso, kiam viro penas ridigi virinon, estas la nura fakto, ke viro rakontas. Virino opinias viron komika preskaŭ konstante, sed tiun fakton ŝi kutime sukcesas kaŝi. Mi vidis virinojn preskaŭ histeriajn pro ridado, kiam ili rakontis pri la maniero, laŭ kiu la edzo butikumas, kiel li drolotas la aŭton, aŭ kiel li kondutas kun blondulino, sed kiam la viro mem opinias, ke li estas komika, la ŝerco fuŝigas.

Cetera, mi konstata, ke estas ne nur la humuro de mia propra edzino, kiun mi ne povas kompreni. Mi renkontas la saman malfacilaĵon kun la edzinoj de aliaj viroj.

Okaze ĉe societa vespero, kiam la intereso jam vigliĝis, kaj kelkaj virinoj

rakontas ŝercon de biologia karaktero, mi kutimis enkonduki ŝercon mian propran. La virinoj, inklude de mia edzino, ĉesas ridi, rigardas siajn ŝuojn, turnis sin unu al la alia, kaj faras ian komenton, kia: "Via hararo aspektas bele de post kiam vi lasis la finojn kreski."

Ho, mi bone lernis esti tre singarda, kiam mi miksas humuron kun virinoj. Nun mi konservas miajn ŝercojn, ĝis la kunuloj kolektigas en la kuirejo por observi min verŝi la trinkojn, kaj la virinoj sidas en la salono kaj parolas pri vestoj, sed ofte dum tia okazo mi rimarkas, ke la edzino mallaŭtigas la voĉon ĝis nura flustro. Post tio la aliaj virinoj eksplodas per tondra ridado.

Iam — iel — mi eltrovos kio estas tiel komika.

—El la angla tradukis Ken G. Linton.

KVIN ANEKDOTOJ

Libertempanta vojaĝanto per sia aŭto pasis beletan vilaĝon. Haltinte, li demandis vilaĝanon, ĉu tie ĉi estas porsana, higiena regiono

La vilaĝano ridetante respondis: Certe, sinjoro. Kiam mi venis ĉi tien, mi ne povis paroli unu vorton kaj apenaŭ havis harojn sur mia kapo. Mi estis tiel malforta, ke mi ne povis iri tra la ĉambro, kaj oni devis levi min eĉ el la lito!

La vojaĝanto entuziasme deklaris: Tio estas ja nekredebla mirindaĵo! De kiam vi jam troviĝas en tiu ĉi vere saniga regiono?

Ho, ek de mia naskiĝo.

Unu tagon mia edzino kaj mi renkontis la maljunan S-ron Galt en parko. Li diris al ŝi, ke li persistos vivi ĝis la militfino, negrave kiel longe ĝi daŭros. Ŝi respondis, bonintence sed taktomanke, "Ho, S-ro Galt, certe mi esperas, ke tre baldaŭ ĝi finiĝos!"

Al juna profesoro en 1916 entuziasma virino prezentis blankan flageton kune kun riproĉo: "Sinjoro, ĉu vi scias, ke en Flandrujo nun mortas junaj viroj, defendante la civilizacion?" Li respondis, sin ĝentile klinante: "Ĉu vi scias, sinjorino, ke mi estas tiu civilizacio por kiu ili mortos?"

W. S. Gilbert diris al redaktoro de la semajngazeto "Punch": "Mi supozas, ke ĉiun semajnon tre multe da ŝercoj alvenas en vian kabineton?" La redaktoro jesis, kio Gilbert demandis al li: "Kial do vi neniam ilin aperigas?"

Iuj Kristanoj asertas kredi pri la mirakloj de la Apostola unua jarcento, sed

pridubas aŭ neigas pretendojn, ke mirakloj okazis post tiu epoko. Aliaj Kristanoj similas tiun Francon, kiu pri-kredis "nur tiujn miraklojn, kies faro ne estas tro malfacila".

Tia sinteno penisigas pri sinjorino, kiu volis kredi, ke Skta. Deniso reprenis sian fortranĉitan kapon kaj formariĝis kun ĝi — sed ne tiel foren kiel estas distanco de Montmartre ĝis la baziliko, kiu nun portas lian nomon.

Jen al ŝi ĝusta respondo: "Nur la unua paŝo estas malfacila!"

AUSTRALIA KRONIKO

BRISBANE: Dum ĉi tiu monato multaj klubanoj estis malsanaj. Ni esperas, ke ĉiuj baldaŭ resaniĝos.

1/6 S-ino R. Hird prelegis al ni — "Kelkaj pensoj pri floroj. 6/6 Brisbane kaj Redcliffe esperantistoj vojaĝis al Rosewood. La rakonto de la tago sekvas la kluban novajon. 7/6 Ges-roj Robinson reprezentis nian klubon ĉe la kutima pikniko kun la klubanoj de Redcliffe kaj la Sunbrila Marbordo. Estis bone aŭdi, ke S-ino Callaghan kun Ges-roj Allen ankaŭ ĉeestis.

8/6 ne estis kunveno, ĉar en Kvin-slando estis ferio pro la Reĝina Nask-tago.

15/6 Ĉiuj ĝuis la prelegon de S-ino J. Elvidge. Sia temo estis "La Aĉetado de domo." Sed ni devis prokrasti la prelegon de S-ino Robinson 22/6. Hon-konga gripo atakis tro multajn membrojn. Bonŝance la tri kursoj de komencantoj sub la gvido de S-inoj Cooney, Sullivan kaj Elvidge ĉeestis forte.—W.G.

MANLY: Nia dua stud-periodo komen-ciĝis jaŭdon 28/5 en la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly, kun entute 15 studentoj. Kvankam malmultnombro 3 kursoj starigis, (unu oficiale): komenca, sub Susan Sobey; drama sub Robbie Robertson; stud-kaj diskutita sub Paul Schwerin kaj Marjorie Duncan.

Klub-kunvenoj okazis post la kursoj, 8.15 - 9.30: 28/5 Paul Schwerin prelegis kun belaj lum-bildoj pri sia vizito al Irano; 4/6 Lily Jullie gvidis kart-ludon, nomitan "Leksikono", kiu entuziasmigis la membrojn pri vort-farado.

Okazis 3 specialaj renkontiĝoj: 14/5 En la hejmo de Ruth Carruthers ni kunvenis por plani agadon ĝis Sept. Poste, vespermanĝo kaj babilado. 31/5 denove en la hejmo de Ruth 27 amikoj festmanĝis kaj adiauis al 5 anoj, kiuj vojaĝos eksterlanden: — Betty Clemin-son, Audrey Bracken, Thora Richmond, Edna Giles kaj Jean Degnin. 1/6 Ges-roj Arthur Cocking invitis klubanojn kaj

vizitantojn al sia hejmo por film-vespero kaj vespermanĝo. Ni ĝuis diapozitivon p.1 vojaĝo de Londono al Katamandu, bone prezentitajn Anglalingve de Joan Payne.

17 el niaj anoj partoprenis en la Federacia Konferenco en Orange je Majo 23-24, kaj ĝuis la sukceson de tiu semajnfino.

Oni ĉiusemajne sendas raportojn pri nia agado al 4 regionaj jurnalaj. Preskaŭ ĉiam ili aperas en "Manly Daily", kaj de tempo al tempo en "Pacific Times", "Warringah News", kaj "North Shore Times".

Partopreno en du urbaj aranĝoj helpis niajn publikajn rilatojn: 5/2 nia Prezidanto Marjorie Duncan reprezentis la Klubon ĉe Urba Akcepto al Miss Australia en la Urbdomo. 2/5 Nia membro Arch Duncan organizis mon-kolekton en la orienta regiono de Manly, subtene al "Ruĝa Kruco Vokas". Nome de la Klubo, kaj helpate de pluraj mumbroj, li kolektis 240 dolarojn tiucele.

En la Radio Programo "Morning Call", 2F.C., (Dec. 1969), Edna May Jenkins intervjuis nian anon, Peg Ford-Lewis, kiu parolis pri la valoro de Esperanto en internaciaj rilatoj. Gratulon al Peg pro ŝiaj sukcesoj en lingvo-studado kaj Esp.—informado!—Marjorie Duncan.

ESPERANTO-FEDERACIO DE N.S.W.

La 12a Konferenco okazis en la Royal Hotel, Orange, je la 23-24a de Majo. Ĉeestis 28 membroj, tre kontentiga nombro, kiam oni konsideras ke la bela urbo staras 166 mejlojn de Sydney, kaj la vintro jam komenciĝis.

Akceptiĝis progres-raportoj pri la Federacio kaj pri la Manlia kaj Sidneja Klubo.

La ĉefa temo diskutita estis propono pri la kunfandiĝo de la Federacio kun la Esperanto-Asocio de N.S.W. (antaŭe Esperanto Co-operative Ltd.). La principon oni akceptis sub certaj kondiĉoj, kaj nun ni atendas la decidon de la E.A.N.S.W.

Oni decidis ke la venonta Konferenco okazu, se eble, en la regiono de Newcastle je la 15a de Aŭgusto.

Post la vespermanĝo ni denove kun-venis por societa vespero. Unue oni provprezentis teatraĵetojn, kantojn, paroladojn, k.t.p. Poste envenis la fama aktorino Muriel Steinbeck kaj ŝia edzo, la lokaj A.B.C. radio-representantoj, kiuj dum du horoj surbendigis la programon kaj kelkajn intervjuojn. Ili tre interesiĝis pri la internacia lingvo, kaj ni ĝuis tre interesan kaj vivecan vesperon.

La antaŭan vesperon nia vigla loka membro, Frank Acs, bonvenigis ĉe sia hejmo 15 membrojn kiuj ĝuis lian tre malavaran gastamon. Li ankaŭ aranĝis, ke dum la matenoj de Sabato kaj Dimanĉo ni vizitu en aŭtomobiloj la ĉirkaŭaĵojn. La vetero estis agrabla, kaj la tuta vizito al Orange estis granda sukceso.

Je la 19a de Aprilo subĉiela pikniko ĉe Manly Dam okazis en varma vetero, kiam 17 membroj partoprenis feliĉan amikan kunvenon. —George Thatcher.

MELBOURNE: Eastern Suburbs: La nova komitato plioftigis kunvenojn. Ni nun kunvenas ĉiun merkredon vespere (esceptante la duan merkredon en la monato) je la oka ĝis la naŭa kaj duono. Kiam kvin merkredoj okazas en unu monato (kiel en Aprilo), la kvinan vesperon ni uzas por distraĵoj anstataŭ klasoj.

En Aprilo ni gastigis la fond-kunvenon de la nova E-a Federacio de Viktorio, kiun gvidis Tajni Goldsmith. Ni elektis S-inon Margaret Casey kiel nian reprezentanton. La sinjorinoj de la E. K. de O. A. refreŝigis la vizitantojn el aliaj Melburnaj kluboj per biskvitoj kaj teo.

Ni aranĝis elmontraĵojn de E-libroj en la Biblioteko de Camberwell dum Majo kaj sekve en tiu de Waverley dum Julio. Poste ni donacis ekzemplerojn de "Essential Esperanto" al la bibliotekoj kiel memoraĵojn. La publiko forprenis 1000 "verdajn kartojn" dum la du elmontroj. — Arthur Heathfield.

NOV-ZELANDO RAPORTAS

Propono pri Re-organizo

Post longa kaj plena diskuto dum la 35-a NZEA kongreso okazigita en Napier (januaro 3-7, 1970), la ĝeoj decidis esplori proponon reorganizi la nacian asocion de Esperantistoj (NZEA).

La propono rilatis la starigon de naŭ regionoj en la lando, ĉiu kun sendependa oficistaro kaj reprezentanto al la nacia komitato. Samtempe, la kongresanoj decidis, ke la jarkotizoj de NZEA estu plialtigitaj, jene: ordinara membro, \$4, ĝeoj, \$7, kaj ke parto de la sumoj restu kun la regionaj komitatoj por vigligi ties agadon.

Sekve, samideanoj en ĉiu proponita regiono nun laboras por eltrovi la volojn de la esperantistoj pri reorganizado, kaj raportoj estos prezentitaj al la 36-a Kongreso, kiu okazos en Auckland la 8-an ĝis la 12-a de januaro, 1971.

Ekde januaro, 1929, kiam la NZEA revivigis post 12-jara 'dormado', la

asocio funkciis laŭ neregiona bazo kaj la nova propono celas fari la E-movadon en Nov-Zelando pli efika kaj reala per decentrigo de la ĉefurbo, Wellington. —W. H. King (Whangarei).

TEATRAJAJ KUNĈEESTOJ SAMIDEANAJ

La T.K.S. (Victorian Esperantists' Theatre Club) estas klubo por Melburnaj E-istoj kaj iliaj amikoj. Ĝi ebligas al ili ĉeesti filmojn kaj vivajn teatraĵojn malpli kare ol private, aĉeti la vinojn "Yaldara" malpli kare ol individua aĉeto kaj ricevi la kluban bultenon — "La Plezurulo". La profiton ni uzas por donaci E-librojn al bibliotekoj, altlernejoj, kolegioj k.t.p.

Dum la unua jarkvarono de la klubo ni aranĝis ĉeestojn al 4 teatraĵoj kaj 3 distraj vesperoj, ankaŭ eldonis 4 n-rojn de la bulteno. Nia celo estas sendolora profito por la movado, kaj ni gajnis pli ol 25 dolarojn.

Ni distribuis E-librojn al lokoj, kie ili interesos eblajn samideanojn. Tial ni kontaktis 3 lernejojn kaj 2 kolegiojn por venontaj duagrada instruistoj. Sekve, ni donacis al la altlernejo en Camberwell kaj la porinstruistaj kolegioj de Parkville kaj Monash arojn, kiuj enhavis 5 librojn kaj unu diskon.

La akcepto de "Plezurulo" estis miriga. Ni ricevis iom da kritiko, sed la ordinara samideano bonvenigis ĝin per subtenado aĉeta kaj (pli grave) kontribua. "Plezurulo" kreskis jam de 6 paĝoj kaj 18 ekzempleroj en Aprilo ĝis 13 paĝoj kaj 40 ekzempleroj en Julio.

"Plezurulo", N-ro 3, Junio, 11 paĝoj, mimeografita. 5c. por membroj; alie 15c. Pipece pakita pikantaĵo. En ĝi kvar homoj nudvorte diskutis la cenzuron, la sekson, kun admirinda observemo. Sur du el la paĝoj troviĝas artikoletoj en kiuj svarmas gramatikaj eraroj. Specialan respondecon havas redaktoroj gardi la purecon de E-a lingvuizado. Ili penus elsarki nekorektaĵojn el la ricevitaj tekstoj.

Ĉi tiu cetero tre vigle distra gazeto estas mendebla ĉe A. Heathfield, 128 Broughton Rd., Surrey Hills. 3127.

OUR PRESS ORGAN

Recipients of our paper should preserve their copies. Certainly every club and group should have done so. One may hope that this has been done fairly widely. Careful indexing of contents serves for ready reference to many a point useful in private study or public activity.

WHAT DID HE REALLY SEE ?

Many have experienced the sense of nearness, for a fairly short time, of those they have loved but are now dead. This has several times happened to me. But the late C. S. Lewis gave me an unusual experience. I saw him but once in the flesh and did not know him well. We did, however, often write to each other.

A few days after his death, while I was at TV, he appeared, sitting in a chair a few feet from me, and spoke a few words that were relevant to difficulties I was then passing through. He was ruddier than ever, grinning all over his face and glowing with health. The interesting thing is that I was not thinking of him at all. I was neither alarmed nor surprised. He was just there. As large as life and twice as natural.

A week later I was reading in bed before going to sleep when he appeared again, even more radiant than before. He repeated the message, which was very important to me at the time.

I was a little puzzling at this (I) and I mentioned it to a certain saintly Bishop, then living in retirement in Dorset. His comment was: "My dear J., . . . this sort of thing is happening all the time". — "The Ring of Truth". (paperback): J. B. Phillips.

(I) Good example of English litotes or understatement. How would you feel if you saw a phantom?

P. G. WODEHOUSE EN ESPERANTO

Richard Osborne en sia libro "Wodehouse at Work" (1961) traktas pri tradukoj de verkoj de Wodehouse en fremdajn lingvojn. Li diskutas la demandon kun bone Angleparolanta Belgo, kiu asertas, ke la Franclingvaj idiotismoj ne konformas kun la Anglaj, estante tute malsamspecaj. "Tradukado estas tre malbone pripagata metio. Se oni faras ĝin por gajni vivrimedojn, oni devas fari ĝin tre rapide. Eĉ se oni povus kontentige traduki verkojn de Wodehouse en la Francan, tion oni certe ne povus fari rapide . . ."

Osborne analizas Francan tradukon sub titolo "Jeeves, au Secours," farante ridigajn tekst-komparojn, poste ekzempligas mankon en Germana traduko kaj fine citas la komencajn frazojn de la Esperanta traduko de la verko: "The Prince and Betty" — tradukita de H. Badash:— "Bela junulino en blua vesto eliris el la domo kaj ekmarŝis malrapide trans la teraso al la loko, kie sidis Elsa Keith

KION LI EFEKTIVE VIDIS ?

Multaj homoj jam spertis, dum iom mallonga tempo, senton de proksimeco al personoj, kiujn ili amis en vivo, sed kiuj estas nun mortintaj. Tio okazis al mi kelkajn fojojn. La mortinta C. S. Lewis donis al mi aparte strangan sperton. Mi vidis lin nur unufoje en la vivo kaj ne bone konis lin persone, sed ni ofte skribis unu al la alia.

Kelke da tagoj post sia morto, dum mi rigardis televidon, li aperis, sidante sur seĝo je pluraj futoj for de mi. Li parolis kelkajn vortojn, kiuj signifis rilatis al malfaciloj tra kiuj mi tiam baraktis. Lia haŭtkoloro vizaĝa estis pli ol ordinare ruĝete-sana; li ridetis plenmiene kaj arde radiis por saneco. Tre interesa estas tio, ke pri li mi tiutempe tute ne estis pensanta.

Mi sentis nenian timon, nek surprizon. Li simple estis tie! Tute kaj plene laŭnatura, vive impresa!

Semajnon poste li denove aperis, kiam mi estis en lito, legante libron antaŭ domo. Ankoraŭ pli belradia li aspektis. Li ripetis tiun saman mesaĝon, tiel gravan por mi en tiu tempo.

Mi estis iom konfuzita per tiu fenomeno kaj poste ĝin menciis al iu sankteca episkopo tiam loĝanta emerite en la provinco Dorset. Li komentis: "Mia kara J., tiu spertospeco tre ofte okazas al la homoj". — "La Frapsono de l'Vero", broŝurita, J. B. Phillips.

(I) Frapa ekzemplo de la Angla litoto (malhiperbolo, trotro milda esprimo). Kiel VI kondukus antaŭ fantomo?

kun Martin Rossiter sub la ombro de la granda acerplatano. Elsa kaj Martin fianĉiĝis antaŭ kelkaj tagoj, kaj ĝenerale oni trovis ilin, je tiu horo, kune sidantaj en iu ombroplena loko".

Li konkludas: "I don't see how this could be bettered" (Miaopinie, oni ne povus plibonigi tiun tradukon). Valora tributo al Esperanto.

("La Princo kaj Betty" estas havebla ĉe U.E.A. 4.80 steloj).

FINNA IMPORTO-EKSPORTO

S-ro Tauno Kostiainen vokas al fabrikantoj, komercistoj, pri vendo-aĉeto kun sia firma, la sola Esperanto-lingva agentejo en Finnlando. Vidu anoncon en "Esperanto", Junio 1970, kaj sekventa Jarlibro de UEA. Adreso: Siltakatu I A 13, Heinola, Finland.

"LANTERNO", libere sendependa internacia gazeto. Enhavas mondpolitikajn, literaturajn, prilingvajn artikolojn. Monate, 10 ĝerm. Markoj aŭ egalv. Postfach 473, D-8000 Munich 25.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 87 (167)

MELBURNO

Aŭgusto, 1970

LA LINGVA PROBLEMO EN VJETNAMO

R. L. HARRY, Australia Ambasadoro en Sajgono.

Vjetnamo kaj ĝiaj loĝantoj havas tiom de problemoj, inkluzive longedaŭran militon kaj ties sociajn kaj ekonomiajn rezultojn, ke oni ne multe atentis pri ĝiaj kulturaj kaj lingvaj malfacilaĵoj. Tamen la historio trudis al la Vjetnamanoj tre kompleksan lingvan situacion.

La Praaj Lingvoj — La Montanoj.

La saĝuloj ne estas unuanimaj pri la origino de la Vjetnama popolo, sed estas sufiĉe certe, ke estis popolo Vjeta, kiu migris suden el la valo de la rivero Jangtse inter la kvina kaj la kvara jarcento antaŭ Kristo. La arkeologoj kredas, ke estis jam en tiu epoko civilizacio en la valo de la Ruĝa Rivero, kun kiu la migrantoj kunfandiĝis. Sed verŝajne multaj indiĝenoj estis puŝitaj en la montojn — la prapatroj de la nuntempaj Montanoj. En la montoj kolektiĝis dum miljaroj aliaj elementoj — triboj kun diversaj lingvoj, similaj al la Kamboĝa, la Taja, la Cama kaj eĉ al la Indonezia. La monta ĉeno de Vjetnamo estas vera mikspoto de lingvaj restaĵoj, kaj la administrado de tiuj ĉirkaŭ 3,500,000 Montanoj estas tre malfacila. La nuna registaro de la Respubliko de Vjetnamo, ĉe kiu mi estas akreditita en Sajgono, klopodas plibonigi la vivnivelon de tiuj Montanoj per edukado en la indiĝenaj lingvoj kaj ankaŭ per instruado de la Vjetnama.

Dufoje mi vizitis vilaĝeton apud la urbo Ban Me Thuot en la provinco Darlac, al kiu la Australia Registaro donacis ventmuelilon por pumpi akvon al la domoj. Multaj vilaĝanoj komprenis mian Anglan kaj Francan, kaj kelkaj ankaŭ divenis la signifon de miaj Vjetnamaj frazoj.

Mi akompanis la Prezidenton de la Respubliko, kiam li bonvenigis milojn da Montanoj, kiuj estis en Kamboĝo, sed kiuj revenis al Suda Vjetnamo por kunlabori kun la registaro.

La Konstitucio protektas la Montanojn. Estas speciala Konsilo por Etnaj Minoritatoj kaj la registaro klopodas por multaj metodoj plibonigi ilian situacion. Mi vizitis ankaŭ en urbo Ban Me Thuot la radistacion (donacitan de Aŭstralio), kiu dissendas edukajn programojn por la montanoj, ankaŭ lecionojn en iliaj lingvoj kaj klarigojn pri socialaj celoj registaraj, ekz. la programon pri "Malfermaj Brakoj" por ribeluloj kiuj deziras reveni al la nacia familio, Krome informojn pri agrikultura programo: "Tereno al la Terkulturistoj". Pro tio la komunistoj atake damaĝis la Aŭstralian dissendilon en Feb. 1968. Riparita, ĝi denove elsendas en la lingvoj de la triboj de la altebenaĵo.

Mi ĉeestis celebron pri la dat-reveno de la Carto de la Etnaj Minoritatoj. Junuloj dancis kaj kantis. Carma festo! sed mi preĝis, ke tiuj junuloj ankaŭ kantos sian nacian himnon kaj ke ili

lernos la Internacian Lingvon.

La Lingvo De Ĉam.

Kiam la Vjeta popolo svarmis el la delto de la Ruĝa Rivero kaj migris suden, sekvante la marbordon, ili konfliktis kun popolo de tre alta civilizacia nivelo — tio estas la popolo Ĉam, de Hinda kulturo. Estas muzeo de la Ĉama kulturo en la urbo Danang. Sed malfortigitaj rezulte de militoj kontraŭ la Kamboĝanoj, la popolo Ĉama ne povis rezisti la militemajn Vjetnamanojn. Nun postrestas nur kelkaj dekmiloj el tiu popolo. Tiu minoritato ne multe parolas sian lingvon.

La Homoj de Kamboĝa Origino.

Antaŭnelonge ĵurnaloj raportis, kun fotoj, pri la "sidiĝa" striko de la bonzoj de Kmera (Kamboĝa) origino antaŭ la Palaco de Sendependeco en Sajgono. Dum multaj tagoj tiuj monakoj restis tie, kaj urbcentre aŭtoveturado estis trege malfacila. Kiel Ambasadoro de Aŭstralio mi ricevis leteron de reprezentanto de tiu grupo. Li diris, ke multaj lojalaj ŝtatanoj de la Respubliko de Vjetnamo estas de la Kmera raso, ke iliaj prauloj enloĝis la delton de la Rivero Mekongo, ke ili parolas la Kamboĝan lingvon, ke ili deziras havi la privilegiojn de etna minoritato.

Antaŭ nelonge mi bonvenigis al Sajgono la Ministron pri Eksterlandaj Aferoj de Kamboĝo kaj helpis al la restarigo de diplomataj rilatoj inter Kamboĝo kaj la Respubliko de Vjetnamo. kaj pri interkonsentoj inter la du registaroj. Komunikon konstatas, ke la Registaro de la Respubliko studos la demandon pri la homoj de Kmera origino.

Mi mem havis personan sperton pri la lingva aspekto. Nelonge post la eksidiĝo de la bonzoj sur la avenue Ton Nhut en Sajgono, mi vizitis templon en la provinco Ba Xuyen (ba suijen), kie troviĝas multaj Vjetnamanoj, ŝtatanoj de la Respubliko de Vjetnamo, de origino Kmera. Por konversacii kun la ĉefbonzo mi parolis Angle, oni interpretis el-Angle en la Vjetnaman, kaj dua interpretisto el la Vjetnama en la Kamboĝan. La ĉefbonzo respondis Kamboĝe; oni interpretis el-Kamboĝe en la Vjetnaman kaj el-Vjetname en la Anglan. Tra la lingvoĉeno mi demandis al li: kial liaj kolegoj en Sajgono malhelpis la trafikon per sia sidiĝstriko? La ĉeno de interpretado funkciis, kaj fine mi ricevis la respondon: "Mi scias nenion pri striko en Sajgono!"

Oni min informis, ke la bonzoj eĉ se ili parolas la Vjetnaman rifuzas ĝin uzi, por konservi la apartecon de sia fako de Budhismo kaj de sia Kmera fidelularo.

Plejparte ordinaraĵoj parolas la du lingvojn, sed mi rimarkis dum iu ceremonio, ke oni interpretis la prelegon de Prezidento Thieu (tju) kaj de la komisiito en la Kamboĝan. Estas kelkaj afiŝoj ankaŭ en la Kamboĝa nefonetika skribosistemo.

(daŭrigota.)

MAJUSKLOJ

Uzante majusklojn, la redaktoro faciligas al komencantojn komprenon de tekstoj. Uzante nur minusklojn, li prezentus al legantoj nenecesan cerbumadon.

Ekzemple komencantoj (kaj eventuale ankaŭ aliaj) vane serĉus en vortaroj signifojn de la sekvantaj adjektivoj:— paria kaj karara marmoro; samosa vino; mokaa kafo; kafo; sabena virino; seneka saĝo; priama (de Priamo) parolo; friĝia ĉapo. Estas do prefere uzi majusklojn ĉe tiuj adjektivoj propronomaj.

Ili ankaŭ povus cerbumi pri: li vidis angoran kapron; kisis sardinon; surhavis kuban ĉapelon; trinkis maltan vinon; parolis senegale; havis kanarian amikon; legis privatan (de Privat) libron; staris en kreta konstruaĵo (ĉu el kreto aŭ de loko Kreta?)

Uzado de majuskloj ĉe propronomaj derivaĵoj lumigas unuton tekston kaj donas karakteron, "personecon" kaj sukecon al presita paĝo. Krome, ĝi **faciligas citserĉon**. Ekzemple, Zamenhof uzis la vorton "Sizifa" ĉe Fundamento Krestomatia 307 (dua eld. 289). Serĉante ĝin, oni facile ĝin trovas, dank'al la elstaranta majusklo, kiu kaptas la okulojn. Simile pri "Herostrata" (Originala Verkaro 382). Serĉi propran nomon aŭ ties derivaĵon sur tutminuskla paĝo similas serĉi pingleton sur stoplokampo.

(Vidu. La Rondo, Dec. 1942, Dec. 1950; British E-ist, Mar. 1953; Esperanto, Feb. 1950; Malgranda Revuo Jan. 1949.)

POLA RADIO SONIS JAM 5-MIL FOJOJN

La 4-an de aprilo en 1959 unuafoje aŭdiĝis etere la anonco: "Parolas Varsovio — naskiĝurbo de Esperanto?"

La 20-an de aŭgusto 1970 Pola Radio disaŭdiĝis la 5000-an elsendon en la Internacia Lingvo. En 1960 2000 E-istoj partoprenis Jubilean Konkurson; kvar E-istaj laŭreatoj vizitis Pollandon kiel gastoj de la Pola Radio. Amatoroj radiaj, nepre informu Polan Radion pri viaj ricevoj ĝiavoĉaj: Pola Radio, Esperanta Redakcio, Poŝtkesto 46, Warsaw 1.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Kiel komisiito pri transporto de nia ŝtato, S-ro W. Howard ofte devas viziti konferencojn en aliaj ŝtatoj. Li rakontis 13/5 al ni pri lastatempa vizito al Townsville. Samvespere li ankaŭ prezentis surbendigitan prelegon de S-ro Ralph Harry pri "La lingva problemo en la diplomatio". S-ino Ruth McGrath, 27/5, parolis pri la estonta agado de nia Ligo kaj, 10/6, F-ino J. Gray kaj S-ino E. Palmer ekzercigis nian vortprovizon kaj traduk-teknikon. La kunveno de 24/6 estis dediĉita al niaj novaj studentoj. Spite de malbona vetero ĉeestis preskaŭ 40 personoj. Kursgvidantoj F-inoj Gray, Hunt kaj Longson prezentis siajn klasanojn. S-ro Jack Hawkes lerte gvidis la vesperon per ludoj kaj facilaj traduk-provoj. Regis amikeca etoso, kaj la vespero estis tiel sukcesa ke oni jam pripensas okazigi samspecan post ne longe.

MELBOURNE: Je la kunveno 1/6 S-ro F. R. Banham legis diversajn rakontojn. "La perdita kolĉeno" montris la malsaĝon de vantemo; "la maldungita sakristiano" montris ke nedezirata ŝanĝo en la vivmedio povas havi bonan efikon kaj "Klerika Eraro" pruvigis ke la trompo ne ĉiam sukcesas. S-ro Herbert Koppel, 8/6, raportis pri novaĵoj el Esperantujo. Je 22/6 ĉiuj ĉeestantoj kontribuis malgrandan eron al la programo, bona ekzerco kaj interesa rikolto. En la amuzvespero, 29/6, nia neesperantista amiko S-ro Jim Daniels montris tre variajn kaj kolorplenajn aspektojn pri Bangkok. Lia prelego tiel plaĉis ke ni invitis lin prelegi pri Fijioj en aŭgusto.

S-ino Fay Koppel prezentis longan poemon de L. N. Newell por diskuto antaŭ ol recenzi ĝin (6/7). Semajnon poste A.E.A. Prezidanto Ken Linton legis pensinstigajn kaj konsiloplenajn rakontojn, kiujn li tradukis. Je 20/7 S-ro H. Beechey parolis pri la humoro kaj montris ke ĝi ne estas internacia. Li atentigis ke la Plena Vortaro kunligas la humoron kun la angloj.

MANLY: Ĉiujatide en la Vespera Lern-ejo, Darley Road, je 7 p.t.m., okazas 3 kursoj: Stud- kaj diskuta sub Paul Schwerin kaj Marjorie Duncan; Drama sub Robbie Robertson; kaj Komenca sub Susan Sobey.

Programoj komenciĝas je 8.15: 11/6 La Drama Grupo prezentis 4 teatraĵetojn, en kiuj rolis Eunice Graham, Olive Russell, Edna Giles, Robbie Robertson, kaj Arthur Cocking; 18/6 D-ro A. Capell, Profesoro de lingvistiko, parolis kun lum-bildoj, pri "Hodiaŭa Fijio";

26/6 KatheSchwerin gvidis programon, "Verkoj de la Anoj"; 2/7 Ejnar Hansen, vizitanto el Kopenhago, parolis pri Danlando; 9/7 Paul Schwerin parolis kun lum-bildoj, pri Nederlando.

Ciusemajne nia klub-raportanto sendas al 4 nord-distriktaĵoj ĵurnalojn artikolojn pri nia agado. Aperis la plimulto—Marjorie Duncan.

SYDNEY: La komencantoj en la klaso estrata de S-ro Chandler bone progresas. Ili nun komencas korespondadi, kaj sendepende legas librojn. Du novaj komencantoj efektive manĝas "Adamson".

La 4an de Majo ni ludis "Scrabble" sub la gvidado de nia Sekretario, S-ino Margaret Chaldecott; la 11-a., S-ro Gueltling rakontis al ni, kial li estas vegetarano. La 18an ni ĝuis amuzvesperon kiu devis esti sub la gvidado de F-ino Van Rijswyck, sed bedaŭrinde pro malsano ŝi ne povis ĉeesti. Ni bonvenigis al tiu kunveno S-ron Hansen el Danujo, kiu restos ĉe ni dum pluraj monatoj.

Nia Prezidanto 25/5 distris nin per lumbildoj de siaj penetraĵoj. Ĉiu tiel ĝuis ilin ke ni unanime petis lin ripeti la programon frue en la estonteco. La 1-an de Junio ni havis konversacian vesperon, kiu fakte fariĝas aferkunsido rilate al "Esperanto House". Ni efektive decidis translokigi la Klubĉambrojn al la supra etaĝo, kaj forlui la ter-etaĝon, almenaŭ por iom da tempo.

S-ro Kevin Smith, 8/6, faris interesan eksperimenton, kiam li uzis la ĉeestantojn kiel legantojn por sia prelego, "La Lingva Valoro de Pluraj Tradukoj de Biblia Teksto". Li donis al ni diversajn tradukojn por laŭlegi kaj gvidis la diskutadon pri ili.

S-ro Gerald Browne 22/6 rakontis plurajn anekdotojn sub titolo, "Sufiĉas por Ridigi Katon. Vigla konversacio sekvis.

S-ro John Matasin 29/6 kondukis nin en la estintecan pere de filmoj kiujn li fotografis ĉe Esperanto Kongreso, piknikoj, kaj subĉielaj kunvenoj depost 1950. Kun miksitaj sentoj ni vidis nin dudek jaroj pli junajn, kaj konstatis ke baldaŭ ni devos fariĝi nur memoroj ĉe la Sidneja Klubo. Ke tiuj memoroj estu dolĉaj! — REVANTO.

BRISBANE: Ĉe Rosewood, 45 mejlojn okcidente de Brisbane oni festis 6/6 Junularan Tagon. Nia membro Jenny Stubbs gvidis la Esperanto-parton. La geknaboj marŝis sub sia nova E-standardo al la ekspoziciejo; ĉiuj portis verdan stelon. Jenny bonvenigis la klubanojn de Brisbano kaj Redcliffe. Post lunĉo

ĉiuj rigardis la elmontrojn de la diversaj junulaj grupoj. La junaj E-istoj bone plenumis siajn rolojn, kio tre plaĉis al la gepatroj.

E-istoj el Brisbane, Redcliffe kaj Sunbrila Marbordo renkontiĝis 5/7 denove ĉe Bribie Insulo. Survoje al Eŭropo vizitis nin S-inoj B. Cleminson kaj Bracken, ankaŭ S-ino E. Giles, survoje al Japanujo. Je 6/7 prelegis S-ro Mal Robinson pri sia ĝardeno. Ĉiuj nun deziras viziti ĝin. Semajnon poste S-ro K. Gunster diskutis poemon per helpo de la nigra tabulo. Beverley Allatt, 20/7, prelegis pri "Alilandaj junularaj gastejoj". —W. Greenhalgh.

REDCLIFFE: Nia grupo suferis kaj postvivis baton kiam Ges-roj Clarke vendis sian domon. Feliĉe ni havis tuj kvar proponojn, kaj plaĉas al ni raporti ke klasoj nun okazas ĉe Ges-roj Memmott (34 Michel Rd., Scarborough, Tel.: 84-5647 aŭ 84-4917).

F-ino Brenda Kent forvojaĝis eksterlande kaj esperas ĉeesti la UEA-Kongreson en Londono. Gratulojn al F-inoj Lyn Moy kaj Ann Chester pro financiĝo.

Dum la foresto de Ges-roj Clarke, S-ro Sherratt konsentis esti kasisto kaj pro reĝigno de S-ino Norcott S-ino Sleigh fariĝis sekretario.

JUS APERIS "De Z. al A. en 3 Epokoj", de Fay Koppel. 20-paĝa libreto, la teksto de prelego ĉe la 17-a Aŭstralia E-Kongreso. Pri-traktas la evoluadon de E-literaturo. Nepre haviginda al ĉiu literatur-amanto. Prezo 50c. Mendu ĉe S-ro E. Chandler, 57 Northcote St., Crow's Nest, 2065.

Manĝ-Danca Vespere de Esperanto-Federacio de Viktorio

La unua aranĝo de la novefondita E-Federacio de Viktorio estis Manĝ-Danca Vespere, kiu okazis la 19-an de Julio en la restoracio "Salzburg Lodge". Aĉo de la Federacio kun geamikoj, entute 58 personoj, partoprenis. Specialajn dankojn ni ŝuldas al S-ino Valda King, kiu forte laboris por la okazo kaj allogis multajn geamikojn. Ankaŭ la federacian prezidanton, S-ron A. L. McLochlan, ni devas laŭdi, pro ties patreca atento.

Bonĝustaj manĝaĵoj, dancado kaj kelkaj kabaredaj eroj kontribuis al ĝuinda vespero. Ni ĝojis saluti Ges-rojn Jim Dimo, kiuj devis vojaĝi 110 mejlojn de Rochester por ĉeesti. Pro tio ili ricevis botelon da ĉampano de la restoraciestro. —Herbert Koppel.

RECENZOJ

"**Sennacieca Revuo**", N-ro 98. Eldonis S.A.T. 56 paĝoj. 0.75 dol.

Intelekte stimula legajo. Devus tiri al si vastan intereson la artikolo pri la Pensmondo de E. Lanti, verkita de intima kolego N. Bartelmes. Du detalaj studoj: 16-paĝa pri Spinoza kaj sespaĝa pri la Martirino Hipatia postulas paciencon de pensuloj kaj scion pri la temkaj pensmedioj, por plene profiti ilian enhavon. Tiu pri Spinoza estas tezo de daŭra valoro.

Sekelaj promenas stratojn Madrasajn, humane **veante** la sorton de Hindaj vagabondoj Tra la Alternaj Epokoj leginde primeditas la homan surluniĝon — atentotene flulingva prezento de problemoj, kiujn tiu mirinda venko metis jam antaŭ la naciojn por ties racia solvo. Schwartz lertlingve ludas pri i.a. — De Gol, la Luno, la sesa libro de Moseo—Steliro. Je la vortjonglado kompariĝus nur Rossetti ("El la Maniko", p. 131). Marks kaj la Nuna Socio, Bavario, Aŭsburgo, Analizo de U.N.O. kaj poemoj kontribuas pleniĝi subtenindan revuon.

Ricevebla per Volo Guelting, 5/21 A'Beckett Av., Ashfield, N.S.W.

"**Telepeo**", bulteno de la Esperanto Federacio de Nova Sudkimrujo. 8 paĝoj mimeografitaj. Senpage por membroj; 1 dol. G. S. Thatcher, 14/33 Fairlight Cres., Fairlight, 2094.

En n-ro 1 (Marto) estas La Menuro (Lirobirdo), senrima originala poemo de E. W. Chandler; en n-ro 2 (Julio) Grace Kirkwood atentigas pri Ornitologia Rondo E-Lingva, kaj Wre Chandler provas liston de birdoj konataj en la ĉirkaŭaĵo de Sidnejo. Li esperas kompili kontentige kompletan liston de Aŭstraliaj birdoj Angle-Esperante.

History of Morwell High School, vol. 5 . . . 1969 and 1959. One dol. E. Maddern, principal, 83 Hoyle St., Morwell, 3840.

Of interest to our readers are the pages of Esperanto activity at the School. During the year four intensive courses in Esperanto were held at evening adult classes. A club has been formed, affiliated with the A.E.A. Interest in the language has spread to adjacent towns. For over five years the School has corresponded in Esperanto with 20 or more foreign countries. Morwell High School for some years has recognised Esperanto as a subject for its own Leaving Certificate. As from 1970 it has been accepted for the University

Leaving Certificate under the provisions of "An Approved Activity". It is hoped that most of the 1970 Leaving Class will elect to take Esperanto as one of the six subjects of the course.

A copy of this magazine has been sent to 40 foreign friends of the School, in 28 countries speaking 23 languages. They communicate with the School and with one another using only Esperanto.

To close the section, Mr. Maddern addresses to them a long letter in Esperanto covering the School's activities. This is the only school in Victoria that teaches Esperanto; 300 out of the enrolment of 930 are studying the language.

A fine photo of its correspondents, all girls, graces page 32.

NIA KAS-KONTROLO

Ni bedaŭras eraron sur p. 46, kol. 1, linio 16. S-ro Linton eligis el tiu ofico ne "ĉi-jare", sed en Jan. 1968.

Preseraro: p. 49, kol. 2, kvara linio de la malsupro:
legu: "je kio Gilbert . . ."

SCOUTING

Are you a Scout, or interested in the Scout Movement? If, as an Esperantist, you could promote the use of Esperanto among the Scouts, why not contact Mr. S. H. Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills, 3127. Agent for "La Skolta Mondo", 8 pages, quarterly. A neat production.

CHARLOTTE'S WEDDING

Old Mr. Bronte would not go to give his daughter away. He was ill, he said, and kept to his bed. What to do? They turned to the Prayer Book and found that "the minister shall receive the woman from her father's or friend's hands". So Miss Wooler volunteered to give Charlotte away.

Poor woman. Her marriage lasted only nine months, for at the end of that time she died, after much felicity, so long delayed for her.

LA EDZINIGO DE CARLOTA

La maljuna S-ro Bronte ne volis ĉesti la edziĝan solenon, por prezente-doni sian filinon al ŝia fianĉo. Li asertis, ke li estas malsana kaj restis en lito. K'ion fari? Ili sin turnis al la Preĝlibro, en kiu ili trovis, ke "la pastro akceptu la virinon de el la manoj de ŝia patro aŭ de amiko". Tial F-ino Wooler vole sin proponis, por prezente-doni Carlotan.

Kompatinda virino! Ties edzineco daŭris nur naŭ monatojn, ĉar fine de tiu tempo ŝi mortis, post multa feliĉo prokrastita por ŝi tiel tre longe.

DU MILITOJ KOMPARATAJ

La Unua Mondmilito superis la Duan pro sia pri granda impresi-potenco (2). Malsame ol la Dua, la Unua ekfalis kvazaŭ tondrobrato el ĉielo azura. Neniu postsekvinta evento tiel terure konsternis kaj anime skuis la Britojn, kiel ĝi faris antaŭ 56 jaroj . . . Por homoj travivantaj la regadojn de la Reĝoj Edvardo la Sepa kaj Georĝo la Kvina, la vivestado mem estis feliĉiga. La tagoj estis alcionaj (1), kaj la liberala optimismo antaŭenrigardis al ĉiam pli vastiĝanta amikeco inter la nacioj, bazita sur komerco kaj racio. Guste el tiu sekureco la nacio estis subite jetita en katastrofon, partoprenis en la kolapso de ŝajne ĉiamdaŭra strukturo de la civilizacio kaj rigardis ĝin diseriganta en sangon kaj koton.

La Dua Mondmilito estis terurega, tamen mankis al ĝi tiu kontrasta fono, ĉar dum la jardeko antaŭa je Septembro, 1939, okazis kruela malmoligo de la homaj koroj, minaca tintado de sabroj kaj ĉiamkreskanta spirito de perforto kaj malradio.

Post 1914 la homaro ne revenis al sia antaŭa animstato, simile al tio, ke post

la Krucumo ĝi ne revenis al sia antaŭa pensomondo. Nur tiuj, kiuj povas rememori la belegan sunsubiron de la finaj jaroj Viktorianaj, povas pritaksi la transformiĝon, kiun la eventoj de 1914 kreis por la homa raso. Malmultaj Britoj, de suhĉe granda aĝo, opinius, ke la 3-a de Septembro, 1939, prezentis kataklismon pli teruran ol tiu de la 4-a de Augusto, 1914. La Duan Militon oni jam de longe antaŭvidis, ĝin atendente. Kvankam ĝi enkondukis pli multajn kaj pli terurajn batojn al la vivkomfortaj Britoj, ol trafis ilin la Unua, ĝi tamen ne liveris ŝokon egalan al tiu de la Unua.

La Unua Mondmilito skuis la kredon al la esenca boneco de l'homoj, kiu regis la Viktorianan pensadon. Tamen multaj, pli-malpli fidante, sentis ĝin milito, kiu por ĉiam "detruos la militemon"; ili volis kredi, ke la sperto instruas, kaj ke la homaro jam "finlernos sian lecionon".

Venis la Dua, niaparte milito simple rezista. Mankis al ĝi la brilo romantika de la Unua, pri kiu gloris poetoj, kiel Rupert Brooke — ĝis S. Sassoon kaj W. Owen versfare elmontris ĝian inferan hororecon. La Unua naskis almenaŭ

dekon da veraj poetoj, kies verkojn oni ankoraŭ legas. El tiuj sentemaj animoj kelkaj mortis en la konflikto. La Dua donis al la literaturo malmulton, ja preskaŭ nenion.

- (1) alciona = (figure) alcionaj tagoj (Butler): = pace serenaj.
 (2) Komparu: vivipova (Originala Verkaro 34, 96, 381 k.a.).

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION OFFICIAL NOTICES

11th July, 1970

New Individual Members

Forrest, Mrs. B. Narrabeen, N.S.W.
 Gilbert, Miss N. R., Rockhampton, Qld.
 Grant, Mrs. H., Unley, S.A.

Public Fund

Previously acknowledged	\$673.87
Wall, Mr. F. G., Vic.	2.00
Brisbane Esperanto Soc., Qld.	3.00
Morrison, Mr. R., Vic.	3.00
Claxton, Mrs. N., W.A.	2.00
"Lernanto", N.S.W.	2.00
	<hr/>
	\$685.87

Sincere thanks to every helper.

Interstate Competition Points Allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
Final Examination success	10
Each \$1 for the Publicity Fund	1

Positions on 11th July, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	533	410.0
Victoria	300	911	303.6
N.S.W.-A.C.T.	260	621	238.8
W. Australia	80	171	213.7
Tasmania	30	32	106.6
S. Australia	40	30	75.0

New Local Representative

Hobart, Tas.: Mr. E. Loorits.

Just a hint!

A little more support for the Publicity Fund would be much appreciated, as we shall soon have to print a new edition of "Freedom of Speech".

During the last 18 months we have received 1534 enquiries.

The number of correspondence course students is almost 200—C. C. Goldsmith, Secretary.

A.E.A. EKZAMENOJ

Elementa: Harold St. Vincent Beechey, kun honoro.

PRISEKSA SUPERSATO

Pri la seksa "problemo", libroj, filmoj, teatraĵoj torentas antaŭ la publikon, flamigante la febron de nia fermentanta nuntempo. Sub diversaj pseŭdokonvenaj maskoj, multaj el ili pretendas prezenti moralan starpunkton, tamen trovas vojon priskribi kun naŭza realismo la farojn de malĉastuloj aŭ perversuloj. Jen simptomato de malsana socio. La baza fakto estas: la seksimpulso estas forto tiele potenca, ke ĝi bezonas bremson, sen kiu ĝi kondukas en detruon homojn kaj naciojn. La leĝoj de la tabuo kaj la nupto prezentas la instinktan sindefendon de l'homoj tra la tuta historio.

Bone, ke la seksdemandoj estas malkaŝe diskutataj — ĝis certa grado. Tamen jam fine satiginte pri la afero, ni forgesu ĝin kaj lasu la menson okupiĝi pri senseksaj fenomenoj.

Fraŭlino kun koloraj okulvitroj enanguligis min kaj ekparolis pri manko de seksardo ĉe virinoj. Eviteme mi ekbabilis pri filmo en kiu gorilo ludis ĉefan rolon. "Ĝi aspektis preskaŭ homa", mi diris. Ignorinte mian rimarkon, la obsedulino penis manovri la gorilon en la orbiton de sia preferata paroltemo: "Laŭ la scienco", ŝi informis min, "la goriloj kaj ankaŭ aliaj bestoj, sub certaj kondiĉoj, praktikas strangajn seksaferojn". Dankante ŝin pro tiu tre sciinda informo, mi glite foriris.

En revuoj abundas spice-pipraj artikoloj: "Kial ne informi vian edzon, ke li sekse malardiĝas?" — "Ĉu la seksrilato sufiĉe riĉe donas al vi?"

"Ĉu viro devus rezigni sekstrutinojn je sia 80-a vivjaro?" — "Ĉu la seksinstinkto entute havas valoron?"

En sana, kreema mensostato, plena de konstruaj pensoj, mi komencas ĝui rostopanon kun kafo. Mi gazete ekvidas bildon de viro paŝanta al kio similas al sunleviĝo. Titolo: Ĉu viroj suferas fizikan vivŝanĝon je sia 40-a vivjaro? La rostopano jam ne gustas bone; mi sentas deprimon dum plulegado. Vivŝanĝon mi certe havis tiumomente, ĉar mi tiam firme ekdecidis eviti legmaterialon antaŭ aŭ dum matenmanĝo, por eviti pardon de apetito.

La homoj ne nur malkaŝe, aŭdace, rigardas al la seksafero; ili rigardegas ĝin ĝis ili okultorde strabiĝas. Tiomege oni jam skribis pri la afero, ke multaj gejunuloj erare supozas, ke geedzaj paroj neniam eliras el la lito. Fakte ili ja eliras; ili devas meti malplenajn laktobotelojn eksteren sur la pordŝtupo. Ili devas ankaŭ iri al laboro, kaj eĉ forgesi la seksecon dum longaj tempodaŭroj.

Tiutemaj libroj "didaktaj" laŭte tamamas pri neceso, ke la ĝea paro akordiĝu seksece. Estas geedzoj, tamen, kiuj konfesas sin tute malsukcesaj en intima amrilato — malgraŭ tio, ke ili estas tute feliĉaj. Aliflanke, mi konas geedzojn tiel bone akordiĝintaj en tiu rilato, ke ili jam faris el ĝi kvazaŭ karieron: sed ili ne povas kune manĝi pecon da rostopano sen interbatalo.

Estas en la vivo multo da aliaj aferoj krom la seksdemando — sociaj, intelektaj, spiritaj — kaj ni agus saĝe se ni malkaŝe, aŭdace direktus nian atenton prefere al ili. — El la Angla tradukis F. R. B.

BELIDEALE

Waringhien — Gastono — jen Franca klerulo

Poeto, prizisto kaj gramatikulo.
Li ankaŭ elstaras en filologio
Kaj kampoj aliaj de l'erudicio.
Aferojn malklarajn li funde pritraktas,
Pri kio simpluloj nur drone baraktas.
Per mendoj, depruntoj kaj bibliotekoj
Absorbis li verkojn de kvar-kvin jardekoj
De "Neĝa Blovado" de l'jar' okdek-oka,
Gis "Norda Naturo", verk' niaepoka. (1)

Tre multaj "verduloj" peplendas pri manko

De tempo por legi, de lasas en ŝranko —
La polvokovritan verdlingvan legajon
Kaj honte murmuris la stultan frazajon:
"Por legi disponas mi eĉ ne momenton;
Atendas mi nun televidan prezenton!"
Por legon eviti ekskuzoj inundas,
Car distroj banalaj riĉege abundas —
Futbalo, kartludo, kriketo, radio,
Au iu alia jam preskaŭ manio.

Ni diras "manio", jen vorto tre drasta;
Komprenu ĝin, karaj, laŭ senco elasta.
Sed niaj verd-libroj ne trafu en sorton —
Pro nelegateco faliĝi en morton!

La Franca majstro ja ateston donas,
Ke simplaj homoj certe plen-disponas
Pri legotempo sen tro ĝena premo —
Al ili mankas nur la ĝusta emo!

—F.R.B.

(Laŭ lia propra aserto: "mi tralegis preskaŭ la tutan esp-an literaturon de la 'Neĝa Blovado' ĝis 'En Okcidento Nenio Nova'". "Parnasa Gvidlibro", p. 14 de la unua eldono; p. 8 en la dua.)

DU VOĈOJ

". . . mi, kiu povas pretendi amplekse posedi, en ĝiaj plej intimaj nuancoj kaj vortencoj, la lingvon de mia lando kaj miaj praaŭoj dum tri-kvar generacioj . . ."
—K. R. C. Sturmer, en "Notlibro de Praktika Esperantisto", p. 20.

"Kara samideano, ĉu vi scias vian nacian lingvon? Jes? Akceptu do la esprimon de mia plej respekta (sed ne tute konvinkita) gratulo. Mi ja devas kun honto konfesi, ke mi ne estas tia klerulo, kiel vi! Kvankam de mia naskiĝo mi senĉese lernis la francan lingvon, mi tamen kun bedaŭro preskaŭ ĉiutage devas konstati, ke mi ankoraŭ ne plene ĝin scias — kaj sendube neniam ĝin scios perfekte. Neniam mi povas tre malproksimiĝi de gramatika libro, kiu staras sur breto de mia libroŝranko; ĝi nepre devas kuŝi sur mia skribotablo mem, tuj 'sub la mano', ĉar preskaŭ ĉiutage mi devas serĉi en ĝi la 'ĝustan kaj precizan' sencan de iu franca vorto'. — D-ro Pierre Corret, en "Franca E-isto", Junio, 1934.

EL PRI-LITA LITERATURO

Vi povas maldormi, **subtrahante** ŝafojn.
Groucho Marx. (Angloj diras: Vi dormiĝas, **adicante** ŝafojn.)

En la Evangelioj Jesuo neniam prezentigas kiel estanta en iu lito. Lia unua kuŝloko estis staltrigo; nur unu fojon oni trovis lin dormanta — nome, en ŝipeto.

Ijob estis malfeliĉa ankaŭ pri litoj, kiel en preskaŭ ĉio alia. Eĉ kiam li krisis: "Mia lito min konsolos, mia kuŝejo faciligos mian suferadon", li male estis terurita per inkuboj kaj viziaĉoj. (Ijob 7/12-14).

Iu homo, kiun malaprobis Jesaja, prenigis sian liton ĝis supro de alta monto, kaj ial "largiĝis ĝin" (?). (Jesaja 57/7-8).

Izebel estis kondamnita al puno: ŝi estos jetita, kun aliaj adultantoj, en liton (Apokalipso 2/22). Stranga puno por tia virino! Ĝi samsignifas kiel: jeti kuniklon en arbustajon.

Virinoj, kiuj amas siajn edzojn, dormas ordinare sur la dekstra korpolanko. La afero estas grava, kaj la kialo estas dufoje menciita en La Alta Kanto de Salomono 2/6, 8/3.

La edzo havis naŭzan kutimon manĝi arakidojn en lito. La senĉesaj kraketoj kaj dentklakoj forte ĝenis la kompatindan edzinon, kies haŭto cetere devis suferi skrapojn pro akraj ŝelpecetoj. Tio pensigas pri fabelo de Andersen: Reĝidino sur Pizo. Ŝi estis tiel delikathaŭta, ke ŝi sentis pizon sub dudek matracoj kaj dudek lanuĝaĵoj. Do oni simpatias kun la supra edzino, kies

korpo devis tordiĝi sur nudaj arakid-ŝeloj.

KONTRAŬ-CIMA KONSILIO

Cimoj ekskluzive sin nutras per sango, sed ili devas penetri haŭton por ĝin ricevi. Ne valoras la ruzo, enmeti sangon en subtason, esperante, ke la cimoj ĉesos vin ĝeni. Simile senefikas, meti lit-starigilojn en ujojn kun keroseno; la fi-uletoj plonĝbomas vin de la plafono. La sola efika metodo kontraŭ ili estas: Prenu du bloketojn da ligno. Unu surhavu etiketon: "Metu cimon tien ĉi". La alia: "Frapu cimon per tio ĉi!"

G. B. SHAW KAJ LA MUZIKO

Ce muzikvespero aranĝita de iu salon-orkestro de kvar, amiko de G.B.S. rimarkis: "Tiu homoj ludis kune jam preskau 12 jarojn". "Ĉu vere", respondis Shaw: "nepre devas esti ke ni sidis ĉi tie pli ol tiom longe!"

Shaw malamis muzikon ĉe la manĝoj, do foje petis la ĉefon de orkestro: "Ĉu vi ludus tion, kion mi nomus?" "Ĉerte, sinjoro". "Bone; bonvolu ludi kartojn au domenojn — negrave kiun — ĝis mi finis la manĝon".

"Kion vi opinias pri la violonisto?" petis gastigantino al Shaw ĉe muzik-vespero. "Li pensigas min pri Paderewski", li respondis. "Sed, sinjoro, Paderewski ne estas violonisto!" Responde pikis la Irlanda verkisto: "Ankau tiu ludanto ne estas violonisto".

(Kiam Shaw audis tiujn rakontojn, li diris, ke ili estas sufiĉe bonaj por esti pri li, sed li dubas!).

ĈI TIO(N) — TIO(N) ĈI.

Komencanto iufoje demandas pri la ordo de la du vortetoj. Pri la vorteto "ĉi" oni lokas ĝin antaŭ aŭ post la pronomo laŭ la postuloj de la ritmo aŭ belsoneco (plejofte antaŭe): ĉi tiu libro; tiu ĉi libreto. Oni neniam ligas ĝin al la pronomo per streketo.

Precipe ĉe versfaro kaj bonstila proza frazo oni trovas helpa tiun liberajon. Ekzemple:

Trovis li en poŝ' nenion;
Ne komprenis li ĉi tion.

Vidiĝis tuj flava stri';
Li pri-miris tion ĉi.

Kaj en prozo oni povas ricevi belan kadencan per zorga elekto de unu aŭ alia formo.

ĈU BANDEROLE ?

Cu eblas al U.E.A. aperigi validan liston de landoj, kiuj permesas eniron al gazetoj adresitaj sur **banderolo**? Sperto de eldonejoj kaj individuaj E-istoj supozigas, ke nur riske oni tiel sendas presajojn al iuj landoj. Responde al leteroj demandaj, anoj de la koncerne dubaj landoj ne sufiĉe bone klarigas la situacion ĉe si poŝtaferan.

REVO KAJ REALO

(a) "La lunvojaĝo estas jam nur rabat bileta (1) flugo". — D-ro Von Braun.

"Donu al mi gramon da lunroko, kaj mi diros al vi la historion de la universo". — Prof-o C. Urey.

"Dio estas en sia ĉielo, kaj la homoj estas survoje al ĝi". — Komento de la B.B.C.

(b) "Ĝis nun specimenoj de lunroko ankoraŭ cerbumigas la inter si disputantajn sciencistojn, kaj negrave kiel finiĝos ilia teorumado, tio tute ne interesas la simplajn homojn. Ili postulas pli ol tion, por pravigi elspezon de 24 milionoj da dolaroj pro la flugoj Apolonaĵ". — The Sun, Melbourne: 13/4/70.

(1) "commuter flight". Ne: "komuta". Komutisto estas fervojo "pointsman", ne "commuter", por kiu ne troviĝas difino en la Vortaroj. "Commuter" estas: ĉiutaga rabat-veturanto per publika transporto; lia bileto estas rabata pro sia regula uzado.

BENA BLAZAMO

Dormo, dolĉa plenforĝes',
Ĉefdonac' de Dio;
Per ĝi duoniĝas ja
Tera viv-konscio.

BALM OF BLESSING

Slumber sweet, all things forgotten,
Heaven's chief gift to man;
By it earthly life-awareness
Loses half its span.

STATE REPORTERS

It is desirable that we issue before the end of the current months. Would reporters please try to get their "copy" in to Mr. Koppel by the 5th at latest.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 88 (168).

MELBURNO.

Septembro, 1970

LA LINGVA PROBLEMO EN VJETNAMO

R. L. HARRY, AŬSTRALIA AMBASADORO EN SAJGONO

(dua parto)

La Ĉinoj.

En la ĝemelurbo de Sajgono—Cholon—oni vidas ke estas granda enloĝantaro Ĉina en Vjetnamo. Kiel aliloke, la Ĉinoj en Cholon estas komercistoj, bankistoj k.s. Ili ankaŭ havas bonegajn restoraciojn. Ili konservas la Ĉinan lingvon kaj la Ĉinan skribsistemon. Mi havas multajn Ĉinajn amikojn en Sajgono—kun mia edzino mi ofte tagmanĝas en hejmoj kie la Ĉina estas la familia lingvo. Plejparte la Ĉinoj estas ŝtatanoj de la Respubliko de Vjetnamo kaj por komercaj celoj lernas la Vjetnaman, sed en iliaj propraj lernejoj iliaj infanoj, aldone al siaj Vjetnamaj studoj, studas la klasikajn Ĉinajn verkistojn. Estas ĉirkaŭ miliono de tiuj dulingvaj Ĉinoj. Multaj iras al Tajvano (Formoso).

La Vjetnama Lingvo

La dialekto, kiun la Vjetnamanoj kunportis el Ĉinujo, dum la jarcentoj apartiĝis kaj fariĝis la lingvo Vjetnama, lingvo de poetoj kaj verkistoj. Pro tio: ke dum longaj periodoj Vjetnamo estis sub la Ĉinaj Imperiestroj, ĝi ricevis grandan parton de sia kulturo el Ĉinujo kaj multajn vortojn por esprimi novajn ideojn. Kiel la Angloj post la Romia konkero uzis multajn latinajn vortojn, tiam post la Normana konkero adoptis latinajn radikojn el la Franca lingvo, tiam en Renesanca kaj moderna epokoj pruntis senpere el la klasika latina lingvo, tiel oni trovas en la Vjetnama tavolojn de ĉinaj radikoj. Estas multaj sinonimoj—

po unu le Ĉina deveno kaj unu indiĝena.

Krome komplikas regionaj dialektoj, aŭ almenaŭ akcentoj, kiuj klare diferencigas inter la Vjetnama el la nordo kaj la Vjetnama en la sudo, inter nordulo kaj sudulo. Tiuj diferencoj estas negravaj, tamen ili kreas ĝenan problemeton en la sudo, kien preskaŭ miliono da antaŭaj loĝantoj en la nordo fuĝis post la instalo de la "Demokrata Popola Respubliko" en Hanojo en 1954. Por fremdulo tio estas tikla problemo, ĉar multaj instruistoj estas el la Univ. de Hanojo, kaj mi mem, kiam mi lernis la Vjetnaman, akiris la nordan akcenton. Kombino de nur elementa lingvoscio kun norda prononco ofte faras mian paroladon nekomprenebla por kamparano en la Mekonga delto.

La Vjetnamanoj posedis ĉarman lingvon kaj interesan literaturon kiam alvenis la Francaj misiistoj, komercistoj kaj soldatoj. Ĉi tiuj trovis la lingvon tre malfacila pro la kvin tonoj kaj la ideograma skribado. Alexandre de Rhodes inventis sistemon de skribo por latinaj literoj kun super - kaj subsignoj por indiki tonojn kaj vokalajn nuancojn. Tio faciligis lernadon. Tamen la lingvo restis trege malfacila por Eŭropano; nur malmulte da alilandanoj scipovas la Vjetnaman. Pro tio — kiel diris al mi la ĉefo de la Instituto Pasteur en Sajgono — kiam Vjetnamano iras ekster sia landlimo li estas muta, surda, se li ne lernis unu el la "grandaj" lingvoj. Dum

la du pasintaj jarcentoj la Vjetnamanoj grandskale devis lerni fremdajn lingvojn. —(finota)

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION OFFICIAL NOTICES

7th August 1970

New Individual Members

Brooks, Mr. R. E. C., Hawthorn, Vic.
McGloin, Mr. N., Yallourn, Vic.
Campbell, Mrs. J., Morwell, Vic.
Cox, Mrs. B., Morwell, Vic.
Halliday, Mrs. M. D., Glen Waverley, Vic.
Golightly, Miss G., Brisbane, Qld.
Cullum, Miss B. L., Glen Iris, Vic.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$685.87
Smith, Mrs. M. B., Vic.	2.00
Crane, S-ro. D., Qld.	1.00
Goldsmith, Mr. C. C., N.S.W.	2.00
Addie, Mr. J. W., Vic.	1.00
Timmins, Mr. V. J., N.S.W.	2.00
Koppel, Mr. H., Vic.	1.15
	<hr/>
	\$695.02

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition Position on 7th August 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	539	414.6
Victoria	300	961	320.3
N.S.W. - A.C.T.	260	636	244.5
W. Australia	80	182	229.5
Tasmania	30	32	106.6
S. Australia	40	30	75.0

You can help your State to improve its position—

1. By distributing green cards, supplied free on request;
 2. By suggesting to other Esperantists that they join A.E.A.;
 3. By enrolling for a correspondence course if you are not already competent: elementary, intermediate, or advanced, particulars sent on request;
 4. By taking an examination, elementary or advanced, to prove to yourself and others that you are competent. (This will please particularly our President).
- C. C. Goldsmith, Secretary.

A.E.A. Ekzamenoj

Elementa: Phyllis G. Jones. Ball Bay, Kvinslando.

TRADUKOJ — VIRINOJ

Tradukadoj similas al virinoj: se ili estas fidelaj, ili ne estas belaj; se ili estas belaj, ili ne estas fidelaj.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: En la nuna jaro ni havis pli da sukcesoj en la verbado de novaj studentoj, kion ni ŝuldas grandmezure al la 17-a Aŭstralia E-Kongreso kaj la "bruo", kiun ĝi kaŭzis radie kaj gazete. Ni nun havas du kunvenlokojn; kutime ni kunvenas la 2-an merkredon en la monato en Nedlands kaj la 4-an merkredon en Suda Pertho.

Kun bedaŭro ni devas raporti pri la morto de S-ro Misha Strassberg. Li ne estis Esperantisto, sed tre fervore subtenis nian movadon. Lia edzino Rica, kiu mortis antaŭ kelkaj jaroj, estis aktiva Esperantistino dum multaj jaroj. S-ro Strassberg fondis kune kun S-ino Ruby Hutchison la siatempe valoran societon "Amikoj de Esperanto". Li ankaŭ iniciatis la literaturan konkurson "Premio Mase", honore al sia bofrato, la unua Prezidanto de nia Ligo. Ĉe la kunveno 24/6 D-ro C. Caldera kortuŝe raportis pri la lastaj tagoj de S-ro Strassberg.

D-ro Caldera revenis de vojaĝo al sia naskiĝlando Italujo kaj 8/7 li donis siajn impresojn kaj vigle komentis pri la diversaj turismaj vilindaĵoj, kiujn li havis. Je 22/7 S-ino I. Einihovici, kiu ekde nun Esperanton en Varsovio, parolis pensinstige pri la filozofia temo "Bonaj Najbaroj". "Ekskurso al Barrier Reef" estis la temo de la kunveno 12/8. S-ino W. Greenhalgh surbendigis la komenton en Brisbano kaj sendis ĝin kun diapozitivaj al sia korespondantino Sue Blockey. Nia sekretario W. Howard, kiu multe vojaĝas, parolis 26/8 pri siaj impresoj kaj sperto en Nova Gvineo.

MELBOURNE: "Japanujo, Taiwan kaj Hon-Kongo" estis la temo de prelego de S-ro Jack Ryding, kiun li prezentis je 27/8 kun belaj kolorplenaj diapozitivaj. Semajnon poste, S-ro F. R. Banham, iom pli serioze ol kutime, traktis temojn kiel "Gusta traduko de anglaj terminoj", "Pri klaraj elparolo kaj skribado" kaj "Lastaj tagoj de D-ro Zamenhof".

Je la 10-a de Aŭg. ni festis la 10-an datrevenon de la kooperativa Esperanto-Domo en Richmond. Samtempe ni faris "teston" pri la aktiveco de la Melburna E-istaro: "La ĉu grava kunveno, kun bona programo kaj luksa vespermanĝo povus forloki la lokajn esperantistojn de siaj televidiloj. Ni elsendis 100 (cent) cirkulerojn, sed nur 20 personoj fakte ĉeestis. Parenteze ni menciuj ke antaŭ 10 jaroj ĉe la fondkunveno ĉeestis 42 ges-anoj. Tiuj kiuj venis ĝuis la pianludadon de Kim Bastin kaj prelegojn

de S-roj H. Beechey, H. Koppel kaj Ken Linton. Komuna kantado kaj luksa festmanĝeto, preparita de S-ro Marshall Cohen kaj S-ino Fay Koppel, finis agrablan vesperon.

Je 24/8 S-ro Kim Bastin prezentis geologian temon rilate la drivadon de la teraj kontinentoj kaj la iaman diseriĝon el unu. Samvespere ni bonvenigis S-inon Shirley Fanos el Sidnejo kaj S-ron J. Slattery el Balmoral. Ĉe la amuz-vespero de 31/8 S-ro Jim Daniel prezentis kolorplenajn diapozitivojn pri vizito al la Figioj.

MELBOURNE: Eastern Suburbs: Pli ol 500 "verdajn kartojn" la publiko forprenis okaze de ekspozicio de E-libroj ĉe la bibliotekoj de Box Hill kaj Doncaster. Ni donacis ekzempleron de "Essential Esperanto" (de W. A. Gething) al tiuj 2 bibliotekoj. Je la fino de Julio S-ro M. Leereveld donis amuzan prelegon pri humoraj, embarasaj kaj strangaj vortoj, kiuj malkaŝas sin en niaj vortaroj. Nia prezidanto prelegis pri Esperanto ĉe la kunveno de presbiteriaj junuloj de Waverley.

MANLY: Ĉiujaŭde je 7p.m. tri kursoj daŭris kiel kutime en la Vespera Lernejo, Darley Road, Manly. Poste sekvis programoj (8.15 - 9.30), kun meznombre 13 partoprenantoj. 16/7 Paul Schwerin distris nin per matematikaj enigmoj; 23/7 Margaret Chaldecott montris lum-bildojn, kiuj emfazis kontrastojn en la naturscienco kaj en la homa vivmaniero en Aŭstralio kaj alilande; 30/7 Lily Jullie gvidis la vortludon "Leksikono" Esperantlingve; 6/8 Robbie Robertson montris stereoskopajn (3-dimensiajn) lum-bildojn pri sia vojaĝo eksterlanden kaj pri la Perta Kongreso.

Dimanĉon la 12an de Julio, laŭ afabla invito de Ruth Carruthers, 25 membroj renkontiĝis ĉe 66 Wanganella Street., Balgowlah, por bonvenigi Ges-rojn Einar Hansen el Kopenhago. Okazis fest-maĝo kaj societa vespero.

Dum la pasintaj 5 semajnoj 4 nord-urbaj jurnalaj aperigis 13 artikoletojn pri nia kluba agado.—Marjorie Duncan.

SYDNEY. La vort-ludo, Scrabble., havas fervorajn disĉiplojn ĉe Sydney, kaj dufoje en la lastaj kvar semajnoj ni ludis ĝin, 20/7 kaj 10/8. Nia Prezidanto, S-ro Bourlin montris, 27/7, sian lumbildaron, "Grimaĉoj de la Mondo." La plimulto el ni estas jam vidinta tiun ĉi programon plurfoje, sed ni ĉiam petas ke Victor remontru ĝin.

S-ro Tom Elliott 3/8 prelegis pri "Brakseĝa Filozofo", efektive la historio de la evoluado de religio. Sekvis vigla diskuto en kiu partoprenis eĉ la

komencantoj.

Nia Danlanda samideano, S-ro Hansen, ankoraŭ restas en Sidnejo, kaj ni tre ĝuas liajn priskribojn de lia hejmlando. S-ro Wre Chandler 2/8 faris intervjuon dissende de Radio 2F.C. pri sia uzado de Esperanto interŝanĝi sonbendojn de bird-voĉoj. Bedaurinde la programisto forstrekis preskaŭ ĉiun mension pri Esperanto. Nur unufoje ni aŭdis la nomon, kaj tiufoje la anoncisto ŝajnis ke ĉar S-ro Chandler estas esperantisto li povas aŭtomate kompreni la lingvojn de la birdoj!

Vizitis nin 9/8 S-ro Terence Watt, ferianto el Anglujo—REVANTO.

BRISBANE: Nia kutima pikniko okazis ĉe Bribie Insulo 2/8. Ceestis 15 personoj. Frank MacDonnell prelegis 27/7 pri sia ŝatokupo "Plongado". Barbara Jolly parolis 3/8 pri "Vojaĝo al Perto"; 17/8 ĉiuj ĝuis denove la kantadon.

Dum 2 tagoj, 23/8 kaj 24/8, ni ekspoziciis E-ajojn en la halo de la Urbdomo. La intereso estis granda, kaj ni distribuis multajn "verdajn kartojn". Eĉ aliŝtatanoj vizitis la ekspozicion, kaj ni ĝojis saluti i.a. Ges-rojn Kevin Smith kun 2 filinoj el Manly.

—W. Greenhalgh.

ROCKHAMPTON: Vizitis nin Ges-roj Tronerud el Melburno kaj Ges-roj Clarke el Redcliffe. Ni esperas vidi Ges-rojn Sinclair el Caloundra en baldaŭa estonteco. Gojigas nin raportoj ke nia artista amikino S-ino Phyllis Jones revenis de Eŭropo kaj nun loĝas ĉe Ball Bay apud Mackay.

ESPERANTO-FEDERACIO DE N.S.W.

La 13-a Konferenco okazis sabaton 15/8 ĉe Toronto (en N.S.W., ne Kanado!), kiu situas proks. 100 mejlojn norde de Sidnejo kaj 20m. de Newcastle, sur la okcidenta bordo de Lago Macquarie. La Hotelo Toronto mem estas bona vidpunkto, de kie oni povas vidi preskaŭ la tutan lagon: taŭga loko por nia unua vizito al la regiono de Newcastle.

Ceestis 23 anoj; komforta hotelo, bonega vetero! Sabaton matene tiuj, kiuj alvenis vendredon, veturis aŭte tra la Arbaro Heaton sur la Montoj Watagan—vasta natura rezervejo kun belaj vidindaĵoj. Survoje hejmen al la hotelo ni vizitis la urbojn Cessnock kaj East Maitland.

Posttagmeze la aferkunveno akceptis protokolojn de la antaŭa konferenco kaj raportojn pri progreso de la Federacio kaj aliĝintaj grupoj. Nia loka membro, S-ro Bruce Cook, kiu instruas en lernejo

apud Newcastle, ankoraŭ instruadas E-on ekster la instruplano al 22 gelernantoj meze dekjaraj. La infanoj sufiĉe interesigas, sed progreso estas malrapida, ĉar la lecionoj daŭras nur duonhoron unufoje en semajno, kaj kompreneble ili devas studi multajn aliajn temojn.

La 14-a Konferenco kaj 3-a Jarĉefmanĝo okazos sabaton 31/10 ĉe Manly, kiel antaŭe.

Vespermanĝinte, ni denove kunvenis por distra vespero. S-ro Cook alkondukis 6 beletajn knabinojn, anojn de sia E-kurso, kiuj dolĉe kantis E-e kaj ludis ludon kiel "Lotto", sed uzante bildetojn de diversaj objektoj anstataŭ numeroj. La Manila Teatra Grupo prezentis 4 teatraĵetojn, kaj S-ro Cocking deklamis tradukitan poemon "La Dafodiloj" (Wordsworth) kaj vigle gvidis nin tra E-vortludoj — tre ridinde! Ni aŭdis la programon surbendigitan ĉe Orange de la ABC aŭtaŭ 3 monatoj, kiun oni dissendis vaste per la radi-retaĵo. Dum 25 minutoj ĝi estas, plejparte angle, intervjuoj informaj kaj interesaj, inkl. du E-edziĝojn — unu en Japanujo, unu en Sidnejo — kaj rakonto de Tiny G. pri: kiel li fariĝis E-isto antaŭ pli ol 60 jaroj.

Dimanĉon matene, ĉar la vetero daŭris bonega, ni kunvenis denove survoje hejmen por subĉiela pikniko ĉe Avondale, Corranbong, kie situas la nutraj-fabriko Sanitarium apud Dora Creek. Mirinde ĉiuj fine trovis la lokon, kaj ni ĝuis du agrablajn horojn antaŭ ol rekomenci la veturon al Sidnejo.

Aliaj Kunvenoj: Subĉielaj piknikoj okazis:— 20/6 ĉe Balls Head, Norda Sidnejo, kie oni povas vidi belajn vidajojn trans la haveno al la ĉefurbo. 27/7 ĉe Cheltenham Reserve, natura parko norde de Sidnejo. Por ambaŭ okazoj la vetero estis perfekta — vere mirinda en la mezo de vintro. — George Thatcher.

ANKORAŬ LA PROBLEMO . . .

Kiam la Finna Ministro de Fremdaj Aferoj devis bonvenigi la Usonan kaj la Rusan reprezentantojn en Helsinko ĉe la konferenco pri Limigo de la Nuklea Bombo, lian dekfrazan parolon oni interpretis el la Finna en la Anglan kaj Rusan. Komentis "Daily Mirror" (Londono) 18/11/69:— "La Finna Ministro kaj la vicurbestro de Helsinko ne bezonis fronti tiun problemon, kiam ili bonvenigis la Usonajn kaj Rusajn delegitojn al la lastjara Esperanto-Mondkongreso en Helsinko. Nur Esperanto estis uzata". (B.E. 5/70).

BONVOLU RIDETI . . .

Kial en ĉeesto de mortanta malsanulo oni parolas Latine?
Estas necese, kutimigi lin al la morta lingvo.

Pro kio vi ploras, etulo?
Patrino donis al mi naskiĝ-certigilon, por ke mi alportu ĝin al la lernejo — kaj mi perdis ĝin!
Nu, kaj kio do?
Nun mi devas denove naskiĝi.

Sur strandbanejo neĵuna sinjoro alparolis sian kunulon: "Vidu, kiel ideale belan korpon havas tiu knabo, ĉu ne?"
"Ne estas knabo, sed knabino".
"Ne diru tion. Tio estas ja knabo!"
"Tute ne knabo. Ŝi estas mia filino, ja".
"Tiel! Do vi, sinjoro, estas ŝia patro?"
"Ne, ne! Mi estas ŝia patrino!"

Cu vi memoras tiun belan valoran moneron, kiun mi perdis antaŭ kvin aŭ ses jaroj?

Jes, mi bone rememoras la okazon.
Cu vi memoras, kiel mi longe serĉadis kaj nenie povis ĝin trovi?

Jes, mi memoras la diligentan kaj penegan serĉadon.

—Nu do, hieraŭ mi surhavis malnovan ~~veston~~, kiun mi ne uzis jam de kelkaj jaroj, kaj kion vi pensas, ke mi trovis en poŝo?

Vian moneron. Permesu al mi vin gratuli.

Ne, ne! Mi trovis la truon tra kiu ĝi certe perdiĝis!

Kiom longe vi ludas la golfon? "Ĉirkau du monatojn". "Kio? Vi lertege ludas ja!" "Tio ne estas miriga. Mi pasigis kvar jarojn, lernante la ludon".

Hirurgo, arkitekto kaj registara dungito disputis inter si pri tio: kies profesio estas la plej malnova. La hirurgo diris: "Tio estas simpla. Eva estis kreita el ripo de Adamo, do la hirurgio estas la plej malnova profesio, ĉar ĝi estis bezonata eĉ ĉe la plej unua homo".

"Bone", respondis la arkitekto, "sed la Biblio rakontas, ke Dio kreis la mondon el kaoso, kaj vi bone scias, ke mia profesio estas la kreado, do la arkitekturo estas eĉ plej malnova ol la hirurgio".

"Ĉu el kaoso?" demandis la registara dungito: "kaj kiu ĉiam kreas la kaoson?"

"Per kiu mano vi uzas ŝovelilon?" demandis ĉefmetiisto al komercanto. "Ho, mi uzas ambaŭ manojn", respondis tiu. "Bone", daŭrigis la ĉefmetiisto: "Prenu du ŝovelilojn kaj komencu tie ĉi."

CITINDAĴOJ

Dio faris bone en tio, ke li lasis geedziĝi Ges-rojn Carlyle. Per tiu aranĝo nur du homoj estis malfeliĉaj anstataŭ kvar. — Sam. Butler.

Ce porvirina kunveno F-ino B. deklamis sian poemon 206-strofan, titolitan: "La Lastaj Vortoj de Mia Patrino".

Pro nepra neceso Gelordoj Scarsdale devas uzadi argentan servicon. La familio Scarsdale uzadis ĝin jam de post 1760j. "Nuntempe anstataŭigi ĝin per fajenco kostus multe tro multe". — Sunday Express.

Forte bedaŭrante mankon de prirelogia edukado ĉe la gejunuloj, D-ro T. Arnold diris: "Mi konas knabojn, jam ok- aŭ naŭdekjarajn, kiuj eĉ ne scias tion, kio okazos al ili post ilia morto". (Ankaŭ ni konas tiajn.)

Se vi volas scii, ĉu vi fizike amas la edzon, mi sugestas tute serioze, ke vi vin demandu: "Ĉu mi purigus miajn dentojn per lia dentobroso?" — "Housewife".

Kiam Henry Ford ekvidis koloran mapon de kvindek ĉefaj vivantaj lingvoj, li rimarkis: "Do la plej urĝa bezono de nia nuntempa mondo estas: ankoraŭ kvardek naŭ mortintaj lingvoj".

Kiam gepatroj persistas tamburi
La virtojn de propraj infanoj,
Tiam min vipas la urĝo forkuri
Kun kapo krevanta en mano.

FOLI-FALO

La sinjoro rave rigardadis al pentraĵo "Printempo", oleverko pri bonforma junulino, kiu havis "veston" el nur unu-du strategie metitaj folioj. Subite blekis akratone la edzino: "Nu do, kion vi atendas — la Aŭtunon?"

Ankoraŭ litoto. — "Se hidrogenaj bomboj eksplodis sur ĉi tiun landon, ni ĉiuj estus envolvitaj en kompleta transformo de nia vivo-vojo". — Sir Hugh Lucas-Tooth, ("Sunday Despatch").

DIO KAJ SCIENCO

Kiam Apolono 13 estis en gravega danĝero, la mondo estis informata, ke nur per preĝado la kosmonaŭtoj povus saviĝi.

Post la sukcesa reveno al la Tero, la teknika scienco laŭdate reprenis sian prestiĝon. . . "Time", 18/5/70.

ESPERANTO IN U.S.A.

It is taught in three schools in San Mateo (Cal.) Dr. E. Feldman, principal of Lawrence School, claims it is an ideal initial non-native tongue for a child to learn because it is easy to grasp and thus builds positive attitudes towards language study. He regards a teachers' course in Esperanto in 1962 as the first "major effort" at teaching Esperanto in U.S. schools. Hitherto the program has suffered from lack of teachers, but a 3-year program will go into effect at Highlands School this autumn. In July a 3-week intensive course was held at San Francisco State College for teachers.

Mrs. Vallon, an Esperanto specialist who teaches it in San Mateo schools, points out that in the Spanish classes the future tense is not introduced until the second year, while Esperanto students learn it very quickly, since it means simply adding -os to the verbs.

The above is a very brief resume of an article in "The Christian Science Monitor" (13 June) by the Education Editor.

A correspondent who had visited San Mateo tells us that there are at least four schools in Oregon also. At a group in San Francisco some 60 were present; most of them spoke Esperanto well. A university in U.S.A. intends to open a degree course including Esperanto this summer.

LIBERECO EN USONO

El 1136 reprezentaj homoj voĉdone demandataj pri la Usona Ĉarto de Rajtoj (la Konstitucio) la plimulto ne volas defendi kvin el la dek artikoloj en tiu Konstitucio. Jen la demandoj:

Kondiĉe, ke ne estas evidenta danĝero de perforto, ĉu vi aprobas, ke kiu ajn homgrupo — eĉ ekstrempolitika — havu rajton organizi protestojn kontraŭ la registaro? — Ne: 76%.

Se viro estas verdiktita kiel senkulpa pri grava krimo, sed poste trovigis ankoraŭ nova atestaĵo, ĉu vi pensas, ke li devus esti denove juĝata? — Jes: 58%

Se persono estas suspektata pri grava krimo, ĉu vi aprobas, ke la polico tenu lin en karcero ĝis ĝi havos sufiĉe da atestaĵo por lin akuzi? — Jes: 58%.

Ekster tempo de milito, ĉu vi aprobas, ke ĵurnaloj, radio kaj televido havu rajton raporti pri kiu ajn afero, eĉ se la registaro rigardas tion kiel malutilan al la nacia intereso? — Ne: 55%

Ĉu vi pensas, ke ĉiu homo rajtas kritiki la registaron, eĉ se tiu kritikado damaĝe kontraŭas la nacion intereson? — Ne: 54%. ("Time", Aprilo 27, 1970)

—Konsidere al la fundamentaj kredoj sur kiujn Usono estis fondita, tiuj voĉintoj ne estas veraj Usonanoj, ĉar ili perfidas la principojn de sia patrolando. Tiel komentas Franco en "Time", Majo 18.

AL NIAJ ABONANTOJ

La redakcio klopodas aperigi legajojn sufiĉe facilajn por komencantoj, plimalpli nove aliĝintaj al la A.E.A. Tial ne plu aperos iom longaj prilingvaj, cetere helpaj, tamen ĝenerale legeblaj nur por bone-progresintoj aŭ adeptoj. La gazeto enhavos pli multe da artikoloj, anekdotoj, ŝercoj kaj similaj, taŭgaj por instruo, amuzo, distro.

Dum la lastaj du jaroj abonigis multe da novuloj, homoj ankoraŭ lernantaj E-on. Ilin ni devas servi, por ke pludaŭru ilia intereso en nia afero. Sekve, amiko, ne petu aperigon de prilingvaj, artikoloj, ĉu originalaj aŭ represaj el aliaj gazetoj. Jam ekzistas multaj libroj prilingvaj (ekz-e "Ne Tiel, sed Tiel ĉi: Faulhaber; "Paŝoj al Plena Posedo": Auld; "Lingvo Stilo Formo": Kalocsay—krom internaciaj E-gazetoj, kiuj bone servas al tiaj E-istoj, kiuj sentas apartan intereson pri stude diskutindaj elementoj de la lingvo.

LA ELEKTO DE ADAMSON

KLARA: Jen viaj ŝtrumpoj lavitaj, kaj ties truoj ŝtopitaj. Krome mi havas grandan bifstekon por via matenmanĝo.

ADAMSON: Kara Klara, kia bonkora virino vi estas — kia varma koro — la plej bona najbaro, kiun oni povas havi!

KLARA: Estas por mi plezuro! Sciu, ke la lasta deziro de via edzino estis: "Prizorgu al Adamson!" Si diris, ke ŝi scias, ke mi prizorgos vian komforton kaj . . .

ADAMSON: Vere, vi faras tion, Klara. Mi ofte miras: kion mi farus sen vi.

KLARA: La domo estas tro granda por unu viro. Ĉiam mi diras: "Domo bezonas prizorgon de virino, sed najbaro, kvankam ŝi estas li plejbona amikino de via edzino, povas fari nur . . .

ADAMSON: Vi lasas nenion nefarita. Mi vin certigas.

KLARA: Jes! Domo bezonas prizorgon de virino, sed pli ol tio mi ne povas fari. Vi komprenas, kiel la homoj klaĉas!

ADAMSON: Klara, mi pensas pri vi kaj mi.

KLARA: Ĉu jes, Adamson?

ADAMSON: Mi ne havas impresan aspekton, Klara, sed vi scias, ke mi estas trankvilema kaj agrabla viro por kunvivado.

KLARA. JES!

ADAMSON: Kaj ke mi ne estas malriĉa.

KLARA: Vi ne, Adamson.

ADAMSON: Ambaŭ la domo kaj mi mem bezonas la zorgon de virino. Vi scias ĉiom de miaj malgrandaj kutimoj . . . nu, preskaŭ ĉiom . . . Klara, ĉu vi povus edzigi viron de mia aĝo?

KLARA: Karulo! Ĉu tio estas propono?

ADAMSON: Klara, mi . . . mi . . .

KLARA: Kara vireto, ĉu vi trovas tion malfacila?

ADAMSON: Jes!

KLARA: Mi faciligos tion por vi. Adamson, la sinjorino simple diros: Jes.

ADAMSON: Ĉu ankaŭ ŝi diros: Jes?

KLARA: Ne dubo pri tio.

ADAMSON: Dio benu vin, Klara. Mi estas la plej feliĉa viro en la tuta mondo.

KLARA: Kaj mi, la plej feliĉa virino!

ADAMSON: Tio decidigas la aferon. Morgaŭ mi proponos al mia dolĉa malgranda ROZO.

—S-ino Sherratt, Redcliffe

PRI "OOMOTO"

La Centro en Kioto sendis liston de pli ol 20 iamaj kaj nunaj abonantoj de tiu gazeto en Aŭstralio. La granda plimulto ne plu abonas ĝin. La malalta kosto, 1.60, ebligas ricevadon de tiu riĉenhava revuo. Eksiĝintoj saĝe konsiderus reabonon kaj, ankoraŭ pli, rekomendus ĝin al aliaj E-istoj. — Peras F. R. B.

KASTELO GRESILLON

De la 4-a aprilo 1971, ĝis la 9-a de aprilo, okazos en la kastelo "Gresillon" —49-Bauge (Francujo) la 10-a Paska Kultura Semajno.

Inter aliaj la plej bonaj studentoj de la esperanto-kurso de la Fabultato de Clermont-Ferrand kaj la agregacia profesoro JANTON estas invititaj.

La organizanto estas S-ro Rene LLECH-WALTER, Honora Prezidanto de U.F.E., 5, quai Vauban-66 - PERPIGNAN, ĉe kiu petu detalojn.

QUAKERISM & ESPERANTO

Advertisements on Quakerism in two Esperanto gazettes brought letters from fifteen countries. How else could such people be reached except through Esperanto? asks Mr. Leather in "The Friend" 23/1/70. To have separate advertisements in thirty languages? Such a project would never have got off the ground.

Address of Quaker centre: see "British E-ist"; May, 1970.

WHY I LOVE ESPERANTO

(a) I wished to become familiar with some language other than my own. Years of more or less intense occupation with French and German have never brought a sense of satisfactory acquirement of these not easy languages. I have not been able to speak these tongues and only with difficulty can I read them by aid of dictionaries.

(b) I was charmed by the symmetry and ingenious structure of Esperanto, its possibilities for intelligent exercise of one's own ability to form words and expressions — in other words, its flexibility and freedom for individual personal construction, a feature denied by the national languages, which are, by their iron laws, rigid and conventional in their set usage, full of characteristic idioms and various in their class, regional and literary colorings. In Esperanto one is freed from all these factors so inhibiting to one wishing to master a foreign national tongue in all its aspects.

(c) A sense of loyalty to the good man who invented Esperanto. A feeling of collaboration with a noble spirit whose sense of service outweighed any other consideration in his life. To abandon Esperanto would, for me, signify betrayal of him and those many others, likeminded with him, who through eight decades have labored to realise his ideal.

KIAL MI AMAS ESPERANTON

(a) Longe mi deziris familiariĝi kun iu fremda lingvo. Dum jaroj mi min okupis, pli-malpli intense, kun la Franca kaj Germana, tamen neniam sukcesis atingi scion kontentigan pri tiuj nefacilaj lingvoj. Ankoraŭ mi ne povas paroli ilin, kaj nur malfacile povas ilin legi, helpate de vortaroj.

(b) Carmis min la simetrio kaj genia strukturo de Esperanto, ĝiaj ebloj ekzerci la propran kapablon kaj inteligentcon ĉe formado de vortoj kaj esprimoj — alivorte, ĝia fleksebleco kaj libereco al individua, personeca konstruado. Tion malebligas la feraj leĝoj de la naciaj lingvoj, kiuj estas rigidaj kaj konvencijaj laŭ porĉiame fiksita uzado kaj plenaj de idiotismoj propraj al siaj fonoj sociaj, regionaj kaj literaturaj. En Esperanto oni estas libera je ĉiuj tiuj faktoroj, kiuj tiel terure ĝenas homojn, kiuj strebas plene, tutaje posedi fremdan lingvon.

(c) Sento de lojaleco al la bona homo, kiu inventis Esperanton. Sento de kunlaboro kun nobla spirito, kies homamo superpezis kiun ajn alian elementon en lia vivo. Forlasi lian verkon signifus por mi agon perfidan kontraŭ li kaj tiuj multaj homoj, kiuj, samsentaj kun li, laboradis tra ok jardekoj por efektiviĝi lian idealon.

RECENZOJ

"Norda Prismo", N-ro 1, 1970; Kvaronjara. 3½ Us. dol. aŭ egalvaloro. Unuopa n-ro, 9 int. rk.

Sur 64 paĝoj oni trovas mirindan kompilon da vari-temaj legajoj — jam de la klara prozo de Ginz, Auld, De Kock, Pančev k.a. ĝis la diversautoraj poemoj kaj form-eksperimentaj versaĵoj. Iuj el ĉi tiuj postulas iom fortan dozon de la imagemo, kiu animis iliajn verkintojn.

La Arton Poezian analizas R.P. Nogueira; Benezik la poemojn de V. Sadler; nelonga traduko el la Turka; pli longa el la Hebrea; kaj brila recenzo de Edwin de Kock pri "Somermeszokta Songó" — ili elstaras kiel eble plej impresaj por la plimulto da legantoj.

De Kock, per sia recenzo, lingve instruas al progresintoj, ne nur per sia ekzempliga pritrakto de la Kaloĉaja tradukado, sed ankaŭ per sia propra prozstilo, elegante moderna.

La duan recenzon kontribuis D. J. F. Quirke, kiu koncize direktas ankoraŭ iom de lumo sur tiun ĉefverkon — "La Infana Raso". Peranto: K. Linton, 11

Poplar St., Caulfield, 3162.

Uzo de "k" anstataŭ "kaj" ankoraŭ ne radikiĝis en prozo. Estas do strange ĝin vidi en versaforma teksto. Kion utilas tio?

La formo "Vjetnamio" kontraŭas konsilon de Waringhien kaj Butler, kiuj enlistigis: "Vjetnamo".

Ĉi tiu kultura revuo meritas pli grandan subtenon, precipe de ĉiu simpatianta la altan literaturan idealon de S-ro Auld, ĝia vasthorizonta redaktoro.

"Vilaĝoj en Batalkampo": Honda Katuiŝi. 64 paĝoj, fotoj kaj mapoj. Eldonis Japana E-a Kooperativo Nakatuhamadori, 3-10, Ooyodoku, Osaka. Prezo neindikita.

Specifa ĉapitro de longa raporto aperinta en la Japana ĵurnalo "Asahi Sinbun". Draste-realisme ĝi priskribas la teruron kaj detruon, kiuj trafis la vilaĝanojn en la milita tereno de Dec. 1966 ĝis Okt. 1967. Postparolo de la tradukinto, Konisi Gaku, aperas sub dato Julio 1970. La tuta verko eldoniĝis ankaŭ en la Japana kaj Angla lingvoj. Havebla ĉe la adreso supra.

Jarlibro de la U.E.A. Partoj I kaj 2. Entute 574 paĝoj.

Necesa manlibro por ĉiu E-isto kiu serioze rigardas la movadon kaj sentas sagacon sin ekipi firmfakte ĉe ĉiuj punktoj. La U.E.A.-Jarlibro kaj la C.E.D. (Centro de E-a Dokumentado) estas la plej aŭtoritata fonto de laŭvera informado.

Je 31/12/69: 3570 delegitoj en 67 landoj — el ili: 1366 ĉefdel., 234 vicdel., 1889 fakdel., kaj 81 junul-del. La membraro nombris je 1 Jan. 1970 33.407, el kiu 7088 estis individuaj. Sekve 26.319 estas asociaj membroj. "Dek mil individuaj membroj estas absolute necesaj por solide ekvilibrigi la en- kaj elspezojn", skribis D-ro Lapenna en sia leg-enda antaŭparolo. Saĝe, ekonomie U.E.A. utiligas siajn nomrimedojn; ne ekzistas eblo por pli ŝpari, ol nun ĝi faras. Ni daŭrigu kaj plivastigu nian subtenon al ĝi. —Ken Linton, peranto.

"Rockhamptona Rondo", 5-paĝa mimeografita organo de la R.E.A. Vol. 7, n-ro 4 (Majo-Aŭgusto).

Ĉefartikolo, lokaj okazaĵoj, ŝercoj, porkomencula paĝo kaj felietono... "La Tempomaŝino" (H. G. Wells). Kvin cendoj ĉe J. Moore, 34 Hadgraft St.

WM. AULD KAJ "NORDA PRISMO"

En letero la fama poeto kaj literaturo afable kritikis recenzon (p. 41, Junio n-ro) pri "Norda Prismo", kies redaktoro li estas. Pro simpla justo ni mencias liajn rimarkojn. Li pridubas, ke "meze-adeptaj" E-istoj kontentige mendus revuon en kiu "troviĝus legaĵo simple kaj trafe esprimata", atentigante pri la revuo "La Praktiko", kiu ankoraŭ ne ricevas sufiĉan subtenon de la "sufiĉe nombraj" E-istoj modeste ekipitaj.

Li demandis: Kion devas fari tiuj el ni, kiujn "la veras la subtilaĵoj de la vere vivanta lingvo", se ni ne rajtas havi revuon en kiu ni povas admiri ilin?

Li kredas, ke la recenziĝo certe surpriziĝus, se li sciis, kiom el la **entuziasmaj** legantoj de "Norda Prismo" estas "meze-adeptaj". Li renkontis multajn. "La recenziĝo nur difinas; li, la redaktoro, devas fari la laboron... kaj trovi ne nur legantojn, sed, pli malfacile, la aŭtorojn, kiuj ĝenerale devas esti iom pli ol meze-adeptaj".

Komente nian rimarkon pri Dickens, li demandas: Kie sin kaŝas tiu nia Dickens, kiu vigligos niajn legantojn...?

Cetere, ankaŭ Dickens, rilate la anglan lingvon, estis iom pli ol meze adepta.

La sinteno de S-ro Auld meritas konsideron. Imprese li sin esprimis. Ni lasas la aferon libera. Eventualajn

komentojn ni aperigus.

Membroj de U.E.A. bonvolu noti, ke la ĉefdelegito, S-ro Ken Linton, estos ekster Aŭstralio dum la unuaj kelkaj monatoj de la venonta jaro — li ankoraŭ ne scias la ĝustajn datojn — do estus konsilinde pagi la kotizon antaŭ la fino de la nuna jaro.

ANKORAŬ UNU VENKO!

Hobart a filatelisto Eino Loorits denove gajnis premion ĉe Esperanta konkurso okazigita de la Pola Radio. Li ricevis medalon sur kiu estas reliefta bildo de D-ro Zamenhof. "The Mercury" (Hobarto) donis foton kaj tekston sur sia frontpaĝo, 22:8.

Fidu pli la propran forton

"Car mi mem faris multe da sperto mi avertas vin: ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkcioj, sed fidu pli la propran forton! Se la E-movado estos forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon." Jen vortoj de la aŭstria Statprezidanto D-ro Franz Jonas, iam aktiva Esperantisto, kiam li malfermis la 55-an Universalan Kongreson de Esperanto en Vieno la 2-an de Aŭgusto ĉijare.

Ankaŭ en nia lando tro multe da homoj "bombardas" oficialajn instancojn, Universitatojn k.t.p. per petoj agnoski, enkonduki aŭ propagandi nian lingvon. Kiam niaj lokaj kluboj, nia tutlanda asocio, estos pli fortaj, la oficialaj institucioj de si mem devos agnoski nin. —Herbert Koppel, Melbourne.

MORWELL EXHIBITION

Initiated by Mrs. M. Wybenga, secretary of the Morwell Esperanto Society, an Esperanto exhibition ran from 5 to 19 September.

It proved popular; about 100 saw it on Saturday opening day, some coming from as far away as Sale and Korumburra. Items included: dolls in national dress from 20 countries, a stamp section and a corner for Scouts and Guides, who gleaned information on their language-badges studies. It was held in the Morwell Library.

Please send in copy by 5th of each month to Mr. Koppel, so that we may issue under current date-line.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 89 (169)

MELBURNO

Oktobero, 1970

LA LINGVA PROBLEMO EN VJETNAMO

R. L. Harry, Australia Ambasadoro en Sajgono.
(tria parto kaj fino)

Vjetnamanoj Lernas la Francan.

La Francoj instruis al la konkeritoj sian lingvon por fariĝi administradon kaj pli altan edukadon de la enloĝantoj. Ne ĉiu posteno aŭ ĉiu profesio estis atingebla por la Vjetnamanoj, sed multaj lernis la Francan lingvon, kelkaj eniris universitatojn en Francujo aŭ poste en Hanojo kaj fariĝis kuracistoj aŭ farmaciistoj. Aliaj fariĝis oficiroj en la Franca armeo, kie ili Franciĝis, aŭ edziniĝis kun Francoj. Fine de la Franca periodo, dekmiloj da Vjetnamanoj parolis la Francan kiel Francoj, kaj eble milionoj havis utilan scipovon.

Post la sendependiĝo en 1954 la Vjetnamanoj ŝanĝis la nomojn de multaj stratoj — Libereco, Justeco, Revolucio, aŭ honore al Vjetnamaj herooj. Sed oni konservis kelkajn Francajn nomojn, ekz. Duong Pasteur (strato Pasteur), kie situas la Loĝejo de la Aŭstralia Ambasadoro, mia hejmo.

Multaj Francaj komercistoj kaj instruistoj restis en Vjetnamo, kaj multaj Vjetnamaj familioj daŭre parolis France kaj sendis siajn infanojn al la liceo en Sajgono aŭ la Pariza Universitato.

La Franca registaro finance subtenas lernadon de la Franca per la Franca Instituto kaj Franca Alianco kaj sendas al Vjetnamo ekzpoziciojn, teatraĵojn, filmojn. Ĝi provizas multajn stipendiojn por ebligi al Vjetnamaj studentoj eniri Francan universitatojn. La Franca restas komuna lingvo inter la Vjetnamanoj kaj la Kamboĝanoj. Kiam dele-

gitaro Kamboĝa vizitis Sajgonon, kaj kiam la Vicprezidento Ky vizitis Phnom Penh, la diskutado kaj la fina komunikado estis en la Franca.

Vjetnamanoj Lernas la Anglan.

Antaŭ 1954 nur malmultaj Vjetnamanoj lernis la Anglan. Vjetnamanoj diris al mi: "Ni kredis, ke Parizo estas la kultura centro de la mondo; ke estas nenio lerninda en aliaj lokoj kaj per aliaj lingvoj". Sed dum la pasintaj 16 jaroj, pro la influo de la Usonanoj (kaj iomete pro la ekonomia, teknika kaj milita helpo de la Aŭstralianoj, Kanadanoj, Britoj kaj Nov-Zelandanoj) la Vjetnamanoj komencis studi la Anglan. Oni lernas ĝin nun en la lernejoj, liceoj kaj universitatoj, en la klasoj de la Usona-Vjetnama Asocio, en la Armea Akademio kaj aliaj lernejoj de la Vjetnamaj armeoj, kaj per la praktiko en situacio, kie centmiloj da Vjetnamanoj laboras por Usonanoj aŭ vendas al ili. Kaj nun miloj da junaj Vjetnamanoj iras ne al Parizo, sed al Novjorko, Bostono, Toronto, Melbourne kaj Londono.

En artikolo en "Esperanto" antaŭ kelkaj monatoj oni priskribis la problemojn de interpretado en ĉi tiu lando. Malgraŭ ke multaj diplomatoj, teknikistoj kaj oficiroj usonoj kaj Aŭstraliaj lernis la Vjetnaman, plejparte la kunlaboradon de la aliancujloj kun la Vjetnama registaro, publika servo kaj armeo dependas de miloj da interpretistoj. Estas multaj tre spertaj lingvistoj, sed neeviteble estas miskomprenoj.

La plej grava fakto, tamen, estas, ke la malfeliĉaj Vjetnamanoj ĉiam havas tiun dilemon — ilia lingvo ne donas aliron al la scienco kaj al la moderna teknologio, certe ne al la plej altaj gradoj. Ili lernis la Francan. Nun ili lernas la Anglan. Kelkaj patroj insistas, ke la infanoj lernu la Ĉinan. La Germanoj starigas klasojn por instrui la Germanan.

Esperanto en Vjetnamo.

En Norda Vjetnamo estas granda Esperanto-movado, kiu eldonas multe da propagando. En Suda Vjetnamo estas malgranda grupo. Kiam paco jam venos, Vjetnamo devas esti fertila grundo por la Internacia Lingvo.

—Ricevita de la red. en 3 Aug.

AUSTRALIAN ESPERANTO

ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

5th September, 1970

New Individual Members

Mason, Mr. H. B., Surrey Hills, Vic.
Barnes, Mr. D. L., Burwood, Vic.
Randles, Mrs. B. E., Kensington Gardens S.A.

Elvidge, Mrs. J., Stafford Heights, Qld.
Stubbs, Miss J., Rosewood, Qld.
Stoimenov, Mr. I., Coburg, Vic.

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$695.02
Goldsmith, Mr. C. C., N.S.W.	6.00
Duncan, Mrs. M., N.S.W.	10.00
Howard, Mr. W. H., W.A.	2.00
May, Mrs. R., N.S.W.	1.00
Thatcher, Mr. G., N.S.W.	2.00
Manly Esperanto Club, N.S.W.	10.00
P.L.C.C., N.S.W.	1.50
Koppel, Mr. H., Vic.	1.00
Caldera, Dr. C. J., W.A.	2.00

\$730.52

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition Points Allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
"Klereca" Examination success	10
Each \$1 to the Publicity Fund	1

Positions on 5th September, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	554	426.1
Victoria	300	991	330.0
N.S.W. -/- A.C.T.	260	689	265.0
W. Australia	80	194	242.5

S. Australia	40	45	112.5
Tasmania	30	32	106.6
— C. C. Goldsmith, Secretary.			

Progress There is no doubt that we are making progress as a result of the present campaign. Our membership has increased by approximately 70%, and consequently we are able to issue this gazette monthly and still have a sound financial position despite rising costs.

We have brought fairly full information about Esperanto into nearly 3000 homes in Australia. We have enrolled for correspondence courses well over 200 people, and a surprisingly large number of these are making good progress. In some areas — those in which members have helped — classes have been larger and group life more vigorous.

We have succeeded in arranging for considerably increased activity in many areas during the next few months, and are hoping that this will mean larger classes next February and many more correspondence students. But this necessitates the printing of many thousands of green cards, and a reprint of "Freedom of Speech" before the end of this year, and this costs money. You have supported us well so far, and I am hoping that you will continue to do so until the close of the present campaign towards the end of next year. May we therefore hope that all who can do so will generously support the Publicity Fund during the coming months? It will then be possible to present at the Congress in Melbourne a report which will show that even in far-away Australia Esperanto is moving ahead. Then, too, you will be able to decide whether you want to continue on the same lines, or can think of better plans—Tiny Goldsmith.

ĈU VI IROS BRITUJON?

Se vi deziras kontakton kun Angla samcelano aŭ konsilion pri io rilata al Anglaj aferoj, senpaga helpo atendas vin. Tiu ĉi propono ne validas por eltrovo de plum-amikoj, sed nur por specifaj aferoj pri kiuj la unua paŝo estas kontakto kun taŭga persono en Britujo. Skribu en E-o al: S-ro Ken Hadler, "Croft House", Hastings, Sussex.

KORESPONDADO

Virino 30-jaraĝa dez. kor. — Hanna Lazar, 6 Szondy u.24, Budapest, Hungary.

Oficisto 30-jara, p.m., bildkartoj, fleks. diskoj. A. Bulganov, Volgogradskaja 19-2, Kazan -80, USSR.

AUSTRALIA KRONIKO

ADELAIDE: Mortis je 29-a de Sept. post longa malsano, S-ro W. C. Andres, preskaŭ 83-jara. En 1953, jam 66-jara, li eklernis Esperanton per propra studado kaj per korespondado kun sia filino S-ino Fay Koppel (Melbourne).

Eksferovojisto, li aliĝis en 1954, post renkontiĝo kun S-ro E. Crowe en Melbourne, al la fervojista fakorganizo I.F.E.F. kaj komencis korespondadon kun aliaj fervojistoj. Li partoprenis kunvenojn de la Adelaide E-Societo. Kongresanoj vojaĝintaj al Perth en Dec. 1953 certe rememoras renkontiĝon kun li, kiam li montris al ili la vidindaĵojn de Adelaide. Bedaŭrinde tro baldaŭ kripliga malsano forprenis de li la eblecon plu partopreni en E-aferoj.

MELBOURNE: Raportoj pri la 55-a Universala Kongreso en Vieno kaj la 43-a S.A.T. Kongreso en Aŭgsburgo konsistigis la programon de la 14/9, prezentita de S-ro H. Koppel, kiu ankaŭ montris fotografajojn de la ĉefparolantoj kaj de la aŭstria ŝtatprezidanto, D-ro Franz Jonas, Esperantisto kaj Protektanto de la 55-a Kongreso. Je 21/9 S-ro Marcel Leereveld donis humoran prelegon en kiu li montris kiom da embarasaj, strangaj kaj "maldecaj" vortoj kaŝiĝas en niaj vortaroj.

Nia ĉi-jara "Amerika Teo" okazis je 28/9. Dudek ok membroj kaj amikoj ĉeestis kaj post vigla marĉandado, 3 loterioj kaj luksega vespermanĝo la rezulto estis espezo de \$53.36. Lastjare 30 ĉeestantoj kontribuis \$49.91. La monon ni uzos por nia biblioteko kaj Ekipaja Fonduso.

La **BORONIA E-GRUPO** ĝuis posttagmezan dancon je 16/8 ĉe la Hunter's Lodge en Croydon. La grupo preparos melodramon por la ĉi-jara Zamenhof-Festo.

CANBERRA: D-ro Ross Robbins revenis el Nov.-Gvineo, kie li instruis ĉe la Universitato. Li denove loĝas ĉe 4 Wild St., Manuka, A.C.T., 2603.

MANLY: Kiel kutime post niaj 3 kursoj en la Vespera Lernejo, Darley Rd., Manly, okazis klub-kunvenoj je 8.30:-13/8 Distra Vespero: Robbie Robertson prezentis 3 teatraĵetojn, en kiuj rolis Thora Richmond, Olive Russell, Arthur Cocking, Fred Deal, kaj George Thatcher; P. E. Schwerin gvidis vortludojn; K. Schwerin deklamis poemon; kaj fine ni kantis komune. 20/8 P. E. Schwerin montris lum-bildojn pri Britujo kun prelego. 27/8 Okazis afer-kunveno en la hejmo de Ruth Carruthers. 3/9 Ni ĝuis societan vesperon en la hejmo de Edna Giles. Magistratano Frank Preacher montris lum-bildojn, kun

komentario anglalingve, pri sia plej lasta vizito eksterlanden.

Nia 3a stud-periodo komenciĝos en la Vespera Lernejo 10/9 kun 3 kursoj, elementa, progresaj, kaj drama.

Dum la pasintaj 4 semajnoj redaktoroj de 4 nord-urbaj ĵurnaloj presigis 9 artikolojn pri nia kluba agado.—Marjorie Duncan.

MYLESTOM: Ĉe la elirejo de la Rivero Belinger kuŝas tiu vilaĝo, sed "kuŝante", ĝi ne dormas. Tie freŝdate leviĝis la verda stelo. De Julio klaseto kunvenis sub gvido de Grace Kirkwood, kiu tie loĝas. Kvin entuziasmaj dommastrinoj studas kaj konvinke parolas al ĉiuj gekonatoj. La edziniĝintaj filinoj de du el ili, loĝante for, aĉetis librojn kaj ankaŭ lernas. La ofte aŭdata demando inter ĉiuj estas: "Kial do la gimnazioj ne instruas Esperanton?" La gvidantino ankoraŭ serĉas respondon, kiu taŭge klarigus la malracian antipation de influj akademiuloj.

Esperanto-Federacio de Viktorio

Ĉiuj kluboj Melbourne, Boronia, Orientaj Antaŭurboj, Orrong kaj Morwell estas nun grupaj membroj, kaj la Federacio havas 55 individuajn membrojn.

La 2-a aranĝo estis vizito al la Melbourne Art-Muzeo je 26-a de Sept. Dek naŭ membroj kaj amikoj, sub la gvido de S-ro Alfred Calkoen, profesia artisto, esploris kaj studis la fakon de "moderna arto".

Financial Statement of the A.E.A. Book Service

Year ended 30/6/1970

Receipts	
Balance, 30/6/1970	\$1171.77
Credit Sales	867.25
Branch Sales	591.47
Melbourne & H.Q. Sales	285.81
Bank Interest	40.32
	<hr/>
	\$2956.62
Payments	
Purchases	\$1291.45
Postage	72.59
Bank Charges	8.35
Insurance	10.68
Printing and Stationery (including Adresaro)	121.45
Abono U.E.A.	7.50
Abono B.E.A.	2.80
Adv. (Jarlibro)	7.50
A.E.A. Donation	43.73
Sundries	1.46
Balance — 30/6/70	1389.11
	<hr/>
	\$2956.62

BONVOLU RIDETI . . .

Ce haveno, maristo plongis en maron kaj savis la vivon al knabeto. La patrino tiam diris al la savinto: "Ĉu vi estas la viro, kiu prenis mian fileton el la maro?" La maristo salutis, dirante: "Jes, sinjorino". Si tuj krietis: "Do kie estas lia ĉapo!"

Afero simila okazis lastatempe en Melburno. Dommaŝtro jam antaŭe fuŝe kaj kontraŭleĝe enfiksis elektran draton interne de lignaĵo ĉefenestra. Iu metiisto, fiksanĉe per borilo kontraŭsunan ŝirmilon, ricevis fortan elektran ŝokon. Ĝi jetegis lin preskaŭ ĝis la kontraŭa muro. Kiam li penis stariĝi, la dommaŝtrino tim-kriis: "Ho, min tre esperas, ke la ŝaltiloj ne eksplodis!"

Ni danku Dion pro la stultuloj. Sen ili, la ceteraj — vi kaj mi — neniel sukcesus. — M. Twain.

Mi ricevas mian korpekzercon per tio, ke mi portadas la ĉerkojn de homoj, kiu fizike sin ekzercis". — C. Depew.

Adam kaj Eva havis multajn avantaĝojn, inter ili la ĉefa: ili ne devis suferi dentopuŝadon. — Twain.

En bonsocieta teatro laŭta sono ekaŭdiĝis ĉe la belveluraj foteloj (brakseĝoj). Segmontristinoj kuregis por esplori la aferon. Ili trovis pardonpetantan sinjoron, kiu estis klariganta la perturbon al siaj indignaj kunuloj: li prenis kun si vekhorloĝon, por ke ĝi avertu lin pri tre grava intervjuo. Li nepre devis estis konscia pri tempopaso!

Pri uzo de la vorto "amo" oni devas esti tre zorga: en iuj kuntekstoj ĝi havas seksecan signifon. — Raporto en "News of the World". Notu ankaŭ pri la simile atentinda: "intercourse".

Vetperisto estas poŝoŝtelisto, kiu permesas al vi uzi viajn proprajn manojn.

Vulpo kaptis kaj manĝis vagintan kokinon. Patrino prenis la okazon por instrui moralan lecionon: "Vi do vidas, Rozo, ke se tiu kokino estus saĝa kaj obeema, ĝi ne estus forvaginta kaj manĝita de la vulpo". La infano meditis momenton:—"Kaj se ĝi estus saĝa kaj obeema, NI certe estus fine ĝin manĝintaj, ĉu ne, Patrino?"

Kuracisto: Via edzo bezonas ripozon, multon da ĝi. Jen preskribo pri kelko da dormigaj piloloj.

Edzino: Bone. Kiom kaj kiel ofte li glutu ilin?

Kuracisto: Sinjorino, ni komprenu nin. Guste VI estas la homo, kiu devas ilin engluti.

Mi tiel flame malamas la vivisekciadon, ke mi rigardas kun ia modera plaĉosento vivisekciadon de vivisekciisto. — M. Twain.

A.E.A. serĉas novan Libro-Servanton

Dum la pasintaj 3 jaroj S-ino Ivy Fallu sperte gvidis nian Libro-Servon. Sed en kelkaj semajnoj ŝi deziras vojaĝi al Eŭropo; ni do bezonas novan ĉefperanton, prefera el Viktorio, kies centra pozicio ŝparas afrankon por pakajcio kaj garantias rapidan liveron.

Membroj pretaj plenumi tiun gravan postenon por nia Asocio bonvole skribu al:

The Vice-Secretary
Australian Esperanto Association
Box 2122 T., G.P.O.
Melbourne 3001

"The Australian Esperantist" needs a new Despatch Officer

Since 1956 Miss V. Cox faithfully despatched our paper to all our members. Now after 14 years of faithful service she has asked to be relieved from this position.

We are looking for an enthusiastic member, preferably in Melbourne, (where our paper is printed), who is willing to continue this important work for our paper. The candidate does NOT need to be an expert Esperantist.

Please contact as soon as possible

The Vice-Secretary,
Australian Esperanto Association
Box 2122 T., G.P.O.
Melbourne 3001.

KOINCIDOJ

Aĝo de Zamenhof en 1887 — 28
Esperantaj literoj — 28
Literoj en titolo de la Unua Libro — 28
Bazaj elementoj de Gramatiko — 28
Sufiksoj en Fundamento — 28
Korelativoj, 5 komencaĵoj, 9 finajoj — 14
Gramatikaj finajoj — 7
Prefiksoj en Fundamento — 7
Tempoj kaj participoj — 7
7 do estas Esperanta magia cifero.—
Adolf Holzhaus.

ACROSS THE CENTURIES

Memory's Long Span.

In his "Unprivileged", Jeremy Seabrook writes: "There sits old Sam Wykes, aged 90, and as he talks of his earliest memories he creates a world of people born nearly two centuries ago".

This could be so. Let us calculate the possibilities:—

The year 1959, Sam, then aged 90, was born in 1869, when James, his father, was 30, having been born in 1839.

Sam's grandfather, William, sired James at 40 years of age, he having been born in 1799.

This grandfather from tender years and onwards, would recall memories of worthies born back in at least the middle decades of the 18th century — memories which Sam, when, say, eight years old in 1877, could have heard from the lips of his grandfather then 78 years old.

ALFABETO. P. 15, Aprilo 1970.

Jen ĉiu litero: Bona hina ĝardenisto ŝatas kulturi pizojn aŭ ĉian vegetaĵon krom florantaj hiacintoj.

Verŝajne estus al mezaĝa ĉeĥoslovaka historiisto treege malfacile deklami laŭte britajn poeziaĵojn. — A. Holzhaus.

The Latrobe Valley Esperantist: monthly newsletter of the Esperanto Societo de Morwell. 7 pages; annual sub. 50c.

POEMA PROBLEMO

The boast of heraldry, the pomp of pow'r.
And all that beauty, all that wealth e'er gave,
Await(s) alike the inevitable hour.
The paths of glory lead but to the grave.
—Strofo 9, "Elegy written in a country churchyard". Gray.

Eminentaj literatoroj ankoraŭ disputas pri tio, ĉu Gray efektive volis skribi la verbon "await" aŭ awaits?
Alivorte: kio estas la subjekto kaj kio la objekto?

Jen estas tri tradukoj :—
La fanfaron' blazona, pomp' de l'forto,
kaj ĉia dono de l'bec' kaj or'
atendas horon la neeviteblan:
kondukas nur al tomb' la voj' de l'glor'.
—A. L. Curry, "Eklezia Revuo", Marton, 1922.

Blazenoj de l'altrango, kaj la pompo de la povo,

TRANS LA JARCENTOJ

Fruegaj Rememoroj

En sia verko "Homoj Sen Privilegioj" J. Seabrook skribis: "Tie sidis la 90-jaraĝa Sam Wykes (ŭajkz). Dum li parolas pri siaj plej fruaj rememoroj li kreas mondon da homoj naskitaj antaŭ preskaŭ du jarcentoj".

Tio povis esti. Ni kalkulu pri la ebloj: La jaro: 1959. Sam, tiam 90-jara, naskiĝis do en 1869, kiam lia patro, Jakobo, estis 30-jaraĝa, naskiĝinte en 1839.

La avo de Sam, nome Wilhelmo, naskitan en 1799, generis Jakobon en sia 40-a aĝjaro.

Tiu avo Wilhelmo, jam de frua vivtempo kaj pluen, povis rememori pri maljunuloj naskitaj en almenaŭ la mezaj jardekoj de la 18-a jarcento. Tiujn rememorojn Sam povis aŭdi de la avaj lipoj, kiam li (Sam) estis — ni diru — okjara en 1877, kaj lia avo 78-jaraĝa.

"James" kaj "Jacob"

La nomo James estas identa kun Jacob. Por ambaŭ nomoj ekzistas en E-o nur unu — Jakobo. La evangelio de "James" estas titolita "Jakobo" en la E-a N.T. Por eviti konfuzon inter la Anglaj nomoj James kaj Jacob, tradukantoj el la Angla sekve devas indiki la identecon per piednoto.

La gajnoj per la belo, per la riĉo kaj plombo —
Egale ili venas al neevitebla trovo:
La vojo al la gloro nur kondukas al la tombo.
—Brendon Clark: "Kien la Poezio?" 1957

La tuta gajn' de belo kaj de oro,
fier' blazona kaj potencopompo,
fatale drivas al la nepra horo.
La gloruvoj' kondukas nur al tombo.

—Wm. Auld: "Angla Antologio", 1957.
Tra tuta sia tradukaĵo Curry ne estis fidela al la originalo en tio, ke li klopodis rimigi nur la duan kaj la kvaran versojn en ĉiu strofo. Gray rimigis 1-3, 2-4. Krome la tradukinto ofte "adasmusis". Adasmuso = rimado per la samaj gramatikaj elementoj (ar-ar; il-il; ec-ec; aj-aj; ul-ul; ej-ej).

Lia provo estis frutempa, poezie pionira. Sub influo de Kalocsay kaj aliaj versmajstroj la pli lingve sentemaj poetoj jam de longe ĉiam pli kaj pli sukcesis eviti adasmuson per uzo de parenclimaj kaj aliaj rim-artifikoj. Auld tiel uzas per.: po-bo en sia provo.

HOBIOJ - - - TRADUKADO

Ekzistas hobiaj kaj hobiaj — amuzaj okupoj povas esti daŭraj, dumjaraj, aŭ nur provizoraj por pasigi tempeton ĉe manĝotablo aŭ en trajno. Ekzemplo de la unua estas la filatelio, birdscienco, artkolektado; de la dua — krucvortenigmoj.

Daŭran hobion Kalocsay nomis "amata ĉevaleto", nome ŝatokupo. La provizora estas nur pordistra, efemere amuza.

Ekzistas speco de ludamuzo, kiu povas fariĝi okupo al kiu ni ofte nin dediĉas:—Traduki E-an anekdoton en E-versaĵon kaj poste en Anglan versaĵon. Aŭ inverse: traduki Anglan anekdoton en Anglan versaĵon, poste en E-an versaĵon. Tio estas ekzerco intelekta kaj lingve kultura.

Ĉe la pli simpla formo de krucvortenigoj vi havas aferon kun **sinonimoj**; ĉe la versa tradukado aŭ parafrizado vi devas okupiĝi kun **ritmo** kaj **rimo**. En ambaŭ okazoj vi progresas en la scio pri la du lingvoj — la Angla kaj E-o.

Ĉiu E-isto progresinta, aŭ fervore aspiranta al progreso, povas fari tiun plezuratan taskon per streĉo de la volo kaj la menso. Facileco venas kun pacienca provado.

En la sekvanta ekzemplo mi tradukis E-ajon en E-versaĵon; poste en Anglan versaĵon. Oni kompreneble povas variigi la sekvecon de la lingvoj.

MULTEKOSTA MALGENTILECO.

Fama kuracisto estis kuracinta malgrandan knabon dum malsano danĝera. La dankema patrino iris al la savinto de sia filo — "Mia Dio", ŝi diris, "ekzistas servoj, kiujn oni ne povas pagi; mi ne scias, kiel danki vin pro la kuracado . . . mi pensis, ke vi akceptos tiun ĉi monujon, kiun mi brodis propramane".

"Sinjorino", respondis iomete malafable la kuracisto, "la medicina scienco ne estas afero de sentoj, kaj niaj flegoj devas esti pagataj per mono. Donacetoj subtenas la amikecon, sed ili ne subtenas niajn domojn".

"Sed, sinjoro doktoro", diris la sinjorino konsternite kaj ofendite, "parolu kaj fiksitu monon!"

"Sinjorino, tio estas du mil frankoj".

La sinjorino malfermis la monujon, elprenis kvin bankbiletojn po mil frankoj, donis du el ili al la kuracisto, remetis la tri ceterajn en la monujon, malvarme salutis kaj foriris.

El febro danĝera saviĝis knabeto pro flego de fama doktoro.

Al tiu vizitis patrino la lia, kun ĝojo kaj danko en koro.

Ŝi diris: "Ekzistas ja servoj bonfaraj neniel merite pageblaj!

Jam vane mi serĉis pri pagmanieroj — ili restas ja neimageblaj.

Monujon brodajan vi jene alvidas: mi faris per mano kaj arto.

Bonvolu akcepti, sed vere ĝi estas de l'pago nur eteta parto".

"Ho ne, sinjorino", respondis li seke, kun brov' faltiĝanta, severa.

Al sentimentalulo tutmankas valoro — jen fakto al vi certe klara.

Kuraco doktora pagiĝas per oro, arĝento, kaj ne per belbeloj.

Objektoj artajaj ja servas amikojn; vivadas sen mon' nur anĝeloj".

Ruĝiĝis ŝi kaj aktratone diris: "Volu mem la monosumon nomu!"

Respondis li: "Ĝin faros mi: du miloj ja da frankoj, jen la pagkio".

Biletojn kvin, valorajn po mil frankoj, ŝi tiris el monujo sia,

El ili duon ŝi aljetis, ĝis tuŝatingo de la mano lia.

Ceterajn tri remetis ŝi, stariĝis, kaj kun malestimo evidenta

Elvoĉis: "Fina Vid'", al pordo turnis sin kaj pasis for silenta.

COSTLY CHURLISHNESS

A doctor, famous in his day, once cured a little boy.

His mother went to give him thanks and show her heartfelt joy.

"There are", she said, "great services for which one cannot pay;

To recompense you fittingly I've searched in vain a way.

At least accept from me, dear sir, this purse handmade by me

As but a partial payment of your professional fee".

"But hold, madame", terse answered he, with sternly wrinkled brow,

"Our payment's not in sentiment; this you must surely know.

Our care is paid in chinking cash, and not in gifts of kind;

Such trifles are for friendships: money's needed, bear in mind".

"Then, doctor", murmured she at this, "be pleased to name your fee".

"Two thousand francs", the doctor said, "is payable to me".

—The purse she opened and drew forth five bills a thousand each,

And two of them tossed on the desk within the doctor's reach.

The other three in purse replaced; then stately rose to breathe

A cold farewell, with scornful gaze, and silent took her leave.

—F. R. B.

SKRIBERARO PRI KLERIKO

("Clerical Error")

En Londona strateto flavviziĝa viro sidis ĉe benko en mucida butiketo. Sinjoro eniris kaj demandis: Ĉu li estas la butikposedanto? Ricevinte jeson, li diris: "Mi estas Kolonelo Ingalls".

Respondis la butikĉefo: "Tiu nomo por min ne havas signifon, mi devas diri".

La kolonelo prezentis folion: "Eble tio vigligos vian memoron".

"Ho, fakturo. Mi havas negocojn kun multe da homoj, kiujn mi neniam vidas vizaĝ-vizaĝe . . . Ha jes, fakturo al Pastro Godfrey Ingalls, de la preĝejo Skta. Johano . . . vere!"

La kolonelo tiam diris: "Pastro Godfrey Ingalls estas mia frato. La fakturo ne estas valida koncerne lin. Li certe ne mendus, ricevus, aŭ legus librojn de tia speco. Inter liaj postlasitaĵoj ne troviĝis tiaj verkoj".

La libristo tuis embarasate. "Mi do kontrolu la aferon. La 15-an de la lasta Majo mi sendis la librojn. Supozinde, ke ili alvenis vian fraton. Kion li faris kun ili poste, jen afero ne koncerna por mi. Tiam literaturon oni ordinare tenas sub ŝloslo, por privata legado. En la daŭro de ok monatoj mi sendadis fakturon, sed ne ricevis pagon. Kompreneble, mi ne sciis, ke tiu kliento mortis."

"Vi kanajlo!" kriis la kolonelo: "Ĉu vere vi asertas, ke mia frato aĉetis de vi tiajn fi-librojn!"

"Estimata sinjoro, mi sendis la librojn kaj rajtas al plena pago. Mi estas malriĉa — la konto staradis nepagita dum longa tempo, sed mi ne procesis jure kontraŭ la kliento, tial ĉar mi deziras eviti malagrablaĵojn, kiun tiu faro rezultigus".

Kolere sputis la kolonelo: "Montru al mi la originalan mendfolion de mia frato".

"Ho, sinjoro, tio estas de vi tute maljusta. Estus por mi malprudente, teni tian folion en mia aktujo. Sed mi havas inkpaperan kopion, laueĝe validan".

Je tio spiregis la kolonelo: "Vi friponaĉo! Mi vin batos ĝisplanken!" Li paŝegis al la timigata libristo, kiu ektenis telefonon kaj vokis iston: "Sendu policanon tuj al . . ." Li sin turnis al la kolonelo: "Nu, sinjoro, ĉu vi sendu al mi ĉekon kaj ni ne plu parolu la

aferon — aŭ ĉu ni atendu policanon?"

"Ni atendu policanon! Vi ekspluatas ĝenan ruzon. Kiam vi legas gazete pri morto de pastro, vi sendas al la testamentaj administrantoj fakturon pri tiuj viaj fie pornografiaj libroj. Parencoj kaj amikoj de mortintaj pastroj forte maldezirus, ke tiaj aferoj farigos konataj. Tion vi tre bone konas. Ili ordinare pagas — kaj silentas. Sed ĉi-tiu-foje vi faris egan paŝon. Mia mortinta frato ne mendis librojn de vi; li ne tenis ilin aŭ private ilin legis. LI ESTIS BLINDA HOMO JAM DUM DEK-KVIN JAROJ — tio ne estis menciita en lia nekrologo. Kaj nun, sinjoro, la policano estas je la pordo!" — El la Angla tradukis F.R.B.

RECENZOJ

"Biblia Revuo", provizore 3-monata. 6 U.S. dol. En n-ro 5 (Nov-Dec. 1969) George Rust aperigis 18-paĝan artikolon: Historio pri la E-a Biblio. En la Jan-Marta (n-ro 1) li provizas suplementon por granda korespondajo de 1908 ĝis 1926, en kiu jaro aperis la tuta Biblio. Lerte kompliata, la du artikoloj konsistigas la plej detalan informofonton pri la temo. Frape impresas vortbildoj pri la treege komplika tasko, kiun finfine plenumis la sin-oferaĵo reviziantoj.

Interesas E-ajn legamulojn supozo, ke la pseŭdonimo "Arish ben Guni" estas eble anagramo de "Ŭaringhien" ("Libro de Amo", p. 15; "Nica Lit. Revuo", 5/60, p. 194).

Aŭtentikeco de la Betlehema Groto (Bagatti), traduko de kelkaj Psalmoj (Broadribb) kaj multe da notoj-mencioj sekvas la ĉefan kontribuon. La red., Prof-o D. Broadribb, estas en Europo ĝis la mezo de 1971. Adresu do al Redaktoro "Biblia Revuo", Piazza Duomo 4, 48100 Ravenna, Italy.

"Norda Prismo", n-ro 2, 1970. Kvaronjara. 45 steloj. Speciala Dana n-ro 84-paĝa, pli komerca, landpriskriba, ol pure literatura. Ĝi tamen pritraktas interalie la plastikan arton, Danajn Nobel-premiitojn kaj la miniaturan ŝtaton, kiun manfabrikis Jutlanda ĉarpentisto dum pluraj jardekoj.

Sur. p. 150 estas kvardek entreprenoj menciitaj en la teksto.

Abunde ilustrita kaj lingve altkvalita, la numero belefike prezentas la vivon de admirinda popolo apenaŭ 5-miliona, sur tero proksimume egalanta sesonon de la ŝtato Viktorio.

PLENA ILUSTRITA VORTARO

Eldonis ĝin S.A.T. (Parizo); perantas Volo Guelting. Ĝi estas jam havebla. 1300 paĝoj; peza 3 funtojn. Prezo 26.10. Recenzo aperos.

DISKO REKOMENDINDA

Ramona van Dalsem, "La Esperanta Najtingalo", kantas kvar ĉarme simplajn melodiojn, kiuj plezure nestas en la memoro: Donu al mi la Manon; La Eho; La Letero; Printempo. Si mem provizis la versojn, la muzikon kaj la voĉon, kiu lasta estas altkvalita, klarprononca, nuancrica. Sia antaŭa disko: La Felico kun aliaj kantoj, vende superis en 1969, kaj ŝiaj kantoj estas dissendataj tra la mondo per pli ol ses gravaj radiejoj. Ĉi diskon akompanis Toos Schooman kaj Rene Dubois. Prezo 23st. ĉe U.E.A.

VIDU PAGON 68 — Fidu . . .

La sinteno de Zamenhof pri la rilato de E-o al la registaroj kaj "aliaj grandaj kaj influaj potencoj" estas pritraktita an lia Kongresa parolado en Washington (1910):

"La celo, por kiu ni laboras, povas esti atingita per du vojoj: aŭ per laborado de homoj privataj, t.e. de la popolaj amasoj, aŭ per dekreto de la registaroj. Plej kredible nia afero estos atingita per la vojo unua, ĉar al tia afero, kiel nia, la registaroj venas kun sia sankcio kaj helpo nur tiam, kiam ĉio estas jam tute preta."

Esence prava diro. Ni rajtas supoz, ke tiu "laborado" inkludas provojn de "privataj homoj" penetri rondojn akademian, kulturajn, komercajn, sciencajn, per tio vastigante la influferon de nia afero. Guste pro tia laboro de homoj, ofte modestaj, kelkokaze kuraĝigis al Zamenhof informoj, ke tiu aŭ alia aŭtoritata institucio jam montris intereson, favoron aŭ akcepton al Esperanto.

Tamen ankaŭ pasive oni povas efiki. Per pli impona membro-statistiko la E-movado, ĉi tie kaj tramonde, sin pli gravigus antaŭ la ankoraŭ dube-indiferenta mondo. Nur per membriĝo al la landaj asocioj kaj al la U.E.A. homoj efike, efektive elmontras sian lojalan fidon al nia afero kaj kontribuas konkretan helpon atingi "la celon, por kiu ni laboras".

PLUMERARO, p. 65

Unua kol., naudekjarajn. Legu: **naŭjaragajn**. D-ro Arnold mortis en 1842j. Povas esti, kaj espereble, ke li jam scias: kio okazas post morto. Se jes, ĉu li scias, ke troviĝas sur la tero ne nur ok- aŭ naŭjaragaj knaboj, sed ankaŭ kadukuloj naŭdekjaraj, kiuj ankoraŭ ne scias kion li scias?

P. 46, 2-a kol. 6: legu — rigardadas.

LEAVING CERTIFICATE IN ESPERANTO

Esperanto is accepted as a Leaving subject, but not as a Matriculation subject. At Morwell High School for the Matriculation class 1971 at least 30 students would take Esperanto as one of their subjects, but this will not be possible unless an application made by the Principal, Mr. I. Maddern, to the VUSEB is successful. This year, out of 120 Form V pupils, 80 elected to take Esperanto as a Leaving subject. If a number of schools offered Leaving Esperanto for 1971 there would be an excellent chance of having Esperanto approved for Matriculation as from 1972. Mr. Maddern would undertake responsibility for providing adequate teaching in the subject.

ESPERANTO: FABRIKMARKO

En "Sun-Herald", Sidnejo, 6/70, aperas reklamo de David Jones' pri bonkvalita meblaro — "Esperanto" — lignonuancoj koloraj: "Eniru la novan eraon de l'koloro kun 'Esperanto'". La nomo "Esperanto" ne estas kopirajta; kelkaj firmoj uzas ĝin.

Nur unufoje Zamenhof malpermesis uzon de la nomo — en 1908 al Couturat, kiu deziris uzi ĝin por sia propra lingvoprojekto. Zamenhof skribis: "Mi petas vin, ke vi ne uzu por via lingvo la nomon 'Esperanto'". Poste li skribis al Sebert: "Li (Couturat) ne havos la rajton malobei (timante, ke mi povas persekuti lin juĝe) . . ." (Originala Verkaro, vol. 2, 175, 179).

Tiu malpermeso ne tuŝas komercajn firmojn. Estas plaĉe, vidi ilin uzantaj la nomon por la propraj varoj.

STATE REPORTS

To get out the paper under current month-date we need all copy in by the 5th of that month. If sent in later, it may be held over till the next issue. Thanks for cooperation.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 90 (170)

MELBURNO

Novembro, 1970

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

2nd October 1970

New Individual Members

McClintock, Mr. W. G., Manly, N.S.W.

Henderson, Mr. C. E., Brisbane, Qld.

Baxter, Mr. R. W., Manly, N.S.W.

Laird, Mr. C., East Sale, Vic.

Taylor, Mr. R. K., Canberra, A.C.T.

Vic., Surrey Hills: Mr. A. C.
Heathfield.

Vic., Wattle Park: Mr. A. C. Heathfield.
—C. C. Goldsmith, Secretary.

A.E.A. Ekzamenoj

Elementa: Victor C. Clarke, Margate
Beach, Q.; F-ino Lily Jullie, N. Sydney
(kun honoro).

Publicity Fund

Previously acknowledged	\$730.52
Sennomulo, N.S.W.	0.50
Addis, Miss W., S.A.	2.00
C. C. G., N.S.W.	1.00
Townsey, Mr. A., N.S.W.	2.00
Jullie, Miss L., N.S.W.	2.00
Orrong Group, Vic.	2.00
Cardale, Miss F., N.S.W.	1.00
Rockhampton Esp. Soc., Qld	10.00

\$751.02

Sincere thanks to all helpers.

Interstate Competition Positions on 2nd October, 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	579	445.4
Victoria	300	1004	334.6
N.S.W. -/- A.C.T.	260	716	275.4
W. Australia	80	199	248.7
S. Australia	40	47	117.5
Tasmania	30	32	106.6

New Local Representatives

N.S.W. Crow's Nest: Mr. E. W.

Chandler.

Vic., Box Hill: Mr. A. C. Heathfield.

Vic., Monash Univ.: Mr. T. Pisz.

Vic., Oakleigh East: Mr. R. Reed.

Vic., Oakleigh South: Mr. F. J. Fallu

NOW IS THE HOUR

not to say "Goodbye", but to seize an opportunity. We are drawing near to the end of the year, and I believe that for our Association it will have been a good one. I should like 1971 to be a still better one. Don't be afraid that I am going to appeal for donations; I want merely to ask for a little help from all who are in the position to give this.

The matter is simple, but important. Our membership has grown, but I am sure that there are a large number of Esperantists in Australia who are not yet members. If a fair proportion would join as individual members we should be able to retain our 'Australian Esperantist' as a monthly journal, and possibly increase the number of pages from time to time, despite increasing costs. The cost of printing has very much increased, and today there are increased postal charges with which we have to contend.

I appeal to you to try and enrol some of these unattached Esperantists. I want to see our A.E.A. with at least five hundred individual members, which would put it on a reasonably firm financial basis, and, I hope, make appeals for donations unnecessary. If you

would like some enrolment forms to facilitate your recruiting action, please state how many and we will send them. Those enrolling now for 1971 will receive also the last issues of 1970 without extra cost.

The coming year may be my last as secretary, and I should like to see 500 BEFORE THE NEXT CONGRESS—Tiny Goldsmith, 1st. Oct. 1970.

A.E.A. serĉas novan Libro-Servanton

Dum la pasintaj 3 jaroj S-ino Ivy Fallu sperte gvidis nian Libro-servon. Sed en kelkaj semajnoj ŝi deziras vojaĝi al Eŭropo; ni do bezonas novan ĉefperanton, preferere el Viktorio, kies centra pozicio ŝparas afrankon por pakajoj kaj garantias rapidan liveron.

Membroj pretaj plenumi tiun gravan postenon por nia Asocio bonvole skribu al:

The Vice-Secretary
Australian Esperanto Association
Box 2122 T., G.P.O.
Melbourne 3001

Dictionnaire — Complet Français-Esperanto: E. Grosjean-Maupin. 656 paĝoj. En bona stato. Unu dol. — Redaktoro.

POEMA PROBLEMO: p. 73

Cu povas ekzisti dubo pri tio: kiu estas la subjekto kaj kiu estas la objekto? "Atendas" (= faras la agon) ne nur la "boast" kaj la "pomp", sed akompanas ilin "all that beauty" kaj "all that wealth e'er gave", do la subjekto, kiu atendas, estas sendube plurala, kaj en la angla lingvo ĝi bezonas la pluralan verbon "await". La objekto, kompreneble, estas "hour", ĉar ĝi respondas al la demando: Kion ĝi atendas?—Ken Linton.

Jes, amiko, ekzistas dubo, kaj eĉ priprava fido egala al via. G. H. Vallins: "The Best English": "La subjekto estas: 'th' inevitable hour': la plurelementa objekto, kiu konsistigas la unuajn du versojn, antaŭiras la singularan verbon (awaits) . . . En kelkaj tekstoj la verbo estas 'await', pro supozo ke la frazo estas formita laŭ la norma prozordo: subjekto, verbo, objekto. Tiel staras la strofo sur memorŝtono al Gray ĉe Stoke Poges". Tamen en sia lasta eldono (1768) Gray skribis: awaits Sekve oni rajtas supozoj, ke tiel li definitive dirvolvis.

AUSTRALIA KRONIKO

PERTH: Nia Sekretario, S-ro W. Howard, havis akcidenton. Li laboris hejme super kesteto por teni verdajn varb-kartojn. La rabotilo per kiu li ĉarpentis subite misdirektiĝis kaj grave vundis 2 fingrojn de la maldekstra mano.

Nia kunveno 9/9 konsistis el vort-ludoj. S-ro Jack Hawks, la gvidanto "intervjuis" ĉiun ĉeestanton pri "la plej preferata sporto".

S-ino E. Palmer 23/9, gvidis la vesperon, kiu konsistis el legado de teatraĵoj.

MELBOURNE: S-ro F. R. Banham 5/10 prezentis 2 rakontojn: "La Ombrello" de Guy de Maupassant kaj moralan demandon bazitan sur "Scio estas forto" el la libro "Mirinda Elik-siro", de J. H. Rosbach. S-ro A. Baldwin 12/10 parolis pri "Enigmoj". Nur aludinte al la plej granda, tiu pri la vivo mem, li skize pritraktis multajn aliajn el kiuj konsistas la vivo de negocistoj, sciencistoj ktp. kaj fine cerbumigis la ĉeestantojn per aliaj malpli gravaj kaj iom pli simplaj.

"Mi estis soldato" estis la temo de interesa prelego de S-ro Harold Beechey je 19/10. Ĉefe li rakontis pri siaj spertoj okaze de la invado de Francujo je "D"-tago kaj la posta liberigo de Eŭropo. S-ro Herbert Koppel 26/10 festis sian 35-jaran Esperantigon. Li rakontis kiamaniere li fariĝis Esperantisto en Oktobro 1935 en Vieno. Li poste regalis la ĉeestantojn per vespermanĝeto.

MELBOURNE: Eastern Suburbs: Ĉe sukcesa ekspozicio de E-Libroj en Septembro en la Centra Biblioteko de Moorabbin, proks. 200 verdaj kartoj estis prenitaj de la vizitintoj. Tio finis nian kampanjon en antaŭurbaj bibliotekoj por 1970.

S-ino Valda King de la Melbourn E-Societo prelegis 30/9 pri transitivaj kaj netransitivaj verboj. Tre fidela membro, Mario Lupieri, revenis de feria vojaĝo al Italujo kaj denove partoprenas en niaj klasoj.

Nia societo donacis E-librojn al la biblioteko de Oakleigh kiel rekompenco por senkosta dispono de bela halo por niaj kunvenoj.

MORWELL: Nia societo prezentis la libron "Zamenhof, Creator of Esperanto" al la Publika Biblioteko kiel dankes-primio por dispono de ĉambro por nia ekspozicio. Ekzempleron de la sama libro ni donacis al la 1500-a vizitanto al la ekspozicio, kiu estis lernantino de

nia Altlernejo, Vanda Baccega.

Ce nia kunveno 29/9 ni tradukis mallongajn skeĉojn kaj poste registris ilin per magnetofono. 30 membroj kaj amikoj partoprenis 9/10 Mang-Dancan Vesperon en la Morwell-Motel.

Nia Junula Grupo fondiĝis en Junio kaj kunvenas ĉiun duan semajnon. Niaj junaj membroj vaste korespondas kun samaĝuloj en fremdaj landoj.

MANLY: Klub-kunvenoj kun meznombre 15 partoprenantoj okazis ĉiujoude en la Vespera Lernejo, Darley Road, je 8.15 post la kursoj: 10/9 kaj 22/10 La Anoj Parolas; 17/9 Vizitanto Wre Chandler prelegis pri Pingvenoj, kaj aŭdigis son-bendon pri ilia parolmaniero; 24/9 kaj 29/10 Lily Jullie gvidis ludojn; 1/10 kaj 15/10 S-ro P. E. Scherwin prelegis kun lum-bildoj pri a) Finnlando, b) Danujo kaj Norvegujo; 8/10 Distraj (Rakontoj, Poemoj, Kantoj).

Renkontiĝis 25 anoj kaj vizitantoj sabaton 26/9 en la hejmo de Ges-roj Les Scott por ĝui societan vesperon (angla-lingve). Edna Giles parolis pri sia vojaĝo al Japanujo, kie ŝi multe ĝuis kontaktojn kun Esperantistoj; Robbie Robertson montris lum-bildojn pri sia plej lasta mond-vojaĝo; George Thatcher aŭdigis son-bendon pri intervjuo inter Tiny Goldsmith kaj Roger Bush (Radio 2GB); kaj fine Les Scott montris kolor-diapozitivojn pri la surluniĝo de la astronautoj en Apollo II. Sekvis festeneta manĝo.

En 4 ĵurnaloj presitaj en la nordaj distriktoj de Sidnejo aperis entute 14 artikoloj pri nia lastatempa agado.—Marjorie Duncan.

BRISBANE: Ĉar lastatempe eksiĝis kelkaj komitatanoj okazis kunveno je 22-a de Oktobro por kompletigi la komitaton. Prezidis S-ro Karl Guenster. Elektiĝis la jenaj: Vic-Prezidantoj: Tom Donnelly kaj Mal Robinson; Sekretario: S-ino Nell Callaghan; Vic-Sekr: Catherine Sullivan kaj Joan Eldridge, Kasisto: Beverley Allet; Libro-Peranto: Hans Brendel. La ĉeestantoj dankis al S-ino Win Greenhalgh, kiu ĝis nun plenumis la postenon de bibliotekistino kaj libro-perantino, sed devis rezigni ĉar ŝi vojaĝas eksterlande en 1971. La ĝisnuna kasistino S-ino Violet Yowe rezignis pro Esperanto-laboro ĉe la Junul-Gastejo.

REDCLIFFE: La vizito de S-ro Goldsmith al la Grupo (6/10) estis la plej signifa okazo. Ĉirkaŭ 20 anoj kaj amikoj ĉeestis la hejmon de Ges-roj Memmott por lin bonvenigi, kaj laŭkutime ni inspiriĝis per li. Plaĉas al ni havi ankaŭ S-inon Shardlow, kiu multmonate

forestis por malsano. Multaj anoj jam estis renkontintaj Tajnon ĉe la pikniko je Bribie en la 4-a. Ges-roj Clarke rapidis hejmen de siaj ferioj por ĉeesti tiujn okazojn. Ili jam antaŭe vizitis S-ron Jon Moore de la E-grupo en Rockhampton. Li sendis sian bondeziran saluton al la Grupo en Redcliffe.

Gerda Kunze, la fratino de "Ziggy", hejmeniris al Germanujo post libertempo kun Ziggy en Kvinlando. La Grupo ĝuis ŝian ĉeeston dum la lastaj kelkaj monatoj. Nun mankas al ni ŝia feliĉa rideto.

S-ro Ray Bond jam vojaĝas eksterlande. Ni esperas, ke li povos uzi Esperanton.

Ni bedaŭras, ke S-ino Seccombe tre malsanas. Rapidan resaniĝon al ŝi!

TOOWOOMBA: Ĉirkaŭ 12 entuziasmuloj ĉeestas niajn ĉiumardajn klasojn ĉe la Toowoomba "Adult Education Centre"; ni diskutis la eblecon formi oficialan grupon. Nia loka gazetaro regule kaj tre volonte aperigas presperantajn artikolojn ensenditajn de mi, kaj la estro de la "Centro" estas tre helpema. Ni do atendas, ke en la nova jaro ni vidos grandan influon de komentantoj.

Unu el miaj studentoj, instruistino de la franca lingvo ĉe nia altlernejo, ĵus kompletigis porinfanan kurson en tiu lernejo.—H. V. Petley.

TIBOR SEKELJ VIZITOS AŬSTRALION

Unu el la plej eminentaj Esperantistoj en la mondo, S-ro Tibor Sekelj de Belgrado, alvenos en Sidnejo je 7-a de Decembro kaj restos en Aŭstralio ĝis la 6-a de Jan. 1971, kiam li forflugos al Nov-Zelando por partopreni la N.Z. E-Kongreson en Auckland. S-ro Sekelj estas bonekonata mondvojaĝanto kaj aŭtoro de multaj vojaĝlibroj. En Esperantujo li estas konata pro siaj libroj "Tempesto super Akonkagvo" kaj "Nepalo malfermas la pordon".

S-ro Sekelj estas preta prelegi en lokaj grupoj kondiĉe ke tiuj pagos la vojaĝkostojn de Sidnejo. Li proponas le jenajn temojn: 1-e "Novaj tendencoj en la E-Movado.", 2-e "Vivo kun kanibala tribo en Amazonio" (kun lumbildoj); 3-e "De Istanbulo al Pekino" (kun lumbildoj). Ĉar S-ro Sekelj regas perfekte la anglan lingvon, li estas ankaŭ preta paroli antaŭ neesperantistoj pri la samaj temoj kaj krome pri la temo "Kiel mi akiris kvin milionojn da amikoj".

Se vi deziras organizi viziton de S-ro Sekelj nepre kontaktu nian sekretarion ĉe P.O. Box 415, Manly, NSW, 2095.—Herbert Koppel.

ESPERANTO IN HONGKONG

Lee Wai Kit has an article on Esperanto in "Potential" (Hongkong Tech. College), sketching the background of Esperanto and its place in the present situation. It is expressed in somewhat quaint English, of which samples are given below literally. Their quaintness confirms the conclusion of the author as embodied in the first citation: "The assertion of no language could be accepted to be the international language came not only from political reasons, but also from the fact that they are all to some extent irregular, i.e. they cannot be grasped in a short time".

"The most highly paid employees in commerce are the men and women who can speak a translation of exactly what a person is saying, only a few seconds behind. These interpreters are really rare talents".

"A friend of mine, who is an Englishman, decided to learn Esperanto four years ago. He only learnt it by himself. After some time, he made the acquaintance of a Japanese girl, who was also learning Esperanto at the same time. They married later. They use Esperanto between themselves though they did not learn much".

"In Canada, two cars crashed. One of the driver spoke French while the other spoke English. The latter ran away after some gestures. While in court, he explained that he was only to find something to write in Esperanto so that the other may understand. The above facts shows that Esperanto is extremely easy to learn".

Quotable are: "A world language is more important for mankind at present than any conceivable advance in television or telephony" (Lewis Mumford).

"It is certainly a pleasant form of linguistic exercise to learn Esperanto, which provides a more useful pastime than playing bridge or solving crossword puzzles" (Simon Potter).

Lee Wai Kit says: A pass in Esperanto for Certificate of Secondary Education (CSE), or Royal Society of Arts (RSA) is equivalent to a GCE pass.

"In Hongkong, although not a few people still do not much know about Esperanto, some firms are using it in their business".

Every year Esperantists visit this city; they could encourage a friend who is trying to do a good job. A photo shows him and others with a Belgian Esperantist at his home: 8 Matheson St., 5 floor, Hongkong. Perhaps some of us could get round to it . . .

KAREN IS TEN

She learns Esperanto. She enjoys it. This is the approximate text of a lecture she gave at her school for an examination.

Esperanto is the international language. (It's good fun too). It isn't the language of any one country, but there are people in nearly every country who know it, and more people are learning it all the time, all over the world.

With Esperanto you can have friends in nearly any country you like. You can swap picture postcards, and stamps, as well as writing letters to each other.

I have three friends in different countries. Vladimir lives in Czechoslovakia. He is 9 years old. His father works in an insurance office and his mother is a teacher. A girl named Pascale Detwiller writes to me from France. She goes to Italy for holidays because her mother was Italian. And the week before last I got a card from a boy scout who lives in Germany and wants me to write to him. We get their addresses through the Esperanto Society.

I started to learn Esperanto about six months ago, perhaps a bit longer. We go to classes at the Adult Education rooms every Thursday night. At the classes we sing Esperanto songs, and play cards games with Esperanto words, and listen to records and tapes of people talking and singing in Esperanto in other countries. But mostly we just read Esperanto from books. The first one in the class reads a sentence in Esperanto. The next one says in English what it means, then we all say it in Esperanto; we do the same with the next sentence, till we come to the end of the story.

And that's the end of my story, so I'll just say thank you and *Cheerio* in Esperanto: MI DANKAS VIN. GIS REVIDO !

Karen received the highest marks in the class for her lecture, and the teacher was very interested in her correspondence and asked whether she was the only child in the Adult Education class (she wasn't). When he asked the class "Who would like to learn Esperanto?" nearly all put up their hands!—J. Moore, Rockhampton.)

ĈIU LETERO . . . p. 15, Marto.

Ĵaŭdon la hirurgo vizitis la juveliston kaj aĉetis poŝhorloĝon, kolĉenon, braceleton, safirojn kaj, smeraldojn. (L. Memmott).

Ho, ĉu horestro, vane ŝarginte biciklon kun muzikpakajo, ankoraŭ forgesis rajdi? (W. Greenhalgh).

POR VIA DISTRO

Junulino eniris apotekon kaj petis vidi la ĉefpersonon pri afero "privata kaj persona". Li venis. La junulino, reĝigante, prezentis leteron, flustrante: "Mia fianĉo estas kuracisto. Hodiaŭ mi ricevis leteron de li. Ĝi estas por mi nedecifrebla. Ĉu vi povus legi ĝin al mi?"

Ĉe la genuoj de mia patrino mi lernis distingi inter la bono kaj la malbono.

Ĉu vere? Trans la genuoj de mia patro mi tion lernis; kaj ordinare en tiaj okazoj li havis batilon en la mano.

TE-REĜO LIPTON

Kiam la te-reĝo Lipton estis junulo li pasigis multe da tempo en la spicbutikoj de la patro kaj li observis kordolore lian mallertan vendoteknikon. Iam li amare rigardis dum la patro provis aĉetigi kelke da ovoj al kliento. Post kiam tiu foriris, la filo diris: "Patro, bone estus se la patrino vendadus la ovojn". "Kial do?" mire demandis la patro. "Nu, la manoj de la patrino estas malpli grandaj ol viaj", klarigis li, kiu poste fariĝis milionulo.

FUMO-FELIĈO ?

"Ĉigaredo estas la perfekta tipo de perfekta plezuro. Ĝi estas ekstreme alta ĝuo, kaj lasas vin ankoraŭ nesatigita. Kio estas pli dezirinda ol tio?" — Oscar Wilde.

PLENDO PRI ATENDO

Suriparisto: ". . . kaj la ŝuoj estos pretaj, sinjoro, post tri semajnoj".

Kliento: "Sed ekster via butikoj estas avizo: 'Riparoj dum vi atendas!' 'Guste, sinjoro. Ĝi en la nuna okazo dum vi atendas — tri semajnoj'".

"Kion vi diras al via edzino, kiam vi revenas hejmon tre malfrue?"

"Mi? Nur 'Bonan vesperon'. Si diras la ceteron".

"Nur imagu! Antaŭ du tagoj mi forgesis lasis mian monujon sur benko en parko. Kiam mi reiris hodiaŭ ĝi ankoraŭ estis tie". "La monujo?" "Ne. La benko".

SOCIOLOGIO

Ĉeestis la Sepan Mondkongreson de Sociologio en Varna (Bulgarujo) 3300 personoj. Prelegis pri "Esperanto Kiel Socia kaj Lingvistika Movado" Prof-o P. G. Forster (Universitato de Hull, Britujo).

ESPERANTO EN USONO

E-o estas instruata en 3 lernejoj en San Mateo (Cal.). D-ro E. Feldman, ĉefpersono de Lernejo Lawrence (Iorrens), asertas ĝin ideala komenca nenacia lingvo por geknaboj, ĉar ĝi estas facila kaj ebligas pozitivan sintenon al lingvostudado. Li rigardas kurson porinstruistojn pri E-o en 1962 kiel la unuan "signife grandan" provon instrui E-on en Usonaj lernejoj. Ĝis nun progreso lamiris pro manko de instruistoj, sed jam trijara programo komencos plenumiĝi ĉe Lernejo Highlands (hajlanj) ĉi-aŭtune. En Julio trisemajna intensa kurso ĉe Stata Kolegio de San Francisco.

S-ino Vallon, specialisto E-a, kiu instruas ĝin en la lernejoj de San Mateo, rimarkigas, ke en Hispanlingvaj kursoj oni enkondukas la futuron nur en la dua jaro. En E-o studentoj ĝin lernas tre rapide, ĉar oni simple aldonas -os al verboj.

La supra informo estas laŭ impresa artikolo en The Christian Science Monitor, 13/6, de la Eduka Redaktoro.

Aldonaj notoj de korespondanto: Estas almenaŭ kvar lernejoj ankaŭ en la ŝtato Oregon. Ĉe grupkunveno en San Francisco alestis ne malpli ol 60 homoj, el kiaj la plimultaj bone parolis E-on. Universitato en Usono intencas ĉi-somere komenci diplomon kurson, kiu inkluzivas E-on.

Parolis optimisme Wm. Auld, kiu faris sukcesajn E-kursojn por instruistoj en Stata Kolegio, San Francisco. El 52 studentoj, 51 bone ilin kompletigis. Li ricevas fortan impreson pri E-progreso en Usono, aparte en edukaj rondoj: "Ŝajnas al mi, ke tie, kiel ankaŭ aliloke, formortadas la malnova generacio de neesperantistaj cinikuloj, kaj leviĝas nova generacio de homoj pretaj rigardi pli racie la tutan problemon de interlingva kompreniĝo kaj aliri al E-o kun mensoj nekatentitaj". (H. de E., 21/9/70).

SKIEMULOJ

La vorto "skio" devenis de la Norvega. En tiu lingvo, ankaŭ en la Sveda, K. antaŭ mola vokalo estas prononcata S. Ordinare la Angla formo = ski. Inter Esperantaj derivaĵoj: skiebla, skibastono, skivakso, akvoskiado. Notu, ke "snowshoe" = rakedo.

"AMERIKA TEO"

De kie devenis la esprimo "American Tea"? En E-a formo: "Amerika Teo" estas nekomprenebla por preskaŭ ĉiu E-isto, inkluzive Angleparolajn. Ĝi signifas vastasence: festeto ĉe kiu parto-

prenantoj donacas kaj aĉetas objektojn: ĝi ne estas temango, te-festo, te-trinkado, kvankam ĉefine oni trinkas teon, t.e.: infuzojn de teo.

Efektive "Amerika teo" signifas: Teo, herba substanco, folioj de teplanto produktata, kreskigata, en Ameriko. Stranga nomo por festeto. Ĉu vere amika kunveno povas esti "teo produktata en Ameriko"? — Grupano.

MEDITO KRISTNASKA

La jaro 1908: estas la antaŭvespero Kristfesta. Ekster la orielaj fenestroj de sinjora domo la neĝo dike kuŝas: la luno lumas sur froste ŝlimaj arboj. En la granda ĉambro estas varme, komforte. Familianoj gaje babilas pri plezuroj de la morgaŭo. "Ekaŭdu nur! Kia sono! Ho, la karolkantantoj jam venis. Iru, Carlota, portu al la kuiristino, ke ŝi poru ion dolĉan por ili. Karlo, jen moneretoj por ilin regali rekompence. Ni malvaru en ĉi-festa tempo!"

Post sia saluto per malnovmondaj kantoj la muzikantoj foriras. Ilia lanterno brilpunktete neniigas en la fora mallumo, kaj en la jam silenta domo ties anoj penas endormiĝi, por ke ili freŝe revekiĝu por bonvenigi la Grandan Tagon. Tiel spertis niaj geavoj.

Estas la jaro 1970: Monaton, aŭ tagon, antaŭ Kristnasko ni trovas nin en maĝazeno. Tra la vasta vendloko fluas sonegado de io neklare familiara. La arion oni ŝajne diske-faras, uzante trumpetegojn kaj alarm-sirenojn. Ĉu vere tio estas la karolo: Bona Reĝo Venceslas? Ververe jes. La sonadoj saltetigas la flakonetojn da valora parfumo sur la kosmetikaj bretoj kaj vibrigas la timpanojn, ŝiras la orelojn de virinoj bruste interpuŝigantaj antaŭ tablo sur kiu kuŝas amaso da mammul-diloj.

Pene personigante Sanktulon Nikolaon, lacmiena virfiguro trene paŝas. Li aspektas kvazaŭ polusa esploristo vaganta en la tropiko kaj penplene boras por si vojon tra la ŝvitanta svarmo. Dise kaj distreme trotante, kiel formikoj sur loko de jus levita ŝtono, intermikse kirliĝas blekantaj patrinoj kaj plendaj gebuboj. Estas ĝuste por ili, ke la bonvolaj komercistoj aranĝis tiun allogan prezenton de la Kristnaska spirito.

En 1908 ankoraŭ ne penetris la simplan vivon la tentakloj de la komerca polpo, la krudaĵoj de la troprofesia amuzomondo. En granda grado la homoj mem provizis por si manĝon, amuzon, gajon kaj ĝuon. En plena kompanio ili celebris la Universalan Naskotagon,

farante por si mem la proprajn plezurojn. Ili ne ŝrumpiĝis en seĝoj, rigardante tra mallumo la banalajn akrobataĵojn de pagataj amuzistoj, nek aŭskultadis al la oredetruaj kriĉoj, blekoj kaj ĝemaĉoj de mense malsanaj kantsteloj. Ankoraŭ la teknikaj mirakloj de televido kaj radio ne venis por detruji la plezurojn de intima inter-societemo.

La mondo de nia hodiaŭa tempo simple ne estas la mondo kiu finiĝis, kiam eksplodis la Unua Mondmilito. La homoj de tiu tempo konis socian stabilecon, kiu forflugis kun la unuaj kanonpafoj en Eŭropo. Sentemajn homojn premas la monda tensio, la individua sento de malcerteco kaj universala malstabilo en ĉiu senco de la vorto — politika, financa, morala, etika . . . kaj nur reiro al praktika kaj esence profunda filozofio certigos al ni la efektivan komprenon kaj benon de la Tago nomata Kristnasko.—F.R.B.

LA "ELEGIO" de T. GRAY

Jen kelkaj tradukoj de la unua strofo de unu el la plej vaste konataj poemoj en la Angla lingvo:

Tagmorton funebradas sonorilo,
serpentas tra l'herbkampo bovinar',
paŝadas lace hejmen la plugisto, —
al mi la mondon lasas en l'ombrar'.
—A. L. Curry 1922

Sonoras horo de la tagofin',
Blekante la bovaro paŝas for,
Plugisto laca hejmen trenas sin;
Lasiĝas ter' al mi kaj noktohor'.
—F-ino I. Iddon, 1927.

La tago mortis en vespera horo,
Bleketojn de bovinoj aŭdis mi,
Plugisto hejmen iris de laboro,
La mondon en krepusko lasis li.
—E. Gregory; 1947.

Tagmorton signas sonorila tristo,
de l'kampoj muĝaj brutoj lante pasas,
trenpaŝas lace hejmen la plugisto,
kaj al mi kaj al nokt' la mondon lasas.
—Wm. Auld, 1957.
(al mi kaj al la nokt' la mondon lasas,
Tio ŝajnas pli konforma al la metro, ĉu ne?)

Citoj respektive laŭ: "Eklezia Revuo", 3/1922; "British E-ist", 11/27; "Familia Rondo", n-ro 43, 1947; "Angla Antologio", 1957.

ERROR ON PAGE 71

In the Book Service Statement read: Balance, 30/6/1969. Not: 1970.

"MY ELDER BROTHER"

In 1930 a 92-years-old man attested before a Berlin court. Asked about his family, he said he had a brother, who had died in 1793. "Good God", cried the judge, "you mean 1893, don't you?" But the old man reaffirmed his word and proved it by a document.

His father, born in 1774, married when 19. His first child, a son, was born in 1793 and died after two weeks. The father remarried at 63, that is, in 1837. His second child, a son, was born in 1838. Therefore when the nonagenarian appeared before the court his "elder" brother had been dead 137 years. A record? — "La Suda Kruco", 2/32.

"MIA PLIAGA FRATO"

En 1930 naŭdekdujaraĝa viro atestis antaŭ Berlina kortumo. Demandite pri sia familio, li diris, ke li havis fraton, kiu mortis en 1793. "Bona Dio!" kriis la juĝisto: "vi volas diri: 1893, ĉu ne vere?" Tamen la maljunulo reasertis sian diron kaj pruvis ĝin dokumente.

Lia patro, naskita en 1774, edziĝis kiam 19-jara. Lia unua infano, filo, naskiĝis en 1793 kaj mortis post du monatoj. La patro reedziĝis kiam 63-jara, tio estas, en 1837. Lia dua infano, filo, naskiĝis en 1838. Tial, kiam la naŭdekjarulo staris antaŭ la kortumo, lia "pliaga" frato jam 137 jarojn estis mortinta.

PHILOLOGY AND ESPERANTO

While those philologists standing outside Esperanto continue to treat it in the abstract, theoretically, classifying it among lifeless projects, other linguists have learned and actively used it, devoting themselves constructively to those concrete lingual problems studied under the new discipline: Esperantology. Many such scholars, appreciating the values of Esperanto, have entered the Esperanto movement and worked within it, making important contributions to all that concerns the practical use of the International Language in many fields. Among them: Th. Cart, Edmond Privat, Charles Lambert, G. Waringhien, P. Bovet, E. Collinson, Wm. Solzbacher, E. Collinder, P. Neergaard, I. Lapenna, W. Manders, not to mention others in Slav and Oriental countries who merit notice here.

Philologists Jespersen, Breal, Bailly, Schuchardt, Muller, Ostwald, Meillet and others accepted in their time the principle of an international language, and their interest, either in practice or in theory, has found a place in I. L. history. ("La Suda Kruco", 6/34).

Surely the true aim of philology, its raison d'être, is not the sterile turning over of dusty speech-fossils, but the practical development and practice of a speech medium whereby the curse of tongue-diversity may be lifted? We hope that more and more workers in the field of language may study the findings of their far-seeing colleagues and collaborate in the task of striking off the shackles that hinder man's march into the future.

See: La Rondo, The Australian Esperantist, 3/62, 7/62, 5/63, 7/63, 9/63, 5/65.

RECENZOJ

PLENA ILUSTRITA VORTARO DE ESPERANTO.

Cefa aŭtoro Prof. Waringhien, Prezidanto de la Lingva Akademio. Eldonis S.A.T. Formato: 5½ x 8. 1344 paĝoj. Prezo 26 dol. 10 c. (U.S.).

Per la intensa laboro de relativa manpleno da dediĉitaj homoj, kies nomoj estas eternigitaj en la paĝoj de la kompilo mem, la E-istaro jam posedas Vortaron, kiu kapablas rivali kun la plej konataj samdimensiaj en la naciaj lingvoj. Recenzi ĝin laŭ ĝia merito, detale, analize, postulus tutan numeron de nia organeto. Nur per propra posedo, E-istoj povas ricevi impreson pri la monumenta mirindeco de la verko kaj per la Enkonduko lerni pri la giganteco de la tasko, kiun tiel tre konsciencie plenumis la elstaraj leksigrafoj.

Waringhien verkis Generalan Antaŭparolon pri la historio de la Vortaro kaj pri ĝia arango kaj konsisto: Medicina Parto: Albault; Botanika, Terkultura: Neergaard; Zoologia, Geologia: Stop-Bowitz; Teknika, Scienca: Haferkorn. Listoj de vinjetoj, signoj, simboloj kaj mallongigoj. 30 finpaĝoj dense ilustritaj.

La vorto "teni" okupas 5½ kolumnojn; -ig 5; iĝ 3; "kun" 2½; "havi" 2½ "ami", "esti", "nova" 2.

La sekvantaj notoj estas nur sugestaj, pridisutindaj: La formo "fabrikejo" mankas; Butler kaj Wells ne ignoras ĝin.

"Diveni" jam ne plu sole signifas: konjekti ĝuste; malkovri per supozoj... ĉar oni povas diveni **malĝuste**. Gis nun multaj instruis, ke oni povas kon-

jektu ĝuste aŭ malĝuste, sed ke la verbo "diveni" signifas ĉiam: prave, ĝuste konjekti. Do, forpasas utila distingo.

"Apreci" venkis la formon "aprezi" kaj signifas, ne "ŝati", sed "kompetente taksu la artan valoron de io".

Mankas mencio pri: "konatulo". Karl Minor insistis pri distingo inter "konato" kaj "konatulo". (E-Deutsch Handwoerterbuch).

Meznokto: internacia formo, tamen ne formita laŭ la reguloj E-vortfaraj. "La mezo de la nokto" = noktomezo. Komparu: meztago, tagmezo. Simile, "centjaro" kaj "jarcento" malsamas. Centjaro = a centenary year. Jarcento = a century. Necesas klara distingo en ĉiu vortaro. Jam tre frue oni sentis tiun eraron ("Lingvo Internacia", 1906, p. 188, 422).

"Edziĝo" = laŭleĝa ligo de viro kun virino; sed, strikte, iĝi edzo. Logike do oni uzus: "geedziĝo", ĉar "geedziĝi" = fariĝi geedza paro. "Edziĝo" strikte signifas: fari iun edzo, sed PIV informas, ke ĝi = geedziĝo ("edziga ceremonio"). Tamen, malgraŭ sia manko de logiko, la malpli longaj formoj estas sufiĉe klaraj kaj laŭ la principo de "minimuma peno". Tiel supozinde la homoj interparolos, kiam E-o estas jam vaste buŝuzata.

"Virgino", "en poezio tute akceptebla". Ĉu virgo (t.e. virgulo) estas "virga ulo"? "Virga" estas adjektiva radiko. Analogie do: dikino, fortino, belino? (La Rondo, 5/60).

"Sidnejo" estas nur "havenurbo" dum "Brisbano", "Adelaido", "Melburno" ricevas titolon: ĉefurbo. Ankaŭ Sidnejo estas ŝtata metropolo. Mankas "Perto" kaj "Hobarto", sed serĉantoj trovos: Perigozo, Hefej.

La Vortaron certe devus (ĉu devas?) posedi ĉiu E-biblioteko, kaj ĉiu E-isto sendolore disponanta la ne tro altan aĉetprezon. S-ino Fallu, nia Libroperanto, havas sendpretajn du ekzemplerojn.

"Biblia Revuo", n-ro 2, Apr.-Jun., 1970. 3-monata; 6 dol. Piazza Duomo 4, Ravenna 48100, Ravenna, Italy.

Donald Broadribb kaj G. van Groningen tradukis kvar prelegojn de Jakobo de Serug (451-521 p. K.), Kristana episkopo en Turka regiono. Koloras la predikojn stranga ideo, ke la tuta Biblio estas kolekto da alegorioj pri Jesuo Kristo. Jakobo vivis dum tempo, kiam la bazaj doktrinoj de la Eklezio estis formulataj, precipe tiu pri la dieco-

homeco de Jesuo Kristo. La tradukoj interesus al teologoj serĉantaj la fontojn de la Kristana religio. Simplaj pastroj, tamen, ne trovus en ili materialon taŭgan por nuntempaj preĝejoj.

Krom tradukoj de Psalmoj, Broadribb kontribuas ankaŭ: Anatolio, la ŝtedita regiono. Libroj pri la ŝteditoj (A. Hittites) estas malfacile haveblaj, sed "The Hittites" (Pelican Books) estas aĉetata. En la Biblio estas 20 mencioj pri tiu popolo. La aŭtoro pritraktas la fonton, logregionon kaj literaturon ŝteditajn, tiam ekzamenas la originon de la nomo Javeo, uzante scion pri la ŝtedita lingvo super tiu problemo.

Jahue (Broadribb) = Javeo (Waringhien) = La Eternulo (Zamenhof). Vidu: "Originala Verkaro", p. 52.

Detalaj notoj, recenzoj, novaĵoj pri la nuntempa Bibliotudado ĉerpitaj el kvar lingvoj.

U.N. CHARTER IN ESPERANTO

Together with it is the Statute of the International Court. Published by the U.E.A. in same format as the issues in the national languages — 2 7/8 x 4 1/4 in. The translators are R. Harry, Ivo Lapenna, E. Svane, experts in this field.

Presented at the Universal Esperanto Congress in Vienna, it sold rapidly, largely as a result of the speech in Esperanto by Dr. Lapenna on "The Successes and Failures of the U.N."

The work is of value also in that it will go far to normalise the terminology of Esperanto in international jurisprudence. 75c. at U.E.A. Rebate: 33% min. of three. Order now.

PRI LANTI

En la Junia n-ro aperas noto: "Pri Lanti", kun adreso de S-ro Borsboom. Ties nova adreso estas: Pr. Christinalaan 6, Bunnik (Utrecht), Holland. Verkante pri Lanti, li petas helpon. S-ro B. demandas: kiu estas K-ino Hennessy (ĉ. 1941). Kiu estas S-ro Watkin (en Wanganui), kiu tradukis en Kvakera lernejo paroladon de Lanti ĉ. 1939? S-ro B. danke ŝatus ricevi tekston de leteroj senditaj de Lanti al Aŭstralianoj.

IMPORTANT: We intend "A.E." to issue midway in each month. Copy **must reach** Mr. Koppel or me by 1st of month. Later copy may be held over. Next issue: Jan.-Feb.. Copy for this to us by Feb 1.—Editor.

The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Membership, including this periodical: \$3.

Advertisements: 25 cents per line.



Editor (Redaktoro): F. R. Banham, 31 St. Andrew's Ave., Rosanna, Vic., 3084

Treasurer (Kasisto): L. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W., 2095.

A.E.A. Press Officer: H. V. Petley, 32a Lindsay Street, Toowoomba, Q., 4350

Address of A.E.A.: Box 415, P.O. Manly, N.S.W., 2095.

N-ro 91(171)

MELBURNO

Decembro, 1970

KRISTNASKAJ VERSAJOJ

Treme stumblas jar' en tonbon,
Kun kutima ŝarĝo peka.
Larmoj mankas. Ĉiu homo
Vidas ĝin per okul' seka.

Juna jar' al mondo portu
Spertojn dolĉajn, sane belajn;
Kontraŭ nunaj malfeliĉoj
Blovojn sendu ĝi forpelajn!

Kristofesto — laŭ la moro
Ĉiu homo homon amas.
Amo brilas en la koro,
Kiam la kandeloj flamas.

Ĉu nur dum Kristfesta faro
Estu tiu bela emo?
Ĉu nur unu tag' en jaro
Tia pomp' de nobla semo?

Nobla estu hom' kaj bona,
Ĉiam emu helpan taskon!
Kiu estas amon-dona,
Festas ĉiam Kristonaskon.

Atingon viaj kordeziroj venu;
La belaj revoj ja efektiviĝu.
La bonfortuno vin tre riĉe benu;
Esperoj jam malfortaj reviviĝu!

Fine venis belvetero! Kia beno Dia!
En sunlumo sidas mi en ĝardeno mia.
Milde spiras sur vizagon dolĉa zefir'
suda;
For laboro, teda penso, ĉia zorgo truda.

Pripensante la amikojn, disajn sur la
mondo,
Firmkuraĝajn fidelulojn de l'Verdstela
Rondo,

Vokas mi: "Karuloj, ni persistu en
bonfaro;
Sano, viglo estu niaj tra l'venonta jaro!
—F.R.B.

LA FAMILIO BUTLER

D-ro George Butler, ĉefpersono de la lernejo Harrow, naskiĝis en 1774. Unu el liaj filoj, Henry Montagu Butler, naskiĝis en 1833 kaj fariĝis ĉefpersono de la Kolegio Trinity (Kembriĝo). Li mortis en 1918. Tiu ĉi viro estis kuzo de la patro de Montagu Christie Butler, eminenta Brita Esperantisto (The A.E., p. 40).

Sekve, H.M.B., en la jaro 1918, povis diri, ke lia patro naskiĝis antaŭ 144 jaroj!

En nia hejmo mia dekjaraĝa filo sin preparis por libertempa kampado. Mi lin demandis: "Kion vi tiel fervore skribas?" Respondis li, embarasate: "Leteron al vi, sendotan kiam mi estos en kampejo. Tio ŝparas al mi tempon, kiam mi estos tie".

DEVAS NE; NE DEVAS

A smoker must not smoke in a non-smoking carriage.
Fumanto DEVAS NE fumi en kupeo por nefumantoj.

Any person need not smoke in a carriage for smokers.

Ĉiu homo NE DEVAS fumi en kupeo por fumantoj.

Ĉu klare? Korespondanto skribis: "Mi aprobas tiujn kvar liniojn. Ĉiu homo devas ne fumi en nefuma kupeo, sed li (aŭ ŝi) ne devas fumi nur pro tio, ke li/ŝi sidas en nefuma kupeo". Tamen, vidu: "British E-ist", Jan. kaj Aprilo, 1962.

ITALA EPIZODO

S-ro V. J. Timmins (N.S.K.) rakontas amuzan, eĉ ridigan, aferon. "Antaŭ ok jaroj mi estis en Romo, atendante la

malfermon de la Kongreso de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperanta. Mi loĝis en hotelo, kiu situis sur la ĉefstrato, kaj ĉiun nokton estis mia kutimo ĉe enlitiĝo meti mian monujon kaj miajn vojaĝ-dokumentojn sub la kapkusenon, kompreneble pro timo pri ŝtelistoj; kaj matene post ellitiĝo mi forprenis kaj enpoŝigis ilin.

"Nu, dum mia foresto ĉe matenmanĝo ĉambristino tage purigis mian ĉambreon kaj ordigis la liton; sed iun matenon mi forgesis mian monujon kaj dokumentojn sub la kapkuseno kaj malsupreniris por matenmanĝo sen ili. Post la manĝo mi petis forpermeson, ekstaris, palpis miajn poŝojn kaj malkovris mian perdon. Ho ĉielo! Kun tremado mi rapide supreniris al mia ĉambro, kiu estis jam ordigita, iris al la litokapo, levis la kapkusenon. Jen kuŝis miaj monujo kaj dokumentoj! Kia liberigo! mi diris enmense. Mi kontrolis la enhavon de la monujo kaj trovis ĝin korekta, kaj la dokumentojn sendifektaj. Pro tio mi intencis rekomenci la ĉambristinon pro ŝia honesteco. Do, la sekvantan matenon mi ŝin atendis en la ĉambro antaŭ ol matenmanĝi.

"Kiam ŝi eniris la ĉambreon mi penadis per mia limigita Itala gratuli ŝin pro ŝia honesteco, sed ŝi kapneis, ne kompreneble mian Italan lingvon. Do, por ŝin komprenigi, mi proponis al ŝi monbileton, samtempe fingromontrante la kapkusenon. 'Ho ne, ne! ŝi ekkriis Itale, 'mi jam havas edzon!' Mi estis tute miskomprenata kaj mi devas konfesi, ke mi iome ruĝiĝis.

"Tial, por komprenigi ŝin pri la vera stato de aferoj, mi elpoŝigis mian monujon, metis ĝin sub la kapkusenon, retiris ĝin, enmanigante al ŝi la monbileton. Fine kompreno lumigis ŝiajn okulojn kaj kun ĉarma rideto ŝi akceptis la rekompencon."

GRADOJ DE ŜOKEBLECO ?

"Estas nuntempe speco de epidemio forme de historia ribelo ĉe iuj fikci-verkistoj. Ili sin rigardas "kuraĝuloj" en tio, ke ili pritraktas malfacilajn soci-problemojn tiel maldelikate, kiel ili nur povas. Pri la seks-afero du-tri el ili estas verdire maniuoloj. Kiel ajn iliaj rakontoj komenciĝas, estas certe, ke post kelke da paĝoj oni estas denove frontata de la ĝisnaŭze gurdata diskutado pri la seks-manio . . . Estas malfacile decidi pri tio: Kion fari? Se oni malpermesus tiajn verkojn ĉe la bibliotekoj, ili ankoraŭ pli vaste vendiĝus. Respondeco ĉefe restas ĉe la eldonistoj; neniu sinrespekta eldonisto devus ilin aperiĝi. Jam aperintajn, ilin oni devas toleri kontraŭvole, se oni ne starigas priliteraturan

cenzuron — kaj tion ne prikonsentus amatoj de l'libereco. Tamen, mi estas certa, ke tiu fikci-verka fazo estas nur efemera; ĝi estas morbida, sed, simile al fizika malsano, ĝi fine for-neniĝos kaj estos forgesita. Dume, ni rigore lasu ilin nelegitaj kaj ĝuu la universalan sunbrilon kaj aeron sanigan de la verkoj de Scott, Kingsley, Thackeray, George Eliot kaj Dickens".

Tiel en 1898 W. J. Dawson sin esprimis. Kiel li komentus pri nuna situacio? Per verkoj kiel *The Women*, *The Group*, *Eros Denied*, *Mrs. Grundy*, *A.B.Z. of Love*, se nomi nur kvin, ĉu ne aserteble, ke verkistoj jam atingis la fin-stacion sur la ŝlima seksovojo, la ĉiom-direblan pri ĝiaj fenomenoj entute?

MISTRADUKOJ

Prof-o G. Waringhien en sia verko "Lingvo kaj Vivo" prezentas la jenajn ekzemplojn:—

Red Designs on China: ruĝaj desegnoj sur porcelano. Korekta: Intencoj de la Bolŝevikoj kontraŭ Ĉinujo.

Workers Fashion Plates: Laboristoj fabrikas telerojn. Korekta: Tutpaĝaj modgravuroj por laboristinoj.

Surbiton Selling Three Year Old Hurdle: S-ro Surbiton vendas palisaron tri jarojn malnovan. Korekta: Vetkurado kun barilo ĉe Surbiton por trijaraj ĉevaloj poste vendotaj.

He had never been known to miss Ascot: Li neniam estis konata de F-ino Ascot. Korekta: Oni neniam vidis lin ne ĉeesti la Ascot--kuradojn.

Love's Last Shift (verko de Colley Cibber): La lasta ĉemizo de Amo. Korekta: La lasta elturniĝo de l'amo.

Plain Tales from the Hills (Kipling): Simplaj rakontoj pri la montetoj. Korekta: Cinikaj klaĉoj el la Himalajaj Stacioj.

Jen ankoraŭ kelkaj: *Mourning Bride*: Edzino de l'mateno (1) Korekta: Funerbranta edziniĝonto. *Mr. Britling Sees It Through*: S-ro B. travidas ĝin (2) Korekta: S-ro B. eltenas ĝis la fino. *The Stickit Minister* (Crockett): La pastro murdita (3) Korekta: La pastro eksigita pro malkapablo. *Sangre y Arena* (Ibanez): Blood of the Arena. Korekta: Sango kaj sablo. *The Innocence of Father Brown* (G. K. Chesterton): La Senkulpeco de Pastro B. (legu: naiveco).

Sugestoj pri iuj verkittoloj: *Our Mutual Friend*: Nia komuna amiko. *The Haunted Man*: La obsedata viro. *Great Expectations*: Grandiozaj (esper)atendoj. *Hard Times*: Mizeraj Tempo. *A Christmas Carol*: Kristnaska rakonto. *Pickwick Papers*: Skribajoj de la Klubo Pickwick.

The Mystery of Edwin Drod: La mistero pri E.D. Far From the Madding Crowd: En paco izola.

En Francujo oni mistradukis per: (1) L'Epouse du Matin. (2) M. Britling y voit clair. (3) Le Ministre Assassinee.

AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION

OFFICIAL NOTICES

25th November, 1970

New Life Member

Sinclair, Mrs. D. M., Caloundra, Qld.

New Individual Members

Casey, Mrs. M., South Caulfield, Vic.

Drastik, Mr. V. C., Revesby, N.S.W.

Ramsay, Mrs. G., Taringa, Qld.

Strudwick, Mrs. L., Campsie, N.S.W.

Hird, Mrs. R., Bardon, Qld.

Chapple, Mrs. E., St. Lucia, Qld.

Degn, Mrs. D., St. Lucia, Qld.

Munro, Mrs. J., St. Lucia, Qld.

Oxley, Mrs. P., Wavell Heights, Qld.

Jones, Mrs. M., St. Lucia, Qld.

Christie Mrs. M., Taringa, Qld.

Bardwell, Mrs. E., Taringa, Qld.

Barnes, Mrs. J., St. Lucia, Qld.

McElwee, Mrs. I., Toowong, Qld.

O'Donnell, Mrs. T. R., St. Lucia, Qld.

Derham, Mrs. B., Traralgon, Vic.

Rachiele, Mrs. R., Morwell, Vic.

Taylor, Mrs. E., Palm Beach, Qld.

Lupieri, Mr. M., Clayton, Vic.

Public Fund

Previously acknowledged	\$751.02
Gardiner, Mrs. E., Qld.	7.50
McQueen, Mr. D. Vic.	3.00
Withington, Mr. J. H., N.S.W.	1.00
Oliver, Mrs. E. C., England	6.00
C.C.G., N.S.W.	6.00
Caldera, Dr. C. J., W.A.	6.00
Morwell Esperanto Club, Vic.	5.00
Maddern, Mr. I., Vic.	3.00
Io	1.29
Wright, Mr. D. A., Qld.	1.00
	<hr/>
	\$790.81

We sincerely thank all helpers.

Interstate Competition

Points allotted

New Individual Member	5
New Life Member	50
Popular Course enrolment	2
Intermediate Course enrolment	5
Advanced Course enrolment	10
Elementary Examination success	2
Advanced Examination success	5
"Klereca"	10
Each \$1 to the Publicity Fund	1

Positions on 25th November 1970

	Quota	Points	%
Queensland	130	718	552.3
Victoria	300	1053	350.6
N.S.W. - -A.C.T.	260	803	308.8
W.A.	80	209	261.2
S. Australia	40	47	117.5
Tasmania	30	34	113.3

C. C. Goldsmith,
Secretary.

EKZAMENOJ de A.E.A.

Elementa, kun honoro: S-ino Ada May Callaghan, Norman Park, Q.

GRAVA kaj URGA

Niaj korespondaj kursoj bone sukcesas, Jen detaloj pri la ĝisnunaĵ enskriboj:

Elementa	155
Mezgrada	76
Altgrada	14
	<hr/>
	245

kaj ili nun alvenas po proksimume kvin en ĉiu semajno.

Nuntempe 25 instruantoj helpas al ni en tiu valoro laboro, sed ni bezonas minimume ankoraŭ dudek. La laboro estas tre interesa kaj ne postulas tro da tempo, ĉar oni akceptas nur la nombron kiun vi povos trakti. Se vi bone scias nian lingvon, kaj estas preta akcepti kelkajn lernantojn, bonvolu sendi al mi detalan informon, aŭ peti de mi informon pri la sistemo, kaj mi senprokraste respondos. Tiamaniere, senkoste al vi, vi povos bonege akceli LA PROGRESON DE ESPERANTO.

JURY SYSTEM DEFENDED

Judge R. Hartshorne presided over 523 criminal and civil trials by jury. Every time the jury went out he recorded his private vote. He agreed with its verdict 437 out of 523 times. In 18 with which he did not agree he felt that he might have been wrong. So he thought the jury was right in 89% in criminal and 85% in civil cases.

But, one may say, that leaves an error of about 10% in the criminal cases. On this the judge comments: "Not necessarily. Who can say with certainty that the jury was wrong in the 10% where its verdict disagreed with mine?"

In some criminal courts defendants are tried by three judges. Yet there are numerous instances where two judges vote "Guilty" and the third "Innocent". On the decision of the two judges a man may be sent to gaol for three years or more. Who is to say that the two judges decided correctly and that the one in minority was in error? Here we have

trained men disagreeing . . . what justification is there for criticising a jury whose verdict, to be legal, at least must be unanimous? ("Courtroom", Quentin Reynolds.)

LA JURIA SISTEMO DEFENDATA

Juĝisto R. Hartshorne (harcorn) prezidis ĉe 523 kriminalaj kaj civilaj procesoj kun jurioj. Ĉiufojn, kiam enĉambriĝis jurio por decidi pri kazo, li printis sian propran voĉdonon. Li konsentis kun jurioj 437 fojojn el 523. Pri 18 el tiuj, kiujn li ne konsentis, li sentis, ke eble li mem malpravas. Li do opiniis, ke la jurioj pravis en 89 p.c. de la kriminalaj, 85 p.c. de la civilaj kazoj.

Tamen oni povus diri: tio signifas erarajn decidojn pri ĉirkaŭ 10 p.c. de la kriminalaj procesoj. Responde la juĝisto komentis: Tio ne estas nepre verdira, ĉar kiu povus diri plencerte, ke la jurioj malpravas pri tiu dekprocento je kiu ilia verdikto malakordis kun mia?

En iuj kriminalaj kortumoj akuzatoj estas juĝataj de tri juĝistoj. Tamen multfoje okazis, ke de juĝistoj verdiktis: kulpa, kaj la tria: ne kulpa. Per decido de nur du el la tri juĝistoj homo tre povas iri en karceron por tri jaroj aŭ pli longa tempo. Kiu povas aserti, ke la du juĝistoj prave decidis, kaj ke la tria eraris? Jen oni vidas, ke klare kompetentaj viroj inter si malkonsentas. Kian rajton havas homoj, kritiki juriojn, kies verdikto — por esti leĝa — devas esti unanima?

LA PERFEKTA MOMENTO

Le laŭ la vojo inter "komenco" kaj "fino" ekzistas perfekta momento por ĉiu vivanta animo. Eble estas pli ol unu, sed plejparte ni estas tro okupataj, tro mondumecaj, tro junaj, tro maljunaj, tro tia, aŭ tro ĉi tia por ĝin rekoni — kaj do tiu momento povas nin eviti.

Mia perfekta momento okazis, kiam mi estis okjara. Mi vekigis iun printempan nokton kaj trovis la lunlumon inundantan mian ĉambron tra la aperta fenestro. Ĝi estis tiel brila, ke mi sidigis en la lito. Nenia soneto aŭdigis. La aero estis karese ŝarĝita per la parfumo de pilfloroj kaj lonicerco.

Mi elŝteligis el la lito kaj piedpinte forpasis el la domo. Ne estis permesite al okjarulo esti el la lito ĉihore, sed mi ĉeziris sidi sur la balancilo en la ĝardeno kaj ĝui tiun lunlumon. Fermante la pordon malantaŭ mi, mi ekvidis mian patrinon, kie ŝi sidis sur la portika ŝtuparo. Ŝi turnis la kapon al mi, ridetis, kaj, metante la fingron al la lipoj, etendis la alian manon al mi, tiel tirante min al

sia flanko. Mi alrokciĝis tiel proksime kiel eble, kaj ŝi metis la brakon ĉirkaŭ min.

La tuta najbarejo estis silente dormanta; neniam lumoj brilis en iu ajn domo. La likvide arĝenta lunlumo estis tiel brila, ke ni povis vidi la obskuran silueton de la granda arbaro pli ol mejlon for. Ĉu ne estas bele? mi flustris, kaj la patrino silente respondis, pli forte stringante mian ŝultron.

Nia alsaca ŝafhundo, Frollo, malrapide transiris la razenon, sin etendis kontente, kaj ripozigis la kapon sur la genuoj de mia patrino. Dum longa tempo ni tri restis tute senmovaj. La steloj estis palaj pro la pliforta brilo de la luno. Jen kaj denove la lunlumo trafis folieton de la rozarbedo flanke de la portiko, kie ĝi estis momente kaptita en rosero, pruntedonante al ĝi fajreron, kiu ekbrilis kiel vivanta steleto. La arbustoj estis ornamitaj per kolĉenoj de diamantoj, kaj la herbaĵo dolĉe odoris pro la mal-sekeco.

Ni konsciis, ke en la apuda arbareto estis moviĝo kaj sono inter la sovaĝaj bestoj — la kunikloj kaj sciuroj, la didelfoj kaj tamiasoj en sia propra mondo. En la obskura ĝardeno kaj en la kampoj plantoj kreskis; en la paŝtejo ĉevalido dormis apud sia patrino, kaj juna bovido alrokciĝis al sia patrino, kiel ankaŭ mi.

Baldaŭ la floroj sur la fruktarboj perdis siajn petalojn, kovrante la teron per sia blanka kaj rozkolora tapiŝo, kaj la juna frukteto ekaperos. La sovaĝ-pruna arbetoj estos plenigitaj per prunoj, rondaj kaj ardentaj kiel etaj lanternoj, dolĉigitaj de la suno, kaj malvarmetaj pro la pluvo. En alia kampo la junaj maizplantoj grade supren puŝigis; melonoj baldaŭ ornamos la serpentumantan grimpaĵon, kie nun la trumpetecaj floroj prelenigas sian provizon da nektaro prepare por la vigla vizito far la abeloj morgaŭ matene.

Entute, ĉi tiu granda karese vartanta silento ŝajnis tiel senfina; la miraklo de la vivo okazadis nevidite kaj neaŭdite. La birdeto kovanta ovojn en la morusarbo plenumis dian mision. La montetoj, neĝenitaj de la pasantaj jarcentoj, proklamis forton kaj majeston. La moviĝantaj steloj, la planedoj, kaj la sen-nombraj mondoj, ĉiuj estas regataj kaj tenataj en la sekureco de la ĉiopotenco sed milda mano de la Kreinto.

La patrino montris al la granda cedro. "Rigardu," ŝi mallaŭte flustris, "tiu stelo ŝajnas esti kaptita en la branĉoj".

Dum ni ĝin rigardis, ĉe la plej supra pinto de la pirarbo mimbirdo subite ekkantis. Ŝajnis, ke la ĝojo, kiu elfluis

el ĝia koro, sentis la devon sin esprimi. La pure oraj notoj de la kanto, liberaj kaj klaraj, kreskis kaj velkis, pulsante kaj dolĉe kunfandiĝante. Jen ili estis tiel mallautaj, ke ili estis apenaŭ aŭdeblaj, sed jen ili eksplodis en kresĉendon de ĝojo kaj ravo. Tiel subite, kiel ĝi komenciĝis, la koncerto finiĝis, kaj denove regis la nokton tiu arĝenta silento.

Okjarulo ne analizas siajn pensojn. Povas esti, ke li eĉ ne konscias pri tio, ke li estas ĉirkaŭata per senfinco, sed li vidas stelon trapikitan per cedrobranĉo, kaj li konscias puran ekstazon; li aŭdas mimbirdon kanti en al lunlumo, kaj li estas plenigita de nepriskribbla ĝojo. Li sentas la ĉirkaŭantan brakon de sia patrino, kaj li konas kompletan sekurecon.

La superreganta potenco procezo de la vivo, la moviĝado de la mondoj, kaj la flusado de la tajdoj, eble estas nekompreneblaj al okjarulo, sed li iel strange sentas, ke li rigardis tra aperta pordo, kaj li estas koninta ian perfektan momenton.—El la angla trad. Ken G. Linton.

FATHER ALBINO CICCANTI

from Italy is visiting Esperanto clubs in N.S.W., says Mamie Dunn in "Sydney Morning Herald", from which we quote: "The spread of Esperanto is his chief aim in life. One of 22 children, of whom four live in N.S.W., he "speaks English only through an interpreter" His superiors have granted him permission to devote his life to Esperanto, which language, though not directly linked with Catholicism, aids Catholic work in various countries. Pope Pius X was a patron of Esperanto and Pope Paul VI has made it an official language in the liturgy. The entire Mass may now be celebrated in Esperanto.

The article says that there are about 1400 Esperantists in Australia. In Victoria, Esperanto is a leaving subject certificate subject and an occasional extracurricular subject in N.S.W.

When Father Ciccanti returns to Italy he will help to translate a new version of the Bible into Esperanto.

LEN N. NEWELL (1902-69)

Pri li verkis Drago Kralj ("Kvar Preleĝoj", 1960):—

Li ne estas kreanto, kiu verkas multe, sed tute kontraŭe; li kreas malrapide. Ĉizelante verson post verso, li agas per ekstrema artistia konscienco. Lia paletro estas diversflanka kaj buntkolora. Inter liaj poemoj estas tre rimarkinda PARIZO, kiu finiĝas per jena strofo:

Da rimoj elĉerpiĝis la provizo:
Mi finu. Sed komprenu anĝelar':
Post morto min atendas Paradizo,
Sed iros al ĉiel' nur ŝelo — ĉar . . .
Mi lasos mian koron en Parizo".
(Tiel efektive okazis. Lia cindro ripozas en la tombejo Pere Lachaise.)

AUSTRALIA KRONIKO

TOOWOOMBA: La energia A.E.A. Informoficisto, S-ro Heber Petley, sukcesis denove fondi novan Esperanto-Societon. Post kelkmonata kurso en la "Adult Education Centre" okazis je 30-a Nov. la fondkunveno de la "Toowoomba E-Societo" en la hejmo de S-ino Harvey. Elektigi: Prez: S-ino Harvey (96 Stephen St.); Vic-Prez: S-ino L. Buchan; Sekr: F-ino M. O'Mara (218 South St.); Kas: S-ino J. Carney; Bibliotekisto: S-ino J. Lehane; Oficisto por eksterlanda korespondado: F-ino J. Veacock; Gazetar-Oficisto: S-ro H. Petley; Kromaj Komitatoj: F-ino Morgan, S-ino Petley.

La jara kotizo estas \$1, kaj 50 cendoj por lernejoj. Tiuj kiuj deziras aliĝi al A.E.A. devas aparte pagi la landan kotizon. Nova kurso komenciĝos en Februaro kaj la monataj klubkunvenoj okazos ĉiun unuan mardon en ĉiu monato.—M. O'Mara, Sekretario.

BRISBANE: La kutima pikniko de nia societo okazis je 15-a Nov ĉe Bribie Insulo, anstataŭ la unuan dimanĉon, pro tio ke niaj japanaj vizitantoj, Ges-roj Issobe, povis ĉeesti. Tre plaĉis al ni gastigi japanajn E-istojn. Ĉe la alveno S-ino Issobe ricevis amason da multkoloraj rozoj de juna Leigh Robinson. Por ĉiuj estis unika sperto facile kaj ĝoje interparoli kun eksterlandaj E-istoj. Ni ricevis inviton de S-ro Issobe viziti la "Sakura Maru" (Japana industria flot-foiro).

Ges-roj Issobe 16/11 vizitis nian klubĉambron. S-ino Issobe aspektis tre bele en sia nacia robo. S-ro Issobe prelegis pri la signifo de japanaj skribsignoj. Estis treege interesa vespero.

Ĉiuj kiuj maltrankvile atendis novaĵon pri Margot Greenhalgh dum ŝiaj du semajnoj en la Greymouth-Hospitalo (Nov-Zelando) ŝokiĝis aŭdi pri ŝia morto. Niaj pensoj estis kun S-ino W. Greenhalgh kaj ŝia edzo.

Pro la foresto de S-ro Gunter, S-ro Robinson gvidis la kunvenon de 23/11. Ni faris planojn pri la Zamenhofa Festo kaj la Kristnaska libertempo. La festo estos "Smorgasbord" kaj distra vespero ĉe la germana klubo 18/12.—W. Robinson.

MELBOURNE: S-ino Fay Koppel, 2/11, gvidis diskuton pri libroj aĉetendaj por nia biblioteko. Je 9/11 S-ro A. Baldwin parolis pri la principoj de flugado. Li montris belajn desegnaĵojn kaj informis ke baldaŭ li faros sian lastan flugekzamenon. Je 16/11 kaj 23/11 S-ro. H. Koppel prezentis magnetofonan programon, faritan de Percy Holmes en Wellington (N.Z.), je la okazo de prelego de malnova E-isto S-ro Mayor pri ties lastatempa vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Je 30/11 klubanoj rakontis laŭvice pri planoj por la alproksimigantaj ferioj.

F. R. Banham prelegis (3/11) antaŭ la Klubanoj Lions en Heidelberg.

MORWELL: Nia kunveno en oktobro estis studvespero. Ni ĉefe uzis lecionon 5 de "Practical Course in Esperanto". Ni ankaŭ aŭskultis al sonbendo pri korekta elparolo, donacita al nia klubo fare de nia membro Colin Laird, kiu deĵoras ĉe la R.A.A.F. en Sale. La lasta kunveno de nia junula grupo decidis estonte kunveni semajne.

PERTH . . . Dum la monato Novembro tri kunvenoj okazis . . . Je la 4a la Komitatanoj diskutis pri la establo de fonduso por investi monon ĉele al propra-Ligdomo. Ĉiuj detaloj estis skribataj, kaj la planon la Komitato prezentos al anoj ĉe la Generala Kunsido por fina decido . . .

Je la 11a kunvenis en ĉambro ĉe la Instruista Kolegio vigla grupo da anjo, kiu vice rakontis pri siaj vizitoj al eksterlandoj. Aliaj distris la aŭskultantojn per amuzaj anekdotoj, kaj S-ro Hawks sprite ekzercadis la mensojn de ĉeestantoj per rapida interpreto . . .

La 25an anoj kunvenis ĉe ĉambro en Suda-Perto. Diskuto pri la utilo de vesper-manĝeto je la fino de kunvenoj okazis. Ĉu aŭ ĉu ne la vespermanĝeto? Jen la demando. Kvankam ne estas devigo, ke anoj partoprenu la kutiman sistemon . . . kiu estas manĝi kaj donaci moneron . . . la ĉeestantoj praktike subtenis la aranĝon pro la fakto, ke la donacoj pagas la koston de presado de la Lig-bulteno, 'La Nigra Cigno'. Fine decidis la ĉeestantoj, ke ili prezentu la kazon al la Generala Kunsido, por ke tiu konfirmu la aferon . . . Sekvis distraĵoj en kiuj ĉiuj partoprenis . . . Entuziasmo regis pri la Zamenhofa Festo, kaj anoj anticipis sukcesan celebron. — G. Pollard.

N.S.W. Esperanto-Federacio

La 14-a konferenco okazis 31/10 en Hotelo Manly. Ĉeestis 19 ges-anoj. Laŭ la raporto de la sekretario/kasisto (S-ro G. Thatcher) la Federacio nun havas 109 membrojn, el kiuj 73 estas aktivaj membroj de la aliĝintaj grupoj. La enspezoj

superis la elspezojn je \$90.

La Federacio estos gvidata de 4 komitatoj, kies kunvokantoj estas: Financoj: S-ro J. Matasin; Kulturaj kaj edukaj aferoj: S-ro A. J. Cocking; Distraj aferoj: S-ro G. Thatcher; Literatura kaj informa komitato: S-ro C. Goldsmith. Sekretario de la Federacio estas S-ro W. Chandler, Prezidanto: S-ro C. Goldsmith.

La jara ĉefmanĝo sekvis la labor-kunsidon. Post bongusta manĝo S-ro Goldsmith disdonis diplomojn: Al S-ino Peg Ford-Lewis la A.E.A. Superan Diplomon kaj al Flora Cardale la B.E.A. diplomon. Sekvis distra programo.

La venonta konferenco okazos 13-an de Feb. 1971 ĉe Hotelo Florida en Terrigal, bela feria loko.

Vizitis nin Pastro Alpino Ciccanti el Italujo, kie li estas konata kiel "Pastro Esperanto". Li estas Franciskana monaĥo kaj multe propagandas nian lingvon. Li jam havis intervjuojn kun pluj gazetoj kaj li intencos fari viziton al Kardinalo Norman Gilroy por peti ke nia lingvo estu oficale enkondukita en la katolikajn lernejojn.

A.E.A. serĉas novan Libro-Servanton

Dum la pasintaj 3 jaroj S-ino Ivy Fallu sperte gvidis nian Libro-servon. Sed en kelkaj semajnoj ŝi deziras vojaĝi al Eŭropo; ni do bezonas novan ĉefperanton, preferere el Viktorio, kies centra pozicio ŝparas afrankon por pakajoj kaj garantias rapidan liveron.

Membroj pretaj plenumi tiun gravan postenon por nia Asocio bonvole skribu al:

The Vice-Secretary
Australian Esperanto Association
Box 2122 T., G.P.O.
Melbourne 3001

ZAMENHOF KAJ LA ANGLA

"La anglan lingvon mi posedas tre malbone kaj tial mi ne kuraĝas fari publikajn tradukojn el tiu ĉi lingvo, pro timo, ke mi eble faros eraron. Libere traduki mi povas nur el la lingvoj rusa, pola, germana kaj franca. El lingvo angla mi povas traduki nur en tia okazo, se mi havas antaŭ mi la tekston de la tradukota artikolo ankaŭ en alia lingvo, por ke mi povu kompari kaj gardi min de eraroj". 12/11/07. El letero sub gardo de F. Azorin, Meksikio.

Laŭ E. Privat (North American E-Review", Nov.-Dec. 1959) "Zamenhof ne parolis la anglan lingvon kaj certe ne sciis anglan fonetikon".

En la "Letero al Borovko" Zamenhof skribis: "... estante en la 5-a klaso de la gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan". Cu privata studo, per propra peno aŭ per helpo de instruisto dungita? En la fina raporto en 1879, kiam finiĝis lia gimnazia vivo, mankas mencio pri la angla. ("Zamenhof", M. Boulton, p. 32).

PRI ANTAUJUGEMO

Se ni honeste ekzamenas nian menson, ni ofte trovos, ke ni emas argumenti kontraŭ nova ideo antaŭ ol ni ĝin plene komprenas.

"Kiu respondas, antaŭ ol li aŭdis, tiu havas malsaĝon kaj honton." (Sentenco de Salomono 18/13).

KORESPONDADO

Kun Aŭstralianoj: Vladimir Kurгуzov, ul. Sosnovaja 48 kv. 4, Jalta -7, Crimea, U.S.S.R. Membro de Klubo "Mevo", p. kesto 33, Jalta.

PROSPEKTO: MANNHEIM

Belaj kolorfotoj, mapo urba, klariga teksto. Vizitantoj, subtenu tian uzon de E-o, petante per delegitoj aŭ turismejoj prospektojn en E-o.

ĈU LANTI PRAVIS ?

"La eldonado de La Rondo estas, mia opinie, mis. Devus ekzisti nur gazeto por la angleparolantoj kaj redaktata angle. Por la E-istoj devus ekzisti nur kelkaj revuoj ampleksaj, ilustritaj, belaspektaj, dum ekzistas jam tro da malimponaj gazetaĉoj". — Letero 20.3.46.

Tiu sinteno de la fama E-isto estas principe defendebla. Tamen li pravus, nur se la perfekta idealo estus atingebla. Fera fakto restas, nome, ke nur tre malmultaj E-istoj en ĉiu lando abonadas internacian kulturalan revuon. Pri Aŭst. radio tiu fakto estas facile konfirmebla; nur eta proporcio de Asociaj membroj ricevas gazetojn el aliaj landoj. Sekve la granda plimulto ne legus gazet-literaturon en E-o, se ne regule aperus en nia organo provizo da tiu "lingvo-nutro".

Krome The A. E. iradas regule al proks. 40 E-centroj kaj eminentaj E-istoj tra la mondo, informante ilin pri nia landa E-agado, pritraktante problemojn gravajn por la internacia E-movado kaj komentante pri aferoj interesaj por niaj samcelanoj alilandaj. Nur per E-o ni Aŭstraliaj E-istoj povas esprimi nian divilon, nian idearon kaj partopreni la vivon kaj pensadon de niaj fratoj ĉie sur la tero. De temp. al tempo E-gazetoj represas niajn artikolojn kaj prikomentas nian enhavon: per tio ili konfirmas nian kredon, ke nia redakcio

postuloj kaj bezonoj de la nuna situacio, sekvas ĝustan vojon, konforme al la —Red.

HO, LA VIRINOJ !

Konata verkisto, hejmen-reveninte, ĝoje diris: "Ĉu ne mirinde! Mi ĵus aŭdis, ke eldonisto donos al mi tre altan prezon por mia nova libro. Ja bonege, ĉu ne!" Respondis la edzino: "Pa! Rigardu nur la koton sur viaj ŝuoj!"

HOMA HONESTECO

Iu viro decidis ne plu uzi sian aŭtomobilon. Li do daŭre starigis ĝin en garaĝo kaj prenis al si biciklon. Unu tagon, farante la lastan butikviziton, li restigis ĝin ĉe pavimrando. Veninte el la ejo, li forĝesis la biciklon kaj iris hejmen. La edzino rimarkigis al li tion, ke matene li uzis la biciklon. Febre li aŭtobuse reiris la lokon, kie li lasis ĝin, kaj je sia granda plezuro trovis ĝin ankoraŭ sur ĝia starloko. Plena de danko pro la honesteco de siaj kunburĝoj, li volis fari monoferon al la malriĉuloj de la urbeto. Irinte en preĝejon, li enpuŝis monerojn en la almoŝkatolon. Ardante pro ĝojo kaj sento de bonfaro, li elpaŝis el la diservejo kaj trovis — ke iu jam ŝtelis la biciklon.

ONI VIDAS, SED NE KREDAS.

Estas certa, elpruvita fakto, ke miloj da homoj, jam (te) 1905, ĉeestis Universalajn Esperanto-Kongresojn kaj povis per unu komuna lingvo interkompreniĝi. Oni voĉe faris en E-o klerajn, intelektajn tezojn, kaj la aŭskultantoj plene komprenis la sencon de la parolajo. Per ĉortuŝaj vortoj prelegistoj forte emociigis aliajn kunvenintarojn. Sur polemika kampo oratoroj provokis akrajn, flame disputitajn vortabatojn. Tamen, tiuj faktoj, klare prezentitaj antaŭ la mondo, ĝis nun ne sukcesis konvinki la publikon, inkluzive la klerulojn. Moderna miraklo de Pentekosto, kiun ĝenerale la homoj blinde ignoras! Ili vidas, sed ili ne kredas!

Simila problemo staris antaŭ la Galilea majstro antaŭ 2000 jaroj. Amare li komentis: "Se ili ne aŭskultas la profetojn, ili ne kredos eĉ se iu levigis el la mortintojn".

La vidado ne ĉiam sekvigas la kredon. Oni vidas, sed ne fidus . . .

ANOTHER FIRST !

Dr. Franz Jonas, Austrian President, opened the 55th Universal Esperanto Congress in Vienna with an address occupying a full page in the magazine "Esperanto".

This is the first time that a **Head of State** has addressed this world assembly in Esperanto.

The opening was attended by 16 diplomats, of whom six greeted the Congress in the International Language.

S.A.T. CONGRESS, AUGSBURG

The West German Chancellor, Willi Brandt, sent a telegram of warm greeting to the annual Congress of Worker Esperantists.

"Kun simpatio por Esperanto" wrote Premier Heinz Kuehn (North-Rhine Westphalia) on his photo, sent to the "Germana Esperanto-Revuo".

The Manger A Treasure Casket?

We're in the sacred season now,
And "Greetings" beam from every store.
From megaphones canned carols flow:
—"O come, the Word made flesh adore!"

The eyes, the hands, of youngsters fall
On playthings stacked in mart and shop,
Whose owners smile good will to all,
And wish the Season had no stop.

The angels sing; the cash bells ring,
For Yuletide is a gladsome thing . . .
"The crowds, the cash, what need we
more?"

—The Christ-Child's eyes with tear-drops fill;

He sees His day dishonoured still:

—Not Him, but Midas, men adore.

Sankta Trogo, Aŭ Trezorkesto?

Ankoraŭfoje venis jam la Sankta

Kristofesto;

Butiko brilas per dekor', kun aĉetad-sugesto.

El megafonoj gekantistoj kun patoso
horas:

"La Sanktan Bebon, Dian Homon, ni
kun am' adoras!"

Etuloj gapas al ludiloj stake vic' sur
vico,

Sin pete turnas al patrin' kun fid' al am-
kaprico.

Sed vane, ve. Patrino jam fingrumas
al la drapo,

La bela dorm-cemizo, la flirte-moda
ĉapo.

La butikisto, ridetante, salutojn vigle
vortas;

La Sankta Festo ja al li profiton riĉe
portas.

Dezirus li, ke tiu temp' daŭradu dum la
jaroj —

Kaj amasiĝu lia-konte monto da dolaroj.

Angeloj kantas; sonctadas kas-maŝinoj
monaj;

Kristnasko staras ĉefa ja el ĉiuj tempoj
bonaj.

Homsvarmoj, aĉetemo, la prezroj ĝuste
altaj —

Kuniĝo de aferoj por la estroj tre
ekzaltaj.

Okuloj de la Kristo-Beb' per larmogutoj
brilas:

Ĉu Lia veno al la Ter' ankoraŭ
malutilas?

Li vidas sian Tagon celebratan sen
honoro:

Al M'idas' — Oro-Reĝo — sin
direktas la adoro.

Midaso, reĝo de Frigio, petis la diojn, ke
ĉio, kion li tuŝos, sin turau en oron.
Sekve lia manĝaĵo estis tiel transformita,
kaj li devis preĝi al la dioj, ke tiu lia
mortiga elekto estu nuligita.—Farbo.

"NOVA SENTO" : H. HYAMS

En 1915 la B.E.A. eldonis mirinde
strangan verkon en originala E-o Ĝia
temo estas teozofeca, en tio ke la animo
de senmoŝna Londonano reekarniĝas
sur Marson, idealan Utopion. Li tie
komparas la terurojn, la idiotajojn, de
nia civilizacio kun la racia ekonomio kaj
saĝa vivmaniero sur tiu planedo.

Simile al la verko "Rigardante Mal-
antaŭen" (Bellamy), kelkaj ideoj re-
formaj ankaŭ en ĉi tiu libro pli-malpli
realiĝis jam.

La lingvaĵo estas preskaŭ senmakula;
la prezento teknike bela. Presis la
libron tiu sama firmo, kiu ankoraŭ presas
la gazeton: The British E-ist. Ĝi estas
valora raraĵo, kiun bedaŭrige eldonisto
ankoraŭ ne represis.

Kun Vallienne kaj Luyken, Henry
Hyams helpis levi nian originalan
literaturon al pli alta nivelo.

En la Unua Mondmilito li, pacifisto,
malliberiĝis. Poste li kavaliriĝis! Je lia
morto en 1965 The B.E. anoncis ĝin per
kvar linioj. Okaze de lia edziĝo en
1939 li ricevis la saman mezuron. Li
meritis pli grandan mencion. Kvarcola
artikolo troviĝas en La E-a Enciklo-
pedio.

Homojn fidelajn la mondo forgesas;
ostoj kaj verko en ĉerko kunrestas.

IMPORTANT !

Reporters, please: all copy to Mr. H.
Koppel or me by first of February.—ED.